# B.TRAVEN
# REGISTARO

Mahagonciklo
dua romano



*romantraduko el la germana*

**PRI LA TRADUKO**

**Aŭtoro** B.Traven
**Titolo** Registaro

**Tradukis**
Dorothea & Hans-Georg Kaiser
laŭ la unua eldono de la romano „Regierung"
el la jaro 1932 de Librogildo Gutenberg en Berlino

**Lingve kontrolis**
Vladimir Türk

**Aranĝis**
Frank Vohla
Hans-Georg Kaiser

**Finredakto**
je la kvina de septembro
en la jaro 2026

## Ĉapitro 1

### 1/1

La politika ĉefo en la orienta distrikto estis *don Casimiro Azona*. Kiel ĉiu *jefe politico*, tiel ankaŭ *don Casimiro* unuavice celis nur sian propran prosperon. Li servis al la patrolando, ne favore al la patrolando kaj al ties loĝantoj, sed por enspezi pere de la patrolando koste de la popolo. Ĉimaniere oni pli agrable laboras kaj antaŭ ĉio oni vivas pli bone. Se oni kiel servisto de la ŝtato ne povas pli enspezi ol estro de taverno, jen vere ne estas kaŭzo, kial oni havu la ambicion meti siajn plej bonajn fortojn en la servon de nacio.

Unue celinte la sukceson nur por si, li donis sufiĉe da atento pri sia familio. Post tio sekvis liaj intimaj amikoj. Tiuj amikoj helpis kapti ŝtatan postenon; kaj li devis konservi ilian favoron, por ke ili lasu sidi lin sur tiu posteno, tiom longe ĝis kiam unu el ili pensos la tempon veninta nun por si mem konkeri la postenon.

Ĉiuj liaj familianoj ĝis la plej malproksima membro estis prizorgataj: nevoj, kuzoj, bofratoj, onkloj, fratoj kaj ties nevoj, kuzoj, bofratroj kaj filoj. Ili restadis en siaj oficoj kiel impostaj administrantoj, urbestroj, poŝtejaj estroj, policaj ĉefoj, pacjuĝistoj tiom longe, kiom li mem povis teni sin en la ofico. Tial ili ĉiuj estis je lia flanko, kion ajn li faris, egale kiom ajn li ŝtelis. Li nur ne rajtis eventuale molesti ilin mem per ekzamenoj, kontroloj kaj per leĝoj, kiam ŝtelis ili. Ĉio, kion ili faris, ĉu laŭleĝe aŭ kontraŭleĝe, li devis sankcii.

Tiu ĉi maniero de administrado de la ŝtata prospero komenciĝis supre ĉe *don* Porfirio, ripetiĝis tiel plu en la ministerioj, tiel estis

daŭrigata ĉe la generaloj, ĝi esprimiĝis sammaniere ĉe la guberniestroj de la diversaj federaciaj ŝtatoj kaj estis tiel daŭrigata ĝis la alkaldo de la plej eta komunumo.

La tuton oni nomis en la gazetoj kaj lernejaj libroj: la saĝa kaj bone ordigita organizo de la respubliko.

Ĉar supre estis malmultaj aŭ plej ofte tute neniuj kapabloj, tial oni esperis malsupre ecĉ pli malmulte. La loĝantaro ĝojis, ke ĝi rajtas vivi. Kaj se la najbaro neatendite estis murdita, ĉar li ekscitiĝis pri la fuŝmastrumado de la administrado kaj pri tro senindulga ŝtelado kaj subaĉetado, jen liaj plej proksimaj najbaroj kaj amikoj ĝojis, ke tio ĉifoje ne trafis ilin mem. Oni enfosis la murditojn kaj tuj forgesis ilin. Oni rememoris pri ili nur por ĉeokaze diri: „Kial li ne tenis sian langon en la buŝo?“

**Rimarkoj**
alkaldo = vilaĝestro, vilaĝa juĝisto
*don* = sinjoro

## 1/2

*Don Casimiro* havis amikon, jen don *Gabriel Orduñez*.

Tiu *don Gabriel* estis brutkomercisto, sed li malgajnis preskaŭ ĉion, kion li posedis, pro hazardoludoj, kaj tion, kio postrestis, li fordrinkis.Poste li entreprenis vendejon, ĝis kiam liaj kreditoroj iutage devis fermi ĝin.

Li estis amiko de *don Casimiro* ekde ilia kuna lerneja tempo. Kaj kiam li iutage lamentis ĉe *don Casimiro*, kiel malbone li fartas kaj kiel ĉiam persekutas lin la malfeliĉo, diris *don Casimiro* al li: „Mi atentos, kion mi povos fari por vi.“

Kelkajn semajnojn pli poste, kiam *don Casimiro* venis dum inspektada vojaĝo tra la distrikto, li ie retrafis *don* Gabrielon. *Don* Gabriel memoris lin pri sia malfeliĉo, kaj ĉar *don Casimiro* havis bonan koron kaj ne povis vidi suferi siajn amikojn, li diris: „Mi ne havas multon por vi. Ĉiu posteno estas okupita. Kaj ĉiuj gluiĝis al la posteno kiel peĉo. Sed mi havas tie malgrandan lokon kun indiĝenoj, Bujvilum. Malicaj uloj estas tie, ili ne lasas subigi sin, ili ribelas kontraŭ ĉio. Se mi sendas soldatojn tien, ni ĉiam forbruligas ĉiujn kabanojn. Sed ni ne povas kapti iun. Ili ĉiam sufiĉe rapide skuas la polvon de la piedoj kaj fuĝas en la ĝangalon, kie ni ne povas eligi ilin. Se ĉio forbruliĝis kaj ni sternis la maizkampojn, ili revenas post certa tempo kaj restarigas sian vilaĝon, kvazaŭ estus okazinta nenio. Kaj tiam ni lasos ilin denove en paco. Impostojn ni ne povas ricevi de ili. Se vi volas iri tien, tiukaze mi faros el vi tie lokan sekretarion. Vi malfermos lernejon. Kaj mi donos al vi precipan koncesion vendi brandon. Vi malfermos *cárcel*-on, municipan karceron, bonan prizonon. La ceteran vi ja scias. Do, se vi volas iri tien. Tiun okupon vi povus ricevi. Alian mi momente ne havas por vi.“

*Don* Gabriel havis tre taŭgan revolveron kaj li estis eksterordinare bona celpafisto. Kaj ĉar la indiĝenoj ne havis revolveron kaj ankaŭ ne povis aĉeti iun, ĉar ili ne havis monon kaj ĉar krome estis severe malpermesite vendi al ili revolverojn aŭ fusilojn, escepte de ĉasfusiloj ŝarĝeblaj tra la buŝo, *don* Gabriel akceptis la postenon. Li transprenus ankaŭ la gardadon de bolanta peĉokaldronego en la infero, se oni ofertus la okupon al li. Li tiel profunde sidis en la kaĉo, ke ne restis elekto por li. Serĉi elirvojon el sia ekonomia krizo helpe de honorinda laboro, pri tio li rezignis jam antaŭ preskaŭ dudek jaroj. Posteno en la ŝtato ĉiam estas la plej sekura. Oni devas nur malfermi kaj malfermteni la okulojn por rapide kapti tion, kio ie elrigardas videbla ĉe la nazo.

Pri la detaloj de lia nova ofico oni ne devis inici *don* Gabrielon. Specialaj administradaj leĝoj por tiu loko ne ekzistis. Kaj eĉ, se ili ekzistus, *don* Gabriel ne devus peni scii ilin aŭ ilin eĉ atenti. Li estis ja amiko de la *jefe politico*. Li agis laŭ plej bona bontrovo kaj laŭ plej bona plaĉo. Li devis sendi ĉiun monaton raporton al la ĉefo, en kiu li raportis pri la nombro de la naskoj, pri la nombro de la mortintoj, pri la nombro de la brutaro. Se li estus trudata pafmortigi kelkajn indiĝenojn, li povus raporti tion aŭ ne. Se li sciigus tiajn aferojn, li devus atenti nur, ke li ne forgesu skribi, ke li agis pro necesa memdefendo kaj, ke la pafmortigito publike insultis la guberniestron. Ekzamenado ne okazus, ĉar tio kostus monon. Kaj ĉar oni ne atendas de sekretario, ke li mensogas en raporto, speciale, se li estas amiko de la politika ĉefo kaj de tiu rekomendita por la ofico.

## 1/3

Bujvilum estis sendependa pueblovilaĝo de la indiĝenoj. Ĝi estis priloĝata de la baĥajontekoj, jen tribo de la celtaloj.

La baĥajontekoj estis tre agemaj indiĝenoj, tre fervoraj agrokulturistoj kaj fervoraj brutbredistoj. Iliaj brutaraj bestoj estis kaproj kaj ŝafoj, krome sufiĉe da porkoj. La porkoj havigis al ili viandon kaj grason. El la vendo de la porkoj al vagadantaj aĉetistoj ili enspezis la monon por aĵoj, kiujn ili mem ne povis produkti, kaj kiujn ili aĉetis en la pli grandaj lokoj de la regiono. Ekzemple maĉetojn, hakilojn, kotonŝtofojn, kudrilojn kaj pinglojn, pulvoron kaj pezajn plumbokugletojn por fusiloj.

El la lano de la ŝafoj iliaj inoj faris kovrilojn, jupojn, ĥorongojn kaj rubandojn. Ĉar tiuj aĵoj estis tre altkvalitaj, ili povis vendi multajn el la memfaritaj aĵoj kiel varojn en la granda urbo Jovel sur la foirplaco. Iliaj varoj ĉiam estis tre deziratajn kaj ili povis fari

neniam sufiĉe da ili por kovri la bezonon.

La tero de Bujvilum estas apenaŭ fekunda. Tial la hispanaj kolonialistoj ne tro avide postulis ĝin. Kiam Meksiko fariĝis sendependa, meksikanoj provis eksetli tie. Sed la indiĝenoj bone sciis tiel aĉigi la restadon por la latinamerikanoj, ke ili ĉiam denove foriris, almenaŭ tiuj, kiuj vivis ankoraŭ. Alikaze la indiĝenoj en sia distrikto certe nur malofte suferigis iun, se ili ne ĵuris pro bonaj kaŭzoj venĝon al iu.

La baĥajontekoj ribelis kontraŭ la registaro kaj kontraŭ individuoj ĉiam nur en tiu kazo, se oni ne lasis ilin en paco en ties distrikto. Preterirantaj vojaĝantoj kaj komercistoj estis sekuraj, se ili restadis nur tagon kaj nokton en la loko. Sed, se ili provis disvastigi sian restadon, la indiĝenoj fariĝis malkonfidemaj, ĉar ili supozis, ke tio povus esti preteksto tie kroĉiĝi kaj setli. Se la nova alveninto post du tagoj estis plu en la loko, oni evidentigis al li, ke lia tempo tie pasis, kaj ke li bone agus, se li pasigus la sekvan nokton en la plej proksima loko.

Se tia ulo ne atentis la averton, li eble estis murdita je la sekva mateno, sed tute certe je la tago poste. Liaj varoj aŭ iuj aliaj posedaĵoj troviĝis netuŝitaj en angulo en la *cabildo*, kie li dormis.

La registaro aŭ pli bone dirate la guberniestro ĉiam denove provis meti sub kontrolo la lokon. Ne ĉar tiu tiom zorgis pri la bonfarto de la indiĝenoj, sed multe pli pro tio, ĉar ili de tiuj fervoraj homoj ne povis enspezi impostojn. Posteno de guberniestro estas sen iu tento, se ne havigeblas impostoj.

Tute sen pagado de impostoj la indiĝenoj tie kompreneble ne estis. Se ili kondukis porkon aŭ kelkajn kaprojn al alia loko por vendi ilin tie sur foirplaco, ili devis pagi sian forirplacan kotizon.

Krome la urbestro postulis por ĉiu vendita besto kapmonon, por plenkreskaj kaproj peson kaj por plenkreskaj porkoj du pesojn. Por pli junaj bestoj malpli.

Kiam ili venis kun siaj bestoj tra lokoj ne tiom grandaj, kie ili ne intencis vendi ion, ĉar ne estis aĉetantoj aŭ ĉar la prezoj estis aĉaj, la alkaldo postulis kiel kotizon dudek centavojn por ĉiu besto pelata tra la loko. Nur malofte ili povis preteriri lokojn, ĉar la padoj kondukis ĉiam nur tra lokoj kaj, ĉar padoj ne laŭplaĉe elekteblis pro la vepro aŭ pro rokaj montaroj.

Ankaŭ, se la indiĝenoj intencis vendi siajn faritaĵojn, ili devis pagi foirplacajn kotizojn; kaj se ili ne havis monon, oni forprenis de ili tiom de iliaj varoj, ke la foirplaca kotizo estis pli ol nur kovrita.

Kontraŭ tiuj tributoj la baĥajontekoj ne protestis. Ankaŭ ĉiu alia indiĝeno pagis ilin. Kaj ili jam pro tio ne povis protesti kontraŭ tio, ĉar ili ne posedis potencon en aliaj lokoj.La guberniestro sendis dudek soldatojn al Bujvilum. Ĉiuj viroj kaj junuloj, kiuj ne sufiĉe rapide fuĝis en la ĝangalon, estis kaptitaj kaj devis konstrui *cabildo*-n, urbodomon. Oni konstruis ĝin, ĉar aliaj konstrumaterialoj ne havigeblis, el argilaj brikoj. Ĝi ricevis grandan ĉambron, kiu fariĝis la oficejo de la sekretario. Ĝi ricevis duan ĉambron, kiu fariĝis la lerneja ĉambro, tria ĉambro servis kiel loĝejo por la sekretario, kaj kvara ĉambro fariĝis *carcel*, do la prizono.

La prizono estis tre grava. Kiel ĉie surtere. Kun la konstruo de prizono ĉie komenciĝas la organizado de civilizita ŝtato.

Kiam la *cabildo* estis preta, oni inaŭguris ĝin. La nova sekretario disdonacis kelkajn piroteknikaĵojn, kiuj vespere kun granda kriado estis forbruligataj. Li donacis plu bareleton da brando por

inklinigi la indiĝenojn al pacemo. Li faris parolon, en kiu li multe parolis pri la *patria* kaj pri *amor para la patria*, pri amo al la patrujo, kaj li sankte promesis, ke li entreprenos siajn negocojn kun *honradeza*, kun honorindeco kaj justeco. Tiam parolis la *jefe*, la estro de la indiĝenoj. Li promesis nome de sia tribo subteni la sekretarion je ĉiuj justaj agoj kun ĉiu sia potenco, por akceli kun ĝojo la prosperon de la loko kaj de ĉiuj indiĝenaj loĝantoj. Al la guberniestro la sekretario sendis mesaĝon, en kiu li raportis pri la bona konkordo, kiu ekzistas inter la indiĝenoj kaj la reprezentanto de la registaro, la sekretario mem. La guberniestro sendis dankmesaĝon kun la solena promeso ĉiam helpi al la loko per sia tuta protekto.

Tiam oni instalis telefondraton, kiu ligis la lokon kun la plej proksima *municipalidad*, do kun la municipo, la komunuma administrejo, kie troviĝis la garnizono.

La indiĝenoj, kiuj fuĝis kun la familioj en la ĝangalon, revenis kun sia brutaroj kaj komencis kultivi siajn kampojn. Regis paco, konkordo kaj harmonio.

Tuj post instalo de la telefonlineo venis malgranda komisiono sendita de la sanitara oficejo. Oni vakcinis ĉiujn indiĝenojn kaj ili ricevis kelkajn dozojn kun kinino.

Du semajnojn poste la soldatoj enviciĝis antaŭ la municipa sidejo, oni komandis stari ilin en atentopozo, kaj tiam ili surŝultrigis sian fusilon kaj marŝis hejmen en sian garnizonon.

**Rimarkoj**
*amor para la patria* = amo al la patrujo
*cabildo* = urbodomo, municipa sidejo, municipio
*celtaloj* = germane: ‚Tseltalen‘

*honradeza* = honorindeco
*ĥorongo* = lankovrilo ĉiam kun enmeza entranĉaĵo por la kapo, uzata kiel mantelo, similas al la sudamerika „ponĉo“
Jovel = praa indiĝena nomo de *San Cristobál*, plej ofte uzata de la celtaloj kaj cociloj
*municipalidad* = komunuma administrejo
*patria* = patrio, patrolando, hejmlando

## 1/4

La sekretario ricevis ĉiun monaton dek kvin pesojn kiel salajron de la registaro.

De tio li ne povis vivi kun sia multnombra familio. Sed la registaro ankaŭ tute ne atendis, ke li vivu de tiu salajro.

Li estis ja sekretario de loko, en kiu loĝas fervoraj kaj agemaj indiĝenoj.

Krome ankaŭ neniu atendis de guberniestro aŭ de polica ĉefo aŭ de urbestro aŭ de impostoficisto, ke li vivu de sia salajro. Ankaŭ la politika ĉefo de la distrikto ne pensis pri tio, ke li vivu de sia salajro.

La sekretario devis nun mem provi atingi bonan enspezon. La politika ĉefo atendis de li, ke li transdonu konsiderindan parton de siaj enspezoj, tiel kiel ankaŭ polica ĉefo postulas, ke ĉiuj policistoj, kiuj troviĝas sub lia komando, donu al li sufiĉe el siaj kromenspezoj, por ke li povu lasi ilin en la ofico. Kiel ili atingas siajn kromenspezojn, ne estas afero lia. Ili ja ĉiuj denaske havas kapon por pensi, kaj li donis al ĉiu taŭgan revolveron kaj ekipis ilin kun abunda aŭtoritato.

Kaj la sekretario laboras kaj laboras por ricevi siajn enspezojn kaj por kontentigi la dezirojn de la politika ĉefo, kiu skribas ĉiun duan semajnon al li, ke li denove bezonas *consideración*, do kroman konsideraĵon, kaj kial ĝi ne venas.

Laŭ la maniero kiel laboras la sekretario, pasas ses monatoj aŭ dek aŭ eĉ dekok en kvieto.

Tiam iumatene li trovas mortpikita sian plej bonan bovinon. Unu semajnon poste lian lastan bovinon. Tiam lia ĉevalo havas sukan maĉetvundon je kruro. Tiam iutage la telefonkablo estas tratranĉita. Li laŭiras la telefonkablon por trovi la damaĝon. Je loko de la vojo, kie la vepro estas tre densa, li trovas novan belan ruĝan lanrubandon. Li kliniĝas por levi ĝin, kaj maĉeto preterrapidegas lian kapon en la distanco de harolarĝo. Li ne plu kuraĝas eliri de la municipo. Telefoni li ne povas. Iuvespere li staras, fumante cigaredon en la *pórtico* de la municipo, por rigardi pro la vetero. Kiam li volas reiri kaj ĝuste intencas fermi la pordon, krakas pafo. Peza plumbokuglo traboras lian ĉapelon kaj alia batiĝas en la pordon.

La municipo staras cent paŝojn for de la plej proksima kabano de la vilaĝo.

Je la sekva mateno li kaj ties familio surseliĝas ĉevale kaj foriras por reveni neniam. Neniu venas por adiaŭi de li. La vilaĝo estas kvazaŭ morta. Sed li scias, ke post la bambuaj bastonoj de la kabanoj cent okuloj rigardas lian foriron.

Se li ne foriras, li estos du aŭ tri aŭ dek tagojn pli poste morta viro.

Kelkajn semajnojn poste venas la soldatoj. La *jefe politico* dum

tri monatoj ne ricevis raporton kaj tial li komandis la soldatojn al la loko.

La soldatoj traserĉis la kabanojn. Ili ne trovas homojn hejme. Ankaŭ la kuirilaron oni forportis.

Ili forbrulas ĉiujn domojn. La municipan konstruaĵon kun la rompmalfermita prizono ili lasas stari.
Sian marŝprovianton ili formanĝis. Kaj ĉar ili trovas en neniu kabano eĉ nur sekan tortiljon, ili formarŝas.

Post kelkaj monatoj la guberniestro ree decidas meti la lokon sub kontrolon kaj impostdevon de la registaro. La politika ĉefo havas amikon, al kiu li devas doni oficon, ĉar la amikon ĉiam persekutas malbonŝancoj kaj li eterne troviĝas en bezono de mono.

La soldatoj alvenas kaj tuj kunvenigas la novan sekretarion kun ties familio. Sed la nova sekretario ne havas loĝejon. La municipon oni forbruligis. Kie ĝi iam staris, kreskas drate duraj herboj kaj ĝermanta vepro.

La vilaĝon oni rekonstruis. La maizokampoj verde kreskas. Sed eĉ ne unu homo estas en la vilaĝo. Neniu kapro, neniu ŝafo. Neniu kuirilaro estas en la kabanoj.

La ĝangalo estas profunda, malhela kaj minacanta. Ĝi ne havas padojn. Ĝi havas marĉojn, jaguarojn, serpentojn kaj moskitojn.

La serĝento, kiu gvidas la soldatojn, estas indiĝeno. Li scias, kio estas ĝangalo kaj vepro. Li eĉ ne pensas pri tio kapti indiĝenojn el la ĝangalo por rekonstrui la municipon.

Sed la vilaĝon oni rekonstruis. La maiz- kaj fazeolkampoj kreskas

verde kaj promesoplene. Impostaj enspezoj kvazaŭ jam mansalutas.

La politika ĉefo, kiu ĉiam estas en bezono de mono kaj, kiu tial faris el sia amiko la plej novan sekretarion, ne povas lasi la vilaĝon en paco. Li bezonas monon, kiu elvringeblas, se la sekretario estas kapabla pri sia posteno.

Li sendas mesaĝon al alia sendependa indiĝena vilaĝo, kiu troviĝas pli proksime al la garnizono. Kaj li komandas al la indiĝena *jefe* de tiu vilaĝo sendi de tiu vilaĝo dudek virojn, kiuj tie, sen tio, ke ili ricevos pagon por sia laboro, sen tio, ke ili ricevos manĝon por tio, devos rekonstrui la municipon, ĉar la nova sekretario bezonas oficejon, loĝejon, telefonlineon kaj prizonon.

Oni inaŭguras la *cabildon*. La indiĝenoj revenas el la ĝangalo. Oni forbruligas petardojn kaj faras parolojn pri la *patria*. La soldatoj surŝultrigas siajn fusilojn kaj formarŝas.

Post dek monatoj aŭ dekdu monatoj flugas iutage maĉeto ankoraŭ je harolarĝo preter la kapon de la nova sekretario.

La vilaĝon oni forbruligas. Tiam ree kreskas drate duraj herboj je tiu loko, kie staris la nova municipa konstruaĵo kun la nova prizono. Kaj tiam la soldatoj revenas.

Tiel tio okazas de cent jaroj. Ĝi ripetiĝas kiel la karaj jarsezonoj. Ĉu okazas revolucioj kaj militribeloj aŭ ne. Ĉu oni murdas prezidantojn aŭ ĉu ili iras al Eŭropo pro sankonsideroj, por ke oni ne murdu ilin.

Kaj ĉio ĉi ne ripetiĝas pro tio, ĉar la sendependaj indiĝenoj estas

barbaroj kaj ribeluloj kaj murdistoj aŭ ĉar ili ne povas envicigi sin en la organizadon de juste administrata ŝtato, sed ĝi okazas tial, ĉar guberniestroj kaj politikaj ĉefoj kaj aliaj oficistoj eterne estas en bezono de mono, ĉar ili ludas, fanfaronas kun pompo, jen armeo de parazitoj, kiuj nomas sin amikoj kaj parencoj, por ke oni indulgu kaj subtenu ilin, kaj ĉar ili havas trifoje pli da inoj ol ili povas nutri, vesti kaj ornami per juveloj.

La eklezion la baĥajontekoj sufiĉe frutempe detenis de la nuko. Ĝi ne damaĝis al ili, ĉar ili faris kun la unuaj fiaj pastroj kaj monaĥoj same tiel, kiel ili faris tion kun la sekretarioj. Al indiĝenoj oni ne devas konsili ion aŭ marteli bibliajn diraĵojn en iliajn kapojn. Ili ankaŭ ne bezonas komunistajn kaj socialistajn partiprogramojn.

**Rimarkoj**
*cabildo* = urbodomo, municipa sidejo
*consideración* = konsidero, respekto
*patria* = patrujo, patrolando
*pórtico* = kolonhalo

## 1/5

Okazis de tempo al tempo, ke Bujvilum kvin jarojn kaj pli longe ne ricevis sekretarion. La loko havis la bonŝancon, se ĝi estis forgesita. Kaj oni forgesis la lokon plej facile, se la plej supraj regantoj interrilatis malamike.

Nova guberniestro estis elektita. Li asertis havi la plimulton. Sed lia kontraŭkandidato, kiu malvenkis, asertis kaj pruvis, ke okazis gravaj balotaj fraŭdoj, kaj ke tiukaze, se tiuj fraŭdoj ne estus okazintaj, estus li la guberniestro.

Ankaŭ la kontraŭkandidato pro tio ekagis en sia guberniestra ofico kaj starigis sian registaron en alia urbo de la federacia ŝtato. Li hastis ennestigi rapide ĉiujn siajn amikojn, por ke ili subtenu lin.

La oficiale elektita guberniestro agis same por havi grandan sekvantaron. La plej bona kaj plej sekura sekvantaro estas ĉiam tiu, kiu kiel sekvantaro enspezas monon.

Sed ĉar inter tiuj du guberniestroj ne ekestis unueco, ankaŭ la pli frua guberniestro pro patriotaj kaŭzoj sentis sin devigita plu restadi en la ofico.

La federacia registaro, kiu ne volis esti neagema en tiu kverelo, por ke ĝi ne perdu la kontrolon pri la ŝtato, ordonis provizoran guberniestron, kiu samtempe komencis sian oficon.

Estas ja tiel, ke ekzistas en Meksiko ĉiam du registaroj, la civila kaj la militista. Ĉiu federacia ŝtato havas du regantojn, la guberniestron kaj la *jefe de la operaciones militares*. Tiu *jefe* estas la militista ĉefo de la federaciaj trupoj, kiuj troviĝas en garnizonoj de la ŝtato.Ĉar tiu generalo estis respondecigita de la federacia registaro por la publika paco en la ŝtato, li sentis sin devigita nun same instali provizoran guberniestron, ĉar li rifuzis konfidi la alian kaj per tio al la militista protekto de la provizora guberniestro, kiu estis nomumita de la federacia registaro.

Tiel okazis, ke en la ŝtato samtempe enoficis kvin guberniestroj, kiuj ĉiuj batalis unu kontraŭ la aliaj, ĉar neniu el ili volis cedi. Ĉiu havis longan vicon da amikoj kaj parencoj, kaj ĉiu el ili atentis pri tio bone eluzi la tempon de sia regado, por ne esti molestata de iuj monzorgoj dum la tuta plua vivo.

Ĉiuj substrekis tion, ke ilin instigis pura kaj malegoisma amo al la patrio.

Similaj bataloj okazis de tempo al tempo ankaŭ inter la ĉefoj politikaj. Kaj tiuj tempoj, estis tiuj, kiam la indiĝenoj de sendependaj vilaĝoj troviĝantaj en foraj regionoj, havis pacon; ĉar estas tiel jam ĉe la hundoj: Se oni batalas pri la ŝinko, oni lasas la ostojn por la unua en paco. La ostoj estos en la vico, se la decido pri la ŝinko estas farita.

Sub la diktatoro *don* Porfirio la decido pri la ŝinko estis farita. Li havis ĝin kaj senhaste dispartigis ĝin inter la longa kaj grasa vosto de siaj parencoj kaj amikoj, kiuj sucis je lia felo.

Tiuj, kiuj estis tro foraj de li, por povi damaĝi aŭ utili al li dispartigi la ŝinkojn, devis esti kontentaj pri la ostoj.

Kaj ostoj estis ĉie en la vasta lando. Ĉiu, kiu laboris, ĉiu, kiu produktis ion, kiu perlaboris ion, estis osto, kiun ronĝi ĝis la medolo ĉiu rigardis sia tasko, kiu havis postenon. Kaj de ekstere kaj de interne rigardate, oni akiris la impreson, ke havi postenon signifas nenion alian krom havi okazon pliriĉigi sin.

Laŭleĝan persekutadon oni devis timi nur tiukaze, se leviĝis suspekto, ke la enhavanto de posteno malafable interrilatas kun la diktaturo kaj eble eĉ grakas pri demokratio, ĝenerala balotrajto kaj pri malpermeso de la reelekto de elektita prezidanto. Tio estis la ununura krimo, pri kiu oficisto povis kulpigi sin. Pri ĉiuj aliaj krimoj kaj fuŝmastrumadoj li mem juĝis. Kie diktatoro supre sidas sur la ranga eskalo, tie sidas sur ĉiuj rangaj rungoj de la eskalo same nur diktatoroj. La diferenco estas nur tiu, ke la plej granda parto de ili sidas pli sube sur la eskalo ol la aliaj.

Tiuj, kiuj sidis iom pli sube estis la kapitalistoj, la fabrikistoj, la posedantoj de haciendoj, la minkompanioj, la posedantoj de plantejoj, la bienuloj.

**Rimarko**
*jefe de la operaciones militares* = la militista ĉefo

## 1/6

*Don* Gabriel ja ne plu estis bebo. Li sciis kio okazis al la sekretarioj en la sendependaj pueblaj vilaĝoj. Centoj de ekzemploj estis konataj al li tiel, kiel al ĉiuj homoj en la federacia ŝtato.

Sed li sciis ankaŭ, same pro centoj da ekzemploj, kiom povas enspezi sekretario en tia indiĝena komunumo, se li estas lerta rilate la postenon.

Kaj tio decidigis lin kun jubilo akcepti la postenon ofertatan al li.

Kiel ĉiuj sekretarioj faris tion, tiel ankaŭ li intencis ronĝi la trovitan oston tiom rapide, kiom tio iel ankoraŭ decas, por poste skui same rapide la polvon de la piedoj. Por foriĝi ankoraŭ en tiu momento, kiam la indiĝenoj ankoraŭ ne implikiĝis tute firme en sovaĝan koleron.

La indiĝenoj certe ne estis malicaj laŭ karaktero. Ili estis pacemaj, se oni lasis ilin en paco. Ili ne estis militemaj. Ili estis pacemaj agrokulturistoj. Kaj agrokulturistoj ĉie estas pacemaj laŭ karaktero, se oni ne molestas ilin sur ties tereno. Ili ne havas alian deziron krom pace kultivi siajn kampojn, konservi sian familion, plenkreskigi siajn infanojn kaj ĝui trankvilan maljunecon. Agrikulturo malpermesas militistan sintenon. Kampoj kaj gregoj aĉiĝas, se oni devas troviĝi sur pado de militiro. Kaj se parto de

ili ĉe militmarŝoj detruas la kampojn de siaj najbaroj, jen la najbaroj, al kiuj oni dezertigis la kampojn, estas devigitaj pro instinkto de memkonservo morgaŭ invadi la kampojn de siaj atakintoj. Aventuremo ne naskas agrokulturistojn. Aventuremo kaj militista spirito naskiĝas nur tiukaze, se la propra tero ne plu nutras la agrokulturiston.

*Don* Gabriel konis la lokon Bujvilum kaj li konis la baĥajontekojn. Kiel brutkomercisto li sufiĉe ofte havis rilatojn kun ili, kaj li ĉiam sufiĉe sukcese negocis kun ili.

Ĉar li sciis, ke la homoj estas pacemaj laŭ karaktero, tial li ankaŭ ne timis iri al ili kiel sekretario.

## 1/7

Tri jarojn la baĥajontekoj ne havis sekretarion. La lasta sekretario mortis en lito pro febro aŭ pro stomaka tordiĝo. Ĉiukaze li mortis pro natura kaŭzo. Li certe ne havis la tempon troigi la aferon tiom ĝis plumbokugloj fajfus preter lian kapon por averti lin, ke nun estas veninta la tempo por mem foriĝi kaj kun la tuta familio. Ankoraŭ kelkajn monatojn lia edzino restadis tie sola kun la infanoj kaj prizorgis la negocajn aferojn. Kiam ŝi jam elvendis sian *tienda*, sian vendejon, ŝi revenis al sia hejmlanda loko *Shcuchuitz*.

Poste la loko postrestis sen sekretario, ĉar la politika ĉefo ne trovis taŭgan viron, kiu volis iri tien. Kaj ĉar tiuj, kiuj volis iri tien, ne kapablis paroli celtale eĉ unu vorton.

Kiel ĉiu sekretario, tiel ankaŭ *don* Gabriel venis kun kelkaj soldatoj; en tiu ĉi kazo ne por esti protektata, sed ĉar tio estis la ununura dokumento, kiun la indiĝenoj povas legi kaj kiu signifas,

ke *don* Gabriel estas la nova kaj laŭleĝe nomumita sekretario, kiu havas la taskon tie prezenti la registaron.

La indiĝenoj, kiuj kiel ĉiam, kiam soldatoj proksimiĝis al la loko, sekve tion ankaŭ ĉifoje fuĝis en la ĝangalon, revenis tre rapide, kiam ili vidis, ke la soldatoj paceme kunstarigis siajn fusilojn antaŭ la *cabildo*, la municipo, ke ili ekbruligis siajn bivakfajrojn kaj post la kuirado sternis sin por dormi sen iri en la vilaĝon kaj traserĉi la kabanojn.

Kiam kelkaj indiĝenoj kiel skoltoj revenis en la vilaĝon, la soldatoj aĉetis de ili kokinojn kaj ovojn kaj pagis kun ĝusta mono sen ŝteli ion. Post la aĉetado la indiĝenoj denove iris al sia kampadejo por kuiri vespere.

Je la sekva mateno *don* Gabriel hisis sur alta paliso antaŭ la municipo la landoflagon, la soldatoj staris en atentopozo, kaj la trumpetisto blovis la flagosignalojn.

Poste la soldatoj formarŝis.

Je la vespero *don* Gabriel malhisis la flagon kaj ekbruligis kelkajn piroteknikaĵojn.

Brandon li ne devis eldoni, ĉar tiuj viroj, kiuj jam revenis en la vilaĝon, ne eliris el siaj kabanoj.

Ankoraŭ je la sama vespero kelkaj junaj viroj iris en la ĝangalon por diri al la homoj, ke la soldatoj formarŝis kaj, ke nur la *nuevo* sekretario kun sia edzino postrestas en la municipo.

Matene el ĉiuj kabanoj leviĝis la fumo de pacaj fornelaj fajroj.
Iom post iom la viroj venis al la municipa konstruaĵo kaj la *jefe*

de la indiĝenoj, la tribestro, enkondukis ilin ĉe la nova sekretario kaj prezentis siajn *delegados*, siajn elektitajn konsilistojn.

Kiam ili vidis, ke *don* Gabriel intertempe jam malfermis sian vendejon, ili tuj komencis aĉeti. Iom pli poste venis ankaŭ jam la inoj kaj infanoj kaj aĉetis salon, pinglojn kaj kudrilojn, dolĉaĵojn, tabakon kaj kafon.

La municipo starigita nur el maldikaj stangetoj priĵetitaj per argilo kaj kovrata per palmtegmento, estis en mizera stato.

Sen tio, ke *don* Gabriel diris eĉ nur vorton, venis la viroj posttagmeze kaj komencis ripari la domon kaj speciale la likantan tegmenton. Ili ankaŭ anstataŭis la parte putriĝintan pordon de la prizono per nova stabila latisa lignopordo.

„Por ke la murdistoj kaj krimuloj ne povu forkuri“, diris la *jefe*, kiam liaj viroj alportis la novan pordon.

*Don* Gabriel donis al ĉiu viro, kiu estis laborinta je la municipo, glaseton plenan de brando. La *jefe* ne akceptis ĝin. Li diris, ke li ne trinkas *aguardiente*, brandon.

Je la vespero diris *don* Gabriel al sia edzino: „Kara, la *viejo*, la maljuna kaciko, ne drinkas. Tio estas suspektiga por mi.“

„Ankaŭ li ja drinkos“, optimisme diris la edzino. „Li estus la unua, kiun mi konas, kiu ne trinkas brandon. Ofertu la brandon al li, se li estas sola kun vi.“

**Rimarkoj**
*aguardiente* = brando
*cacique* = indiĝena tribestro, kaciko

*delegado* = prezentanto, parolisto
*nuevo* = nova
pueblo = setlejo de indiĝenoj, puebloindiĝeno
*tienda* = vendejo, butiko
*viejo* = la maljuna ĉefo

## 1/8

Pro la enspezoj el la vendejo *don* Gabriel ne povis riĉiĝi. La vendejo ja ne estis granda. Ĝi estis anguleto en la loĝoĉambro. De tie oni iam rompis fenestron tra la argilan vandon. Tiu fenestro malfermeblis per stabila lignopeco. Malsupre de la breto troviĝis du bantoj el basto, kiuj firme estis ligitaj je la vando per speco de lignofostetoj, tiel, ke tiu breto faldeblis supren aŭ malsupren. Se ĝi estis malsuprenfaldita, jen la malfermaĵo en la vando malfermis laŭ fenestro. Sub la breton oni nun metis du stangojn, kies supraj finaĵoj estis tenataj de elkavigitaj truoj en la larĝa breto, por ke ili ne renversiĝu. Se la breto estis faldita malsupren kaj apogis sin sur tiuj stangoj, tiukaze la breto estis la vendeja tablo kaj la vendejo estis malferma. Se la breto estis suprenfaldita, jen la vendejo estis fermita. Kiu volis aĉeti ion, restadis ekstere de la domo antaŭ la fenestro kaj atendis tiom longe pacience kaj sen voki ion aŭ klaki la manojn ĝis *don* Gabriel kaj lia edzino ĉeokaze rimarkis, ke ‚iu estas en la vendejo', kiel oni dirus tion ie aliloke.

Krome la vendejo apenaŭ havis varojn. Neniu donis ion je kredito al *don* Gabriel, eĉ ne peceton, eĉ tiam ne, kiam li diris, ke li estas nomumita sekretario. Li povis eldoni por la aĉeto de varoj nur ĝuste tiom da mono, kiom li havis monon kontantan. Ne estis multe. Kelkajn pliajn pesojn, kiujn li povis pruntepreni de siaj amikoj kaj de parencoj de sia edzino, estis foruzitaj por la domo kaj la vojaĝo.

Nur bareleton da brando li ricevis kredite, je tre altigita prezo kaj kontraŭ dumonata lombarda kvitanco pagebla je la lasta tago de la dua monato, sen precipa prezentado aŭ pagopostula letero. Sed la fabrikisto de la aguardiente, de la brando, certigis al li, ke tiukaze, se li pagos la krediton ĝis la lasta ebla pagotago, li ricevos estontece la fajran akvon por la kutima komerca prezo kontraŭ lombarda kvitanco unumonata . La edzino de *don* Gabriel devis subskribi kiel garantianto.

Brando en Meksiko ne vendeblas kredite al indiĝenoj. En malgrandaj lokoj kun pura indiĝena loĝantaro oni tute ne rajtas vendi brandon.

Sed *don* Gabriel ricevis ja de la *jefe politico* specialan licencon por la vendo de brando. Kaj kiel la guberniestro por la ŝtato aŭ kiel politika ĉefo por lia distrikto, li povis nuligi leĝojn aŭ dekreti leĝojn laŭ plaĉo kaj saĝo.

Landaj leĝoj estas ja tute bonaj. Sed ĉiam necesas oficistoj, kiuj respektigas la leĝojn de la lando. Kaj tiuj oficistoj, kiuj havas potencon kaj aŭtoritaton respektigi leĝojn de la federacia ŝtato, estas en sia distrikto de kompetento sufiĉe fortaj por interpreti leĝojn, por ŝanĝi ilin, por nuligi leĝojn aŭ por por akrigi ilin, tute kiel plaĉas al ili. Aliokaze diktaturo ja ne havus sencon, kaj oni povus kontentiĝi per demokratio aŭ per herediga monarkio. Certa diferenco ja devas esti rimarkebla. Kaj la diktatoro, kiu staras supre sur la pinto, ne povus daŭrigi sian diktaturon sen bonaj amikoj, kiuj sube havas aŭtoritaton kaj potencon.

*Don* Gabriel vendis je la dua tago kvar plenigitajn glasetojn da brando, je la tria tago nur unu glaseton kun brando. Je la kvara tago neniun. Je la kvina tago du glaseton kun brando, je la sesa tago, je dimanĉo, neniun glaseton kun brando.

Je tiu tago vespere *don* Gabriel diris al sia edzino: „Se mi ne donas krediton, mi vendos la brandobarelon eĉ ne post kvar monatoj, kaj kiu pagu post ses semajnoj mian lombardan kvitancon, tion mi ne scias.“

„Kompreneble vi devas doni kreditojn. *Tonto*, ŝtipkapulo“, respondis la edzino. „La knaboj ja pagos, kiam ili vendas porkojn aŭ maizon aŭ lanon.“

Dum semajno *don* Gabriel enspezis peson kaj tridek centavojn. El la vendejo kaj el la vendo de la brando.

Malsatmorti li ja ne povis, li kunportis por si kokinojn kaj kvar porketojn.

La homoj en la vilaĝo ne estis malafablaj al li. Iutage iu alportis kokinon kiel donacon, alitage alia kapridon kaj tagon poste plia buŝelon plenan de maizo, sekvatage iu alia grandan staŭdon plenan de ore flavaj bananoj.

La *jefe* de la indiĝenoj donis al li ĝardenon kaj kampon de la komunuma tero. La tribestro ankaŭ tuj sendis junulojn, kiuj kultivis ilin por li.

Sed tio, kion *don* Gabriel bezonis, estis mono. Maizon, kokinojn, ovojn oni ne povas suramasigi, se oni ne estas ekipita por pogranda komerco kaj ne proksima al trafiklinio.

Sed por kio li havis la potencon en la loko?

Se oni havas la potencon, oni devas uzi ĝin. Oni devas uzi ĝin rapide, antaŭ ol oni perdas la potencon.

## 1/9

Du arabaj komercistoj venis dum sia vojaĝo al la loko. Por vendoj ili havis diversajn utilaĵojn kaj bonan kvanton de superfluaĵoj: alumetojn, fadenojn por brodado en ĉiuj koloroj, kotonŝtofojn kun surpresitaĵoj, butonojn, buntajn hararkombilojn el celuloido, hararpinglojn, kudrilojn, blankan ĉemizotolon, tranĉilojn, kulerojn, bunte pripentritajn tasojn el emajlo, prajmojn, vitroperlojn, trembriletantajn orelringojn kaj fingringojn, karbacidan natronon, kininon, sanktulajn bildetojn kun spegulo sur la dorsa flanko, buntajn silkorubandojn kaj tvirnojn.

La indiĝeno ne estas multe alia laŭ karaktero kiel ĉiuj ceteraj homoj. La inoj ŝatas buntajn rubandojn kaj trembriletantajn kolĉenetojn kaj briletantajn orelringojn. Kaj apud la gravaj aĵoj necesaj por la vestoj kaj la dommastrumado, ili, kiel ĉiuj aliaj inoj surtere, ĉiam inklinas aĉeti senfine multajn aĵojn, kiuj aŭ ĝojigas ilin aŭ donas kontenton al ili aŭ por distingi sin iel de aliaj inoj, aŭ por tiri pli grandan atenton de sia edzo aŭ de sia elektito al si. Kiel ĉie, ankaŭ tie la edzino instigas la edzon per ridado, afableco aŭ per ploroj aŭ ĉagreniteco permesi aĉeti al ŝi tion, kion ŝi volonte volas havi. Kaj kiel kutimas ankaŭ aliloke, la viro aĉetas sufiĉe da diversaj aĵoj, kiuj per si mem estas malmulte utilaj, sed pri kiuj li scias aŭ supozas scii, ke ili ĝojigos lian edzinon aŭ faras la koron de lia elektita ino pli facile alirebla por ties pretendoj.

La komercistoj, kiuj kun siaj muloj ŝarĝitaj kun pakaĵo vagadas tra la vilaĝoj de la indiĝenoj, scias pro longa sperto, kiel oni devas negoci. Kion ili ne havas ĉe si, ili ne povas vendi. Sed tio, kion ili portas kun si, tion ili scias vendi por bonaj prezoj, ĉu indiĝeno bezonas tion ĉu ne. Kiel al ĉiuj aliaj bonaj komercistoj estis ankaŭ al ili tute egale, ĉu la vendaĵoj estas utilaj aŭ aĉaj, por ili gravis

nur, ke la aĵoj vendeblas kaj permesas bonan enspezon.
Vojaĝantaj komercistoj, kiuj alvenas en lokon por vendi siajn varojn, iras unue al alkaldo, al la vilaĝestro, por prezenti sin al li. Estas formo de ĝentileco. La alkaldo demandas de tempo al tempo pro la licencoj kaj pro la impostkvitancoj kaj li diras al ili, ke ili ne rajtas vendi brandon.

Du sirianoj ankaŭ tie unue iris al *don* Gabriel. Kvankam li ne estis alkaldo, ĉar la *presidente* tie estis la *jefe*, elektita de la indiĝenoj. Sed la komercistoj rigardis la sekretarion kiel la veran aŭtoritaton, kaj *don* Gabriel certe tre ĉagreniĝus pri tio, se ili ne agus tiel.

Kiam ili vidis, ke li havas komercon kun brando, ili ĉiuj unue akceptis tian glaseton en rondo, en kiun ili inkludis lin mem, por pligrandigi la pagon. Tiam ili demandis lin, ĉu ili rajtas tranokti en la municipo kaj manĝi ĉe li. Tio denove ebligis enspezon al *don* Gabriel.

Ambaŭ komercistoj pagis pli ol sufiĉe por la tarifo de la federacia ŝtato, kaj ili pagis la tarifon por la lando Meksiko, ili pagis sian imposton por la *municipalidad*, la komunuman administrejon, en kiu ili loĝas. Ili pagis krome specialan licencon por vagadaj komercistoj.

*Don* Gabriel ne kontrolis iliajn licencojn kaj impostkvitancojn. Estis por li sen intereso, kion aliaj enspezis pere de la komercistoj.

Kiam la *copitas* estis eltrinkitaj, li tuj proksimiĝis al la kerno de la afero: „Ĉi tie speciala komunuma imposto pagendas; ĉiutage peso por ĉiu komercisto.“

„Tamen“, unu el la araboj kontraŭdiris: „Ni pagis nian *municipalidad*-tarifon ja jam en Jovel.“

„Tio, kion vi friponoj pagas en Jovel,min ĉi tie tute ne interesas“, diris *don* Gabriel koncize. „Vi volas ĉi tie negoci en la loko, kaj tiukaze vi do devas pagi impostojn. Se vi ne pagos, mi ankaŭ ne donos al vi permeson elmeti viajn varojn ĉi tie aŭ iri en la kabanojn de la homoj, kaj post horo vi devos forlasi la lokon.“

„Tio estas ja maljusteco“, diris la alia el la komercistoj.

Respondis *don* Gabriel: „Mi estas ĉi tie la sekretario, kaj mi scias, ĉu ĉi tie en la loko impostoj pagendas aŭ ne.“

La araboj pagis la imposton.„Kvitancon mi ne devas skribi al vi“, li diris, kiam li ricevis la monon. „Mi estas ja ĉi tie en la loko, kaj en alia loko neniu demandos vin pro kvitanco de ĉi tie.“

Tiel ili ne havis pruvon por plendi ĉe instanco. La plendo ne havus precipan sukceson ankaŭ tiukaze, se ili povus antaŭmeti kvitancon. Diktatoroj kaj la armeo ne akceptas plendojn kaj la rajton plendi. Kaj kiu brue tumultas, estos pafmortigita, ĉar li ĝenas la trankvilon kaj ridindigas aŭtoritatulojn.

Sed *don* Gabriel ne lasas gliti la predon tra la fingroj. Se oni havas fiŝon je hoko, oni firmtenu ĝin.

„Mi ĉi tie ne ricevas salajron“, li diris. „Mia salajro estas, ke mi havas la rajton ĉi tie vendi varojn kaj brandon en vendejo. Vi vendas la samon, kion mi havas ĉi tie en mia vendejo, kaj se vi vendos ion, tion ne povos vendi mi. Vi ĉiuj devas pagi al mi unu peson da konkurenctarifo por ĉiu tago, sed ĉiu el vi minimume du pesojn, por ke mi povu iom elbalancigi mian damaĝon.“

La du komercistoj pagis ankaŭ tiun monon.

Estas ĉie tiel, se pakaĵeto da cigaredoj estas imposte ŝarĝita per duono de cendo, la komercisto pagas la pakaĵeton ne je duono de cendo pli multekoste, sed je kvin cendoj.

„Por rondigi la sumon“, kiel li tiukaze diras. Li klarigas la novan prezon helpe de la nova imposto.

Ĉi tie ĉiuj varoj de la komercistoj altiĝis tuj je kvindek procentoj. La indiĝenoj, kiuj devis pagi, ĉar ili bezonis la novajn varojn, pagis. *Don* Gabriel, kies tasko estis protekti kiel sekretario la indiĝenojn kontraŭ uzurado kaj ekspluatado, ne povis diri ion kontraŭ la uzuraj prezoj, ĉar li ja kiel aŭtoritato donis la komercpermeson al la komercistoj en la loko.

## 1/10

*Don* Gabriel estis komplezema kaj bonkora. Kiam li vidis, ke kelkaj el la indiĝenoj volas aĉeti ĉemizojn, ŝtofojn kaj aliajn necesajn aĵojn, sed ne havas monon por tio, li ofertis al ili krediton, tute libervole.

„Vi volas, ke mi pruntu tri pesojn al vi, Hipolito, ĉu?“ li demandis.

„Jes, *don* Gabriel, mi ne havas ĉemizon, kaj mia *mujer* diras, ke ni bezonas kelkajn metrojn da ŝtofo.“

„Mi volonte donos tri pesojn al vi“, diris *don* Gabriel, „sed kiu estos via garantianto?“
„Mia frato Eleoso.“

„Venigu lin ĉi tien.“

„Ĉi tie mi estas“, diris Eleoso.

„Vi garantios por Hipolito, ĉu?“ demandis *don* Gabriel.

„Kompreneble, li estas ja mia frato.“

„Kiam vi vendos viajn du porkojn, Hipolito?“ demandis *don* Gabriel.

„Post kvin semajnoj, *don* Gabriel. Mi jam parolis kun *don* Roberto. Li estas la komercisto, kiu ofte venas ĉi tien por aĉeti porkojn kaj kaprojn.“

„Tiukaze vi donos al mi post kvin semajnoj kvin pesojn, Hipolito, ĉu?“ kalkulis *don* Gabriel.

„Kompreneble mi tiam donos al vi kvin pesojn“, diris Hipolito.

„Vi garantias por la kvin pesoj dum kvin semajnoj, Eleoso, ĉu?“ diris *don* Gabriel. „Kaj por ĉiu plua semajno plian peson, ĉu?“

„Kompreneble mi transprenos la garantion por mia frato“, diris Eleoso.

„Bone, jen prenu la tri pesojn“, diris *don* Gabriel, donante la monon al Hipolito, kiu tuj aĉetis ŝtofon por ĉemizoj.

*Don* Gabriel pruntis la tutan kontantan monon el la domo al la indiĝenoj, kiuj volis aĉeti ion de la komercistoj. Kaj ĉar la homoj tiel rapide ricevis monon, ili aĉetis ĝis la lasta centavo.

**Rimarkoj**
*mujer* = edzino

## 1/11

Kelkajn semajnojn poste venis brutkomercistoj.

„Vi volas ĉi tie aĉeti brutojn, ĉu?“ demandis *don* Gabriel, post kiam ili trinkis plurajn glasetojn kun brando en rondo.

„Jes, ni venas ĉi tien regule“, ili diris, „ ni havas ĉi tie malnovan klientaron.“

„Vi ja konas la ĉi tie-an lokan imposton, ĉu?“ demandis *don* Gabriel.

„Ni pagas niajn impostojn en nia loĝloko, kaj la komunuman imposton en la buĉejo.“

„Tio min ĉi tie ne interesas, kion vi pagas ie aliloke“, diris *don* Gabriel. „Por ĉiu porko, kiun vi aĉetos ĉi tie, vi devos pagi ĉe mi unu kaj duonon da pesoj kiel imposton. Por ĉiu ŝafo unu peson kaj por ĉiu kapro okdek centavojn. Se vi ne pagos, mi ne povos doni komercan permeson al vi kaj mi ne donos ĉi tie la permeson al la loĝantoj, ke ili rajtas vendi ion al vi.“

La komercistoj nun jam tiom longe estis survojaj, kaj ili volis konservi la klientaron de la loko. La prezo, kiun la indiĝenoj ricevas por siaj bestoj, estis multe malpli alta ol ili atendis, ĉar la komercistoj devis malsupremmarĉandi la imposton de la aĉetprezo, por ankoraŭ fari negocon.

La indiĝenoj ne volis vendi ion por tiuj prezoj kaj diris, ke ili

tiukaze mem pelos la bestojn al Jovel, kie ili certe ricevos pagon laŭ la bonaj malnovaj prezoj.

La komercistoj ekĉagreniĝis kaj volis aĉeti nenion kaj ĉirkaŭrigardi en aliaj lokoj. Sed, se ili aĉetus nenion, *don* Gabriel ne povus postuli la impostojn.

*Don* Gabriel je plia fojo ne lasis forgliti la fiŝon kaptitan de la hoko.

Li venigis la tribestron de la indiĝenoj.

Ĉiam, kiam *don* Gabriel volis eldevigi ion de la indiĝenoj, pri kio li timis, ke tio povus konduki al akraj kontraŭdiroj kaj necesigi longajn klarigajn parolojn, li lasis decidi la rekonatan aŭtoritaton de la indiĝenoj, ilian propran tribestron. En tiu ĉi kazo li fariĝis mem nur la modesta sekretario, kiu staras sub la aŭtoritato de la prezidanto de la loko, ĉar la efektiva estro de la komunumo ĉiam estis indiĝeno, membro de la tribo, kiu loĝas en la loko de jarcentoj. Tiu loka estro ĉiujare estis elektita de la indiĝenoj; ĉiujare alia el la rekonataj kaj plej kapablaj viroj de la tribo. La sekretario estis nur la reprezentanto de la registaro, kiu certigadis la komunikadon de la loko kun la registaro, ĉar la indiĝenoj ne sciis legi kaj skribi. Li ne havis rajton dekreti ion aŭ ordoni ion sen konsento de la indiĝena ĉefo.

Tiel tio legeblis en la leĝo. Kaj la leĝo estis tiel kreata ne pro amo al la indiĝenoj kaj ne pro respekto pri ties laŭnaturaj rajtoj, sed ĉar ĝi estis la ununura eblo kiel registaro povas vivi kun la memstaraj indiĝenoj en paco. Militiraj ekspedicioj estis multekostaj. Kaj se la soldatoj sukcesis detrui la vilaĝojn de la indiĝenoj, la indiĝenoj fariĝis senhejmlandaj, formis bandojn kaj vagadis kiel rabistoj, rompŝtelistoj kaj murdistoj en la regionoj

de la meksikaj ranĉoj kaj vilaĝoj, ĉar ili forbruligis haciendojn kaj tutajn lokojn, ĉar ili buĉis ĉiun bruton renkontatan, ĉar ili forbruligis ĉiujn kultivitajn kampojn, ĉar ili detruis telefonlineojn kaj pontojn, ĉar ili fortrenis ĉiujn ĉevalojn kaj mulojn trovitajn sur paŝtejoj, estigante tiom da damaĝoj, ke la registaro rapidis interkonsenti pacon kun la bandoj. La indiĝenoj tute ne montris emon vagadi en bandoj. Ili prefere restadis trankvile en siaj vilaĝoj ĉirkaŭataj de siaj familioj por kultivi la kampojn kaj por bredi siajn brutojn. Ne nur la registaro, sed eĉ la tuta lando havis nur avantaĝojn, se, la indiĝenoj estis lasataj en paco.

Sed kvankam la registaro koncedis la plenan memadministradon al la indiĝenoj en ĉiuj lokoj, kie la indiĝenoj estis la sola loĝantaro, la leĝo estis tamen nur leĝo laŭ tiu amplekso, laŭ kiu la sekretarioj interpretis kaj uzis tiun leĝon. Estas ĉiam la interpretoj kaj la efikoj de interpretoj de leĝoj, kiuj estigas malbonojn.

## 1/12

*Don* Gabriel, tio, kion li intencis fari, ne povis fari sen la helpo de la indiĝena ĉefo.

„Komprenu, Narciso“, diris *don* Gabriel al la indiĝeno, „en tiu kazo la afero estas ja tute evidenta. Tiuj naŭ viroj“, li menciis ilin ĉiujn laŭ la nomo, „pruntis de mi monon, jen tiom da mono, jen eĉ pli. Ili ĉiuj prezentis al mi persone garantianton, kiam mi pruntis la monon al ili. La mono nun pagendas, ĉe kelkaj jam dum semajno. Ili promesis al mi repagi la monon, tuj kiam ili estos vendintaj porkojn aŭ ŝafojn. Nun la komercistoj estas ĉi tie kaj la viroj ne volas vendi ion, ĉar la prezoj ne plaĉas al ili. Sed tio certe ne estas kulpo mia.“

„Ne, certe ne“ diris la *jefe*.

„La homoj volas vendi la bestojn sur la foirplaco en Jovel“, rakontis *don* Gabriel plu. „Ĉar ili supozas ricevi tie pli altajn prezojn. Sed, se multe da bestoj estas pelitaj tien, la prezoj estas pli malaltaj ol ĉi tie. Tio kompreneble estas tute egala al mi. Komprenu, *don* Narciso“, li nun alparolis la indiĝenon eĉ je „*don*“ por montri al li, ke li rigardas lin samranga al ladino. „Komprenu, se la homoj en Jovel vendas ion, ili eldonas la monon tie kaj eĉ ebriigas sin. Kiel ili tiukaze repagu al mi la monon, kiu estas repagenda jam nun, eĉ kun garantiaĵo?“

Narciso tuj venigis de la kampoj ĉiujn ĉi virojn, kies nomojn *don* Gabriel diris.

Li demandis ĉiun unuopulon, kiom da mono li ŝuldas al *don* Gabriel, inklude tion, kion *don* Gabriel postulis kiel interezon en ĉeesto de la garantianto.

*Don* Gabriel havis sian notlibreton ĉemane kaj li konfirmis la sumon, kiun memoris tiuj ŝuldantoj sufiĉe bone. Neniu provis falsi la sumon. Tion ili ne faris, ĉar promesvorto estas promesvorto kaj ĉar oni ne rompu promeson.

„Vi ja en ĉeesto de garantianto promesis“, demandis Narciso, „ke vi volas vendi, tuj kiam venos komercistoj en la lokon, porkojn, aŭ kion ajn alian vi havas krome, por repagi la pruntitan monon al *don* Gabriel, ĉu?“

La viroj klarigis, ke tio estas ĝusta, sed ke la prezoj, kiujn ofertas ĉi tie la komercisto, estas multe pli malaltaj ol li ofertis kaj pagis ilin ĉiufoje antaŭe.

„Tion mi ne povas ŝanĝi“, diris Narciso.

Li turnis sin al la komercisto kaj demandis lin: „Kial la prezoj estas subite tiom malaltaj? De jaroj ili ne estis tiom malaltaj.“

La komercisto cerbumis pri bona respondo. Li turniĝis kaj vidis, ke *don* Gabriel fikse rigardis lin en la vizaĝon.

La komercisto volis nun diri, ke li devas pagi ĉi tie en la loko tre altan kontribuon por ĉiu bruto kiel komunuman tarifon, kaj ke tio estas la kaŭzo, ĉar li devas pagi pli malmulte por la brutoj, por ankoraŭ povi vendi ilin kun eta gajno al la viandejoj.

Sed *don* Gabriel ne lasis paroli lin. Li diris: „La impostoj por la bestkomercistoj estas nun tiom alte fiksitaj, ke la brutvendistoj ne plu povas pagi la malnovajn prezojn.“

La komercisto tuj komprenis. Li ne povis ĉagreni la sekretarion, se li volis fari negocojn tie. Sekretario povas tiom malfaciligi la vivon al komercistoj helpe de kiaj ajn pretekstoj, ke la komercisto nek aktuale nek alitempe povus aĉeti eĉ nur unu felon, tiom longe, kiom la sekretario estus en la loko. Kion la komercisto faru, se la sekretario klarigas, ke la brutoj, kiujn la komercisto aĉetis en alia loko, kaj kiujn li kondukas nun kun si, estas infektitaj, kaj ke oni tuj devos mortigi ilin por malhelpi, ke la loko estos infektita. La mortigitaj brutoj de la komercisto tuj forbruligendos, laŭdire por malhelpi disvastigon de la epidemio. Kiel kaj kie la komercisto povus pruvi, ke tiuj brutoj ne malsanis? *Don* Gabriel ne estus la unua kaj ne la ununura, kiu estus farinta tion kaj similan, se la komercisto aŭ kiu ajn venas en la lokon, ne rekonas la dirojn kaj la aŭtoritaton de la sekretario.

Narciso, la tribestro de la indiĝenoj povis juĝi nur laŭ tio, kion liaj okuloj vidis, kaj kion liaj oreloj aŭdis. La homoj ŝarĝis sin kun ŝuldoj ĉe *don* Gabriel, ili promesis pagi la ŝuldojn, tuj kiam venos

en la lokon komercisto, al kiu ili povos vendi siajn brutojn.
Li akceptis, ke la postulo de *don* Gabriel ekzistas laŭrajte kaj ĝi ne estis kontestita de iu. Tial li ordonis, ke ĉiuj ĉi viroj, kiuj pagu ŝuldojn al *don* Gabriel, devos vendi siajn brutojn al tiu komercisto je tiu prezo, kiun li povas pagi laŭ sia bontrovo. Kiu ne havis ŝuldojn ĉe *don* Gabriel rajtis fari kun siaj brutoj tion, kio plaĉas al li.

Intertempe ĉiuj viroj de la loko kolektiĝis sur la placo antaŭ la municipo; ĉar la hezitemaj intertraktadoj iom post iom daŭris kelkajn horojn.

Ĉiuj viroj, eĉ la ŝuldoŝarĝitoj koncedis, ke ilia tribestro en tiu kazo diris la verdikton tiel, kiel ĝi estas ĝusta. Ĉar neniu sciis kaj ne povis scii, kion intertraktis *don* Gabriel kun la komercistoj, ili trovis, ke la decido de ilia *jefe* estas entute justa. Kaj ĉar ne la sekretario, al kiu neniu el ili fidis, estis dirinta la verdikton, sed ilia propra tribestro, tial ili obeis lin libervole kaj la komercistoj ricevis pli da brutoj ol ili atendis.

„Kial do antaŭe la longtempa interparolado pro la malmultaj pesoj, kiujn vi ĉi tie lasos al mi!“ diris *don* Gabriel vespere al la komercistoj. „Se mi ne sidus tiom atente sur ilia nuko, vi eĉ ne kunprenus forputriĝintan kaprovoston hejmen. Kaj nun, ĉu? Rigardu la rezultojn. En neniu loko vi povis aĉeti tiom, kiom ĉi tie. Jen al vi ja viaj mizeraj pesoj, kiuj defalas ĉe tio por mi, ja nun vere ne povas kaŭzi avaran aflikton.“

La ofico, kiu komence aspektis tiel mizere, komencis kreskigi oron sur ĉiu herbotigo.

**Rimarkoj**
*ladino* = mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en Ĉiapaso uzate

specife por kontrasti indiĝenojn kaj ne-indiĝenojn, do ne nur mestizojn, sed ankaŭ blankulojn.

# Ĉapitro 2

## 2/1

La malmultaj pesoj, kiujn pruntedonis *don* Gabriel, revenis al li kun granda sekvantaro. Tiel li havis la eblon pliampleksigi la negocon.

Li havis la devon instrui en lernejo. Tio estis unu el liaj multaj kromoficoj. Sed tiu kromofico facile entrepreneblis, ĉar lia ĉefofico almenaŭ esence estis, ke li ĉeestas.

Instruisto li estis neniam. Li povis legi kaj skribi kaj kalkuli la plej necesan.

Sed sub la diktaturo oni ne rigardis tre valora, ke la infanoj de la proleta loĝantaro estu instruitaj. Se proletoj havas iom da eduko, ili tuj volas havi eĉ pli da ĝi kaj fariĝos nekontentaj pri la rilatoj, kiujn kreis Dio helpe de la eklezio kaj registaro, kaj kiujn ili deziras konservi.

Instrui la infanojn de la indiĝenoj aŭ instrui la indiĝenojn mem kaj doni edukitecon al ili, oni konsideris kiel pekon kontraŭ la volo de la plej alta Dio. Se estus la volo de la plej alta Dio, ke ĉiuj homoj legu kaj skribu, Dio donus la kapablon al ili tuj ĉe la naskiĝo. La volo de la plej alta Dio surtere estis reprezentata de la eklezio, kiu pro la dia elĉiela inspiro de siaj servistoj scias tute precize, kion Dio celas, kaj kion li ne celas; ĉar ili havas intiman rilaton al Li kaj al ties unktitaj oficistoj kaj ekzekuciistoj.

La diktaturo nur tial povis teni sin supre, ĉar ili dividis la potencon kun la eklezio kaj donis al ĝi ĉiun koncesion, kiun tiu postulis. Kaj unu el tiuj koncesioj estis, ke la indiĝenoj ne ricevu lernejan edukitecon, ĉar oni konsideris tion kiel la plej belan kristanan ornamon konservadi ties simplaniman infanan kredon.

Sed venis turistoj el fremdaj landoj al Meksiko, kaj gazetskribistoj. Kaj venis homoj, kiuj havis monon kaj volis utilige uzi tiun monon en lando, kie la konkurenco estis malpli brutala kaj malpli detruiga ol en la hejmlando.

La diktatoro deziris, ke la lando estu malferma por envicigi ĝin en la aron de la alte civilizitaj nacioj. La diktatoro de alte civilizita nacio estas pli agnoskata kaj pli certa pri sia loko en la monda historio ol diktatoro de grego el barbaroj. La meksikanoj laŭ la opinio de ilia diktatoro estis nekapablaj mem malfermi la landon, ĉar ili, kiel li opiniis, ne sciis labori kaj ankaŭ ne volis labori.

Li, la dikatoro, kvankam li mem estis meksikano, faris escepton. Tial li ĉiam denove lasis elekti sin de tiuj, al kiuj li donis la rajton elekti lin, kaj kiuj estis rekompencataj per postenoj kaj oficoj. La komedion de la balotado oni daŭrigis por montri al la civilizitaj landoj, ke Meksiko estas konstitucia respubliko, en kiu la investita kapitalo kaj la koncesioj donitaj al la usonaj bankoj kaj minejaj kompanioj, estas sekuraj.

La diktatoro opiniis sin la plej bona meksikano kaj la ununura meksikano, kiu valoras vivi. Sed por la cetera Meksiko laŭ li estis pli bone, se diluvo inundus ĉiujn ĉi ceterajn meksikanojn dum dudek kvar horoj.

Kiam nova baloto estis komenciĝonta, li starigis solene sian

klikon laŭvice en aŭdienco kaj lasis ilin petegi, ke li reakceptu la kandidatecon; laŭ la maniero de pordogardisto en palaco de milionulo, kiu sentas sin tro nobla por akcepti krommonon, sed kiu tre seniluziiĝas, se oni ne metas ĝin en unu el liaj malfermitaj manoj etendataj dorsflanke. Fine, se la kliko kuŝis sur la genuoj antaŭ li, deklaris la diktatoro: „Mi ja ne plu volis fari tion. Mi ĵuris, ke mi rifuzos la kandidatecon. Sed ĉar vi, *caballeros*, tiel insiste petegas min, mi devas oferi min je plia fojo por la meksika popolo.“

Tiu ĉi okazaĵo legeblis en ĉiuj usonaj gazetoj kaj ĝi pruvis al la mondo, ke Meksikon ne regas despota diktatoro, sed alte evoluita konstitucia sistemo, laŭ la modelo de civilizita kaj moderna respubliko.

La dikatoro oferis sin por sia popolo okfoje laŭ tiu maniero, ĝis kiam elseligis lin longatempa dolorplena revolucio kaj la nedankema meksika popolo lasis morti sian grandan amarigitan kaj tristigitan ŝtatestron en ekzilo en fremda lando. La popolo bone eltenis la malbenojn kaj la pesimismajn komplotojn de tiu ĉi granda suferulo for de la diktatora trono.

La diktatoro rigardis tion sia plej grava tasko sorĉi bonajn statistikojn en la mondon. Se li ne farus tion, la mondo ja ne ekscius, kia granda ŝtatestro li estas, kaj kiom la meksika popolo devus esti dankema al li, ke li ĉiam denove oferis sin kaj metis sur sin la pezan ŝarĝon de la diktaturo kaj la dornokronon de la prezidanto por esti la unua kaj plej supra servisto de sia amata popolo.

La nenombreble multaj gregoj de banditoj, kiuj svarmis tra la lando, kiuj formiĝis el indiĝenoj, de kiuj oni forprenis la teron por doni ĝin al bienegaj posedantoj, usonaj kompanioj, generaloj kaj

al membroj de la aristokrataj klikoj, kaj kiuj estis pliampleksigataj de peonoj, kiuj fuĝis el la tiraneco de la bienegaj posedantoj, de la fera mano de la granda ŝtatestro, estis forigitaj per tio, ke la gazetoj ne rajtis raporti pri ili, je minacata puno de konfisko.

Sed la diktatoro volis havi ne nur la feran manon de granda ŝtatestro, kiu garantias al la lando internan pacon kaj sekurecon, sed li volis havi en la civilizitaj landoj ankaŭ la famon esti la granda moderna edukisto de la meksika popolo.

Tiun famon li atingis helpe de statistikoj pri la granda kvanto de vilaĝaj lernejoj, kiujn li fondis por prizorgi la indiĝenojn, la peonojn, tiel kiel ankaŭ la tutan proletaron de la meksika popolo per moderna edukiteco.

Lando, kiu havas multajn lernejojn, estas tre estimata de la civilizitaj nacioj, kaj ĝi estas favora loko por logi fremdan kapitalon kaj por investi ĝin tie.

La lernejoj en la grandaj urboj estis tute samrangaj al la lernejoj en Usono. Tiaj ili devis esti. Ĉar tien venis turistoj, bankieroj kaj gazetskribistoj, kiuj estis invititaj viziti tiujn lernejojn.

Sed turistoj, bankieroj kaj gazetskribistoj ne iris en la forajn vilaĝojn de la indiĝenoj kaj de la rura proletaro. Al ili oni antaŭmontris la statistikojn pri la multaj vilaĝaj lernejoj, kiujn la diktatoro jam fondis. Per tio kontentiĝis la fremdaj vizitantoj. Ili konkludis el la malmultaj modelaj lernejoj en la grandaj urboj la altkvalitecon de la lernejoj en la vilaĝoj. Ili timis la streĉajn vojaĝojn en la internon de la lando kaj ricevis siajn sciojn el bele aranĝitaj modelaj skribaĵoj en la ekspediciaj ĉambroj de la ministerio pri edukado.

*La Escuela Rural*, la rura lernejo en Bujvilum, kies instruisto estis *don* Gabriel, apartenis al tiuj lernejoj, kiujn fondis la granda ŝtatestro kaj edukanto de la meksika popolo, kaj ĝi brilis en la statistikoj kiel indiĝena lernejo kun cent dudek lernantoj.

Tiu rura lernejo en Bujvilum estis same gvidata kiel ĉiuj ruraj lernejoj de la respubliko.

Ĝi efektive havis cent dudek lernantojn el la vira genro. La statistiko ne mensogis.

## 2/2

*Don* Gabriel demandis la tribestron Narciso: „Kiom da knaboj estas ĉi tie en Bujvilum kaj en la setlejoj apartenantaj al la loko?“

„Mi ordonos nombri ilin“, diris Narciso.

Kelkajn tagojn pli poste li revenis kun la respondo: „Estas cent dudek aŭ eĉ kelkaj pli da.“

„Ili ĉiuj devos veni ĉi tien en la lernejon“, ordonis *don* Gabriel.

La tribestro zorgis, ke la ordono laŭvice atingu ĉiun.

Je la sekva lundo venis ĉirkaŭ tridek knaboj en la lernejon. La plej multaj el ili estis nudaj.

*Don* Gabriel surskribis ĉiujn nomojn. Al tiuj, kiuj ne sciis sian nomon, ĉar ili neniam aŭdis iun, li donis nomon.

Marde venis denove pli ol tridek knaboj en la lernejon. Duono el ili estis nova, ĉar ili lunde ne ĉeestis. El la tridek knaboj, kiuj

ĉeestis je la pasinta tago, duono ne venis plu, ĉar *don* Gabriel, kiu ne sciis, kion fari kun la knaboj, tradraŝis tri knabojn por almenaŭ fari ion kaj por montri al ili, por kio taŭgas lernejo. La patroj de la knaboj ne konsentis pri tio kaj malpermesis al siaj filoj denove iri en la lernejon, ĉar ili ne deziris, ke la sekretario batu la knabojn, nur tial, ĉar tiuj kvazaŭ lude interbatalis sur la placo antaŭ la *cabildo*, antaŭ la municipo.

*Don* Gabriel denove tradraŝis kelkajn knabojn, ĉar li estis ja instruisto.

Sekvatage denove duono el la knaboj forestis. Ili preferis labori kun siaj patroj sur la kampoj anstataŭ lasi bati sin en la lernejo.

Sed venis ĉirkaŭ deko da novaj knaboj, kiuj nek lunde nek marde ĉeestis tie.

En la kuro de du semajnoj ĉiu el la cent dudek knaboj almenaŭ unufoje estis en la lernejo.

*Don* Gabriel raportis al la registaro, ke li havas cent dudek lernantojn, kies nomojn li indikis en listo. La lernejo eniris en la statistikon kaj tie faris bonan impreson.

Ĉar *don* Gabriel ĉiutage havis lernantojn, li devis instrui.

La lernantoj alvenis en la lernejon je la sesa matene, kiel estis ordonite de li. Aŭ pli ĝuste dirate, la infanoj alvenis tuj post sunleviĝo, ĉar nek *don* Gabriel, nek iu alia en la loko havis horloĝon.

Sed je la sesa *don* Gabriel ankoraŭ ne ellitiĝis. Nur lia edzino jam ellitiĝis, kaj la lito ankoraŭ estis varma.

Je la sepa kaj duono li ricevis sian kafon.

Tiam li paŝis sur la sojlon de la pordo kaj vokis transen al la placo antaŭ la lerneja pordo: „Ĉu vi ĉiuj ĉeestas, *muchachos*?“

„Jes, sinjoro *profesor*, ni estas ĉiuj ĉi tie“, kriis la knaboj.

„Mi tuj venos. Ne tro bruu“, vokis *don* Gabriel.

La knaboj dum iom da tempo sidis sur la herbejo kiel musetoj.

Kiam *don* Gabriel denove troviĝis en la domo kaj faris tie nenion krom kvereli kun sia edzino, ĉar li ne sciis kion celi kaj kion fari, la junuloj denove ĉasadis kaj kvazaŭ ŝerce interbatalis. Post duono de horo *don* Gabriel ree paŝis sur la sojlon de la pordo, ĉagreniĝinte sekve de kutima kverelo kun sia edzino kaj tial li kriis koleriĝinte: „Kanajloj, ĉu mi ne ordonis al vi, ke vi kondutu trankvile?“

Li kaptis knabon kaj vangofrapis lin.

La knabo kriis kaj diris plorante: „Tion mi diros al mia patro, ke vi vangofrapis min.“

Li forkuris kaj ne revenis dum tiu tago.

Sed intertempe aperis kelkaj novaj alvenintoj.

Post iom da tempo la knaboj denove ŝerce kvereletis kaj batalis inter si por vidi, kiu plej longe povas stari sur la kapo sen renversiĝo. *Don* Gabriel sidis nun ĉe la matenmanĝo kaj diris al sia edzino: „Ankaŭ tiuj damnitaj filoj de putinoj, la tielnomataj fazeoloj ne estas kuiritaj ĝis moleco. Ĉe l‘ damnito sur la kruco!

*Caray*, fulmotondro! Se vi ne povas kuiri, vi ne estu edziniĝinta! Ankaŭ via patrino ne estas pli bona ol vi, ŝi havas nenion, scias nenion kaj disipas la tutan monon de *don* Manuel. Kiom mi bedaŭras la kompatindan viron, ke li estas via patro! La tortiljoj estas fridaj kaj gustas laŭ pajlo. Mi metis ja la kuleron en belan kaĉon! Kial Dio tiom kruele punis min, ke mi aranĝiĝis kun via familio! Via frato Siksto estas nur veproŝtelisto. Li ne lasas en paco eĉ unu knabinon. Mi tuj blindiĝos, se ili ne iutage starigos lin antaŭ policajn fusilojn."

„Lasu mian familion en paco, fripono, nur tion mi diras al vi", kriis la edzino. „Via familio koniĝis en la tuta mondo. Antaŭe nenion kaj poste eĉ malpli, kaj pli da ŝuldoj ol laŭsoj. Se mi estus nur obeinta mian bonan kompatindan patrinon, ŝi ekde la unua tago avertis min kontraŭ vi. Kaj kiom ŝi pravis, *Dios en el cielo*, Dio en la ĉielo scias, kiom ŝi pravas. Via patrino al mia patrino eĉ ne de malantaŭe povas kisi la kotŝmiritan ĉemizon. Prefere mi estu penduminta min ol akcepti vin, trompisto!"

Post tio la ino sidiĝis en angulo kaj komencis ploregi kiel torenta akvofalo.

*Don* Gabriel, klake ĵetis la mantenatajn tortiljon kolere sur la tabloplaton, saltis al la pordo, kaptis bastonon kaj ĵetis ĝin kun forto inter la grego de la lude luktantaj knaboj.

„Hunda brutaro", li kriis, „ĉu mi ne ducentfoje diris al vi, ke vi ne kriu tiom? Ĉiujn mi laŭvice traktos per pugnoj, ratoj stinkantaj. Mi tuj venos."

Denove kelkaj knaboj same kriante kuris transen al la vilaĝo. Sed la kuraĝuloj restis kaj sidiĝis denove kviete sur la herbejon, kie ili kaŭris kiel timigitaj tervermoj, kiuj forgesis, el kiu truo ili rampis

kaj tiam plu nur esperis, ke nigra cikonio trovu kaj beke piku ilin kaj tiel liberigu ilin de la turmentoj.

Denove venis kelkaj novaj knaboj. Ili kunportis siajn hundojn, ĉar ili de ili ne povis disiĝi, kaj la hundoj ne de ili.

**Rimarkoj**
*caray* = fulmotondro
*muchachos* = knaboj, junuloj
profesoro = instruisto, helpinstruisto ktp.

## 2/3

Intertempe estis jam la deka.

*Don* Gabriel iris en sian oficejon por rigardi, ĉu tie io okazis.

Nenio okazis. Ĉio estis tiel, kiel li postlasis ĝin vespere. Kelkaj paperoj kaj leteroj estis surtavoligitaj. Kelkaj estis pikitaj sur najlojn batitajn en argilan muron.

Ja ne povis okazi io en lia oficejo, ĉar liaj registaraj negocoj ĉi tie deruliĝis nur tre malrapide.

Li ĉirkaŭrigardis, ĉu li ne povus fari ion, ĉar li ja estis la loka sekretario. Sed kiom ajn li ĉirkaŭrigardadis kaj turniĝadis tien kaj tien, li trovis nenion, kio necesigus lian registaran agadon.

Li surtavoligadis la leterojn kaj foliojn kaj presitajn dekretojn kaj instrukciojn kuŝantajn sur la tablo. Li jam centfoje legis ĉiun paperan pecon kaj ĉiun notfolion kaj zorgis pri nenio, kio legeblis en la presitaj instrukcioj de la registaro. Li bezonus skribiston, sed li havis neniun. Li ankaŭ ne scius, kion doni al la skribisto por

skribado, ĉar nenio estis skribenda. Li estus doninta al li la presitajn deklarojn por kopiado por okupi lin.

Kiam li jam kelkfoje transtavoligis ĉiujn notfoliojn kaj paperojn, li denove metis ilin tiel, kiel ili kuŝis antaŭe, li glatigis ilin, ŝovis ilin en angulon de la tablo kaj aranĝis ilin per sia manplato tiel, ke ili formis unu angulon kun la eĝoj de la tabla angulo. Kaj tiam li frapetis per la manplato sur la notfoliojn kaj paperojn kvazaŭ li timus, ke la leterfolioj eble ne tiel kuŝados plu laŭ tiu aranĝo.

Tiam li levis la inkboteleton, skuis ĝin, eltiris la korkon, flaris ĝin, skuadis ĝin denove kaj refermis la boteleton per la korko kaj metis ĝin al ties loko. Nun li prenis la plumingon, rigardadis la rustiĝintan pinton de la plumo kaj gratadis ĝin tiom longe je sia hararo ĝis ĝi estis pura kaj tiam li metis la plumingon laŭ bela ordo apud la boteleton.

La oficeja ĉambro havis nur krudan tablon, du same krudajn kaj tre rigidajn seĝojn kaj du longajn benkojn, kiuj staris antaŭ argila muro.

Li rigardis transen al la benkoj kaj bedaŭris, ke sidis tie neniuj arestitoj aŭ kverelantoj, pri kies sorto kaj punoj li povus intertrakti.

Nun li paŝis antaŭ la pordon, rigardis transen al la vilaĝo kaj levis tiam manon por vidi el kiu direkto blovas la vento.

Li iris ĝis la angulo de la domo, de kie li povis vidi la junulojn, kiuj troviĝis antaŭ la pordo de la lerneja ĉambro kaj gakadis kiel anseroj.

La eniro al la lerneja ĉambro troviĝis post la angulo je la alia muro

de la loka municipo.

De la angulo li vokis: „Ahora, *muchachos*, *escuela*“.

La knaboj enviciĝis antaŭ la lernejo en linio.

„*Atencion*, atentu!“ li komandis.

Kelkaj knaboj, kiuj lernis tion en antaŭaj tagoj, kriis sovaĝe: „*Buenos días señor profesor!* Bonan matenon, sinjoro instruisto!“

*Don* Gabriel ekzercis nun por la unua dum duono de horo la *atencion*, la starigadon de la knaboj en vico kaj la ĝojokriadon: ‚Bonan matenon, *señor profesor*‘ tuj kiam li sufiĉe proksimiĝis al la lerneja pordo por aludi, ke nun komenciĝis la lernejo.

Li devis ekzerci tion ĉiutage denove, ĉar venis ĉiun tagon novaj knaboj, kiuj ne sciis la reglamenton. *Don* Gabriel rigardis tiun ekzercon „Atentu!“ kiel la plej gravan lekcion, kiun li povas instrui al la knaboj. Kostis por lia cerbo la plej etan laboron, kaj tiu tiel malgranda cerba agado havis rapidan kaj videblan sukceson, kiu ne montriĝus tiom rapide ĉe la dresada parkerigo de la alfabeto.

Tiu *atencion* estus samtempe tute bonega prezentado por oficistoj, se tiuj eventuale en inspektaj vojaĝoj venus en la lokon. Inter ili eble eĉ la *jefe politico* persone.

Se iu el tiuj *caballeros* tien alvenus, li komandus salti la knabojn antaŭ la lernejo. Li vokus: „Atentu!“ Kaj la *señor jefe politico* ĝojus pri tiu bone oleita mekanismo. Li sentus sin flatata kaj samtempe li ekkkonus, ke la knaboj estas bone edukitaj kaj

agnoskas lian aŭtoritaton. Se la mekanismo je komando tiom bone funkcias, la diktatoro ne devas timi, ke la junuloj, kiam ili fariĝos iam viroj, eventuale ribelos kaj postulos rajtojn. Se oni dresadas tion dum la juneco tiel bone, vokas la diktatoro aŭ la arcepiskopo nur laŭte *„atencion“*, kaj ĉiuj forgesas tuj, ke ili propre venis por postuli rajtojn kaj liberojn.

La knabojn la saltado al la atentopozo kaj la enviciĝo en rekta linio kaj la kriado multe pli ĝojigis ol trankvila sidado.

Estis samtempe bona komenco por la lernado de la hispana lingvo. La knaboj sciis nur la lingvon de siaj indiĝenaj gepatroj. Kaj ĉar la celtaloj ne havas la vorton „Atentu!“ en sia lingvo, tial ĉi tie tuj komenciĝis la unua konatiĝo al la lingvo de la respubliko.

Ĉio, kion *don* Gabriel volis instrui al la infanoj, li devis unue klarigi al ili en ties propra lingvo. Li parolis la idiomon de la indiĝenoj nur malbone, ja tre malbone. Homoj, kiuj estus malpli ĝentilaj kaj malpli taktoplenaj ol estis la indiĝenoj, ridus ĉe ĉiu frazo tiom, ke la korpo tordiĝus pro kramfoj. Des pli infanoj. Sed la infanoj estis tiel bone edukitaj de siaj propraj gepatroj, ke ili ne ridindigus plenkreskulon, eĉ se li balbutus aŭ havus oblikvan dikan nazon.

Kiam la infanoj sufiĉe forte povis kriadi *„Buenos días, señor profesor!“* ili lernis meti anstataŭ la vortoj *señor profesor* la vorton *caballero*. Oni instruis al ili, ke ili ĉiam devas krii ‚*caballero*‘, se la matena saluto ne celas la instruiston. ‚*Caballero*‘ estas ĉiam ĝusta. Oni povis uzi ĝin eĉ ĉe eklezia sinjoro pri kies titolo *don* Gabriel, ne povis klariĝi.

**Rimarkoj**
*Ahora, muchachos, escuela* = Ek, knaboj, al la lernejo!

## 2/4

La lerneja ĉambro ne havis fenestron, tiel kiel ĉiuj aliaj ĉambroj de la municipo ne havis fenestron. Estis nur la pordo, kiun eblis malfermi tiel, kiel en ĉiuj aliaj ĉambroj de la domo, se necesis heligi la ĉambron per ekstera lumo.

En la vilaĝoj kaj urbetoj en Meksiko neniu domo, ĉu loĝa domo aŭ ofica domo, havas fenestrojn, en la urboj de mezgrandaj urboj la plimulto de la domoj estas sen fenestro; kaj eĉ en la ĉefurboj de la lando oni trovas milojn de senfenestraj domoj, precipe en la kvartaloj de la proletaro. Nokte oni firme riglas kaj fermbaras la pordojn kaj la homoj dormas kiel en tomba kelo. Se oni vivas dum pli da tempo en Meksiko, oni kutimiĝas tiom pri tio, ke oni tute forgesas, ke domoj povas havi ankaŭ fenestrojn. La klimato permesas lasi la pordon malfermita dum la tuta jaro, kaj oni tial tute ne sentas la bezonon pri fenestroj.

La planko en la lernejo konsistis el firme stamfita tero, kiel en ĉiuj aliaj ĉambroj de la municipo. La tegmento estis tegmento nur el palmoj.

La mebloj de la lerneja ĉambro konsistis el tre malgranda kruda eta tablo kaj seĝo, kiuj montris jam spurojn de la vetero. Ekzistis por la infanoj nek benkoj nek tabloj. La infanoj devis stari aŭ ili kaŭriĝis surtere.

Sur la eta tablo kuŝis la ununura libro, kiun posedis la lernejo. Ĝi havis la titolon: „Kion devas scii ranĉisto, kiu volas teni sana sian brutaron?“ La libron verŝajne antaŭa sekretario, kiu tie havis sian oficon, postlasis pro neatentemo. Ĝi estis ŝirita en pecojn kaj certe jam servis al la infanoj de pluraj lokaj sekretarioj kiel ludilo.

Krome tie ankoraŭ troviĝis aĉe aspektanta kaj trivita eta libro, kiun oni ne povis nomi libreton ankaŭ tial, ĉar tute mankis la dua duono. La mankantaj folioj certe estis donitaj al travojaĝanta ofica persono, kiu ne kutimiĝis uzi elŝiritajn herbotufojn por privataj celoj. Tiu libro aspektis mizere ankaŭ tial, ĉar la randojn de la postrestintaj folioj prironĝis blatoj kaj musoj. La titolo estis „Populara astronomio“.

Krome staris sur la eta tablo inkuja boteleto kun densiĝinta kaj krustiĝinta inko. Apud ĝi kuŝis plumingo kun rustigita plumo. Maldekstre de ĝi troviĝis kelkaj folioj de blanka papero.

La infanoj havis nek ardezajn tabulojn nek skribpaperon.

Ĉiu generalo en la lando, ĉiu guberniestro kaj ĉiu ŝtatsekretario subtenis ne malpli ol ses inojn. Multaj pli ol dudek inojn. La kvanto de iliaj haciendoj kaj bienoj kreskis ĉiujare. Kaj en ĉiu jaro plialtiĝis la kvanto de iliaj ludomoj kaj luataj vilaoj en la ĉefurboj. Dek du procentoj el la ina genro de la lando estis registritaj prostituitinoj. De la ceteraj inoj la duono de tiuj, kiuj loĝis en urboj, ne estis registritaj, sed ili devis fari la saman kiel la registritaj inoj por vivteni sin kaj siajn infanojn kaj siajn gepatrojn. Ilian klientaron ili trovis inter la generaloj kaj koloneloj de la armeo, inter la altaj oficistoj de la lando kaj inter tiuj, kiuj investis fremdan kapitalon en la lando por malfermi ĝin por la beno de la popolo. Pro tridek jaroj de diktaturo, jen la sekvo de tiu ora erao sub la diktaturo, kiu kapablis subigi fieran popolon tiom, ke en la plej favoraj cirkonstancoj partoprenis tri procentoj de la popolo je la politikaj balotoj, ĉar oni komandis ilin tien por konservi la ŝajnon de civilizita kaj konstitucie regata lando. Estis eĉ tiel, ke por ĉiuj homoj estis pli grava la elekto de la karnavala reĝino kaj de la klaŭnreĝo por la procesio en la nokto antaŭ la granda festo, tial ĉe tiuj karnavalaj elektoj estis donite

dudekfoje pli da voĉoj ol ĉe baloto de meksika prezidanto.
La rurajn lernejojn vizitis laŭ la statistikoj multaj vizitantoj por malkaŝi al la mondo, ke Meksiko kunmarŝas en la unua vico de la civilizitaj popoloj. Sed la lernejoj havis nek benkojn nek tablojn nek ardezajn tabulojn nek krajonojn nek inkon nek plumojn nek librojn nek skribpaperon nek profesie trejnitajn instruistojn. Tion oni ne menciis en la statistikoj. Tion ankaŭ neniu postulis, ke oni menciu tion. Tial ja ankaŭ estas pli facile mensogi kaj trompi kun statistikoj ol sen statistikoj en ĉiuj branĉoj de la homa agado. Nur necesas forlasi el la statistikoj ĉion, kio povus malaltigi la valoron de la statistiko. Se spite al tiom da lernejoj kaj tiom da frekventoj okdek kvin procentoj de la popolo povis nek legi nek skribi post tridek jaroj da diktaturo, jen kulpis tion ne la diktaturo. Per funeloj oni ne povas plenigi cerbojn. Se la infanoj ne lernas, tiukaze estas ilia propra kulpo, tio pruvas nur kiom necesas konservi la dikaturon de la registaro kaj la potencon de la eklezio, post konsidero de la malkapablo de la indiĝenoj lerni ion, havigi sciojn al si kaj regi sin mem.

## 2/5

Malantaŭ la eta tablo en la lerneja ĉambro estis najlitaj du bretoj el malnovaj kestoj je la argila muro.

*Don* Gabriel prenis pecon da kreto kaj skribis sur la breton la literon A kaj diris: „Tio estas A. Kio tio estas?“

La infanoj ĉiuj samtempe kriis: „A.“

Poste li skribis la literon B kaj diris: „Tio estas B. Kio tio estas?“

La infanoj kriis: „Jen Booo!“

Kiam li venis ĝis la litero H, li sentis sin lacigita kaj diris: „Nun estas paŭzo. Vi ludu sur la placo. Sed ne interbatalu, ĉar tiukaze mi batos vin per la fazeolstango, etaj *cochinos*, porkoj, kiuj vi estas. Kio vi estas?“

„*Cochinos“*, kriis la infanoj ĥore, „porkoj“.

„Almenaŭ tion vi jam scias“, li diris.

Li iris en sian loĝoĉambron kaj engorĝigis brandon. Tiam li iris en la kuirejon kaj repaciĝis kun sia edzino. Ĉar li dormis kun ŝi en la sama lito kaj pensis pri la nokto, li trovis tion pli saniga, ĉiam sufiĉe frutempe akordiĝi kun sia edzino. Antaŭ sunsubiro oni ĉiam konkordu, precipe kun sia edzino, se oni ne havas alian je dispono. Sed la sunsubiro laŭ tempo ankoraŭ tute ne proksimis. Kaj antaŭ ol la tago pasis, li ankoraŭ kvarfoje terure kverelis kun sia edzino, sed ree kaj ree li paciĝis kun ŝi. Ĉar la lasta repaciĝo okazis, kiam li estingis la kandelon, li ne plu havis tempon kvinan fojon kvereli kun ŝi kaj tial la repaciĝo daŭris ĝis matene, kiam ĝi, tamen ankoraŭ antaŭ la matenmanĝo estis interrompita por povi komenci la novan tagon kun geedzaj ĝojoj. Se geedzoj ne havus tiajn ĉiutagajn gravajn batalojn, ili ne estus elteneblaj, kaj oni devus eltrovi ion pli bonan, ĉar la vivo de viro estas batalo. Kaj la vivo de edzino estas kontraŭatako kun subteno de artilerio en bone kovrataj pozicioj, en la dorso kaj kun ĉiam pretaj rezervoj.

Post horo *don* Gabriel rekomencis la instruadon. Li komencis kun ‚*atencion!*‘ kaj la tradraŝado de du knaboj, kiuj kaptiĝis reciproke en la hararo kaj batalis unu kontraŭ la alia. La knaboj kuris plorante hejmen por diri tion al la patro.

Aperis kvin novaj alvenintoj en la lernejo, tiel, ke la perdo ne estis

granda. Sed la kvanto de la knaboj restis la sama, ĉar tri knaboj en la paŭzo iris al siaj kabanoj kaj ne revenis.

*Don* Gabriel ne zorgis pro tio. Li havis nur la devon deklari la lernejon kaj instrui en la lernejo.

Li montris nun al la litero A: „Kio tio estas?“

„Estas F“, kriis la knaboj plimulte, dume du inter ili ekkverelis, ĉu estas D aŭ ne.

*Don* Gabriel malesperiĝinte kapneis kaj diris: „Tio malĝustas, estas A.“

„Estas A“, kriis la knaboj.

„Kio tio estas?“ li demandis kaj montris la literon B.

„Jen H“, kriis kelkaj, dum kelkaj vokis: „Jen Eeee.“

*Don* Gabriel malesperiĝis eĉ pli, li ekkonis kiel malfacile oni faras ĝin al instruisto en la vivo, kaj li diris: „Vi, kapridoj, tion lernos dum via tuta vivo neniam. Tio tute ne havas sencon. En viajn indianajn kraniojn oni povas marteli ĝin nur per hakilo.“

Li skribis nun la literon I sur la tabulon.

„Tio estas la litero I. Ĉiuj postparolu tion.“

„Tio estas Iiii, ĉiuj postparolu tion“, kriis la knaboj bonhumore.

„Ĉe la diablo“, li kriis kolere, „vi diru nur I, nenion pli.“
„Iiiii“, kriis la infanoj.

La infanoj staris proksime de la eta tablo.

*Don* Gabriel pentris nun la literon J sur la tabulon.

Jen unu el la knaboj vokis: „Mi scias, ke tio estas kapro, kiu estas firmligita. Kaj mia patro diris al mi, ke mi nun devas veni hejmen kaj observi la kaprojn, ili ĉiam iras en la maizon.“

„Vi restados plu ĉi tie“, diris *don* Gabriel. La knabo komencis plori.

„Iru en la inferon“, kriis *don* Gabriel. „Sed morgaŭ vi ree estos en la lernejo, aŭ mi draŝos al vi la fazeolstangon sur la dorson.“

La junulo forkuris kaj *don* Gabriel diris: „Tio estas *ĥota*.“ Li prononcis ĝin hispane.

„Tio estas *ĥotooa*!“ la knaboj ĥore vokis.

„Nu, tion vi ja tamen ne lernos. Kial mi ankoraŭ pli longe turmentu min ĉi tie kaj disŝiru mian pulmon pro vi!“ diris *don* Gabriel.

„Ni nun lernos ion alian. Atentu! Mi estas meksikano, *Viva Mexico, Viva arriba!*“

La knaboj postkriis ĝin kaj *don* Gabriel diris: „Tion vi nun scias, kaj memoru tion bone.“

Sed kion tio signifas, la infanoj ne sciis; ĉar *don* Gabriel ne penis klarigi tion al la knaboj en ties propra lingvo.
Tiu voko ‚*Viva Mexico!*‘ kondukis lin al nova ideo rilate tion, kion li instruu al la knaboj.

Iun instruplanon li ne havis. Eĉ multe malpli imagon pri tio, kiel oni instruu infanojn.

Li skribis la literojn sur tabulon kaj parolis la liternomojn. Se la infanoj memortenos tion, ili estos lernintaj la legadon; kaj se ili ne memortenos tion, ne estis kulpo lia. Li plenumis sian devon kiel instruisto, ĉar li diris al ili, kiujn nomojn havas la literoj. Li ankaŭ ne sciis, kio fareblus plu. Li jam atingis la finon de siaj kapabloj kiel instruisto.

Sed la ‚*Viva Mexico!*' estis kvazaŭ inspiro. Li vidis tute precize, kiel li daŭrigos sian instruan agadon.

„Bone atentu, *muchachos*", li diris, „mi ĉi tie antaŭkantos ion al vi. Kaj vi postkantos tion."

Li poste komencis kanti la nacian himnon. Li kantis la melodion tiel neprecize, ke same tiel bone povus esti fokstroto. Kiam li atingis la trian linion, li eltrovis, ke li ne scias pluajn vortojn. Tial li kontentiĝis per tio, ke li ripetis plurfoje la unuajn du liniojn kaj postulis de la infanoj, ke ili postkantu tiujn vortojn. Ili kvazaŭ regurdis ilin sen kompreni ties sencon, ĉar ĝi estis ja hispana kanto.

*Don* Gabriel rigardis tion bonega rimedo por plenumi esencan taskon de la lerneja instruado: Instrui al la indiĝenaj infanoj la lingvon de la lando.

Kiam la infanoj parole jam regurdis tiujn du liniojn pli ol dekfoje kaj tamen ne precize direblis, se oni nur supraĵe aŭdis tion, ĉu la knaboj parolas la hispanan aŭ la hindustanan, sed, ĉar tamen oni povus persvadi iun, ke tio estas la hispana, *don* Gabriel kontentiĝis per tiu sukceso.

Li atendis novan inspiron pri tio, kion li faru. Kaj jen li ekhavis la penson, ke li bone povus uzi la infanojn por kapti pli bonan postenon en la ŝtato.

Tiel li ekhavis la ideon instrui al la infanoj ankaŭ la ĵuron sub la flago.

Li sciis, ke neniu oficisto, kiu en inspektada vojaĝo vizitus la lokon, kiam ajn penus kontroli en la lernejo, ĉu la infanoj lernas legi kaj skribi. Tia ekzamenado nur ŝtreĉus la fortojn kaj ĝi estus enua. Oficistoj ne volis, ke oni enuigu ilin.

Sed bonegan impreson li atingus, se li ordonus stari la knabojn en atentopozo kaj ili vokus en la hispana ‚Bonan matenon, *caballero!*' Kaj se ili kantus parkere kelkajn liniojn el la nacia himno, se ili eĉ povus deklami la ĵuron sub la flago, kompreneble hispanlingve, la inspektanta oficisto konsciiĝus, ke *don* Gabriel estas viro por pli bona posteno, eble eĉ la ĝusta viro por okupenda posteno kiel impostkolektisto.

Tiel *don* Gabriel pliampleksigis la instruadon kaj preĝadis la ĵuron sub la flago. Sed li ankaŭ en tiu kazo ne rememoris multon. Jam la dua frazo fariĝis tiel necerta, ke li rezignis pri tio kaj kontentiĝis per tio instrui la unuan frazon kaj ripetigi la du liniojn de la nacia himno, kiujn li sciis kun certo.

Li konvinkiĝis, ke tio tute sufiĉus por prezentado de la lernejo. Paroligi la ĵuron sub la flago laŭ la tuta longo kaj kantigi la nacian himnon kun ĉiuj strofoj, tion atendis certe eĉ ne unu oficisto. Male, ili kviete dankus *don* Gabrielon pro tio, ke li ne turmentis ilin per tio devi aŭskulti la milfoje maĉitan kaĉon laŭ ties tuta senkompata longo en tiu kota vilaĝo. Oni taksus tion eĉ kiel delikatan taktosenton pri li, se li montrus al la oficisto nur ĝuste

la ideon de la instruado kaj de la sukceso. Kaj por evidentigi, ke ne okazis tie eble eĉ neglektemo, li antaŭe dirus al la oficisto, ke li volas montri al li per tiuj limigitaj eltiraĵoj, kiamaniere disvolviĝas la instruado, kaj, ke li certe scias, ke la tempo de la *señor comisario* aŭ de la *señor* inspector estas tro multekosta por povi atendi de ili, ke ili aŭskultos dum horoj la parkere diratajn frazojn kaj la regurdadon de la infanoj.

*Don* Gabriel konis la homojn. Kiam kelkajn monatojn poste impostinspektisto venis en la lokon kaj skribis en sian vojaĝraporton inspektadon de la lernejo por ŝajnigi sian agadon pli ampleksa ol ĝi estis en vero, *don* Gabriel efektive agis tiel, kiel li elpensis tion. En la vojaĝraporto de la inspektisto al la registaro troviĝis la rimarko: „Mi vizitis kaj inspektis kromofice la lernejon de la loko kaj trovis ĝin tre multpromesa kaj vere kontentiga en ĉiu direkto. Sub la gvidado de la sekretario de la loko, *señor Gabriel Orduñez* ĉiuj infanoj parolas hispane kaj troviĝas en avancita ŝtupo, kio koncernas la legadon, la skribadon kaj la historion.

La raporto de tiu inspektisto esprimis, kiel ĉiuj tiaj raportoj, la veron. Sub diktaturo aŭ despoto statistikoj kaj raportoj okupas gravan rangon. Ili estas la fasado de la konstruaĵo. Tiuj fasadoj eĉ ne eltenus, se oni gratus nur per fingra ungo je orumado. Kaj nenie aliloke oficistoj kaj neoficistoj komprenas tiel lerte starigi fasadojn kiel sub diktaturo, en kiu ĉiu, kiu volas vivi kaj vivi sen molesto, antaŭ ĉio devas ŝmiri per gluaĵo sur fasadon tion, kion li faras aŭ parolas, por ke li ne estu eksuspektata ne akcepti la sistemon.

Kiam *don* Gabriel instruis du aŭ tri semajnojn en la lernejo, li trovis, ke liaj lernantoj neniam kleriĝis pri tio, ĉu la litero, kiu estas pentrita sur la tabulon, estis A aŭ G. *Don* Gabriel diris al la

knaboj ĉiutage dekfoje, ke ili tamen ne lernos tion, eĉ se ili frekventus la lernejon dum cent jaroj.

La knaboj tion mem komprenis kaj venis en la lernejon nur tiukaze, se ili ne sciis kion fari alian. Je neniu tago ĉeestis pli ol kvarono de la knaboj.

*Don* Gabriel eltrovis novan lernometodon. Envere li ne eltrovis ĝin, sed li trovis ĝin iam en alia loko, kiam li ankoraŭ estis brutkomercisto kaj volis aĉeti brutojn de la sekretario en tiu loko.

Pri tiu metodo, kiun li vidis tie, rememoris nun *don* Gabriel, kaj li imitis ĝin kun negrava plibonigo de la patento. Tiu malgrava plibonigo estis fakte lia eltrovo.

Li kunkolektis en sia magazeno neuzeblajn erojn de pakpapero, disŝiritajn papersaketojn kaj blankajn gazetorandojn.

Tiam li skribis per inkoplumingo sur ĉiun el tiuj ŝiraĵoj mallongan frazon: ‚La bovino estas bruna kaj havas kvar krurojn. La kaprino havas kornojn kaj voston. La ŝafo estas nigra aŭ blanka kaj havas lanon. La arbo estas alta kaj havas multajn branĉojn. La sekretario estas *caballero* kaj havas edzinon. La guberniestro regas la ŝtaton honorinde kaj kun saĝo. La prezidanto de la lando estas generalo kaj bona prudenta viro. La meksika respubliko havas faman prezidanton, *don* Porfirion. La *Jefe Politico* en nia distrikto estas viro kun honoro kaj estas respektata de ĉiuj. La meksikanoj estas la plej kuraĝaj militistoj surtere kaj noblaj. La suno staras en la ĉielo kaj estas ronda. Mia patro havas agron kaj kaprinojn kaj ŝafojn‘.
Post kiam *don* Gabriel sur sufiĉe da paperŝiraĵoj skribis po unu el tiuj frazoj, li donis al ĉiu knabo tian surskribitan ŝiraĵon.

Li donis la ŝiraĵon surmanen de knabo tiel, ke la pozicio de la literoj el la okuloj de la knabo estis ĝusta.

Tiam li diris al la knabo: „Tiel vi ĉiam tenu la papereton antaŭ vi, por ke tiu ĉi punkto ĉi tie estas je la dikfingro de via dekstra mano. Tiel, jen, kiel mi montras tion al vi.“

Nun li antaŭlegis al la knabo la frazon, kiu legeblis sur la papereto, kaj la knabo devis ripeti la frazon tiom ofte, ĝis li povis postparoli ĝin kun certa sekureco.

Sed li klarigis la frazon ne sufiĉe en la indiĝena lingvo. La knabo havis nur etan divenon pri la signifo de la enhavo de ĉiu frazo. Li ne sciis, kiu vorto en la frazo estas ‚bovino‘ aŭ ‚kaprino‘. La knabo post kelkaj ripetoj povis elgakadi nur tiun frazon, kiu estis antaŭdirita al li, sed li nek vere kaptis la ĝustan sencon nek kaptis la sencon de ĉiu unuopa vorto, ĉar tiuj frazoj estis ja ĉiuj hispanlingvaj.

Kiam la knabo estis ricevinta la papereton kaj sufiĉe ofte postparolis la enhavon, ĝis li sciis ĝin parkere, la knabo kun sia ŝiraĵo estis lasata sola, kaj lia plua tasko estis nun seninterrompe regurdi la frazon, ĉe tio tenante la papereton antaŭ la okuloj.

Tiam *don* Gabriel okupiĝis pri la sekva knabo, enmanigis la ŝiraĵon de la knabo kaj antaŭdiris al li la frazon, kiu legeblis sur la papereto, ĝis la knabo memortenis ĝin.

Kiam ĉiuj knaboj havis siajn paperetojn, ĉiu laŭte gakadis sian frazon je la sama tempo kun ĉiuj aliaj. Estis sovaĝa pelmelo de kiaj ajn frazoj, kies verkisto kaj produktisto estis *don* Gabriel.
*Don* Gabriel foriris por trinki brandon kaj la knaboj kvazaŭ lude interbataladis sur la placo.

La instruado konsistis dum la sekvaj semajnoj nur el tio, ke la infanoj ripetis ĉiutage la du liniojn de la nacia himno, kiujn *don* Gabriel sciis mem, kaj, ke ili ĉiun tagon kvar aŭ kvin horojn gakadis la frazon legeblan sur la papereto de ĉiu knabo, interrompite de kelkaj paŭzoj por interbataladoj.

En la kuro de la semajno venis ĉiuj, do la cent dudek knaboj, al la lernejo, ĉiu unuopa el ili almenaŭ unufoje kaj ĉiu ricevis certan ŝiraĵon.

Kaj efektive iutage venis *Don Casimiro*, la *jefe politico* de la distrikto dum sia inspektista vojaĝo en la lokon.

Starinte en la atentopozicio kaj trumpetante elkriinte la frazon *„Buenos días, caballero!“* la knaboj parolis la du unuajn liniojn de la nacia himno. Ili monotone kaj kvazaŭ kante parolis ilin, sed tiel, ke aŭdeblis neniu simileco kun la ĝusta melodio. Sed *don Casimiro* ne ĉagreniĝis pri tio. Li ankaŭ ne rimarkis, ke la knaboj ne sciis pliajn liniojn de la himno, ĉar tuj, kiam ili estis regurdintaj la du liniojn, ili kriis: „Mi estas meksikano. *Viva Mexico, viva arriba Mexico!*“

*Don Casimiro* gajnis per tio la impreson, ke tie sur tiu tereno estis atingita ĉio, kio iel elvringeblas el indiĝenaj infanoj.

Tiam ĉiu knabo antaŭenpaŝis, tenis sian papereton antaŭ si kaj laŭte kaj gakante antaŭlegis tion, kio legeblis sur la deŝiraĵo.

La *jefe politico* rigardis kelkajn el la paperetoj kaj sentis kontentiĝon, ke ĉiu knabo vere legis tion, kio legeblis sur la papereto.

Ĉar li trovis *don* Gabrielon tiel taktoplena ne tiom molesti lin kun

la prezento de la infanoj, ankaŭ li estis taktoplena kaj ne provis interŝanĝi reciproke la paperetojn de la infanoj aŭ instigi tiun aŭ tiun infanon legi la papereton de alia knabo. Kaj li ankaŭ ne troigis tiom eĉ alvoki knabon, montri sur certan vorton kaj demandi: ‚Kiel tiu ĉi vorto nomiĝas, sub kiu mi ĵus metis mian montrofingron?' Li ankaŭ ne demandis knabon: ‚Montru al mi sur via folio, kie legeblas la vorto ‚maizo.'

Tiam *don* Gabriel ordonis al la knaboj nombri de unu ĝis dudek. Kaj fine li demandis: „Kio estas Meksiko?"

La infanoj vokis ĥore: „Meksiko estas libera kaj sendependa respubliko."

„Kiu staras je la pinto de la meksika respubliko?" li demandis kaj la infanoj kriis: „Prezidanto."

„Kiel li nomiĝas, la prezidanto?" „Generalo *don* Porfirio", kriis la knaboj.

Per tio finiĝis la lerneja prezento. *Don Casimiro* skuis la dekstran manon de *don* Gabriel kaj diris al li, ke li estas tre kontenta pri la rezulto.

En la raporto *Don Casimiro* menciis, ke la knaboj de loko sub la gvidado de la sekretario elektita de li mem, pro ties granda kapablo, ĉiuj parolas, skribas kaj legas la hispanan kaj ĉiuj scias la hispanajn numeralojn.
La lernejo troviĝis en la jara statistiko kiel rura lernejo centprocente sukcesa kaj kun la aldona rimarko: aĝokategorio de la jaroj sep ĝis dek kvar, neniuj analfabetoj.

Centoj de indiĝenaj vilaĝoj, kiuj malproksimis okdek ĝis kvarcent

kilometrojn for de la plej proksima fervojlinio, ricevis la saman kategorion en la statistiko; ĉar ĉiu *jefe politico* estis sufiĉe ambicia ne lasi pli altan ranĝon al alia *jefe politico*. Tian bonegan edukstatistikon eĉ ne Danio povis prezenti, kaj ĝis la plej estontecaj tempoj estis certigita la famo de la diktatoro kiel edukanto de lia popolo kaj kiel varmkora protektanto de la indiĝena raso. La statistikoj estis ja presitaj kun zorgemo sur bela peza papero kaj pompe binditaj kaj poste senditaj al la statistikaj oficejoj de ĉiuj civilizitaj nacioj.

„Kia esperoplena lando!“ diris la usonaj bankieroj. Kaj pruntis bonvoleme milionojn da dolaroj al la usonaj fervojkompanioj, lum- kaj elektrokompanioj, minejaj kompanioj, naftokompanioj, koloniigaj kompanioj kaj kaŭĉukkompanioj por havi sufiĉe frutempe la manojn en tiu ĉi lando, kiu havas tian grandan estontecon, kaj kie la meksikano estis farita tiom senrajta kaj tiel senutila kiel ĉino en Aŭstralio, kaj la indiĝenoj tiel sklavigitaj kiel proletaj negroj en Liberio.

**Rimarkoj**
*cochino* = porko
*comisario* = komisiito
*inspector* = inspektoro
*Viva Mexico, viva arriba!* = Vivu Meksiko, vivu ĝi!

# Ĉapitro 3

## 3/1

La granda sufero de *don* Gabriel estis tiu, ke la lernejo ne enspezigas ion.

En la kuro de la multaj semajnoj, kiujn li jam pasigis tie en la loko, li sukcesis fari diversspecajn negocojn helpe de sia aŭtoritato.

Kromimpostojn por komercistoj, kromimpostojn por brutoj, kiujn la indiĝenoj buĉas en la loko, kromimpostojn por brutaĉetistoj, kromimpostojn por familiaj festoj, kiujn la indiĝenoj de la loko festis por si mem. Monpunojn por importita brando, kiun indiĝenoj portis hejmen, se ili estis en urbo sur la foirplaco kaj poste lasis kapti sin de *don* Gabriel aŭ, se oni renkontis ilin, dum ili ebriis.

*Don* Gabriel kiel sekretario ne havis la intencon pasigi sian tutan vivon en tiu de l‘ mondo forgesita loko. Lia tasko estis tiom rapide, kiom eblas, riĉiĝi tie kaj poste aĉeti grandan bienon aŭ malfermi brandofabrikon en iu urbo.

Oni ne tentu kaj mistifiku Dion, kiu havigas oficon al oni. La grandan gracon montritan al viro, kiu ne estas inda paŝi antaŭ la vizaĝon de la plej alta Dio, li eluzis je sia propra bonfarto kaj lerte aplikis sian funton, por ke ĝi fariĝu tuno. Sed *don* Gabriel estis malriĉa je ideoj, kiuj povus konduki al sukceso.

Sed jen okazis, ke vizitis lin je la ĝusta tempo lia pli juna frato Mateo.

## 3/2

*Don* Mateo ne tute libervole vizitis lin. Li ne sentis tro da inklino al *don* Gabriel, kaj ĉu *don* Gabriel bone fartas aŭ malbone, tio ne multe interesis lin.

Mateo ĉiam havis multe da bonŝancoj. Aŭ por priskribi tion pli precize, ĉar feliĉo apenaŭ difineblas: Li havis la kapablon ĉiam elserĉi nur tiajn amikojn, kiuj povus esti utilaj al li persone.

Pro tiuj rilatoj li tralaboradis sin tra tuta vico de ŝatataj postenoj: poŝteja estro en malgranda loko, kontrolmarkisto, akridokomisaro, buĉbruta inspektisto, foirplaca kontrolisto.

De tiu ĉi lasta posteno li faris grandan salton al unu el la plej strebataj oficoj, kiuj ekzistis sub la diktaturo: Impostinspektisto. Por neniu ofico, eĉ ne por tiu de lerneja estro aŭ de komisaro de la publika saneca higieno necesis iuj scioj. Analfabetoj povis esti generaloj. Iu, kiu sciis la efikon de ricinoleo kaj kiu certe sciis, ke la plejmulto de la homoj havas la koron sur la maldekstra flanko, povis esti armea kuracisto kaj donis al si la titolon de medicina doktoro. La oficoj ne estis por tio, ke ili servu la popolon, sed ili ekzistis trovi postenon por tiuj, kiuj rigardis *Don* Porfirion kiel la plej grandan ŝtatestron de la lastaj kvar jarcentoj aŭ por teni plenŝtopitaj la monujojn de tiuj, kiujn oni timis, ĉar ili povus fariĝi maloportunaj al la reganta kliko, ĉar ili estis membroj de tre riĉaj multinfluaj familioj.

Se oni supozis pri impostinspektisto, ke li nun sufiĉe longe havis la oficon por povi meti sufiĉe da mono flanken kaj, se li ne petis eksplicite pri sia eksiĝo post kelkaj klardiraj avertoj por translasi la lokon al alia strebemulo, jen okazis sufiĉe ofte, ke la viro estis

tirata en kverelon, kutime je festo, kiam oni trinkis multe. Oni intence ofendis la viron ĝis li elŝiris pro ekscitiĝo la revolveron. Post tio li estis pafmortigita de tiuj kiuj staris prete, ĉar necesis memdefendo. Tiel la posteno fariĝis disponigebla; kaj ne malofte ĝuste tiu, kiu pafis, ricevis tiun postenon. Ĉar ĉiuj, la juĝistoj, la ĉefo de la polico, la urbestro kaj atestantoj, apartenis al la kliko de tiu, kiu ricevu la postenon, tial la murdo estis forgesita post la pompa enterigo de la imposta inspektisto, kiu mortis tiel malbonŝance kaj bedaŭrinde. La nova imposta inspektisto aranĝis grandan bankedon kaj elegantan societan balon.

Imposta administranto ricevis sufiĉe grandan salajron. Sed tiun li rigardis nur kiel krommonon. La enspezoj, pro kiuj la ofico estis tiel avidata, estis de alia speco.

Li ricevis konsiderindan procentparton el ĉiuj enspezitaj impostoj. Tion la dikaturo tiel ordonis, por ke la impostadministrantoj havu intereson je la negoco kaj, por ke oni elvringu ĝis trans la lasta limo el la komercistoj ĉion, kio iel ajn elvringeblas de ili. Antaŭ ol entreprenema fabrikisto povis teksigi mil metrojn da kotonlana ŝtofo, li devis jam pagi la valoron de dudek kvinmil metroj je licencaj kotizoj kaj impostoj. La registaro ne havis intereson pri tio, ke meksikanoj starigu propran industrion en la propra lando. Estis pli oportune enspezi altajn doganojn por la importo de varoj el fremdaj landoj kaj konservi al si la bonvolon de usonaj, francaj kaj anglaj eksportaj firmaoj, por pruvi per altaj importkvantoj, ke la dikaturo kreis oran eraon.

Ligita al la ofico de imposta administranto estis ankoraŭ aliaj grandaj enspezoj.

Kiel supre en la registaro estis nur diktatoroj, estis ankaŭ malsupre en ĉiuj oficoj nur diktatoroj. La imposta administranto

havis la rajton fiksigi la alton de la impostoj por ĉiu komerca branĉo kaj por ĉiu metio kaj por ĉiu alia enspezo. Tio por si mem rajtigeblis. En tia granda lando la impostaltoj ne reguleblas per leĝoj. En la distriktoj, kiuj malproksimis de fervojoj kaj stratoj, la transportkostoj estis pli altaj, en aliaj distriktoj la prezoj por nutraĵoj estis altaj, en aliaj ili estis malaltaj, en iu loko la salajroj kaj ĝeneralaj negocaj kromkostoj estis malaltaj kaj en alia loko altaj.

Se la impostregularo de la ŝtato ordonis, ke brandofabriko laŭ la proksimuma fabrikata kvanto devas pagi ducent pesojn da impostoj ĉiumonate, la imposta administranto fiksis tiun imposton pro kiu ajn kaŭzo je kvarcent pesoj. Tiam la fabrikisto vizitis lin. La fabrikisto ĵuris, ke li ne povas pagi tian imposton. La vizito finiĝis per tio, ke li donis al la imposta administranto mil pesojn, pro ties konsidero, kaj la imposta administranto pro tio fiksis la imposton nur je ducent kvindek pesoj ĉiumonate. En tiu kazo li eĉ havigis al si bonan reputacion, ĉar li favore al la ŝtato elvringis kvindek pesojn pli en ĉiu monato ol propre kutime estis pagende.

La fabrikisto helpe de leĝoj kompreneble povis kontesti la altan imposton. Sed unue li devus pagi la fiksitan imposton por jaro aŭ eĉ pli da tempo, ĉar pasus nenombreble multaj monatoj antaŭ ol la plej supra impostoficejo decidus ion. Eĉ, se la impostoficejo decidus je lia favoro, tamen daŭrus ankoraŭ jaron aŭ eĉ pli longe antaŭ ol li rericevus la monon tro multe pagitan. Ĉar la fabrikanto devus pagi ĉiujn kostojn de la arbitracia procedo, kaj li je la lokoj, kie oni farus la decidojn, devus pagi advokatojn, la kostoj vorus la plej grandan parton de la tro multe pagitaj impostmonoj, tiel, ke tiu sumo, kiu fine retrovus la vojon en liajn manojn, apenaŭ indus la penon kunpreni ĝin.

Kutime aldone estis tiel, ke fabrikanto pagis malpli da impostoj ol li fakte estis devigita pagi. Kaj ĉe la arbitracia procedo tio malkaŝiĝus, ĉar oni farus postkontrolon.

Pro tiuj kaŭzoj estis ĉiam la plej simpla afero por ĉiu imposta paganto interkonsentiĝi kun la imposta inspektisto kaj doni al li okazon enspezi ion. Tio estis ĉiam pli malmultekosta kaj pli sekura.

Tial estis facile kompreneble, kial la ofico de imposta inspektisto estis tiom dezirata kaj kial kandidato por tiu ofico ne hezitis helpi transigi en la alian mondon la ĝistiaman enhavanton de la posteno, se tiu je fiksita tempo ne libervole volis retiriĝi.

## 3/3

Estis nur tre eta urbeto, en kiu *don* Mateo kun la helpo de multinfluaj amikoj ricevis tiun impostan postenon. Sed por li, kiu havis krome nenion, eĉ tiu eta posteno estis sufiĉe bona por kontentigi lin. Tiel, kiel por *don* Gabriel la posteno kiel loka sekretario, kiom ajn eta ĝi estis, donis la okazon ree bone surpiediĝi.

Kaj tiam iutage revizio anonciĝis, sed mankis al *don* Mateo pli ol tri mil pesoj en la kaso.

Li provis pruntepreni la monon de diversaj personoj, sed tio malsukcesis. Venis en lian kapon stranga elirvojo. Tia elirvojo, kvankam stranga, tamen ofte kaj ankaŭ aliloke estas uzata.

*Don* Mateo forrajdis al malproksime situanta loko, kiu troviĝis en lia imposta distrikto, por tie kolekti impostojn. Je la dua tago post tio li revenis sen ĉevalo, taŭzita kaj ĉifonita kaj kun vundita brako

pro pafo. Li iris al la polica ĉefo kaj klarigis, ke lin rabe atakis je la hejmiro banditoj, kiuj forprenis la tutan monon, kiun li havis ĉe si, pli ol tri mil pesojn.

Lia ĉevalo retroviĝis en la nokto sur lia paŝtejo, kun sangomakuloj sur la selo.

Ĉe la revizio la kaso tamen ne estis en ordo. Li ne estis sufiĉe prudenta por povi lerte kamufli, ke tiuj tri mil pesoj rabatake forprenitaj de li, kaj kiujn li antaŭe laŭdire enkasigis en tiu loko, ne estas identaj kun la tri mil pesoj, kiuj mankis en la ĉefa kaso. Sed la reviziaj oficistoj, kiuj komprenis preskaŭ nenion pri librotenado kaj ankaŭ nur tial fariĝis reviziaj oficistoj, ĉar ili havu postenon kaj alian ne povis okupi, ne trovis la fadenon en la afero por klare pruvi la defraŭdon al *don* Mateo. Ili kontentiĝis per la aserto, ke la rabitaj tri mil pesoj estis la samaj tri mil pesoj, kiuj mankis en la ĉefa kaso.

Ĉar unu el tiuj reviziaj oficistoj havis amikon, al kiu li devis montri sin dankema, kaj al kiu li jam delonge promesis oficon, li uzis la okazon por proponi al *don* Mateo libervole eksiĝi de la posteno.

*Don* Mateo sufiĉe bone komprenis la konsilon kaj li petis pri la eksiĝo.

Ekde tiu tempo li ne havis okupon. Li vagadis en *Balún-Canán*, havis kverelojn kun inoj, provis kelkajn negocojn pri la vendado de domoj kaj ranĉoj, komercis kun ĉevaloj kaj muloj kaj subtenis siajn amikojn en la batalo pri oficoj en la komunuma administrejo kaj en la distrikto, ĉiam esperante, ke tiukaze, se iu el liaj amikoj ekoficistos, ankaŭ por li denove posteneto devus esti havigebla.

Pro drasta kverelo pri la nova kandidateco por la prezidanteco de la komunuma administrejo, ekokazis pafadoj inter la klikoj; kaj *don* Mateo malbonŝancis per tio, ke li brulmarkis la dekstran kruron de la polica ĉefo apartenanta al la alia partio por la nova kandidato per kuglo el kvardek-kvin-kalibra pistolo. Sed la plej granda malfeliĉo estis, ke, kvankam ĉiuj aliaj kugloj interpafitaj en tiu kverelo, ne identigeblis rilate la originan pafinton, la polica ĉefo sciis kun certo, kiu brulmarkis lin per la kvardek-kvin-kalibra kuglo. Kaj ĉar la partio de la polica ĉefo tiumomente havis la potencon, al *don* Mateo ne restis io alia krom pretiĝi por vojaĝo interne dum horoduono, tiam ankoraŭ en la sama nokto li sidis sur ĉevalo, kovrata de siaj amikoj endorse, kaj survojiĝis al Gvatemalo.

Ĝis la lago de *Tsiscao* la vojo estas ja bona, sur la meksika flanko ĝi estas sesdek kilometrojn longa, por la persekutantoj same tiom, kiom por la persekutato. Sed post la lagoj komenciĝas diodamnita ĝangala vojo ĝis la unua loko en Gvatemalo.

Estis tiu ĝangalo, kiun *don* Mateo timis.

Ĉar ĉiu, kiu en tiuj distriktoj faris stultaĵon kaj devas fuĝi pro tio, rajdas al Gvatemalo, kie oni nek persekutas nek transdonas lin al juraj instancoj de Meksiko, pro aferoj, kiujn li deliktis tie, tial la polica ĉefo supozis, ke Mateo tute certe iros al Gvatemalo, kaj ĉar tiu sufiĉe antaŭis distance, la persekutantoj post du horoj rezignis pri plua persekuto.

La persekutantoj havis la komision, ke ili lin voku, kiam ili ekvidos lin, kaj se li ne haltos tuj pafmortigu. *Don* Mateo konis la ulojn. Li sciis, ke ili pafmortigus lin ankaŭ tiukaze, se li haltus post la voko, kaj tiam eĉ des pli certe. La polica ĉefo estis lia plej akra malamiko. Parte pro certa ino kaj parte, ĉar estis konate, ke

*don* Mateo mem havis la esperon fariĝi polica ĉefo, en tiu kazo, se lia kliko transprenos la rudron. En tiu kazo la polica ĉefo devus forlasi la urbon; ĉar Mateo trovus kaŭzon pro memdefendo forigi lin.

*Don* Mateo timis la longan solecan rajdadon tra la ĝangalo. Li sentis ankaŭ, ke lia ĉevalo eklaciĝas. Tial li ŝanĝis sian planon.

Post dudekkilometra rajdado li deturniĝis de la vojo, turnis sin al nordo, ĉirkaŭiris *San Antonio*-n kaj *Las Margaritas,* ripozis en *Santa Helena*, vojaĝis plu alten al *Santa Rita*, ĉirkaŭiris *Hucutsin*, kie li estis konata, kaj kie troviĝis telefona konekto, kaj venis post kvintaga rajdado al sia frato en Bujvilum.

Tie li estis preskaŭ tiel sekura kiel en Gvatemalo.

Li estis nun en alia distrikto, li povus kaŝi sin, se iu eventuale venus kiel vojaĝanto en la lokon, kiu konas lin kaj neniu ekhavus la ideon serĉi lin tie, ĉar ĉiuj supozis lin en Gvatemalo.

Post tri monatoj la krurvundo de la polica ĉefo bone estos kuracita, cikatriĝinta kaj forgesita. *Don* Mateo tiam povus reveni, repaciĝi kun la polica ĉefo, dum certa tempo eviti ĉiujn kverelojn kaj atendi ĝis la propra kliko sidos ĉe la manĝotrogo.

En Meksiko oni estas tre vastkora pri tiaj aferoj. Kiu ne estas kaptita, kiam la sango ankoraŭ tro bolas, povas esti certa pri sia paco, se la vundo estos cikatriĝinta, ĝis kiam li iam denove falos en kaptilon.

## 3/4

*Don* Gabriel ne tre ŝatis sian fraton Mateo. Mateo estis kverelema kaj ĉiam volis esti prava, li fanfaronis eterne pri siaj pli bonaj scioj, pri siaj pli grandaj kapabloj, sian pli aĝan fraton daŭre humiligante kaj kritikante pri ĉio, kion ajn li faris.

„Mi povas tre helpi al vi rilate viajn negocojn“, diris *don* Mateo.

„Jes“, respondis *don* Gabriel. „Sed tiurilate ne multe da helpo eblas. Mi ne havas ion por fari. La tutan laboron de jaro mi povas plenumi dum dek du horoj sen streĉi min dum tio.“

„Kiom da mono vi enspezas helpe de la lernejo?“ demandis Mateo.

„Nenion“, diris Gabriel, „tion mi faras simple krome por fari almenaŭ ion. Tio faras ankaŭ bonan impreson en la raporto kaj, se iu eventuale venas en la lokon. Tio estas inkludita en miajn dek kvin pesojn, kiujn mi ricevas ĉiun monaton kiel sekretario.“

*Don* Mateo ridis supere: „Mi neniam supozis vin tre ruza, *Gabucho*, sed ne tiom stulta. La lernejo povas enspezigi pli ol tridek kaj eĉ kvindek pesojn dum ĉiu monato al vi.“

„La familioj pagas nenion por la instruado.“

Mateo diris: „Tion mi povas imagi, sed ekzistas ja leĝo, ke la infanoj devas frekventi la lernejon ĉiutage. Kaj se ili ne venas, vi havas la rajton puni la patrojn per peso aŭ per tri pesoj.“

„Tio pravas“, konfirmis *don* Gabriel. „Pri tio mi neniam pensis.“

Ĉar ĉiutage nur tridek lernantoj venis en la lernejon, kaj naŭdek mankis, tial tio estus ĉiutage naŭdek pesoj da enspezo. Li rapide elkalkulis tion.

„Por ne fari tion komence tiom severe“, klarigis *don* Mateo, „vi ja ne devas puni ilin per peso, sed nur per du realoj, do per dudek kvin centavoj por ĉiu forestinto.“

„Tio estas bonega ideo“, diris *don* Gabriel.

**Rimarkoj**
*ayuntamiento* = komunuma (urba) konsilantaro
*Gabucho* = Gabĉjo

## 3/5

Li rapide sekvis la konsilon de sia frato. Ankoraŭ en la sama posttagmezo li lasis deklari en la loko, ke li por morgaŭ devas kunvoki kunsidon de la *ayuntamiento*, de la loka administrado por klarigi gravajn demandojn, kaj li petis ke la kaciko kaj la konsilantoj ĉeestu.

Por sukcesigi tiun severan punregulon, li denove bezonis, tiel, kiel pri la brutovendo, la indiĝenan tribestron.

Je la sekva mateno venis la *jefe* kaj liaj konsilantoj al la municipo. *Don* Gabriel petis ilin sidiĝi sur la benko.

Ĉeestis ankaŭ *don* Mateo, kaj *don* Gabriel diris koncize: „Tio estas mia frato, kiu venis viziti min.“

*Don* Gabriel tuj komencis turni sin al la esenca punkto. Li ŝovis parton de la presitaj ordonoj kuŝantaj sur la tablo al si, kaptis

arbitre iun el ili kaj komencis paroli: „Jen nova ordono ricevita de la registaro.“

La tribestro kaj ties tri akompanantoj rigardis sin reciproke, sed sen montri suspektigan mienon. Pro spertoj ili sciis, ke ĉiam, kiam venas nova ordono de la registaro, tio signifas: Pagado per mono aŭ liverado de nepagataj helplaboruloj por la konstruado de strato en malproksima regiono, kiu havas eĉ ne la plej etan signifon por la loko mem.

La ordono, kiun *don* Gabriel tenis en mano, estis instrukcio por ke la sekretarioj regule kontrolu la telefonlineon per laŭirado, ligite kun vico de reguloj kiel forigeblas perturboj de pli simpla maniero fare de la sekretarioj mem per riparoj por teni la telefonlineon en ordo.

Nek *don* Gabriel nek iu alia sekretario en la federacia ŝtato iam penis atenti tiun instrukcion kaj iri laŭ la telefonlineoj. La registaro, kiu sendis tiun kaj similajn instrukciojn al la sekretarioj eĉ tute ne atendis, ke tia instrukcio estu atentata. Ĉiuj tiaj ordonoj estis donitaj nur tial, por ke iu, kiu havas postenon kaj, pri kiu oni ne scias kiel okupi lin alie, estu konfidata per la grava tasko elpensi tiujn ordonojn kaj skribi ilin dum monatoj plenaj de streĉa laboro. Tiuj ordonoj plenumis ankoraŭ alian celon: Ĉe la disdonado de la preslaboroj por tiuj instrukcioj iu, kiu havis iom pli altan rangon, povis enspezi monon per tio, ke li interkonsentiĝis kun la presisto, kiel estu presataj la kalkuloj kaj la kvitancoj.

*Don* Gabriel alte mantenis tiun instrukcion kaj tiam enmanigis ĝin al la *jefe*.

Nek la tribestro nek iu el la konsilantoj povis legi. Sed en la

instrukcio estis kelkaj desegnoj, kiuj klarigu, kiel oni devas interligi disŝiritajn elektrajn lineojn kaj kiel la drato estu fiksita sur la vitraj izoliloj por eviti induktojn sur la mastoj kaj por atingi bonan izoladon.

Sur tiujn desegnojn montris *don* Gabriel kaj diris ĉe tio: „Ĉi tie legeblas, ke la registaro postulas, ke mi ĉiam raportu helpe de la telefono al la registaro, se oni ne faras en la loko tion, kion ordonas la registaro.“

Tion la indiĝenoj komprenis, ĉar ili vidis ja la desegnojn de la telefona lineo.

„La registaro ĉi tie postulas en tiu ordono“, parolis *don* Gabriel plu, „ke ĉiu knabo de la loko ĉiutage devas veni en la lernejon, krom sabate kaj dimanĉe, ĉar ne okazas lerneja instruado en tiuj du tagoj en la tuta respubliko. Kaj la registaro ordonas, ke la patro de ĉiu knabo, kiu ne venas en la lernejon, devas pagi por ĉiu lerneja tago, kiun malĉeestas knabo, unu peson kiel punon al la sekretario de la loko.“

La indiĝenoj ne diris eĉ vorton. Ili nur plurfoje kapjesis kaj rigardis al sia tribestro, kiu kapjesis same.

La *jefe* rulumis sin cigaredon kaj tiam diris lante: „Tion ni ne povas pagi. Por tio ni ne havas monon. Kelkaj el la ĉi-tieaj familiaj patroj havas ses infanojn. Kiel ili pagu ses pesojn ĉiutage, se la knaboj estas sufiĉe grandaj kaj devas kunlabori sur la kampoj, kiam la maizo estas plantata aŭ kiam la knaboj devas restadi ĉe la ŝafogregoj, por ke la junajn bestojn ne kaptu jaguaro?“

„Jes, tio pravas“, diris *don* Gabriel kompreneme, „sed mi povas fari nenion, mi estas ĉi tie nur la sekretario. La registaro ordonis

tion, kaj mi devas fari tion, kion la registaro ordonas aŭ ili metos min en prizonon.“

Nun *don* Mateo enmiksiĝis en la intertraktadojn: „Ĉie tio estas tiel en la federacia ŝtato. Tiel estas ankaŭ en *Balún-Canán* kaj en Jovel.“

La kaciko rigardis lin kaj diris tre trankvile: „Ĉu vi estas ĉi tie la sekretario?“

Iom konfuzite pro la neatendita demando, diris Mateo: „Kompreneble ne. Sed mi scias, ke ĉie estas tiel.“

La tribestro demandis: „Ĉu vi do kunprenis tiun ordonon ĉi tien?“

„Jes“, malcertigite respondis *don* Mateo, „mi estis sur la vojo ĉi tien al mia frato, kaj jen la poŝtestro donis la leteron al mi, por ke mi kunprenu ĝin ĉi tien.“

La tribestro leviĝis kaj samtempe ekstaris liaj akompanantoj.

Li diris: „Jen ni ja nun povos foriri, ĉu? Aŭ ĉu ekzistas ankoraŭ plia instrukcio?“

„Ne“, diris *don* Gabriel, „mi ricevis nur ĉi tiun.“

## 3/6

Je la sekva tago ĉeestis, kiel ĉiam, nur tridek knaboj en la lernejo.

*Don* Gabriel komencis surskribi la nomojn de tiuj patroj, kies knaboj mankis, por enkasigi de ĉiu la peson.

Sed en tiu kazo li kvazaŭ puŝis kontraŭ vandon, pri kies ekzisto li ne tute konsciiĝis ĝis tiam.

Li havis liston de ĉiuj knaboj en la loko, estis cent kaj dudek da ili. Sed estis plej ofte nomoj, kiujn li mem donis al la knaboj por povi distingi ilin. Nur pri tre malmultaj knaboj li konis la patron, kaj tio estis ĝuste tiuj patroj, kiuj loĝis en la loko. La plimulto de la familioj loĝis vaste dise en la distrikto de la loko. Multaj loĝis profunde en la ĝangalo.

Li ne sciis eblon kiel identigi la nomojn de la patroj, kies knaboj mankis en tiu tago. Li ankaŭ ne sciis rimedon kiel ricevi la nomojn de la patroj, kies knaboj mankos morgaŭ.

Ĉar ankaŭ Mateo en tiu kazo embarasiĝis pri bona konsilo, ili ambaŭ perdis la esperon, ke ili persone iel havos ian gajnon el la lernejo. Tio ne malmulte kontribuis al tio, ke malpliiĝis la intereso de *don* Gabriel pri la lernejo.

Du semajnojn poste venis la *cura*, la katolika pastro, en la lokon. La indiĝenoj kun siaj edzinoj kaj infanoj alvenis por kisi la manon de la *cura*. Por tio li donis sian apostolan benon, kaj per tio li estis je la fino de sia streĉa laboro.

**Rimarko**
*cura* = pastro

## 3/7

Sed la alveno de la *cura* riĉe benis ankaŭ la domon de la sekretario, kun beno, kiu havis videblajn formojn.

La edzino de *don* Gabriel sciigis en la loko, ke ŝi havas nenion en

la domo, sed ke ŝi devas oferti ja gastamon, ĉar la sankta viro certe ne mortu pro malsato. Du horojn poste *don* Gabriel havis en la domo dek kvar kokinojn, okdek ovojn, ses meleagrinojn, du malgrandajn sucĉporkidojn, kvin kapridojn kaj la karnon de du antilopoj.

La sankta viro kompreneble ne povis manĝi ĉion, kaj tio, kio restis, ne pli povrigis *don* Gabrielon.

Oni prezentis al *señor cura* la lernejon. Kaj li estis eksterordinare kontenta pri la instrua rezulto.

„Mi scias, *señor secretario“*, li diris al *don* Gabriel, „tio estas tre streĉa laboro, kiun vi havas ĉi tie, kaj estas vere bonfartige vidi tian sukceson.“

„*Gracias, señor cura*“, respondis modeste *don* Gabriel. „Mi multege pli povus atingi rilate al la edukado, se nur la frekventado de la lernejo estus pli regula.“

La sankta viro kapjesis kompreneme kaj frapis sian ventron: „Mi ne scias vere, sed mi supozas, ke mi havas problemojn kun la hepato, jen ĝi sidas, jen, ne ĉi tie“, li kondukis manon de Gabriel al la loko de sia korpo, kiun li celis. „Ankaŭ povas esti la renoj“, li diris plu, .„ne estas tute klare al mi. Sed plej ofte mia digestado estas aĉa. Kaj ankaŭ dormi mi ne povas bone. Ĉu vi havas glaseton kun bona malnova komiteko en la domo, *señor secretario*?“

„Dankon, dankon, ĝi estas ĝuo. Jes, kompreneble, ankoraŭ pluan; ne, ne, do plenigu, plenigu la glaseton ĝis la rando, mi tuj ne stumblos trans stango. Kio koncernas la frekventadon de la lernejo, ne tro atentu tion, kion la registaro diras pri tio. Kion sciu

la registaro? La aŭtoritato estas la patro. Tio estas la leĝo de Dio, kaj la sola volo de Dio. Dekomence de l‘ mondo. Kaj se la patro bezonas la knabon por laboro, jen la devo de l‘ knabo estas obei la patron. Tio estas la volo de Dio, kaj ni homoj ne enmiksiĝu en la volon de Dio, kiu scias kaj konas ĉiujn aĵojn kaj aferojn plej bone. Se la infano lernas obei sian patron kaj Dion, kion plu kaj kion pli bonan ni kompatindaj pekuloj povus instrui lin? Vere saĝa estas registaro tia, kia ne kaŭzas malpacon inter la patro kaj la infano. Obeo al la patro estas pli altranga ol obeo al surtera registaro. Lasu veni la infanojn ĉi tien al la lernejo, kiel ili volas, kaj kiam ili volas, ilia patro plej bone scias, kio estas plej bone por la infanoj. Kion bonan ĝi estigu en la mondo, se oni ŝiros la homojn ĉi tie el ties infaneca senkulpo? Plenŝtopi ilin per legado kaj skribado, detrui ilian kontentan vivon kun la vantaj aferoj, kiuj estas nomataj sciado kaj edukiteco. Vantaĵo, vanta fiaĵo tio estas, nenio pli. Al la senkulpuloj kaj sensciuloj la ĉiela regno estas sekurigita. Ĉu ankaŭ al la aliaj, tio estas necerta, ĉar pri tio nenio estas trovebla en la Biblio. Ja kompreneble, mi ankoraŭ tute volonte akceptos pluan glaseton. Ja kompreneble plenan ĝis la rando, tio helpas al mia digesto. Ĝi estas tre malrapida kaj lamas je ĉiuj finaĵoj. Kiel dirite, *señor secretario*, lasu veni la infanojn al la instruado, kiam kaj kiel ili volas. Senkaŝe dirate, mi estas, kiel ankaŭ la honorinda sinjoro episkopo, kontraŭ ĉiu rura lernejo. Ju pli malmultaj ili estas, des pli bone; neniuj estus eĉ plej bone. Sed tamen mi ja agnoskas, kion vi ĉi tie en tiuj malmultaj monatoj atingis pri la edukado de la infanoj. Estas mirinde, kiom la infanoj jam lernis. Estas granda honoro por vi. *Salud!* Je via sano! Nu, mi ne scias, ĉu mi ankoraŭ unu glaseton… Bone, sed nur unu pluan, jen la vere lastan. Ĝi estas bonega. Cetere, kiel nun estas la vojo a*l Tanquinvits*? Ĉu tre marĉa? Antaŭ du jaroj mi firmkaptiĝis tie apud la vojo. Ĝis la selo mi troviĝis en ŝlimo, kun mia maljuna mulo.“

„Nun, en tiu ĉi jarsezono“, diris *don* Gabriel, „la vojo bone rajdeblas. Jen kelkaj lokoj, kie vi prefere bone atentu. Ŝtonoj kovrataj de tero kaj ŝlimo. Intere estas truoj. Prefere vi tie deseliĝu, *señor cura*. Okazas, ke la muloj profunde sinkas per kruro en truon inter la ŝtonojn kaj la kruroj facile rompiĝas. Sed, se vi deseliĝas, la danĝero estas malpli granda, la besto pli facile povas eltiri sin, se ĝi ne devas porti ŝarĝon.“

La pastro pripensis tion dum certa tempo, ekbruligis cigaron kaj diris tiam: „La homoj, kiujn vi havas ĉi tie en via distrikto, estas tre pacema kaj diligenta popoleto. Mi nun jam delonge ĉiujare unufoje venas ĉi tien por bapti ilin. Lasu la homojn tute en paco, ili estas kiel infanoj. Tiel oni ankaŭ devas trakti ilin. Kaj, se ili de tempo al tempo ebriigas sin, diru nenion. Je la sekva tago ili estos fordormintaj sian ebriecon.“

*Don* Gabriel ekstaris: „Pardonu, *señor cura*, mi devas skribi kelkajn leterojn. Mi volis peti vin kunpreni la leterojn al Jovel kaj tie transdoni ilin al la poŝto.“

„La sankta viro ridis: „Daŭros semajnojn aŭ dek tagojn antaŭ ol mi venos al Jovel. Mi vizitas ĉiujn lokojn en la regiono. Mi ne tre rapidas sur mia vojo, mia mulo trotas kiel lama limako. Kaj mi lasas ĝin troti kiel plaĉas al ĝi. La negocoj de Dio estas malrapidaj kaj ne bezonas flugmaŝinon. Ĉu vi iam ajn vidis tian maŝinon? Mi ne kredas je tiaj kaj ankaŭ nenio fariĝos el tio. Oni ne provu plibonigi Dion. Se Dio estus celus tion, ke ni flugadu en la aero, jen li donus flugilojn al ni. Kaj ĉar Li ne donis flugilojn al ni, sed rezervis tiujn por la anĝeloj, Li per tio evidente montris sian volon, kaj ni obeu la volon de Dio. Se viaj leteroj ne tre urĝas, mi volonte kunprenos ilin.“

„La leteroj ne urĝas“, respondis *don* Gabriel. „Mi sendas ilin nun

nur tial, ĉar mi havas okazon por tio.“

„Jes, mi ankoraŭ akceptas pluan glaseton, kompreneble, „diris la *cura*, mi ne ĉiam trovas tian bonegan komitekon, tian *comiteco añejo*. Kaj ĝi bonfartigas min. Mia stomako tiukaze ne sentiĝas tiom frida. Sed devas esti nun la tute lasta. Kaj poste, kun via bonkora permeso, mi sternos min.“

**Rimarkoj**
*comiteco añejo* = pli longe aĝigita en lignaj bareloj ol simpla komiteko
komiteko *(comiteco)* = speco de brando, produktita en Comitán, Chiapas
*gracias* = Mi dankas

## 3/8

Je la sekva tago, kiam la pastro ĵam forrajdis kun sia servisto, diris *don* Gabriel al sia frato: „Tiu konsilo de vi tute fiaskiĝis. El la lernejo oni povas elvringi nenion. La eklezion mi ne volas havi sur la nuko.“

„Afero via“, respondis *don* Mateo indiferente, „se vi ĉi tie ne enspezas sufiĉe da mono. Tio min ne koncernas!“

„Mi ĉiam pensis, ke vi estas tre ruza kaj scias ĉion pli bone ol mi“, diris *don* Gabriel.

Tiu rimarko ronĝis je *don* Mateo, ĉar li havis nenion por fari kaj nur dependis de sia frato kaj de sia edzino, kiel solan distron. Tial tiuj vortoj pli ĉagrenige gorĝopremis lin ol tio okazus en aliaj cirkonstancoj.

Dekomence li asertis, ke li havis bonajn oficojn nur tial, ĉar li

havas pli grandajn kapablojn ol aliaj homoj kaj precipe havas pli da talento ol lia pli aĝa frato.

Estis la kernpunkto de ilia ĉiutaga kverelado, ke Mateo insistis pri tio, ke tiukaze, se li estus tie ses monatojn sekretario, li pli prosperus ol Gabriel kaj dum du jaroj elmastrumadus el tiu ofico almenaŭ kvin mil pesojn por sia propra poŝo.

„Tion mi ja nun volus scii“, diris pro tio *don* Gabriel, „kiel vi povus elvringi almenaŭ kvin mil pesojn. Eĉ se vi starigus ĉi tie ĉiujn familiojn sur la kapon, eĉ ne tricent pesoj elfalus. La homoj ja simple ne havas ilin. Facile dirite, ke eblas elmastrumadi kvin mil pesojn dum du jaroj! En via loko, kie estis vi, kie troviĝas tri brandofabrikoj, dek aŭ dek kvin trinkejoj, kvardek magazenoj, kvar restoracioj, dudek ĉinoj kun butikoj, kiujn vi povis senplumigi kvazaŭ kokinojn antaŭe kaj malantaŭe kaj supre kaj sube, tio estas alia afero ol ĉi tie.“

„Sed en tiu distrikto mi ne estis sola“, respondis *don* Mateo por defendi sian opinion. „Jen la urbestro, la urbosekretario, la administranto de la impostmarkoj, la polica ĉefo kun ses viroj, la juĝisto, la delegitoj kaj kvindek pliaj, kiuj ĉiuj kuntiris kaj kunŝiris. Sed ĉi ti vi estas ja sola kaj povas elkulerigi la tutan supon sola.“

„Damne“, vokis *don* Gabriel, lasu min en paco!“

Li vidis, ke la knaboj sur la placo ŝerce bataletis kaj reciproke ĉasis sin antaŭ la lerneja pordo. Li kaptis kvin el ili kaj tradraŝis ilin.

Tiam li lasis paroli ilin la tekstojn de ties paperetoj. Kiam ĉiuj jam faris tion, li laŭvicigis ilin sur la placo, ekzercis la knabojn pri

ansermarŝo, ĉe kiu ili devis etendi samtempe la brakojn.

Post tio li ordonis ripozigan paŭzon, foriris por trinki glaseton da brando kaj komencis kvereli kun sia edzino.

## Ĉapitro 4

### 4/1

*Don* Gabriel estis en sia oficeja ĉambro kaj transtavoligis la instrukciojn kaj leterojn, mane glatigis ilin, surmetis supre ŝtonon kiel pezigilon, malfermis la inkboteleton, flaris je ĝi, skuis ĝin, denove fermis ĝin per la korkŝtopilo, levis la plumon, forgratis la ruston je sia hararo, metis la plumingon denove apud la inkboteleton, blovis la polvon de la tablo kaj paŝis sur la sojlon de la pordo por fumi cigaredon.

Kiam li hazarde rigardis transen, tien, kie la pado el la ĝangalo kondukas al la vilaĝo, li rimarkis, ke granda trupo de indiĝenoj almarŝis kaj volis krucumi la vastan placon de la municipo, por atingi la padon, kiu kondukas al *Hucutsin*.

Du viroj, meksikanoj, ambaŭ kun peza revolvero je la zono, gvidis la trupon. Ili sidis sur ĉevaloj.

Ili komandis, ke tie sur la vasta placo ĉiuj haltu kaj iom ripozu, por atendi tiujn, kiuj ankoraŭ sekvos.

Ĉiu indiĝeno portis pezan pakaĵon kun siaj lankovrilo, nutraĵoj kaj vestoj.

Ambaŭ ladinoj rajdis antaŭ la portikon de la municipo. Ili

deseliĝis kaj iris renkonte al *don* Gabriel.

*„Buenos días“,* salutis unu el ili. „Ĉu vi estas la sekretario ĉi tie?“

„Jes“, konfirmis *don* Gabriel, „*Pase!* Envenu!“

„Ĉu vi havas komitekon?“ demandis unu el ili.

„Sufiĉe da“, diris *don* Gabriel.

„Tiukaze plenigu al ni la botelojn“, petis la meksikano.

„Kaj unu glaseton ni tuj ĉi tie trinkos. Unu komitekon por vi, *señor secretario*.“

„Dankon“, diris *don* Gabriel. „Sidiĝu por momento, mi havas la brandon en mia butiko. Se vi aŭ la homoj, kiujn vi havas ĉi tie, ion bezonas por la vojo, mia *tienda*, mia vendejo estas la ununura en la loko; dum la sekvaj ok leŭgoj, kiujn vi volas marŝi ankoraŭ hodiaŭ, vi ne trovos vendejon.“

Kiam li venis kun la boteloj al la butiko li trovis sian edzinon kaj Mateo jam fervore vendantaj tabakfoliojn, cigaredojn, kamforpecetojn, salon, akran kapsikon kaj bastŝnuregojn.

Proksimume dudek el la migrantaj homoj ĉirkaŭstaris en dense kunigita grupo ĉe la malsuprenigita klapo, kiu estis la butika tablo.

*Don* Gabriel plenigis la botelojn de la du viroj kaj verŝis komitekon en tri glasetojn.

Li revenis en la oficejan ĉambron. Ili ĉiuj diris: *„Salud!“* kaj haste

verŝis la komitekon gorĝen.

*„ Bueno“*, diris la viroj kaj ŝovis sian korpozonon supren, gestante tiel, ke ili estas vojaĝpretaj. „*Vamonos*, ni ekiru. Longa fortoraba vojo estas antaŭ ni.“

Ĝuste, kiam ili malligis siajn bestojn de la fostoj de la portiko, venis Mateo ĉirkaŭ angulon de la domo.

Sur la vasta placo fariĝis vigle inter la indiĝenoj. Ili levis siajn pakaĵojn kaj komencis ekmarŝi, unu post la alia.

„Kiom da homoj vi havas ĉi tie ĉe vi?“ demandis Mateo la virojn, kiuj ĵus volis meti la piedojn en la piedingojn.

„Okdek“, respondis unu el ili kaj sidiĝis sur la selon.

„Ĉu vi moviĝas al la kafplantejoj?“ demandis Mateo.

„Jes, en la distrikton *Soconusco*.“

„Vi ja ne tiel simple povas formarŝi de ĉi tie, *caballeros“*, diris *don* Mateo, tre proksimiĝante al la ĉevaloj.

*„Cómo?“* demandis la viro. „Kiel vi opinias tion, *señor*?“

„Tion vi ja scias. Vi devas pagi ĉi tie la pasaĝermonon por la homoj“, diris *don* Mateo, „dudek centavojn por ĉiu viro.“

„Kial pasaĝermonon?“ demandis la viro. „Mi pagis jam la tutan kontraktimposton.“

„La kontraktimposto nin ĉi tie ne koncernas“, diris *don* Mateo.

„Ĉi tie por la loko ni devas enkasigi pasaĝermonon, vojmonon. Tio estas loka ordono. Tion vi ja devus scii kiel laboristaj agentoj, *caballeros*. Tion vi ja ne mem pagos. Vi kalkulos tion sur la kontojn de viaj homoj, kiel kontraktimposton kaj kiel varbokomisiojn. Tio al vi ja certe povas esti indiferenta. Sed ni havas ĉi tie la rajton malhelpi la ekmarŝon de la homoj, se la pasaĝermono ne estas pagita.“

Ambaŭ agentoj sciis, ke la loko ne havas la rajton enkasigi la pasaĝermonon, ĉar nek pontoj nek marĉopado troviĝas en la regiono de la loko, kiun la loko devus teni en ordo. Sed ili sciis ankaŭ, ke tio ne kondukos ilin eĉ paŝon plu, se ili ne pagus la pasaĝermonon. Kun siaj okdek viroj ili facile povus eldevigi la tramarŝon. Sed ili ŝarĝus la malamikecon de la sekretario sur sin. Kaj tia malamikeco estas ĝenanta. Ili estis ne nur varbaj agentoj por indiĝenoj, por kafoplantistoj, sed ili ankaŭ estis brutaĉetistoj kaj brutvendistoj, felokomercistoj kaj ĉeokaze ili devis transporti varojn sur mularo. Sur vojaĝoj al la plej grava ŝipostacio de la rivero *Grijalva* por la transŝargado de varoj Bujvilum ĉirkaŭireblis nur kun perdo de tri tagoj da vojaĝtempo. Kompreneble povus okazi, ke ili ne devus vojaĝi dum la sekvaj tri jaroj tra tiu loko; sed same tiel bone eblus, ke ili jam post du monatoj denove devus trairi tie. Tio dependus de iliaj negocoj. Havi la sekretarion kiel malamikon en iu loko, kiun oni devas trapasi sur vojaĝoj aŭ pro negocoj, aŭ ankaŭ nur konsideri lin malafabla, povis fariĝi tre multekosta. Ĉiu, kiu tie vojaĝas, ĉu komercisto aŭ ne komercisto, ĉiam dependas de la bonvolemo de la lokaj sekretarioj. La loka sekretario estas la ununura neindiĝeno en la loko kaj li estas la aŭtoritatulo, kiu povas doni al oni protekton aŭ rifuzi ĝin.

La agentoj pagis la dek ses pesojn por povi trapasi la lokon.

Ili volis havi kvitancon. Sed Mateo diris: „Ni ankoraŭ ne ricevis

la novajn formularojn, sed vi ja ne bezonas kvitancojn, *caballeros*, ni ne postulas la monon dufoje por la sama trupo.“

Kiam la transporto estis ekster vidodistanco, diris *don* Mateo al sia frato: „Ĉu vi vidis kiel oni faras tion? Vi lasus tramarŝi la ulojn ĉi tie sen diri eĉ vorton. Ĉion, kio venas ĉi tien en vian lokon, oni devas senplumigi, kvazaŭ elvringi, alie vi neniam sukcesos. Kiam la homoj revenas kaj iras hejmen de la plantejoj, tiam ili ĉiuj marŝas solaj, sen agentoj. Tiam vi denove forprenos de ili dudek centavojn por ĉiu animo. Tiam ili havos sian salajron enpoŝe. Ili ja ne scias kion fari kun tio. Kaj fervore kroĉu komitekojn al ili. Ne zorgu pri tio, ke la du agentoj plendos pri vi pro maljusta tarifo. Neniukaze ili plendos tiom longe, kiom vi estas ĉi tie sekretario. Kaj se vi ne plu estos sekretario, jen tio povas esti indiferenta al vi. Kaj tiam ili delonge estos forgesintaj tion, kaj ili ankaŭ neniam scias, ĉu vi ne kaptos gravan postenon ie aliloke. Ili ja ne mem pagas tion. Devas pagi tion la *muchachos*. Kaj tiuj ne povas kontroli ĝin per kalkulado, ĉar ties kontoj estas tro ampleksaj.“

**Rimarkoj**
*cómo?* = Kiel?
leŭgo (*legua*) = mezurunuo de distancoj, surtere ĉirkaŭ 4,5 km-ojn
portiko = kolonhalo

## 4/2

En la loko estis nupto. La juna edzo havis la kutiman devon regali per brando kaj siajn proprajn amikojn kaj la amikojn de ambaŭ familioj, kiuj kunvenas pro tiu nupto. Li aĉetis la brandon jam kelkajn semajnojn antaŭe en Jovel, kie li ricevis ĝin multoble pli malkare ol vendadis ĝin *don* Gabriel. La bareleto sekrete estis kontrabandita en la lokon, kaj *don* Gabriel eksciis nenion pri tio.

Ĉar atendeblis, ke kelkaj el ili ebriiĝos, la juna indiĝeno aĉetis ankaŭ dek litrojn da brando de *don* Gabriel, por konservi la ŝajnon, ke la tuta brando, kiu estos trinkita en la nupto devenis el la *tienda* de la sekretario.

„Vi povas havi pli da ĝi“, diris *don* Gabriel al li, „ankaŭ, se vi nun ne povas pagi. Mi pruntedonos volonte al vi.“

Sed la junulo respondis, ke li pensas, ke dek litroj sufiĉos.

Estas certe nature ĉe indiĝeno, ke li rapide kaj facile estas influata de brando, speciale de tiuj, kiuj estas vendataj al indiĝenoj. Multaj indiĝenoj sub la influo de brando perdas ĉiun kontrolon de sia agado. Ĉiu homo, kiu konas indiĝenojn, scias tion. Kaj se oni ne scias tion, oni pli rapide ekscios tion ol ĉeokaze estos agrabla al oni.

Du tagojn kaj noktojn oni dancis laŭ la muziko de akordiono kaj de du gitaroj.

La junuloj ne trinkis multe. Sed la iometo de tio, kion ili trinkis, perdiĝis kiel efiko de nelacigebla dancado, per trinkado de grandaj kvantoj da kafo kaj per eĉ multe pli grandaj kvantoj da akvo. La junuloj sen escepto havis ankaŭ la decidan deziron fari bonan impreson al la junulinoj ĝenerale kaj speciale por certa junulino. La indiĝena junulino taksas la sobrecon de viro pli alte ol korpan agrablan aspekton. Tiun takson de junulo jam instruis la patrino al ili. La junulaj indiĝenoj scias tion, kaj ili scias ankaŭ, ke tiukaze, se ili ne havas sobran karakteron, ili eble tamen povos ricevi inon, sed ke ili ricevus apenaŭ tiun junulinon kiel edzinon, kiun ili volonte volus havi. Kiel ankaŭ ĉe aliaj rasoj la karaktero de viro kiel tiu de ino nur tiam fariĝos malsekura kaj deflankiĝos de la origine montrita aŭ ŝajnigita, se laŭŝajne ne plu estas necese

havi bonegan karakteron, kaj tio okazas ĉiufoje laŭ obstino kaj forto de hipokriteco aŭ du jarojn pli poste aŭ dek jarojn post tio. Multaj geedzoj kapablas reciproke ŝajnigi dum dudek jaroj karakterojn, kiujn neniu el ambaŭ vere posedas kaj povas okazi kaj okazas efektive de tempo al tempo, ke daŭra ŝajnigo de la karaktero fariĝis tiom kutima, ke la hipokrita karaktero preskaŭ fariĝas la reala. Preskaŭ. Sed neniam tute. Tial ofte okazas strangaĵoj post dudekkvinjara geedzeco ĉe tiu aŭ ĉe ĉi tiu aŭ tuj ĉe ambaŭ, kiujn neniam tiel atendis en tiu tiom harmonia komuneco.

Estas la edziĝintaj viroj prizorgataj kun inoj kaj infanoj, kiuj en seniluziigita mondo trovas en la brando lastan fuĝejon. Se eĉ alte civilizitaj homoj ne scias kaj ne povas klarigi, kial ili verŝas ĉampanon, viskion kaj konjakon en sin, post kiam la deziregoforgesi sin aŭ estigi ekzalton delonge estas satigitaj, oni povas atendi tion de indiĝeno eĉ malpli. Estas vana peno voli klarigi tion. Oni plej bone adaptiĝas al la situacio, se oni akceptas la fakton, ke ekzistas senbridaj drinkuloj inter ili, kutimaj trinkuloj, kontraŭalkoholuloj kaj ĉeokazaj drinkuloj.

Estis la senbridaj drinkuloj kaj la ĉekoazaj drinkuloj, kiuj uzis tiun nupton kiel senkulpigon por longa ebrieco.

Estis tri viroj, kiuj venis post la dormo frue matene ankoraŭ lacaj pro longa ebriego al la vendejo de *don* Gabriel kaj postulis pli da brando. Ĉe la nupto ili ne plu ricevis brandon, ĉar la nupto dum la longa postfestado etendiĝis nur sur la malvastan rondon de ambaŭ familioj.

Ili kunportis malplenajn litrobotelojn kaj havis monon. *Don* Gabriel ne volis vendi *aguardiente* al ili, ne tial, ĉar li eble ne volis fari la negocon, sed ĉar li sciis, ke li povus havi pro tro ebrieco de

la uloj sufiĉe da malfacilaĵoj.

*Don* Mateo proksimiĝis kaj diris: „Kial koncernas vin, kiom la homoj volas trinki?! Vi ja ne estas ilia saneca konsilisto. Vi devas zorgi ja nur pri tio, ĉu ili povas pagi kaj ĉu ili sufiĉe taŭgas, por ke vi pruntu monon al ili.“

*Don* Gabriel donis la brandon al ili.

Du horojn pli poste li aŭdis sovaĝan kriadon el la loko, kaj indiĝenino kuris kun sia bebo sur la brakoj al la municipo kaj kriis: „Li mortbatis mian fraton kaj fortranĉas la kapon de li.“

*Don* Gabriel kaj *don* Mateo kuris transen en la lokon, kie ili vidis kelkajn virojn interne de baraĵo de korteto, malantaŭ kabano. La viroj penis ĵeti sur la teron Gregorion, unu el la triopo, al kiuj matene estis vendita la brando.

Gregorio forte batadis ĉiudirekte per maĉeto, de kiu gutis sango. Apogite al la argila muro de la kabano troviĝis la kadavro de junulo, kiu havis proksimume dek ok jarojn. La vizaĝo estis dishakita je diversaj lokoj kaj la korpo fendigita kun profundaj vundoj.

La viroj, el kiuj la plimulto ankoraŭ mem grave ebriis, provis atingi la furiozanton per stangoj, por renversi lin per batoj. Sed ili ne kuraĝis tre proksimiĝi al li, ĉar ili timis, ke Gregorio povus trafi ilin per la ĵetita maĉeto.

La indiĝena tribestro alvenis tien, ĉar li aŭdis la kriadon. Sed ankaŭ li ankoraŭ estis ebria kaj rigardis ĉiujn laŭvice kun vitrecaj okuloj, sen kompreni, kio tie okazis. *Don* Gabriel komisiis knabon, kiu staradis tie, rapide kuri al la edzino en la municipon

kaj alporti la lazon de la selo. La knabo post kelkaj minutoj revenis. *Don* Gabriel sukcesis post kelkaj provoj, ŝtelirinte ĉirkaŭ la kabanon, kapti Gregorion el la dorsa flanko, li ĵetis la lazon sur la viron kaj renversis lin. Kiam Gregorio falis, kelkaj el la indiĝenoj alsaltis, ligis lin kiel pakedon per la lazo, tiel, ke la viro ne plu povis moviĝi. Tiam ili pene portis lin transen al la municipo, kaj metis lin en la prizonon. Nun jam tute sen forto, li komencis ekdormi kaj tradormi sian ebrion. Sur la loko antaŭ la municipo estis ankoraŭ ses viroj, kiuj tie kriadis kaj kriaĉis kaj ne sciis, kion fari kun si.

*Don* Mateo diris, ke estas plej bone, ankaŭ tiujn junulojn meti en la prizonon, por ke ili ne faru eĉ pliajn fiaĵojn.

*Don* Gabriel vokis al si kelkajn virojn, kiuj ŝajne estis sobraj, kaj kun ilia helpo li sukcesis aresti tiujn ulojn.

Ĉiuj inoj en la loko, kaj ĉiuj viroj, kiuj estis sobraj, diris, ke estas ĝuste, ke *don* Gabriel metis la ebriulojn en la prizonon, por eviti, ke okazu ankoraŭ plia mortbato. Ĉiujn homojn, precipe la inojn, ekobsedis histeria timo. Kvar inoj kun siaj infanoj kuris al la municipo, ĉar ili serĉis tie rifuĝejon pro siaj ebriaj edzoj aŭ fratoj kaj ili pasigis la tutan tagon en la lerneja ĉambro. Kaj unu el la inoj venis kriante al *don* Gabriel, petegante lin, ke li metu ŝian edzon en la karceron, ĉar li volas mortbati ŝin kaj iliajn infanojn. *Don* Gabriel ordonis altreni la viron, metis lin en la karceron kaj la ino iris kun siaj infanoj hejmen.

Meze de la antaŭtagmezo reestis tute trankvile en la loko. La ebriiĝintoj ĉiuj ŝajne dormis, kaj la ceterajn oni vidis en la kampoj ĉe ilia laboro.

## 4/3

La prizono estis tre malgranda loko. Sardinoj ne povas kuŝi pli dense kunmetitaj en siaj skatoloj ol ĉiloke tiuj surtavoligitaj kaptitoj.

Antaŭ tagmezo venis ties edzinoj por alporti manĝon. Sed neniu el la prizonuloj vekiĝis.

Vespere la edzinoj revenis kaj ŝovis al siaj edzoj la manĝon tra la latisa krado de la peza ligna pordo. Tiam ili bruligis bivakfajron antaŭ la pordo por la nokto, por ke ĝi donu varmon al la kaptitoj.

La viroj ankoraŭ tiam estis ebriaj. Al la inoj ŝajnis pli sekure havi la edzojn ankoraŭ en la karcero. Neniu el ili iris al *don* Gabriel por peti lin, ke li ellasu la edzon. El pli fruaj travivaĵoj kaj spertoj ili sciis ankaŭ, ke tiukaze, se la edzoj enprizonis en foirplaca urbo pro ebrio, ili ne tiel facile sukcesos eliri el tiu prizono, kiel ili envenis en ĝin. Super la pordo de tiaj prizonoj en la etaj lokoj de la federacia ŝtato legeblis sentencoj por memoro, kiujn policistoj kaj gardistoj elpensis kaj poste skribis per kreto super la pordojn. „Gardu vin enveni ĉi tien, frateto, ĉar neniu scias, kiam vi denove eliros.“ „Facile malfermiĝas la pordo por tiuj, kiuj envenas; sed la ŝlosilo malfacile troveblas por tiuj, kiuj deziras eliri.“ „Restadu ekstere, amiko, fidu al mi, al tiu, kiu enestis; se vi envenos ĉi tien, vi restados ĉi tie ne malpli longe ol jaron.“ „Tiu, kiu enfermas vin, frateto, sidas antaŭ la pordo; sed tiu, kiu ellasos vin, loĝas milojn da mejloj for de ĉi tie.“

**Rimarko**
*aguardiente* = speco de brando
*tienda* = vendejo, butiko

## 4/4

Je la sekva mateno la inoj tuj venis ĉe sunleviĝo kaj kaŭrigis sin kun siaj beboj sur la sino, antaŭ la prizonon kaj parolis kun siaj edzoj. La kafokruĉojn ili starigis apud la bivakfajro, kiu ardetis antaŭ la pordo la tutan nokton.

Indiĝenoj nokte sentiĝas malagrable, se ĉe iliaj piedoj bivakfajro ne brulas aŭ almenaŭ bruletas. Per longa bastono, kiun ino donis tra la krado al ili, ili nutris la fajron per postŝovado de pliaj bastonegoj, por ke ĝi ne estingiĝu, tuj se iu el ili foje vekiĝis el sia ebrio kaj rekonsciiĝis dum certaj sekundoj.

*Don* Gabriel, dum li ĉeestis, ankoraŭ ne havis okazon meti iun en la prizonon. Estis multaj kvereloj en la loko, sed neniu el la kverelantoj iris al li, por ke li pacigu tiujn kverelojn. Ĉio estis regulita kaj perita de ilia propra kaciko. *Don* Gabriel ne havis la rajton en la loko mem enmiksiĝi en la aferojn de la loĝantoj. Tio estis la afero de la propra *jefe* de la homoj. Neniu iam ajn venis al li, se regis malkonkordo pri kamparaj distribuoj aŭ pri kverelo pri la rajto je ĉasita besto, aŭ se estis malklaraĵoj pri tio, ĉu kaprino estas tiu de Tomaso aŭ tiu de Panfilo, al kiu apartenas ĉirkaŭvaganta kaprido, aŭ ĉu Elias rajtigite akuzis Linon, ke li provas forlogi de li knabinon, kiun li intencas edzinigi.

Ĉion ĉi reordigis ilia tribestro Narciso je ĉies kontento.

*Don* Gabriel rajtis nur en tute difinitaj kazoj mem enmiksiĝi kiel prezentanto de la registaro. Tia kazo ekestis, se la publika paco de la federacia lando kaj de liaj loĝantoj, kiuj senpere ne apartenis al la indiĝena loko, estis minacata.

Al tiu ŝtata intereso apartenis la gravaj krimoj kiel ekzemple murdo, stratrabado, grava rabo interne de la loko, ĉiuj rabatakoj sur vojoj, ĝenoj de la paco sur tereno, kiu apartenas al ĉiuj, kaj pro tio al la ŝtato. Kiel ŝtata tereno estis rigardata la municipo kaj la vasta placo de la municipo. Jen la lokoj, kie ĉiu ŝtatcivitano havis la rajton je senĝena ekzistado. Kion la indiĝenoj faris interne de sia loko, kaj kio ne tuŝis iun alian ŝtatanon, tio estis ilia propra afero. Sed ankaŭ tiukaze *don* Gabriel havis la rajton kaj la devon enmiksiĝi, se li estis vokata. Kiam la inoj de la loko ne sciis elirvojon kiel gardi sin kontraŭ la propraj ebriaj edzoj, kiam la propra tribestro ne kapablis superforti la murdiston kaj trankviligi la ceterajn virojn kaj malhelpi malbonon, ĉar li mem estis grave ebria, ili iris al *don* Gabriel, ĉar li estis ilia lasta kaj sola savanto.

Estis facile por la junaj viroj de la loko, kiuj ne ebriis, reordigi ĉion. Sed estas kontraŭ la indiĝenaj moroj, ke filoj aŭ junuloj ordonu al siaj patroj kaj la pli maljunaj viroj de sia komunumo aŭ eĉ sukcesigu tiujn ordonojn per perfortro. Neniu firmligas sian patron per ŝnuro aŭ ĵetas lin teren, se la patro pro sia sensenca ebrio volas mortbati la patrinon. La filo povas nur provi sekurigi la patrinon, kaj se li ne sukcesas, tiukaze li ricevas la mortigan maĉetan baton por la patrino. La ebria patro kun la maĉeto enmane per voko postulas de la filo, ke li venu al li. Kaj la filo sekvas laŭvorte, kaj eĉ sen levi por defendo brakon kontraŭ sia patro, li lasas mortbati sin de li. Se li timas, ke la patro povus mortbati lin pro kolero kaj sensenceco, jen li ĝustatempe flankeniĝas; sed, se la voĉo de la patro atingas lin, aŭ heroldo de la patro trovas lin, tiukaze li iras el sia garda kaŝejo.

Pro tiuj kaŭzoj, kiuj havas la radikon en la moroj de la indiĝenoj, okazis, ke oni vokis *don* Gabrielon, por ke li helpu.

Kaj ankaŭ pro aliaj kaŭzoj oni alvokis sekretarion por ĉeokaze solvi eĉ internajn kverelojn kaj malklaraĵojn pri privataj aferoj.

Estis kazoj, pri kiuj la tribestro pro prudento ne decidis ion, ĉar li sciis, ke la decido rezultigus daŭran malamikecon ne nur al viro, sed eĉ al tuta familio. Kaŭzoj estis multaj, kial lia juĝo ekestigis malamikecon. Li lasis decidi tiukaze sian sekretarion. La sekretario estis rigardata senpartia, ĉar li aŭ ties familio aŭ unu el liaj amikoj pro la juĝo ne estis favorigebla; ĉar li estis laŭ posedo kaj laŭ siaj familiaj rilatoj kaj siaj amikecaj rondoj ekstere de la komunumo.

Estis tiaj okazoj, kiuj neeviteble ekestis el la moroj, el la karaktero kaj la ekonomiaj kaj parencaj rilatoj de la indiĝenoj, kiuj donis al la sekretarioj potencon kaj aŭtoritaton, kiuj en la manoj de koruptaj oficistoj kondukis al senkompata ekspluato kaj al la plena sklavigo de sendependaj indiĝenaj komunumoj.

**Rimarko**
*kaciko* = *cacique* = indiĝena tribestro

## 4/5

Kiel ĉiuj oficistoj sub la diktaturo *Don* Gabriel rigardis oficon kiel rimedon por pliriĉigi sin. De la infaneco la meksikanoj sub tiu regada sistemo vidis nenion alian. Ili ne lernis ion alian. Kaj ili ne aŭdis ion alian. Oni ne diris pri oficisto, ke li havas strecan kaj tre respondecan postenon, sed oni diris, ke la viro havas siajn ŝafojn en la stalo, tiel, ke li nur ankoraŭ devos tondi ilin, ĉar li estas ja la guberniestro.

Kaj ekde la juneco *don* Gabriel lernis, ke eĉ la plej eta ofico devas rezultigi riĉajn enspezojn, kiuj estu multoble pli grandaj ol la

salajro.
La diktatoro *don* Porfirio mirigis la mondon per tio, ke li povis prezenti post mallonga tempo bone reordigite la tute runigitan ŝtatan buĝeton de la respubliko Meksiko, kaj tiel, ke la ŝtata trezoro de la lando kreskis tiom, ke ĝi devis fari enviaj ĉiujn ceterajn landojn. La statistikoj montris tion kaj pruvis, ke granda ŝtatestro levis la meksikan popolon en civilizacian alton kaj ekonomian floron, kiujn oni supozis neeblaj. Li kapablis teni la kostojn por la ŝtato ridinde malaltaj. Tio estis tre facila. La salajroj por la oficistoj estis en multaj kazoj tiel malaltaj, ke povus vivi apenaŭ muso de ili. Kaj se guberniestro aŭ polica ĉefo, *jefe politico* aŭ juĝisto volis vivi tiel, kiel tio decas al lia rango, li devis havi kromajn enspezojn. Ke li uzis la vastegajn kompetentojn de sia ofico por ekstreme pliampleksigi la kromenspezojn, sekvis kvazaŭ per si mem el tio. La ŝtata trezoro fariĝis pli kaj pli granda, la ŝuldoj de la lando ŝajne ĉiam pli malmultaj, sed la povreco de la popolo, la senscieco, la koruptado, la politika spionado kaj la abismiga maljusteco fariĝis pli kaj pli detruigaj.

*Don* Gabriel sciis, ke li havas tiun oficon por pliriĉigi sin, kaj ke li ne havas ĝin por akceli la bonfarton de la indiĝena loko kaj de ties loĝantaro. Mankis al li nur lerto kaj sperto por vringi el la ofico ĉion, kio elvringeblas.

Li ne estus eltrovinta, ke gajneblas pro la transporttrupo de indiĝenaj laboristoj dek ses pesoj por li, se lia frato Mateo ne estus montrinta tion al li. *Don* Mateo akiris amason da prosperigaj spertoj en rilato kun multaj oficistoj. Sed li havis ne nur spertojn, sed ankaŭ tion, kio pli validas por ofico: li posedis la fantazion kaj la talentojn de eltrovinto.

„Se la ofico ne donas enspezon“, li diris ĉiutage dekfoje al *don* Gabriel, „tiukaze vi devas fari ĝin enspeziga.“

## 4/6

Je tiu mateno, kiam ili sidis ĉe la matenmanĝo, diris *don* Mateo: „Nun vi ja fine havas grasan porkon en la stalo, Gabĉjo. Kaj krome melkeblan bovinon.“

*Don* Gabriel ĉesis maĉi kaj diris: „Ĉu mi? Ĉu ankaŭ vi estas ankoraŭ ebria? Porko kaj melkebla bovino, ĉu? *Cómo?* Kiel vi opinias tion?“

„Pri vi oni povas diri: Perlojn ĵetitajn antaŭ la porkojn, *hombre*“, respondis *don* Mateo. „Ja viro de muloj kaj klarinetoj! Ĉu vi tute serioze estas tiom fermnajlita per tabulo antaŭkape, ke vi ne vidas la monton de pesoj, se ĝi kuŝas antaŭ vi? La karcero estas plena de viroj, kiuj volas eliri, kaj vi sidas ĉi tie kaj ne havas kusenon sub la postaĵo. Mi supozas eĉ, ke vi lasos flugi la grasan meleagron el la fingroj kaj ĝojos pri tio kiel ĝi ekflugos kaj poste vepren, kaj vi ellasos ĉiujn ulojn ĉi tie el la kaverno, kie ili sidas tiel mole. Tiom da bonŝanco, ke ili ĉiuj mem eniris, ke vi eĉ ne vokis iun. Oni kondukis ĉiun el ili libervole al vi.“

„Sed mi ja ne povos reteni ilin eterne ĉi tie en la karcero“, diris *don* Gabriel, „mi devos ellasi ilin hodiaŭ, alikaze ili frakasos la tutan domon.“

„Nur ne timu tion“, rediris *don* Mateo, „tion ili ne faros. Tiuj scias, ke tiukaze almarŝos la soldatoj, kaj ke tiuj forbrulos ties domojn.“

*Don* Gabriel volis ion respondi, sed tio ne eblis, ĉar li aŭdis, ke kelkaj viroj estis antaŭ la pordo de la oficejo, kiuj tie interparolas kaj evidente atendas lin.

Li surmetis la ĉapelon, fermtiris la zonon de la revolvero kaj iris ĉirkaŭ la angulon de la domo en la portikon, kie la viroj staris antaŭ la fermita pordo. *Don* Mateo, same surmetinte la revolveran zonon, sekvis lin.

„Bonan matenon!“ diris *don* Gabriel.

La viroj salutis same.

*Don* Gabriel malfermis la pordon, iris al sia tablo, transtavoligis la instrukciojn kaj leterojn, senkorkigis la inkboteleton, flaradis ĝin, refermis ĝin per la korko kaj gratadis la plumingon je sia hararo tiom longe, ĝis kiam ĝi estis pura.

La viroj sidiĝis sur la benkon. *Don* Mateo sidiĝis sur la saman benkon kaj rulumis cigaredon.

Tiam unu el la viroj komencis paroli: „Mi estas la frato de Isidro, kiu sidas en la karcero. Jen, la frato de la edzino de Isidro. Kaj jen duonfrato de la edzino de Isidro. Kaj tiu tie transe estas la frato de la patro de Isidro.“

„Kial Isidro estas en la prizono?“ demandis *don* Gabriel. Li ne sciis, kiu el siaj prizonuloj estas Isidro, ĉar li konis neniun el la kaptitaj viroj laŭ nomo.

„Isidro estas la viro, kiu nur ebriis kaj tiom kriis, sed li ne opinias tion tiel“, diris la frato. „Ni deziras nun, ke vi ellasu lin. Li estas nun sobra, kaj se li ne iros al sia maizo, li havos malbonan rikolton.“

*Don* Gabriel ekstaris kaj diris: „En ordo, vi tuj povos havi lin.“ Li volis ekiri kaj liberigi Isidron el la karcero.

„Atendu“, diris tiumomente *don* Mateo, „vi ja devas unue diri, kiom da *multa*, da punmono li devos pagi.“

La indiĝenoj komprenis la hispanan nur iom, sed ili komprenis pri kio temas. Ili komprenis ankoraŭ pli bone, ke *don* Mateo malhelpis la senkostan enliberigon de Isidro.

Ili kutimiĝis pri tio, ke *multa* estas kroĉata al ili, se oni metas ilin pro iu kaŭzo en prizonon, plej ofte pro ebrio en loko, kie ili vizitis la foirplacon. Se ili ne havis monon, kaj neniu el iliaj parencoj aŭ amikoj akompanantaj ilin pagis la punmonon por ili, oni retenis ilin dum semajno aŭ pli longtempe en prizono, kaj ili devis labori sur la vojoj aŭ la stratoj aŭ en la parkoj de la urbo.

Sed ĉi tie ili estis en sia propra loko kaj Isidro krimis nenion alian krom tio kriadi kaj rifuzi iri trankvile al sia kabano.

„La *multa* por Isidro estas dek pesoj“, diris *don* Mateo, „tuj kiam li pagos la dek pesojn, li povos foriri.“

„De kie Isidro prenu dek pesojn?“ demandis la frato de Isidro. „Li ne havas dek pesojn, sed grandan familion. Dek pesojn, ĉu? Tio estas ja preskaŭ la valoro de du tute dikaj porkoj, se la prezoj estas bonaj. Se la prezoj estas tiel aĉaj kiel tiam, kiam la komercistoj estis la lastan fojon en la loko, jen eble estas eĉ tri porkoj.“

„Gabriel“, vokis *don* Mateo, „ĉu tio ne legeblas tie en la instrukcio, dek pesojn da *multa* por ebrieco kaj bruado kaj minacado?“

*Don* Gabriel levis presitan folion kaj diris: „Jes, tio legeblas ĉi tie, ordonita de la registaro.“

„Tiukaze ni ne povas ŝanĝi tion“, diris *don* Mateo, „tio estas do laŭ la leĝo.“

Intertempe *don* Gabriel havis tempon ekkompreni, ke ĉi tie malfermiĝis nova fonto de mono, pri kiu li jam pli frue iam pensis, sed kiun li timis ekbori.

Sed estis tiel bonege, ke la loĝantoj de la loko estis en dilemo, tial ili pro memprotekto devis subteni la sekretarion ĉe la arestigo de la ebriiĝintoj. Povis okazi, ke tiu aŭ alia mortbatas iun aŭ ekbruligas domon. Tiu murdo, se ĝi okazus, facile povus veki la murdavidon de alia, kiu perdis la kontrolon pri siaj agoj.

Certe *don* Gabriel estus liberiginta ĉiujn prizonulojn sen dekalkuli monon, dum li estis sola. Ne, ĉar li eble konsciiĝis, ke li portas kunkulpon ĉe la okazaĵoj pro la vendo de la brando aŭ ĉar li sentis en si homan komprenon pri la malfortoj de la indiĝenoj, sed pro praktikaj kaŭzoj.

Parte li timis. Li sciis la sorton de kelkaj aliaj sekretarioj. Aliparte li ne volis tiel subite, sed iom post iom malfermi ĉiujn fontojn, kiuj ekzistas. Li certe ne estis tiel ŝtipkapula kiel lia frato supozis lin. Esence li eble estis pli inteligenta ol lia frato Mateo, ĉiukaze li estis pli diplomata.

Por Mateo estis facile bruske agi tie kaj ludi la fortan kuraĝan viron. Li ne estis respondeca. Ĉion li povis transŝovi al la sekretario. Mateo ankaŭ pli rapide povis forlasi la lokon ol Gabriel, kiu havis edzinon kaj kelkajn havaĵojn, kiujn li ne volis perdi.

Ĉu Mateo intence volis tiri lin en malfacilan situon, ne estis evidenta. Gabriel certe sciis, ke Mateo ne tre frate sentas al li.

Tamen li ne supozis, ke Mateo povus esti tiel diabla, konscie tiri lin en danĝeron. Mateo sopiris tiun oficon, tio estis certa. Ke li celis ankaŭ la edzinon de *don* Gabriel, tio apenaŭ estis verŝajna.

Sed bone eblis, ke *don* Mateo ludis volonte. Se li ne povis ludi per mono, jen li ludis per la sorto de aliaj, por vidi, kiel ili finiĝos kaj por ĝoji pri tio, ke ĝuste li estis la mekanisto en la fono.

## 4/7

Ĉu estis tiel aŭ ĉu tiel, *don* Gabriel glitis en situacion, en kiu li tiom firmpinĉiĝis, ke li ne vidis fendon, tra kiu li povus fuĝi.

*Don* Mateo diris la alton de la punmono kaj kaŭzigis ĝin per instrukcio. *Don* Gabriel pro tio ne plu povis diri, ke la *multa* ne nepre estas pagenda. Li devis nun senindulge insisti pri la pagado de la punmono. La ĉefan negocon de sia ofico li ja bazigis per tiuj monpunoj, kiujn li tuj fiksus kaj enkasigus kun senkompata severo ĉe ĉiu iel ajn pravigebla okazo, kiam li estos sufiĉe sekura. Sed por tiu negoco li esperis eduki iom post iom la kacikon de la indiĝenoj, por havi lin kiel subtenanton.

Sed li akceptis, ke tiukaze, se li nun cedus, post kiam Mateo pelis lin en la kaptilon, li bezonus multe da tempo antaŭ ol li povus konvinki la homojn, ke punmonoj estas necesaj por teni ordon kaj pacon en la loko. Ĉiu defendus sin per tio, ke li enliberigis la plej malicajn pacĝenantojn sen tio, ke ili devis pagi ion, kvankam li estas senkompata ĉe malpli gravaj deliktoj kontraŭ laŭdiraj instrukcioj.

Sed decide estis, ke li timis la mokon de Mateo. Se li nun ne kaptus la okazon, kiel li kaptis ĝin, kiam *don* Mateo ŝovis la pasaĝermonon de la laborista transporto al li, la moko kaj la

sarkasmo de Mateo al li ne plu elteneblus en la sekvaj semajnoj, ĉar li tiukaze laŭdire denove estus lasinta forflugi vepren la meleagrojn, kiujn li tenis tiel perfekte permane. Lia propra edzino, pli atentema pri mono ol li mem, kun ĝojo subtenus ĉiun sarkasmon de Mateo, ĝis li mem akceptus, ke li estas la plej granda klaŭno, kiun Dio grace pridonacis per tio, ke li benis lin per la ofico.

*Don* Mateo ekstaris kaj flankentiris sian fraton. Li parolis mallaŭte tiel al li, ke la ĉeestantaj indiĝenoj supozis, ke li persvadas lian fraton trakti indulgeme la prizonulojn.

Sed efektive li diris: „*hombre*, tiel bone kiel ĉifoje vi trafos tion neniam denove, kaj se vi estus pliajn cent jaron la loka sekretario en tiu ĉi loko. Ne lasu preteriri tiun bonŝancon. Oni ne scias, ĉu ĝi eble iam revenos. Vi eĉ ne unu ulon el ili enkarcerigis arbitre. La viroj kaj edzinoj petis vin meti la ebriulojn kaj kriulojn en la prizonon. La kaciko laŭ ilia opinio konfirmis tion, ĉar li diris nenion pri tio. Lia feliĉo estas, ke li estis pli ebria ol ĉiuj ceteraj. Nun vi havas sufiĉe da ili kune ĉi tie, kun la subteno de la tuta loko. Devigu ilin bone pagi por la eliro. De nun tio iros kvazaŭ per si mem. Ĉiun semajnon vi povas aresti du aŭ tri el ili. Troviĝas ĉiam preteksto. Vi povas krei tiom da ordonoj, kiom vi volas. Ili ne povas legi ilin. Se ili ne estos kontentaj pri tio, ili fariĝos koleraj pri la registaro. Tio ne koncernas vin, kaj la registaro estas malproksima. Eĉ, se ili sendos delegacion kaj la guberniestro efektive penus akcepti ilin por kvin minutoj, ili ne povus paroli kun li, ĉar li ne komprenas eĉ vorton de la celtala idiomo. Li demandus ilin pro la nomo, skuus de ĉiu manon, pagus por ili en *fonda*, do en gastejo, por ĉiu el ili manĝon por duono de peso kaj skribus al vi oficialan leteron por ekscii, kion ili celis. Vi povus respondi al li laŭplaĉe. Li flankenmetus la leteron en ĉiu kazo, ĉar li delonge estus forgesinta la pedikoplenajn indianojn, se li tiam

efektive ankoraŭ estus guberniestro kaj ne jam alia okupus lian postenon, kiu tute ne scius ion, sed zorgus nur pri tio, kiom da kromaj tarifoj li povas vringi el la kafoplantistoj, por aŭtomobil-stratoj kaj fervojoj, kiuj neniam estos realigitaj."

*Don* Gabriel komprenis, ke ĉio estis tiel, kiel lia frato diris. Se li ne volis fuŝi sian oficon por ĉiam, li nun devis ektranĉi la lardon, kiu kuŝis antaŭ li.

Ankaŭ la indiĝenoj sidantaj sur la benko parolis inter si kaj interkonsiliĝis, kion fari.

Kiam *don* Gabriel kaj *don* Mateo denove paŝis en la oficejan ĉambron, diris la viro, kiu nomis sin frato de Isidro: „Aŭskultu, sinjoro sekretario, ni volas pagi kvar pesojn kiel punmonon por Isidro, por ke li povu iri hejmen al sia edzino kaj al siaj infanoj."

*Don* Mateo ne lasis respondi *don* Gabrielon. Li diris tuj: „Sed la instrukcio postulas dek pesojn. Sed mi ja ne estas la sekretario. Se *don* Gabriel povas fari tion por malpli da mono, jen li devos respondeci tion al la registaro."

„Bone", diris *don* Gabriel, „mi ne estas tirano, ne despoto. Ni diru do ok pesojn. Isidro estas malriĉa, kaj li havas grandan familion."

„Kvin pesojn", respondis la frato de Isidro. „Kvin pesojn ni ja volas pagi, tiom li povos repagi al ni, se li vendos la kaprojn."

Post tien kaj ĉi tien- parolado ĉiuj interkonsentiĝis pri ses pesoj kiel punmonon por Isidro. La viroj iris al siaj domoj, kaj la frato de Isidro revenis post kvarono de horo kun ses pesoj.

*Don* Gabriel ne kvitancis la punmonon.

Sed *don* Mateo tamen sentis sin instigita konsili al li: „Kvitancojn vi ne devas skribi, neniam. Tiukaze oni neniam povos kontrolkalkuli ion, neniam pruvi ion, eĉ se la indiĝenoĵ ĉi tie fariĝus maltrankvilaj kaj ribelus. Vi ĉiam denove devas konvinki ilin, ke la registaro fiksis tiujn instrukciojn kaj, ke vi estas nur enoficigita oficisto, kiu devas efektivigi la instrukciojn, kaj ke tiukaze, se vi ne efektivigus ilin, vi mem estus metita en prizonon. Cetere, kial tiom da vortoj? Ili eĉ ne postulas kvitancon. Al ili mankas eĉ ideo pri tio. Jen la varo kaj jen la mono. Kaj se oni pruntas ion, tiukaze nur post garantio fare de ilia.“

„Mi volus scii nur tion, kial oni ne jam faris sekretarion el vi“, diris ridante *don* Gabriel.

„Iras tro malrapide por mi, *hombre*“, rediris *don* Mateo, „mi ankaŭ ne havas la trankvilon, kiun havas vi. Mi estus tro rapida, kaj tiam mi havus ilin ĉiujn sur la nuko. La vero, Gabĉjo, mi timas esti tiom sola kun tuta vilaĝo plena de indiĝenoj, el kiuj mi volas gajni monon.“

*Don* Gabriel forĵetis la cigaredon, tretadis sur ĝin kaj diris: „Tiel tio estas do pri vi, frateto, min vi volas firmnajli ĉi tie kaj vi estas for, kiam ekbrulos!“

„Al vi tio ne okazos, Gabĉjo“, ridante diris *don* Mateo. „Vi estas tro stulta por tio. Vi povas mieni kiel ŝafo, sed ne mi. Tial vi estas sekura sur tia posteno.“

## 4/8

Ĉirkaŭ tagmezo ĉiuj kaptitaj indiĝenoj, kiuj ĉeestis, estis liberigitaj el la karcero por po ses pesoj da *multa*. Parte oni pagis la monon tuj, parte *don* Gabriel skribe ŝarĝis la monon kiel ŝuldojn sur la enkarcerigitojn kontraŭ garantio fare de du parencoj.

Por la viro, kiu ebrie minacis mortbati sian edzinon kaj siajn infanojn, kaj kies propra edzino petegis la sekretarion, ke li metu la edzon prizonen ĝis kiam li denove sobros, li fiksis dudek pesojn kiel punmonon. Dudek pesoj estis certe tiom, kiom la duono de la maizorikolto de la viro aŭ la duoblo de vendeblaj porkoj, kiujn li havis.

Liaj fratoj kaj onkloj kaj aliaj el lia parencaro venis por agi por li. Post trihora kunsido ĉiuj unuiĝis je dek du pesoj, kiujn *don* Gabriel skribe ŝarĝis kiel ŝuldon al la viro. Ĉiuj ĉeestantoj transprenis la garantion, ke la sumo estos pagita interne de ses semajnoj, kun interezo, kiu sumiĝis al tri pesoj.

Pro la murdisto Gregorio ankoraŭ neniu venis. Nur lia edzino regule portis la manĝon al li. Ĉiufoje la edzino kaŭriĝis kun bebo je la mamo kaj kun tri infanoj ĉirkaŭkurantaj ŝin antaŭ la pordo de la karcero kaj tie ŝi restadis ĉiufoje, kiam ŝi venis, tri horojn kaj pli longe. Ŝia edzo ne parolis multe al ŝi, kaj ŝi preskaŭ nenion al li. Ŝi rigardis sia devo kiel edzino esti proksima al sia edzo. De tempo al tempo ŝi ploradis kviete por si mem.

Vespere ŝi venis nur kun sia bebo. Ŝi kunportis por la edzo nigrajn fabojn kaj tortiljojn kaj kruĉeton kun kafo. Ŝi ekbruligis bivakfajron antaŭ la pordo, varmigis la manĝon, ŝovis ĝin tra la pordokrado, rigardis lin dum la manĝado, demandis lin, ĉu li

volas havi salon aŭ pli da akvo.

Kiam li jam manĝis, ŝi donis tabakfoliojn al li, kaj li rulumis larĝampleksajn cigarojn por si mem. Li apogis sin kontraŭ la argila muro de la prizono, fumis kaj demandis ĉeokaze pri io certa, kio okazis hejme kaj li koncize ordonis al ŝi laborojn, kiuj farendis, kaj pri kiuj aĵoj kaj pri kiuj bestoj ŝi devas esti atentema.

Poste li sternis sin sur la minca petato kunportita de la edzino, kovris sin per maldika lanokovrilo, kiu havis multajn truojn kaj endormiĝis.

La edzino pacience restadis kaŭranta antaŭ la pordo ĉe la bivakfajro. Ŝi vigligis la fajron per bastono, premis sian bebon kontraŭ la nudan mamon, fumis cigaron, kiun ŝia edzo donis al ŝi, ekdormiĝis sen ŝanĝi sian kaŭrantan pozicion, vekiĝis, kiam la fajro komencis estingiĝi, parolis mallaŭte kaj kareseme al sia etulo, premis ĝin denove al si, postŝovis lignon en la fajron, rebruligis la estingitan cigaron, fumis kelkajn spirtirojn, denove ekdormis kaj vekiĝis, se la fajro komencis estingiĝi. Ilia edzo dormis trankvile kaj softe, neĝenate de konsciencriproĉoj en siaj sonĝoj.

Kiam la nokto ekpaliĝis, la edzino rektiĝis, trotis kun etaj paŝoj al la hejma kabano por prepari la matenmanĝon por la edzo.

**Rimarko**
petato = mato

## 4/9

La pordo de la prizono estis farita el dike tavolaj hakitaj tabuloj kunmetitaj sen najloj. La krado konsistis el fortikaj bastonoj vertikalaj kaj horizontalaj, je la kruciĝoj tiom noĉitaj, ke la bastonoj kunkroĉiĝis. La kadrofenestroj estis tiom vastaj, ke la enkarcerigito facile povis trameti sian kapon, se li emis tion.

La pordo ne havis ŝlosilon. En la pordofoston estis enbatita fera krampo, kiu estis tiom rustiĝinta, ke oni supozis ĝin havi „rapidiĝantan tuberkulozon“, ĉar ĝi rustiĝis tiom, ke ĝi estis jam tute magra. Se oni estus ŝovinta bastonon en tiun krampon kaj tordus ĝin, ĝi estus elspirinta per facila kraketo sian lastan surteran ĝemon por ne plu esti uzebla je iu utila releviĝo.

Tra transversa stango de la krado, kies fenestreto plej proksimis al la fosto, estis metita ĉeno kun duobla maŝo. Tiu ĉeno apartenis al la sama tuberkuloza familio, al kiu apartenis ankaŭ la krampo. La ĉeneroj estis tiom ronĝitaj kaj detruitaj de rustiĝo, ke oni facile povis disfroti tian ĉeneron per manpremo.

Tra la du ĉenaj finaĵoj kaj la malfermita flanko de la krampo estis metita pendoseruro. Sed la seruro ne funkciis, ĉar ĝi tiom rustiĝis, ke la intera mekanismo ne plu moveblis. Sed ĉu la mekanismo moveblis, ĉu ne, tio estis ekster konsidero; ĉar *don* Gabriel ja ne havis ŝlosilon al tiu seruro. Kiam li enfermis enkarcerigiton, li premis la riglilon de la seruro nur tiom kunen, kiom la riglilo akceptis tion. Ĉar la mekanismo de la seruro intencis ne plu partopreni en la kuro de la hastiĝanta mondo, la seruro ne klakfermiĝis plu. Se *don* Gabriel ellasis prizonulon, li simple malfermtiris la riglilon de la seruro.

Li ellasis la prizonulojn kelkajn fojojn ĉiutage dum dek minutoj.

Dum tiu tempo *don* Gabriel iris en la lernejan ĉambron aŭ al sia edzino en la kuirejon. Ĉar li ja sciis, kion faras la prizonulo dum tiuj dek minutoj, nome tion, kion prizonulo devas fari, *don* Gabriel ne sentis precipan emon observi lin dum tio.

Se la prizonulo jam faris la donacon, kiun li ofertis al la tero, li sidiĝis antaŭ la karceran pordon, kie li pacience atendis, ĝis kiam *don* Gabriel denove aperis, por denove enfermi lin.

Kiel la tuta oficeja konstruaĵo, tiel ankaŭ la muroj de la prizono, kiu okupis angulon en la ofica domo, konsistis nur el sveltaj latbariloj, kiuj amplekse estis surŝmiritaj per argilo. Per kelkaj piedtretoj la muro kaj de ekstere kaj de interne trapuŝeblis sen peno. Iu ajn viro povus malfermi la ŝlosilon same tiel facile, kiel *don* Gabriel faris tion. Kaj ĉiu viro en la loko sciis, kiel la ŝlosilo malfermeblas kaj refermeblas.

Kaj tamen, eĉ se la kaptito en tiu prizono devus atendi je la ekzekuto de mortkondamno kelkajn semajnojn, li ne fuĝus kaj neniu de liaj amikoj liberigus lin.

Se la pordo de domo laŭ ordono estas fermita por indiĝeno, kaj eĉ se ĝi estus ligita nur per bastrubando, tiukaze signifis tio por li, ke la prizona pordo estas fermita, eĉ se ĝi malfermeblas nur per kurbigita fingro.

## 4/10

Indiĝeno, kiu krimas krimon, provas fuĝi kiel ĉiu alia homo, antaŭ ol oni kaptos lin. Sed, se li foje estas arestita, tiukaze li akceptas sian sorton kun flegmo, kiun eŭropano ne komprenas. Li provas nek fuĝi nek defendi sin. Li ne prezentas sian kriman agon en la plej belaj koloroj kaj li ne serĉas iun pravigon. Se oni

petas lin paroli pri la kaŭzoj por lia ago, li nomas kialojn, kiuj per si mem apenaŭ havas rilaton al la ago, laŭ la opinio de tiu, kiu pridemandas lin, kaj laŭ la opinio de neindiĝeno. Okazas, ke li diras: „Mi sentis la bezonon murdi iun, kaj tial mi mortbatis lin.“ Sed plej ofte li tute ne donas klarigon, ĉar li eventuale ne havas klarigon. Aŭ ili tiom profunde estas en sia karaktero, en lia konscio, en siaj sekretaj timoj, en siaj intimaj deziroj, en sia por li mem malklara sinteno al la vivmedio kaj kunmedio, ke li ne havas la inteligenton, ja eĉ ne la kapablon per vortoj kaj klaraj frazoj komprenigi la pelantajn fortojn de sia animo al iu alia homo, kaj des malpli al juĝisto aŭ al polica oficisto. Verŝajne li sentas instinkte, ke neniu alia homo kapablas kompreni lin, eĉ se li seninterrompe parolus dum tagoj. Kaj ĉar li sentas tion, tial lacigas lin ĉiu vorto, kiun li povus diri je sia defendo. La juĝisto kun sia tuta digno sidas antaŭ li kaj parolas kaj kriadas al li kaj diras, ke li estas spitema, obstinkapa, insida ulo, kiu estas naskita krimulo. La verdikton li toleras tiel, kiel li toleris sian naskon. Li ne penas ŝanĝi ion je tio aŭ ion diri pri tio. Li sentas nur la profundan malŝarĝiĝon de la animo, ke kun la verdikto ties turmento finiĝas, ke oni ne pli longe fosados en li, ke oni ne plu demandos pri klarigoj, kiujn li ne povas oferti, ĉar li ne scias ilin. Li tute akceptas sian sorton. Se estas mortopuno, li staras antaŭ la buŝoj de la fusiloj rektataj al li kun la sama indiferenteco, kun kiu li staris antaŭ siaj juĝistoj kaj li ridas senkaŝe kaj honeste al la soldatoj, kiuj pafas sur lin. Li nek transen portas kun si en la eternan silenton malamon aŭ koleron pri siaj juĝistoj nek pri la soldatoj pafmortigantaj lin. Li eĉ ne sentas, ke okazis maljusteco al li. Eble li pensas, ke estis lia sorto de la komenco de l‘ mondo kaj, ke neniu povas fuĝi de sia sorto kaj neniu homo surtere havas iun kulpon, se la sorto tiel devas deruliĝi kiel ĝi okazas. La observanto de tiu okazaĵo, kiu ne estas indiĝeno, kaj kiu ne scias la karakteron de indiĝeno, interpretas la korskuigan sentimon de la indiĝeno vidalvide kun lia certa morto kiel grandan bravecon.

Sed tiu sentimo, tiu alridado de la soldatoj, kiuj rektadas la fusilojn al li, la impreso, kiun li vekas, kvazaŭ temas pri ludo, ĉiuj ĉi aferoj ne havas ion komunan kun braveco. La indiĝeno, foje jam en tiu situacio, estas nek kuraĝa nek malfortema; li estas nur neeldireble flegma. Efektive tiel flegma, ke li staras tute ekstere de ĉiuj surteraj sensoj kaj perceptoj. Kuraĝa estas nur tiu homo, kiu ne estas indiferenta kontraŭ danĝero kaj kiu ne restas indiferenta. En la milito kaj en sangoverŝigaj kvereloj estas tiu homo plej kuraĝa, kiu posedas malplej da interna kulturo kaj kies animo montras la malplej grandan sensivon, la homo, kiu ne havas fantazion kaj kiu laŭ sia esenca karaktero plej proksimas al bovo. Kiu scias la internan, la spiritan valoron de la vivo, tiu estas neniam vere kuraĝa sur tiuj terenoj, kie kutime kuraĝo estas glorata.

Se la indiĝeno estas liberigita kaj rajtas foriri sur sia vojo sen plua molesto, li dankas al neniu por tio. Li akceptas la verdikton pri lia senkulpo same tiel flegme kiel la mortverdikton. Por li laŭ lia karaktero tio ne faras diferencon. Restas tamen la certeco al li, ke la kaŭzoj de lia agado ne estis komprenataj kaj ke li neniam povus klarigi ilin. Li sentas la kialojn kaj li certe sentas ilin tute ĝuste en konkordo al sia karaktero kaj al la vivmedio, kiu montras sin antaŭ liaj okuloj. Sed li kapablas klarigi tiujn kialojn nek al si mem en siaj pensoj, nek li povas klarigi ilin eĉ al sia plej bona amiko. Sed la amiko, indiĝeno apartenanata al lia parencaro, el la sama tribo, el la sama vivmedio, plenkreskinta sub la samaj tradicioj kaj moroj kiel li, komprenas lian agadon, komprenas la kaŭzojn; sed ankaŭ li ne povus fari ilin kompreneblaj al iu, kiu ne tiom proksime apartenas al lia raso, tiel, ke li komprenus sen klarigantaj vortoj la kaŭzojn de tia ago.

La civilizita indiĝeno kaj la indiĝenoj de la urboj same tiom malproksimas de la primitiva indiĝeno en la instinkta

postsentado de kaŝitaj kaj neklarigeblaj kialoj kaj agoj kiel eŭropano.

Leĝojn oni faras tiel, ke ili adapteblas al la averaĝa nivelo. Leĝoj en nacio de Eŭropo, kiuj estas unuecaj laŭ formo, raso, lingvo kaj religio, historio kaj scio – se tia unueco efektive estus atingebla – proksimiĝas almenaŭ ŝajne al certa ŝminkita justeco. Lerta edukado fare de ŝtato kaj eklezio kredigas la homojn, ke ili havas justan leĝosistemon. Tiu fido de la ŝtatcivitanoj necesas, por ke la leĝoj estu akceptataj. Leĝojn, kiujn la plimulto rigardas kiel maljustajn, ne daŭrigeblas por ĉiam. Se oni perforte provas konservi tiujn leĝojn, ili kondukas ĉiam al revolucioj.

Sed kiom ajn bone leĝoj eble estas, en lando kiel Meksiko la ĝeneralaj landaj leĝoj ĉiam nur por malgranda parto de la tuta loĝantaro povas esti justaj leĝoj laŭ efiko. La leĝoj en Meksiko, tiel kiel ĉie, antaŭkondiĉas loĝantaron, kiu laŭ sia eduko, raso, lingvo, tradicioj, moroj kaj ekonomia strukturo estas unueca. Sekve de la uzado de tiuj landaj leĝoj al la tuta loĝantaro sen diferenco kaj sen konsidero de la diverseco rilate la popolan konsiston el multnombraj en ĉiu rilato apartigitaj tavoloj, tiuj leĝoj ebligas nemezureble grandajn maljustecojn sen esti rigardataj maljustecoj laŭ landaj leĝoj.

La murdo, kiun krimas civilizita meksikano, estas laŭ leĝo la sama murdo, kiun krimas indiĝeno, kiu tute ne similas rilate al sia animo, al siaj sentoj kaj siaj ekonomiaj vivkondiĉoj al la cvilizita meksikano. La murdo, kiun krimas indiĝeno, radikas en motivoj, kiujn la civilizita meksikano nek scias, nek konas, nek komprenas. La civilizito scias, ke la leĝo gardas la meksikanon, kaj ke ĝi venĝas la meksikanon, se iu praktikis maljustecon al tiu. Male la indiĝeno ne havas tian komprenon pri la leĝo. Se tiu sentas sin ofendita aŭ priŝtelita aŭ malinde traktata, la ekvilibro

de liaj sentoj por justeco kaj venĝo ne restabiliĝas per tio, ke juĝisto en malproksima urbo punas tiun viron, kiu praktikis je tiu indiĝeno iun maljustecon per unujara restado en prizono. Eĉ tiukaze indiĝeno ne sentas reatingitan harmonion inter fiago kaj venĝo, se la viro, kiu mortbatis sian filon, ie en la lando por tio estas mortkondamnita kaj pafmortigita.

La *caballero* povas vivi plu nur tiukaze, se li mortbatas la profanadanton de sia honoro en duelo, aŭ, se li ne povas mortbati lin, li preferas, ke oni lin mem mortbatu. Ne sufiĉas al li, ke juĝisto, kiu rigardas tiun honorprofananadon ĉiutage, punas la ofendinton per monpuno aŭ punas lin per kvarsemajna restado en prizono. Tiu vidpunkto de la *caballero* estas primitiva. Eble. Sed tiukaze la ofendo de nacio fare de alia nacio estas same primitiva. Tamen alte civilizitaj popoloj ankoraŭ nun ekmilitas reciproke. Tiom longe, kiom ili faras tion, eksterulo ne povas juĝi la ŝajne nekompreneblan murdon de indiĝeno.

La murdo, kiun krimas indiĝeno en sia komunumo, estas neniam rabmurdo, kiel ajn vaste oni interpretas tiun nocion. La krimo, kiun homo deliktas, kiu scias la kaŭzon, la celon, la valoron kaj efikon de la leĝoj, ne estas la sama krimo, kiun deliktas primitiva indiĝeno. Ja, ĝi estas eĉ ne la sama krimo, kiunapenaŭ edukita tre strečе laboranta kaj malbone pagata proleto krimas en civilizita lando.

Borsa trompado estas rabo, ĝi estas poŝoŝtelado. La borsa spekulado estas laŭleĝa, la poŝoŝteladon oni punas. Sed en ambaŭ kazoj malmemgardemaj homoj estas prirabataj de tiu, kiu kaptas la okazon. Spekulado kun kafo kaj greno, pro kiu la produktantoj de tiuj produktoj perdas sian terposedon kaj ĉion kroman, kion ili posedas, sen tio, ke ili povas fari ion kontraŭ tio por malhelpi tiun spekuladon, estas laŭleĝe permesata. Male al

tio la ŝtelado de kafosako aŭ de sako kun greno el la stokejo de la spekulanto estas grava rompŝtelo kaj oni severe punas ĝin. Ambaŭ agoj, kaj la spekulado kaj ankaŭ la ŝtelado de sako da kafo estas kaj laŭintence kaj laŭefekte al la koncernatoj tute samaj. Sed antaŭ la leĝo la spekulado validas kiel tute ne riproĉebla kaj leĝe protektata negoco, sed la ŝtelado kiel rabo.

Tiun maljustecon aŭ pli precize dirate, tiun neperfekton de la leĝoj ni koncedas, komprenas kaj kapablas priparoli.

Tiom malmulte kiom la grenproduktanto rigardas sin neprotektata de la leĝo rilate al la rabatakoj de la spekulantoj, tiom malmulte rigardas sin la indiĝeno venĝita pere de leĝo, kies defendanto per neniu vorto, per neniu ideo kapablas, ankaŭ se ĝi volus tion, redoni al li la harmonion de la vivo, kiu estis rompita fare de ago de lia najbaro. La indiĝeno al blankulo, kiu ne havas rilaton al lia vivo, povas pardoni agon, kiun li ne povas pardoni al sia najbaro. Li scias kaj sentas, ke blankulo vivas en alia mondo. Tial li juĝas lin indulge. Sed lian najbaron li juĝas – male al tio – severe kaj juste; ĉar li scias de la najbaro, ke al tiu liaj moroj kaj sentoj estas tiel intimaj kiel al li mem.

Kaj al tia murdo kaj tia murdisto, tiel intime ligita al tia komplika vivmedio, *don* Gabriel estis elmetita kiel juĝisto pro la kompetentoj de sia ofico.

## 4/11

Indiĝeno distingiĝis laŭ la valida koncepto sub la diktaturo de besto nur per tio, ke li povas paroli. Li havis nek homajn rajtojn nek homan animon. Oni devas kompreni la agojn de la oficistoj al la necivilizitaj indiĝenoj laŭ tiu koncepto. Al la meksikanoj plenkreskintaj kaj edukitaj en la spirito de tiu dikaturo, oni ne tro

atribuu tiujn agojn por juĝi lian bonecon aŭ malbonecon. En la civilizita Romo estis tute pravigite laŭmore kaj laŭ moralo ĵeti sklavojn aŭ kristanojn antaŭ leonojn kaj ĝoji en la areno pri tiu malegala batalo. Tiel, kiel oni nun rigardas tion tute pravigita, ke la ŝtatoj envicigas homojn kontraŭ ties volo en la armeon, traktas ilin pli-malpli malhumane, perforte rompas ties volon kaj ties liberon kaj sendas ilin kontraŭ ilia volo laŭ ordono de la landa prezidanto en la arenon kontraŭ la armeo de alia lando por tie murdi kaj lasi murdi sin por aferoj, kiuj al la proletoj, kiuj disponigas la grandan plimulton de la arenosklavoj, same tiel indiferentas kiel indiferentas al la sklavoj en la areno la kvanto de la spektantoj kaj la alto de la interkonsentitaj enirpagoj kaj devas esti indiferentaj, ĉar ili ŝanĝas ilian sorton tiom malmulte, kiom ŝanĝas la sorton de la proleto la diferenco, ĉu li elsangadas por Francio aŭ por Britlando. Li batalas por la sorto de la transvivantoj, kiuj vetis pri la fineliro de la batalo en la areno.

La maljusteco, kiun la diktaturo praktikis kontraŭ la indiĝenoj, ne baziĝis sur tio, ke ili rigardis la indiĝenojn kiel parolantajn bestojn, sed sur tio, ke la diktaturo faris nenion por tio levi la indiĝenojn el tiu necivilizita ŝtupo tiom supren, ke ĉiu homo rigardas la indiĝenojn kiel homajn estaĵojn, se eble ankaŭ ne tuj kiel fratojn, sed kiel homajn estaĵojn de la sama speco kaj anima konsisto, kiel la civilizitajn meksikanojn. Tial ankaŭ la maljusteco de la ŝtatoj kaj de ties regantoj ne baziĝas esence je tio, ke ili sendas samlandanojn kontraŭ ties volo same al sklavoj en la arenojn de la militoj, sed je tio, ke ili ne levas siajn samlandanojn sur tian ŝtupon de la civilizacio, ke ili rifuzas lasi misuzi sin kiel senvolan gregon de sklavoj. Tio kompreneble devigus la ŝtatojn pruvi tiom bonajn kaŭzojn por la neceso de milito, ke la samlandanoj libervole defendus sian ŝtaton, kaj ju pli libervole tio okazus, des pli ili rigardus pro sia civiliziteco la decidojn de siaj ŝtatestroj pravigitaj.

## 4/12

*Don* Gabriel cerbumis, ĉu li eventuale povus elvringi monon el la murdo. Sed nek li nek *don* Mateo trovis kaŭzon altigi la enspezojn de la sekretario. Ĉu la viro murdis alian indiĝenon aŭ dudek kvar indiĝenojn, tio estis indiferenta al ili. Havi mil indiĝenojn pli aŭ malpli de tiu speco je dispono ne faris diferencon por la ekonomia situacio de Meksiko. Kaj ĉar mil indiĝenoj de tiu speco ne faris diferencon ĉe la personaj enspezoj de guberniestro aŭ de generalo aŭ de imposta administranto, ilia ĉeesto aŭ malĉeesto ne estis pli grava ol la ĉeesto aŭ malĉeesto de mil pliaj ĉasbestoj en la savanoj aŭ en la arbaroj.

La revolucia registaro dudek jarojn post la falo de la diktaturo nombras la indiĝenojn, ĉiun indiĝenon, kiel meksikajn civitanojn, kies rajtoj estas samaj al ĉiu alia civitano, je kies bonfarto la registaro sin sentas devigita, kaj al kiu ĝi asignas terposedon ebligantan rikoltojn, kie ajn ekzistas la bezono. Tie, kie la indiĝenoj agas interne de sia komunumo kaj pro tio ne ekestas konfliktoj kun la rajtoj, la sekureco kaj la vivo de aliaj homoj, kiuj estas ekstere de la sfero de la indiĝenoj, la registaro lasas agi la indiĝenojn tute libere, se temas pri tio intertrakti ties kverelojn. Kaj la registaro nur tiukaze enmiksiĝas, se oni alvokas ilin por decido. Sed bedaŭrinde ankaŭ sub la nova registaro guberniestroj, generaloj kaj aliaj oficistoj en malproksimaj distriktoj ankoraŭ tro ofte mastrumas, verdiktas kaj agas laŭ la sistemo de la porfirismo.

*Don* Gabriel pensis puni la viron per ŝarĝo da kvindek pesoj. Volonte li estus ricevinta tiujn kvindek pesojn. Sed la indiĝeno ne havis ilin. Ankaŭ post tri jaroj li ne povus kunkolekti ilin, se *don* Gabriel pruntus al li la sumon kun pluaj kvindek pesoj por la interezoj. *Don* Gabriel provis tion; sed la viro ne povis havigi

garantiulon. Neniu volis garantii por li, ĉar estis tre verŝajne, ke la viro de iu parenco de la murdito estos mortigita pro venĝo. Kaj la garantiulo tiukaze respondecus la sumon.

Sangovenĝon la indiĝeno ne konas, eble escepte de kelkaj malmultaj triboj. Se indiĝeno mortbatas alian, la tuta vilaĝo scias, kial okazis la murdo. Ĉiu scias tute detale la kaŭzojn, la ekeston, la moralajn kaj tradiciajn motivojn. Se oni prijuĝas la murdon laŭ tiuj motivoj pravigita kaj neevitebla, nek la frato nek la patro nek la filo de la murdito persekutos la murdiston. Regas la opinio, ke la mortbatito meritis sian sorton, kaj ke li mem kulpis tion pro sia konduto. Kompreneble povas okazi, ke parenco de la familio, kiu eble pli bone scias la verajn kaŭzojn, ne akceptas la opinion de la vilaĝo kaj li intencas venĝon, kaj venĝos sin tuj kiam troviĝos okazo ĉe kverelo en ebrio aŭ ĉe festo.

Se la ĝenerala opinio de la vilaĝo estas tiu, ke la murdo okazis maljuste, scias tion la murdisto tute per si mem, vekiĝinta el sia ebrieco aŭ trankviliĝinta post sia kolero. Li prenas sian familion kaj libervole forlasas la vilaĝon. Neniu persekutos lin. Sed, se li ne foriros kaj loĝos plu en la vilaĝo kvazaŭ okazis nenio, oni trovos lin antaŭ ol la luno tute ŝanĝos sian aspekton iam mortbatita en la vepro aŭ sur sia kampo.

Se la opinio estas tiel kaj tiel en la loko, tiel ke unu el la parencaroj klarigas, ke la murdo estas nepravigita, kaj la alia parencaro male pri tio klarigas, ke la kriminto pensis, ke ĝi estas pravigita, aŭ se li estis ebria ĝis senkonscieco aŭ agis tro rapide kaj li pentas tion poste, tiukaze la tribestro konsilas al li forlasi la vilaĝon kaj setli profunde en la ĝangalo. Se li sekvos al tiu konsilo, ĉiuj familoj en la loko estas repacigitaj al li.

Oni povis simple transdoni la murdiston al la kaciko de lia loko.

Sed *don* Gabriel vidis sin en situacio, en kiu li ne povis fari tion.

Li estis vokata de la viroj por meti la murdiston en la prizonon pro la sekureco de la loko, ĉar la murdisto troviĝis en tia ebrieco, ke li minacis mortbati ĉiun, kiu tro proksimiĝos al li.

Se li estus eldoninta lin sen hezito, li perdus parton de sia aŭtoritato. Sed tiun aŭtoritaton li uzis por fari negocojn. Li eble eĉ farus la impreson, ke li timas la murdiston aŭ ties parencaron. Sed timon li ne rajtis montri, se li volas esti plu sekretario kaj elmastrumi kromimpostojn kaj monpunojn el la loko.

Puni la viron per ŝarĝo dekpesa, sumon, kiun li eble ie povus havigi, estus malsaĝa. Povus okazi post tio, ke komercistoj aŭ vojaĝantoj estus rabatakitaj kaj murditaj pro la certo, ke la sekretario per dek pesoj punus kaj forgesus la aferon, dum oni samtempe povus gajni ĉe la rabatako cent pesojn, kiujn la komercisto havas ĉe si. La pensoj de necivilizitaj indiĝenoj, kiel tiuj de la plej multaj civilizitaj homoj, estas sufiĉe strangaj, sed ili havas ĉiam ian elirpunkton, kiu tute bone kompreneblas.

La saman, kion faras ankaŭ ĵuĝistoj kaj policaj inspektoroj en aliaj landoj, kiuj ne precize scias, kion ili faru kun arestito, tion ankaŭ faris *don* Gabriel tiukaze. Li lasis la viron dum certa tempo trankvile en la karcero, sen diri al li, kion li intencas fari kun li, esperante, ke io okazos, kio entute liberigos lin de la devo decidi ion, aŭ, ke io okazos, kio metos decidon en lian malfermitan manon.

# Ĉapitro 5

## 5/1

La prizorgado de la kaptito kostis nenion, nek al *don* Gabriel nek al la komunumo. La edzino de la kaptito devis havigi kaj alporti la manĝon al li. Kaj se li ne havus edzinon, jen devus prizorgi lin lia patrino aŭ liaj fratoj aŭ iu ajn parenco.

Kun pacienco, kiu neniam laciĝis kaj neniam lamiĝis, sen vorto de riproĉo, venis la edzino trifoje ĉiutage kun siaj infanoj al la prizono por nutri la edzon, por doni purajn vestojn al li, por doni al li tabakon kaj por zorgi pri ĉiuj liaj bezonoj kaj plenumi ilin.

De tempo al tempo, se *don* Gabriel humuris tiel, ke li ellasis lin je la ĝusta tempo, kunsidis la tuta familio antaŭ la pordo de la karcero por kune manĝi. Tiu, kiu el la amikoj de la kaptito havis tempon kaj emon, iris al li, kaŭriĝis antaŭ la prizono kaj interparolis kun li.

Ne regule, sed dum plimulto de la noktoj, la edzino dormis kun siaj beboj sur petato proksime antaŭ la pordo de la karcero por esti proksima al sia edzo.

Dum lia kaptiteco la edzino faris ĉiujn laborojn necesajn sur la kampoj kaj ĉe la bestoj, kaj se ne sufiĉis ŝia forto aŭ tempo, venis ŝiaj fratoj kaj helpis al ŝi.

Ne okazas malofte en eta loko, ke tia formo de aresto daŭras monatojn, se la urbestro aŭ la sekretario decidis, ke la kaptito restadu kelkajn monatojn en aresto, pro puno pro iu delikto.

Narciso, la kaciko de la indiĝenoj, intertempe jam kelkfoje estis en la municipo por priparoli oficajn aferojn kun *don* Gabriel. Sed dum tio la kaptito neniam estis menciita.

Sed tiam li venis iutage, sidiĝis sur la benkon en la ofica ĉambro kaj diris: „*Don* Gabriel, kion vi faros nun kun Gregorio, kiu mortbatis Aurelion? Ĉu vi volas lin reteni dum vivotempo ĉi tie en la ĉelo?“

*Don* Mateo ne ĉeestis. Li ĉasis bestojn en la ĝangalo.

*Don* Gabriel tiris la korkŝtopilon el la inkboteleto, flaris je la inko, denove fermis ĝin kaj diris:„Tion vi scias bone, Narciso, vi estas ĉi tie la *presidente* kaj scias la leĝojn kaj instrukciojn.“

„Kompreneble mi scias ilin“, respondis Narciso.

„Tiukaze vi ankaŭ scias“, daŭrigis *don* Gabriel, „ke murdo estas tre malica kaj terura afero. Gregorio certe estos mortkondamnita kaj ekzekutita per fusiloj.“

„Jes, tion mi scias“, respondis Narciso.

„Se li povus pagi cent pesojn aŭ almenaŭ kvindek pesojn da *multa*“, diris *don* Gabriel, „tiukaze mi povus liberigi lin.“

„Tiom da mono Gregorio ne havas“, diris Narciso, „kaj tiom da mono li ne havos en sia tuta plua vivo.“

„Mi atendis ĝis nun, Narciso, pro Gregorio, kaj mi ankoraŭ ne telefonis al la registaro. Sed mi nun ne povas atendi plu, ni devos fari ion. Murdo estas tre granda kaj grava afero. Se mi telefonos, venos la soldatoj ĉi tien kaj pafmortigos lin ĉi tie.“

„Jes“, diris la *jefe*, „tion ili certe faros.“
„Sed mi tamen ne povas lasi foriri lin“, daŭrigis *don* Gabriel, „tion mi ne rajtas fari, kaj kelkaj pugnoherooj ĉi tie, kiuj ĉiam ebrias, eble pensos, ke tio funkcios ĉiam tiel facile kaj, ke io tia ne havos malicajn sekvojn, kaj tiukaze ni havos ĉi tie eble en ĉiu semajno murdon.“

„Tio povus esti“, koncedis la kaziko.

Pro tiu tien-kaj-ĉi tien-parolado *don* Gabriel ekhavis ideon, kiu ne venis en lian kapon ĝis tiam.

Tiom longe, kiom li jam laboris en tiu loko, li ne havis la okazon foje vojaĝi al Jovel por rigardi, kio okazas en la mondo kaj ĉu eble jam malfermiĝis fendeto, tra kiu li povus rampi al pli bona manĝokripo.

Pro Gregorio nun ofertiĝis okazo vojaĝi al Jovel kaj esti eĉ pagata pro tio per tagsalajroj. Necesis nur, ke li konduku Gregorion kiel punkaptiton al la magistrato, ofica ago, kiu estis krompagenda. Estos pli malkare por la magistrato, se li kondukos la viron mem al la urbo kaj se ne necesos sendi soldatojn por plenumi la ekzekutverdikton aŭ konduki lin al urbo por tie verdikti lin.

Tiel rapide, kiel tiu bona ideo estis veninta al li, li rapide provis plenumi ĝin.

„Ni ĉi tie tute ne havas la rajton juĝi pri tia grava kazo“, li diris, „nek vi kiel *presidente* nek mi kiel sekretario. Tio estas afero de la tribunalo. Mi devos konduki lin al Jovel kaj tie transdoni al la aŭtoritatoj. Mi volas diri al vi, Narciso, tio estas multe pli bona por li. La juĝistoj en Jovel eble ne estos tiom severaj al li. Ili verdiktos lin je proksimume tri ĝis kvin jaroj da prizono aŭ je

laborista punkolono. Kaj se la tempo estos pasinta, tiam oni liberigos lin kaj li povos reveni ĉi tien al sia parencaro. Sed, se male al tio la soldatoj venos ĉi tien, li apenaŭ povos esperi. Aŭ ili tuj ĉi tie ekzekutos lin per fusiloj aŭ ili faros tion sur la vojo kaj diros, ke li volis forkuri, kvankam tio ne pravas. Ili simple uzas la leĝon pri fuĝo, la *Ley de Fuga*."

Kaj la *jefe* diris: „Mi pensas, *don* Gabriel, ke vi pravas. Tio estas la plej bona por li kaj ĝi donos bonan ekzemplon por la pugnoherooj ĉi tie."

„Tiukaze mi ekiros morgaŭ, Narciso", diris *don* Gabriel. *Don* Mateo anstataŭos min ĉi tie kiel sekretario. Vi ja konsentas tion, ĉu?"

„Jes, mi tute konsentas", respondis Narciso. „Mi iros al lia familio kaj diros al ili, ke Gregorio morgaŭ estos kondukata al la urbo, al tribunalo."

Ĉar estis ilia propra tribestro, kiu klarigis al la loko kaj al la familio de Gregorio, ke tio estos certe la plej bona por Gregorio, se oni kondukos lin al urbo, por ke oni verdiktu lin tie, ĉiu konsentis. Ili ĉiuj sciis tute bone, ke ne eblas fari ion alian, se la registaro havas sekretarion en la loko. Tial, ĉar tie estis la sekretario, kiu prezentis la registaron, ili ne rajtis ordigi la kazon inter si.

La edzino de la kaptito informis sian edzon pri tio, ke li estos forkondukata je la sekva tago. Ankaŭ Narciso ankoraŭ venis al li por diri, ke li trankvile iru kun *don* Gabriel al Jovel, ĉar tio estos pli bona por li.

Gregorio akceptis tion ŝajne same tiel indiferente kiel li akceptus,

se oni dirus al li, ke lia prizontempo finiĝis kaj ke li iru laŭplaĉe sian vojon.

Lia edzino alportis la vespermanĝon kaj ŝi sidis ĝis noktomezo kun la infanoj antaŭ la karcero, de tempo al tempo dormanta, foje vekiĝinta kaj parolanta kelkajn vortojn al sia edzo kaj nutranta la bivakfajron.

Ĉirkaŭ noktomezo ŝi iris al sia kabano por kuiri lian matenmanĝon kaj por prepari lian vojaĝprovianton, kun la helpo de kelkaj najbarinoj. Ĉar estis marŝo ĉirkaŭ kvartaga, kiun li devis entrepreni.

Je la sesa sekvamatene *don* Gabriel kaj lia edzino estis vojaĝpretaj. Li sidis sur ĉevalo, dum lia edzino rajdis maljunan mulon, sed sekure irantan; dua mulo portis la pakaĵojn por la vojaĝo.

Gregorio helpis pretigi la bestojn por la marŝo. Antaŭ sunleviĝo li estis ellasita el la karcero por kunlabori. Dum la vojaĝo estos lia tasko servi kiel servisto.

Li iris en sian kabanon kaj alportis sian pakaĵon kun la nutraĵoj por la marŝo, sian petaton kaj sian truigitan lankovrilon. Li iris sen kontrolado kaj forestis dum horo. Se li havus la intencon fuĝi tio estus facila afero, tiel, kiel li eĉ pli facile povus fuĝi poste survoje.

## 5/2

Sed kiam li jam havigis siajn aĵojn, li revenis al la municipo. Estis lia sorto, ke li devis mortbati Aŭrelion. Tiel, kiel li apenaŭ povis fari ion kontraŭ tio, tiel li apenaŭ povis reteni la plian deruliĝon de sia sorto, kiu sendis lin por la verdikto en la urbon. Kian utilon

havus forkuri, se la sorto tenis preta alian sorton por li? Li povis fuĝi de *don* Gabriel kaj de siaj juĝistoj kaj de la soldatoj, sed neniam li povus fuĝi de sia sorto.

Kaj eĉ, se li ne estus fatalisto kaj senrezista subjekto de la destino, kien li forkuru? Ĉu en alian lokon, kie oni ne parolas lian lingvon? Tie li estus fremdulo, ne akceptata en la komunumo kaj se li tamen setlus tie, neniu akceptus lin kiel amikon. La misfido kun ĉiu tago fariĝus pli granda por li. Li kulpus, ke beboj mortas, ke la maizo ne kreskas, ke la ŝafoj ne naskas idojn kaj, ke la rivereto de la loko ŝangas sian iradon.

Poste iutage oni bruligus lian kabanon kaj disstamfus lian maizkampon. Kaj se li tamen restadus tie plu, li kaj lia familio iutage estus murditaj.

Li povus konduki sian edzinon kaj siajn infanojn en la ĝangalon por setli tie. Sed lia komunuma sento estis tiel profunda, ke longe li ne povus vivi en la ĝangalo. Li malfortiĝus kaj malsaniĝus sen sia parencaro. Li devus reiri al sia popolo. Pli frue aŭ pli malfrue. Kaj se lia parencaro mortkondamnus lin kaj lin ekzekutus, li estus kontenta anime, kaj li estus en ekvilibro kun la harmonio de sia vivmedio, li estus profunde dankema enkore, ke li rajtas morti interne de sia popolo. En la ĝangalo li povus vivi kiel besto, sed nur en la komuneco kun sia parencaro li estis estaĵo, kiu konscias pri sia homeco.

Li povus fuĝi en malproksiman urbon, kie neniu konas lin, kie neniu okupiĝas pri li. Sed jam sur la vojo li trovus multajn homojn, kiuj konas lin. Oni demandus lin: “Kien, amiko mia? Kaj kial?“ Li kapablas mensogi pri kutimaj aferoj de sia malvasta vivo. Sed lerte mensogi pri komplikaj aferoj kaj en vivmedio nekutima kaj al fremdaj homoj, kiuj suspekteme rigardas lin, tion

li ne povas. Li embarasiĝus kaj vekus eĉ pli grandan suspektemon kaj en la sekva loko la instancoj arestus lin.

Aŭ li lerte ŝtelirus sur vepropadoj al la urbo, evitus ĉiun neindiĝenon en vasta cirklo, tranoktus nur en la vepro, malproksime de la padoj.

Li atingus la urbon. Sed li ne parolis eĉ unu vorton el la hispana. En la urbo ne estus laboro, kiun li povus fari. Ĉio estus fremda al li, la lingvo, kutimoj, vivmanieroj, la homoj. Almozpeti li ne povus. Li ne scius kiel vivteni sin en urbo almenaŭ mizere, eĉ se oni ne havas laboron. En urbo ne kreskas plantoj kaj fruktoj, kiujn li povus preni kaj satiĝi kiel en ĝangalo aŭ vepro. Li povus trovi laboron kiel helpanto ĉe la ĉaristoj aŭ ĉe la mulpelistoj. Sed li ne scius kiel proksimiĝi al ili. Kaj eĉ tiuj homoj, se ili ne komprenus vorton de lia lingvo, estus suspektemaj kaj rifuzemaj.

Sed tamen li povus bonŝance ricevi laboron, la plej strecan, la plej duran, la plej kotan, la plej mizerigan, kie li devus esti je dispono dum dudek kvar horoj en tago kaj ricevus nur iom da manĝo kiel salajron. Laboristo, kiu ne postulas salajron ankaŭ en Meksiko estas bonvenigata homo. Li estas ŝatata kaj validas kiel ĝentileco, se li postulas por sia laboro nenion pli ol favoran kapjesadon de la mastro.

Sed eĉ tia rifuĝo ne savus lin. La sopiro al lia edzino kaj al liaj infanoj fariĝus iutage tiom forta, ke li devus reiri al ili sen konsidero pri tio, kio okazas al li.

Li ne eltenus vivi disigite de ili.

Sekve, egale kion ajn li farus, li kaptiĝus en la maŝo kaj ne povus fuĝi. En multaj rilatoj li ne tre diferencas de la eŭropa proleto,

kies sindonemo al sia familio, al sia elektita loĝloko kaj al sia amikara rondo estas la fonto de multaj el ties ekonomiaj mizeroj kaj de ties ekonomia dependeco.

## 5/3

Gregorio prenis sian pakaĵon kaj ekmarŝis antaŭen.

Lia edzino kun la infanoj jam antaŭe iris sur la vojo longan distancon, por tie, kie la pado kondukas en la ĝangalon, adiaŭi lin.
Kaj tie kaŭris la edzino kun sia bebo je la mamo, atendante sian edzon. La ceteraj infanoj iris en ŝia proksimeco.

La edzino, kaŭriĝante laŭ indiĝena maniero sur la tero, silente ploradis por si mem, ĉe tio balanciĝante kun sia supra korpoparto laŭ ritmo, kiu certe harmoniis kun la doloriga movado en ŝia animo. Ŝi premadis sian bebon al si, karesadis ĝin, kaj ĉiufoje denove iom liberigis ĝin laŭ la sama ritmo. Estis kvazaŭ la tuta doloro havis rilaton nur al la etulo. Je la infano ŝi montris sian korpan sentadon, kiun ŝi ne volis montri vidalvide kun sia edzo, eble eĉ ne povis montri.

La rilato de indiĝeno al sia edzino kaj tiu de indiĝenino al sia edzo estas tiel intima, kiel ajn povas esti iam amrilato. Sed laŭaspekte ĝi estas kruda. Efektive tiom kruda, ke oni kiel eŭropano estas ŝokita pri tiu kruda sinteno, ĉar oni sentas ĝuste pro tiu kruda sinteno nur des pli la intimecon de la sentoj de tiuj homoj. Neeldireblaj sentoj enkoraj ĉe ĉiuj homoj estas similaj kaj de ĉiuj homoj simile perceptataj. La intimeco de iliaj sentoj estas tiom profunda, tiom aŭtentika – ĉar tiom primitiva – tiom vehementa kaj tiom vera, ke mankas al tiuj homoj ĉia kapablo hipokriti tiajn sentojn, kaj por eviti ankaŭ la plej etan signon de la ŝajno, ke

spureto de hipokriteco povus ŝteliĝi en la montratan aspekton de iliaj sentoj, ili montras eksteren tiun krudan sintenon. Tiu kruda sinteno ne estas masko, kiun ili tenas antaŭ si por kaŝi malantaŭ ĝi siajn verajn sentojn, sed ĝi estas natura protekto kontraŭ impetega kaj ruiniga eksplodo de sentoj. Ne reteni siajn sentojn kun krudeco povus konduki facile al tio, ke iliaj sentoj estas fordone elmetataj al la tuta mondo, tiel, ke ili ridindigas sin antaŭ ĉiuj najbaroj kun la malĝojiga rezulto, ke iliaj plej profundaj sentoj estas senvalorigitaj kaj, ke restanta doloriga honto de iliaj sentoj minacas rabi la nuancon de ĉasteco, kiu neniam estingiĝas ĉe ili, kiom ajn aĝaj ili fariĝas.

Jen Gregorio sur la vojo proksimiĝis, kun balanciĝanta paŝado, sufiĉe kliniĝinte sub la ŝarĝo de sia pakaĵo.

Ĉar li ne rigardis supren, sed pro la fortika portobendo, kiu premiĝis al lia frunto, rondrigardis ĝuste nur kelkajn paŝojn sen povi rigardi vaste maldekstren aŭ dekstren, li ne rimarkis sian edzinon.

Kiam li estis jam nur tri paŝojn for de ŝi kaj rektiĝis por pli bone distribui la ŝarĝon, li ekrigardis la edzinon sidantan sur la pado.

„Huj!“ li vokis rapide.

Li miris, ke li vidas ŝin tie.

Li haltis, sed nur parte turnis sin al ŝi, kvazaŭ li volus aludi, ke li ne havas la intencon halti au eĉ restadi.

La edzino tenis alte sian bebon, kvazaŭ ŝi volus ĝin transdoni al li, por ke li ankoraŭfoje vidu ĝin.

Ŝia mamo estis nuda. Ŝi rimarkis tion kaj palpante provis butonumi la jaketon, sed ne fermis ĝin, ĉar ŝi faris tion tro haste pro emociiĝo.

Ŝi nun surgenue iom rektiĝis, ankoraŭ nun tenante sian bebon al sia edzo. Tiam ŝi komencis krii kiel besto. Ŝia nelavita vizaĝo, ŝvelinta pro la larmado en la nokto, tordiĝis al nerekoneblaĵo, kiu havis plu nur la formon de vaste malfermata blue ruĝa buŝo kun fortaj dentoj. Ŝiaj nigraj okuloj estis du mincaj linioj, el kiuj premiĝis grandaj ploroj. Ŝia forta nigra hararo estis taŭzita kaj permane trafosita kaj vile hirtiĝis en ĉiuj direktoj kiel la sveltaj branĉetoj de konfuze aspektanta nereordigebla arbedo en la ĝangalo. Ŝia malgranda nelonga nazo estis larĝa kaj la naztruoj jam per si mem sanige vastaj, aperis kiel kavernaj irejoj al la misteroj de nekonata mondo, kiu komenciĝis post la brune ruĝa veterbatita haŭto de ŝia vizaĝo.

Kun longe daŭrigataj torentoj de krioj ŝi eligadis la veon de indiĝena ino en la senkompatan medion, en kiun la homo estas metata, kaj je sia eterna mizeriga malavantaĝo provizita kun korpaj kaj animaj sentoj, pli priplendinda ol obtuzigita besto, kiu estas enviinda pro tio, ke ĝi ne havas sentojn rilate al la estonteco.

Estis ŝia funebra krio pri morta infano, pri ŝia morta patrino, pri ŝia morta edzo. Neniu devis diri tion al ŝi, ŝi jam sciis tion, ke ŝia edzo estas forprenata de ŝi por reveni neniam. Tiel, kiel ŝafo, kiun kondukas la brutkomercisto el loko, li neniam revenos. Besto, kiu kapablas paroli kaj ridi, sed kiu ne havis animon laŭ la opinio de tiuj, kiuj estis liaj juĝistoj kaj kiuj regis ĝin. Kota, plena de pedikoj, katolike baptita, sed tamen pagano, malpli edukita ol hundo, avida je brando, kun ebone duraj laborkutimigitaj manoj, kun hararo trafrotita sur la kapo de la krudaj portorimenoj pro pezaj ŝarĝoj, tiel trafrotita kaj kalva kiel la premaĵoj sur la dorso

de ŝarĝmulo. Cifero en la buĉdomo de la kapriculoj, kiuj regis la landon kaj la indiĝenan rason.

La ino ne konis la rilatojn, kiuj regis ŝian sorton, tiel kiel ankaŭ ŝia edzo ne sciis ilin. Kaj tiel, kiel bovino tute ne pensas pri tio forkuri al favora loko ĉe la vojo, pelata de la komercisto tra regiono por alveni fine en vendejon de buĉisto, tiom malmulte ankaŭ la ino pensis pri tio, ke ŝia edzo povus reveni. Ŝi vidis kiel oni forportas brutojn; kaj ĉar ŝi sciis el cent spertoj, ke la grandaj *patroncitos*, la ĉefĉjoj, kiuj regas kun la revolvero en la zono, ne faras diferencon inter bruto kaj indiĝeno, tial ŝi sciis, ke ŝi vidas ŝian edzon tie la lastan fojon.

En ŝia akre sonanta plendego ne estis kaŝita penso, kiu rilatas egoiste al ŝi mem, kio fariĝu nun el ŝi kaj el ŝiaj infanoj. Tio ne tuŝis ŝin. La infanoj tie estis naskitaj, kaj la infanoj manĝos kaj vivos. La morgaŭo estas fora, kaj kiam ĝi estos veninta, la tablo kovriĝos.

Ŝia plendego kun la plena kvazaŭ erupcia forto de vulkano estis direktata nur de la sorto de ŝia edzo. Ŝia edzo estis por ŝi dum ŝia korsufero nek litkunulo nek prizorganto de la infanoj. Tio ne gravas. Pro tio ŝi ne eligus krion, eble apenaŭ distordus la buŝon.

Sed ŝia edzo estas la patro de la infanoj, kiuj estas ŝia korsango. Al ŝiaj infanoj oni forprenas Dion. Oni detruas la altaron, ĉe kiu ili preĝas. Kaj por ŝi mem la centro de ŝia vivo estas detruita. Ŝia edzo eble estis drinkulo, eble li batis ŝin, eble li lasis labori ŝin ĝis la fino de ŝiaj fortoj; sed spite al ĉio ĉi, li estas la kernpunkto de ŝia estado. Ŝia tuta pensado, agado kaj zorgado kolektiĝis ĉirkaŭ li. Li estis ŝia religio, ŝia mastro, ŝia sola amiko kaj ŝia plej fidela kamarado. Li estis ŝia vera patrujo. Li estis la ununura patrolando, kiun ŝi konis. Kun li kaj pere de li la vivo ĉirkaŭ ŝi estis

vivigata. Sen li la mondo disrompiĝos en pecojn. Ne ŝiaj ekonomiaj problemoj estis ligitaj kun li. Tiujn problemojn ŝi kapablis solvi helpe de sia parencaro, eble kun granda peno, sed kun certa sekureco. Estis ŝiaj animaj bezonoj, kiuj fariĝis senenhavaj kaj nebulaj sen li. Tiel kiel senindividuaj homoj fariĝas malplenaj anime, se oni forprenas de ili ties Dion aŭ idolon aŭ sanktulojn.

Ŝi ne plendis pro si mem, ŝi ne kompatis sin mem. Ŝia korŝiriga plendego estis la esprimo de ŝia doloro, preskaŭ de ŝia korpa doloro, ĉar li estis disŝirata parto de ŝia estado, la plej granda parto de ŝia estado kaj de ŝia karaktero, kiu estis detranĉata de ŝi.

## 5/4

Ŝia kriado alvenigis la ĉirkaŭe petolantajn infanojn, kiuj premis sin dense al ŝi kaj komencis plori, kiam ili vidis funebri sian patrinon.

Gregorio, kiu haltis kaj parte turniĝis al ŝi, rigardante ŝin, kvazaŭ ŝi jam ne plu apartenas al li, volis iri plu.

Sed kiam li vidis sian edzinon en tiu sovaĝa malespero, kaj eble eĉ pli pro la baraktanta nuda bebo, kiun lia edzino tenis al li kiel oferdonon, li tre proksimiĝis al ŝi, surgenuiĝis kaj tiris sian kapon el la portobendo.

„*Tate, tate*“, vokis la infanoj kaj pendigis sin saltante al li. Ilia plorado ĉesis tuj, kiam ili vidis, ke la patrino trankviliĝis, en tiu momento, kiam ŝi havis sian edzon je sia flanko.

Estis nur kelkaj minutoj, kiujn li povis restadi tie. Sed kun ĉiuj sensoj kaj sentoj vivantaj en tiu momento, estis por la ino tiuj

hastantaj minutoj samaj al jarcentoj plenaj de travivaĵoj. Eĉ ne unu el tiuj kelkaj  minutoj estis prirabata por disipi eĉ nur penson pri la estonteco. Neniu el tiuj minutoj iam revenus; kaj kio en ili ne estis sentata kaj travivata, tion ankaŭ la eterneco ne povus havigi.

Gregorio ne montris tuŝitecon sur sia vizaĝo pri tio, kio okazis en li. Li movis la lipojn kvazaŭ ili estus elsekiĝantaj.

Li prenis la bebon el la etenditaj brakoj de sia edzino, balancis ĝin, tenis la bebon iom sur siaj genuoj, tuŝis karesante per la rondaj brunaj bebaj posttaĵpartoj sian vizaĝon.

Sed li diris eĉ ne vorton. Neniun konsolon, nenion pri nekredebla espero je reveno. Estis lia sorto, ke li estas bruto. Li havis nek la potencon nek la kapablon influi tiun sorton. Kion la *patroncitos*, la ĉefĉjoj difinis, decidis kaj faris kun ili, tion la indiĝenoj devis akcepti. Nek ilia jesado nek ilia neado povis ŝanĝi ion je tio. Homamo loĝas malproksime, reciproka homa kompreno troviĝas tre ekstere de la limoj de la mondo, kaj la ĉionscianta kaj justa kreinto de ĉiuj aĵoj restas plu nevidebla kaj plu neesplorebla, por ke liaj pastroj ne perdu la enspezojn el la vitejo.

La edzino plorsingultis mallaŭte por si mem kaj tute proksimiĝis al sia edzo por senti lin.

Kelkajn fojojn ŝi diris: „Gregorio, Gregorio.“Tio estis la solaj vortoj, en kiuj ŝi kapablis esprimi ĉiujn siajn aktualajn sentojn.

Li ne konsilis al ŝi, kion ŝi faru, kiam li estos for. Ŝi ankaŭ ne demandis lin. Tio estis aferoj, kiujn trakti estos sufiĉe da tempo, kiam ili urĝos ŝin.

La infanoj denove komencis petoladi.
La viro kaj la edzino sidis silente kune sen reciproke rigardi sin. Ambaŭ rigardis antaŭ si la malvastan padon, kvazaŭ ili volus kontroli la aĝon de la forviŝitaj hufospuroj de la ĉevaloj kaj muloj tie irintaj.

Estas certe, ke ambaŭ nenion pensis, ke la ĉirkaŭo por ili malaperis, kaj ke ili sentis sin estingitaj el sia konscia estado kiel en profunda dormo.

Sed subite ili estis ŝiritaj el tiu dormo, krude kaj senkompate.
„Hola, Gregorio, antaŭen, antaŭen!“ *Don* Gabriel proksimiĝis rajdante kun sia edzino.

Lia edzino rajdis antaŭe, la mulo sekvis kaj post ili rajdis *don* Gabriel.

Kiam li vidis sidi Gregorion ĉe la vojo, li sentis, ke li devas diri ion. Li sciis, ke la indiĝeno spite al sia peza pakaĵo ne nur povis paŝadi tiel rapide kiel la bestoj, sed plej ofte estos antaŭ ili sur la vojo. La indiĝeno grimpas trans krutajn deklivojn kaj rampas transverse de ravinoj tie, kie la bestoj ne povas iri. Li marŝas la plej mallongan vojon, dume la bestoj de tempo al tempo devas iri longajn ĉirkaŭvojojn. Kaj pro la edzino de *don* Gabriel, kaj pro la portomulo, paŝis la bestoj malofte pli ol rapide.

*„Orita, señor“*, respondis Gregorio, *„ya me voy*; mi jam venas.“

Li rektiĝis dum tiuj vortoj kaj redonis la bebon al sia edzino. *Don* Gabriel, eĉ sen halti nur dum sekundo, rajdis senzorge plu.

La edzino tuj premis la infanon sovaĝe kaj malesperiĝinte al si, kun tro hastaj kaj konfuzaj movoj de siaj brakoj kaj manoj. Ĉar ŝi

ne povis brakumi kaj premi la edzon al si, ĉar tio estus rompo de la indiĝenaj moroj. Sed ĉar ŝi sentis sin urĝata korpe esprimi, kion ŝi sentas en tiu momento, por liberigi sin, ŝi kovris sian infanon per brakumoj, kiuj en ŝia koro celis la edzon.

Ŝi restadis kauriĝante sur sia loko, ŝi firme kunpremis siajn lipojn kaj rigardis kun grandaj malsekaj okuloj supren al sia edzo, observante ĉiujn liajn movojn de la ekiro, kvazaŭ ŝi volus memorteni tiujn movojn.

Kvankam tio ne povas esti.

Dum ŝi rigardis sian edzon, dum li surmetis la pakaĵon, ŝi denove kaj denove kaj ekprenis maneton de la bebo, premis ĝin konvulsie per siaj fingroj kaj ŝovis ĝin en sian buŝon, facile, sed tute nekonscie pri sia ago, maĉante kaj suĉante ĝin.

Gregorio jam ordigis sian pakaĵon. Li sidiĝis, metis la porto-bendon trans la kapon, ĵetigis la supran parton de la korpo kun energia salta movo antaŭen kaj stariĝis dum tio.

Kun la ŝarĝo sur la dorso li turnis sin nun al sia edzino. Li movis manon al ŝi, kaj ili tuŝis nur la antaŭajn membrojn de siaj fingroj reciproke, laŭ la maniero de sia raso, sen premi la manojn.

Sed antaŭ ol ili disigis la manojn unu de la alia, la edzino firme kaptis lian manon, prenis la manon de ŝia edzo kaj kisis ĝin.

Lia vizaĝo fariĝis malserena, kvazaŭ maldika vualo kovrus ĝin. Li preme fermis iom la okulojn, singultis unufoje gargare en la gorĝo kaj kaptis kun la maldekstra mano la surfruntan bendon, kvazaŭ li devus skui ĝin tiel, por ke la ŝarĝo estu portebla pli oportune.

Dum la aludo de sekundo li premis manon kontraŭ la lipojn de sia edzino. Tiam li retiris la manon emfaze.

La edzino tenis la bebon al li, kaj li metis siajn fingropintojn sur la hararon de la infano.

Ree ekkontrolante sian voĉon, la edzino vokis: „*Muchachos*, *tate* foriras.“

La infanoproksimiĝis. Ĉiu, ankaŭ la plej malgranda, kaptis manon de la patro kaj kisis ĝin. Li tuŝis la kaphararon de ĉiu infano kiel resaluton.

La infanoj retiriĝis kirliĝante.

Li staris dum certa tempo antaŭ sia edzino. Li rigardis ŝin. Ŝi aspektis nelavita, lamente ploranta pro sia mizero. Ŝiaj muskoloj kaj tendenoj kurbiĝis kaj konvulsiĝis pro la sovaĝa rezisto kontraŭ la disŝiranta ribelo de ŝiaj sensoj, kiuj nun fine komencis venki ŝin. La bebo firmkroĉis sin al la nuda mamo. Ŝiaj okuloj forte ŝveliĝintaj kaj inundataj per grandaj kugloformaj gutoj, estis direktataj al li, la nudajn gambojn kun la krustokovritaj nudaj piedoj ŝi etendis antaŭen el la nigra truigita lankitelo, kiu estis ŝia ununura vestaĵo posedata de ŝi surtere. Li rigardis al ŝi, kaj li vidis je ŝi, kiel neniam antaŭe la tutan enkorpiĝon de sia hejmlando kaj de sia mondo. Li vidis tiun mondon je la unua fojo en sia vivo ekesti antaŭ la okuloj kaj jam disfali dum la ekesto. Li malfermis iom la buŝon, kvazaŭ li volus profunde enspiri. Sed antaŭ ol li finis tiun movadon, li firme kunpremis la lipojn.

Poste li rapide turniĝis kaj foriris sur la vojo sen diri ion plu, sen retrorigardi, sen halto.

Post dek paŝoj la ĝangalo jam voris lin.

**Rimarko**
*tate* = patro

# Ĉapitro 6

## 6/1

Du tagojn poste je la malfrua posttagmezo *don* Gabriel atingis la plej grandan indiĝenan lokon, *Cahanco*.

La loko estas grava placo por ĉiuj mulaj karavanoj, kiuj venas el la sudo kaj el la mezaj distriktoj de la ŝtato. Ĉi tie disiĝas la vojoj al la lokoj en nordo, al tiuj de nordoriento kaj al tiuj de nordokcidento. Tial ĝi estas grava komerca centro kaj foirloko. La karavanoj aĉetas tion, kion ili bezonas por la pluvojaĝo; nutraĵojn kaj anstataŭaĵojn por damaĝitaj portoselaj materialoj. Sufiĉe ofte la karavanoj restadas tie tutan tagon, por ke la bestoj havu altkvalitan ripozon, por transŝarĝi la varojn laŭ la porta eltenpovo kaj persisto, kiun ĉiu unuopa mulo videble havis dum la ĝistiama marŝo, antaŭ ol komenciĝos la tre penigaj vojoj. La vundoj de la bestoj kaŭzitaj kaj pro la premado kaj frotado de malbone ekvibriligitaj ŝarĝoj kaj pro profundaj mordoj de grandaj insektoj, tie estas zorge kuracataj. Se tio ne okazus, plenigus sin la vundoj dum la plumarŝo per fingrolongaj vermoj, kiuj vorus beston ankoraŭ vivanta sub la haŭtsurfaco dum nur kelkaj tagoj, ĝis la besto renversiĝus kaj mortus ĉe la vojo.

*Cahanco* situas sur alta ebenaĵo. Tiun ebenaĵon tute okupas la placo. La indiĝenoj loĝas ĉirkaŭe je la deklivoj de tiu ebenaĵo, kaj ankoraŭ pli supre troviĝas la kampoj kaj agroj de la indiĝenoj.

Neniu indiĝeno loĝas ĉe la placo. Ĉi tie loĝas nur *ladinos*, meksikanoj.

La placo estas granda ortangulo. La malvastan flankon okupas la disfalanta preĝejo, la alian transan flankon limigas la municipa konstruaĵo, jen la urbodomo, kie loĝas kaj regas la sekretario de la loko. La prezidanto de la komunumo estas indiĝeno, kiu vivas enmeze de sia popolo, tiel, kiel en ĉiuj lokoj kun indiĝena loĝantaro.

Unu el la pli longaj flankoj havas longe etendiĝantan koloniostilan konstruaĵon kun kolonhalo laŭ la tuta longo. Ĉi tie estas la *fondas* kaj kuirejoj, kie la vojaĝantoj povas manĝi. Tie estas kelkaj senfenestraj ĉambroj, kie staras vakaj litoj. La matracoj konsistas el krucforme kaj transverse ligitaj bovohaŭtaj rimenoj firmligitaj ĉe la flankaj latoj. Sur tiu reto el krudaj rimenoj, je kiuj troviĝas ankoraŭ ĉiuj haroj de la felo, ĉar tiuj rimenoj ne estas tanitaj, kuŝas mato el basto. Tiujn ĉambrojn kaj dormejojn oni ludonas al vojaĝantoj. En ĉiu ĉambro troviĝas kvar ĝis ok el tiaj dormejoj, neniu estas disigita de la aliaj per kurteno aŭ movebla vando.

Plej ofte estas nur vojaĝantinoj, kiuj luprenas liton. Por tiu dormejo oni kalkulas tre malmulte da mono, plej ofte nenion. Ĝi estas kvazaŭ aldonaĵo por la vespermanĝo, kiu kostas ĉiam la saman, egale ĉu oni dormas en dormejo ĉu ne.

Viroj dormas kun raraj esceptoj en la liberaera ekstera kolonhalo, kie ili fiksas hamakon aŭ sternas sin sur la plata argila tero, kun mato sub si kaj kovrita per lankovrilo kaj moskitoreto sur ĝi.
Sed senafliktite dormas ankaŭ sufiĉe ofte inoj tie en la ekstera halo, precipe, se ili vojaĝas kun siaj edzoj, en la haloj estas kutime pli fridete ol en la mucidaj ĉambroj.

Tiu ĉi halo estas ofte tiom plenigita per pakaĵoj, seloj kaj dormantaj homoj, ke apenaŭ restas loko por iradi, kvankam la halo esta tre longa. De tempo al tempo estas pendigitaj eĉ dek hamakoj, en kiuj dormas aŭ viro aŭ ino, kaj sub unu el ili mulpelisto aŭ migranta indiĝeno havas sian dormejon.

Nokte fariĝas neniam tute kviete en tiu halo, tiel, kiel ankaŭ neniam silentiĝas la babilado de iuj iom ebriaj mulpelistoj aŭ de indiĝenoj sur la placo.

Je ĉiu horo en la nokto alvenas vojaĝantoj aŭ karavanoj tien, aŭ homoj vojaĝas plu, precipe, kiam estas lunlumo. Antaŭ la halo brulas dum la tuta nokto la bivakfajroj de la indiĝenoj kaj de la mulpelistoj, kiuj kuiras sian manĝon mem, ĉar eĉ la malkaraj prezoj de la kuirejo estas ankoraŭ tro altaj por ili. Dum la tuta nokto oni pakas ion en la halo, parolas, insultas sin reciproke, sakras, fumas kaj interkonsiliĝas pri la vojo dum la sekva tago.

La kuirejoj estas ĉe la finaĵo de la halo, ili troviĝas plej proksime al la municipo. Ankaŭ tie oni kuiras dum la tuta nokto kaj paroladas. Kiam la lasta vespermanĝo estis transdonita al vojaĝinto, kiu ĵus alvenis tien, jam kelkaj homoj ekstaras, kiuj estas vojaĝpretaj kaj demandas pri matenmanĝo.

Ĉiuj rasoj kaj profesioj kolektiĝas en la halo: usonaj inĝenieroj, svedaj geologoj, arabaj komercistoj, hispanaj komercagentoj, meksikaj arkeologoj, negroj, judoj el Pollando, ĉinaj kontrabandistoj de opio, indiĝenaj ŝarĝportistoj, eskapintaj punkaptitoj kaj murdistoj fuĝantaj. Sed ĉiuj, kiom ajn eble estis tie, estis pacemaj kaj societemaj. Tiu, kiu nokte hazarde estis tretata sur la kapon de iu, kiu devas ekvojaĝi, aŭ kiu ricevas fortan puŝon en flankon, tiel, ke ĝi bluiĝas, sakras por iom da tempo kaj la kaŭzanto senkulpigas sin ĝentile kun multaj vortoj. La indulga suferanto,

frotanta la dolorigan korpoparton, respondas ankoraŭ pli ĝentile: „Ne gravas, sinjoro mia, mi ĉiam volonte estas je via dispono por servi al vi!“ Sed la paco kaj la konkordo per tio ne estas ĝenataj; ĉar ĉiu scias, ke neniu havas la intencon molesti alian.

Ĉe la transa flanko de la placo estas vicigitaj la butikoj kaj magazenoj.

Tiuj tielnomataj komercaj domoj estas pajlokabanoj kaj lignobarakoj. Ĉiu unuopa komerca domo vekas la impreson, ke ĝi tuj renversiĝos, kaj ĝi kun certo renversiĝus, se ĝi ne estus tenata de la najbara konstruaĵo, kiu same tiom kompatinde atendas la sekvan ventopuŝon, por ke ĝi fine povu adiaŭi sin de la kruela mondo. Kvankam tiuj magazenoj konsistas nur el tabuloj, latoj, staketoj, ĉifonoj, pajlofaskoj, palmfolioj, kartonaĵoj, laderoj, drataj pecoj, vakaj gazolinoskatoloj kaj skatoloj por petrolo, feloj, matoj kaj restaĵoj de vermboritaj kestoj, ili tamen aspektas tiel, kvazaŭ ili jam ekzistis, kiam Noa ĵus ricevis la komisionon konstrui arkeon.

Kelkaj el tiuj magazenoj havas nur varojn kun la valoro de tri pesoj entute. Sed la posedantoj ŝajne vivtenas sin de tio. Ĉiu magazeno vendas preskaŭ tute la saman, kion vendas ankaŭ la najbara magazeno. La posedantoj de la magazenoj estas plej ofte inoj. Kie estas iliaj edzoj, tion oni ne scias, kaj ankaŭ eĉ ne unu el la inoj sciis, kie troviĝas la edzo. Kaj malofte iu sciis diri, kial la edzo perdiĝis. Sed por daŭra memorigo ĉiu viro postlasis al sia edzino certan kvanton da infanoj, por ke ili ĉiutempe povu pruvi, ke ili unufoje aŭ eĉ kelkajn fojojn havis edzon.

Tiuj magazenoj ne estas fermitaj konstruaĵoj. Precize rigardate kaj, se oni ne lasas hipnotigi sin de la nomo *tienda* aŭ butiko, sed esploras la aferon ĝisfunde, do se oni kvazaŭ rigardas la ĉemizon

sur la korpo, tiukaze oni ekkonas, ke tiuj butikoj estas nur tabuloj, kiuj kuŝas sur kestoj aŭ stabloj por formi vendotablon. Post tia butika tablo estas krude faritaj fakoj, en kiujn oni metas, ŝtopas kaj ĵetas la varojn sen iu ordo aŭ disdivido, kaj kie ili dum jardekoj atendas aĉetonton.

Tiu ĉi tablo kaj la bretaro kun fakoj havas tegmenton el ĉiaj aĵoj, per kiuj oni povas fari en la kazo de bezono tegmenton por io, se oni havas nek asfaltkartonon nek tegmentajn tegolojn. Maldekstre kaj dekstre de la butika tablo estas starigitaj vandoj el ĉiuj eblaj grandoj kaj ĉiuj specoj de ligno el kiu ajn deveno kaj el ĉiu ajn pensebla origina uzo, por aludi, kie finiĝas la magazeno de magazenposedantino, kaj kie komenciĝas tiu de la najbarino.

De la fantazia tegmentaro pendas malsupren ĉiuj iel vendeblaj varoj: ŝnuregoj, zonoj, fortikaj bendoj, kandeloj, kafokaldronetoj, lanternoj, mulpelistaj vipoj, spronoj, sandaloj, lakŝuoj por damoj, retikuloj el basto, retikuloj el ledo, ŝrotpafiloj, fajrofariloj konsistantaj el ŝtalo, fajroŝtono kaj meĉo, bildoj de sanktuloj, flamruĝaj grandaj koltukoj, gigantaj pajloĉapeloj, maĉetoj, kotonĉemizoj kaj roboj por balo.

Sur la tablo estas pesilo, kiu estas ĝustigita tiel, ke la aĉetanto neniam povas konstati, ĉu oni ĝuste pesas aŭ ne. Plej ofte ankaŭ la vendisto ne povas diri tion precize. Sed la pesilo estis deviga laŭ instrukcio, kaj tial ĝi staras tie.

Sur la tabloj staras boteloj kun biero, limonado kaj soda akvo; krome tie kuŝas bananoj, oranĝoj, citronoj, bakvaroj, kakaofaboj, kukurbaj kernoj. En glasoj kaj boteloj troviĝas allogaj bombonoj.

Vespere oni iluminas tiujn butikojn. Ĉiu butiko havas alian iliuminaĵon. Petrollampojn, acetilenlanternojn, oleolampetojn,

gazolinlampojn oni vidas en grandaj kaj modernaj butikoj. La pli malgrandaj havas kandelojn, kaj la ankoraŭ pli etaj havas iluminajn kenotrancêtaĵojn.

Antaŭ la butikoj estas starigita vico de indiĝenaj kuirejoj, kiuj havas nek tegmenton, nek tablojn, nek seĝojn. Ĉiu, kiu volas manĝi, kaŭriĝas sur la teron aŭ staras ĉe la eta kuirejo. La klientoj estas plej ofte migraj indiĝenoj aŭ karavanpelistoj, kiuj estas tro lacaj mem kuiri. Tiuj kuirejoj laboras dum la tuta nokto. La indiĝenaj kuiristinoj kaŭras ĉe siaj etaj ladaj forneloj kaj dormas; sed tuj, kiam iu ekstaras ĉe la forneto, la inoj jam vekiĝas, kaj sen tio, ke la gasto diras ion, la ino flamigas la fajron per blovado kaj ĵetas kelkajn sekajn tortiljojn por rostado aŭ varmigo sur la rondan ladan pleton super la fajro. La kafo estas ĉiam preta, ĉar la kafokruĉeto staras proksime de la fajro.

La butikoj ne estas fermigeblaj. Tio ankaŭ ne multe helpus, se oni fermus ilin, ĉar la tuta magazeno konsistas nur el kunnajlitaj kestotabuloj, latoj, sakoj, feloj, malfermŝiritaj pakkartonoj kaj bastaj matoj. Tial sufiĉus softa, tre softa piedtreto por eniri la butikon por rompŝtelo. La seruro estus nur lukso.

Sed tiel, kiel ĉe la malgrandaj indiĝenaj kuirejoj, kiuj estas pli malgrandaj ol la pupoĉambro de eŭropa filino, tiel ankaŭ en la varobutikoj ne estas konstatebla fino de la negocaj horoj. Oni povas aĉeti dum la tuta nokto ion en la butikoj. Oni devas nur voki la negocistinon.

Kiam la mondana trafiko de la loko komenciĝas preskaŭ halti, ĉirkaŭ la deka vespere kaj, se jam nur en la butikoj por vendo de brando,estas videbla ankoraŭ iom da negoca movado, ĉar la mulpelistoj aĉetas la trinkaĵojn por la nokto, tiam la posedantino de la butiko komencas formeti la aĵojn de sur la tablo aŭ de sur la

stablo, kiun ŝi kutime nomas tablo. Ĉion, kio kuŝas sur ĝi, oni pakas sub la tablon aŭ stivas tion tie, kie ankoraŭ troviĝas libera anguleto aŭ vaka kesto.

Kelkaj el la butikoj metas kelkajn tabulojn sur la tablon tiel, ke ili supre trovas apogon ĉe la fragmita tegmento. Per tio ili signalas, ke ili fermis la butikon kaj ke oni plu povas ricevi la bezonatan nur tra malantaŭa pordo aŭ la flankpordo. Tiu malantaŭa aŭ flanka pordo estas dum la negoca tago ŝiraĵo de sakotolo kaj dum la nokto estas du aŭ tri apogitaj vermboritaj tabuloj.

Se la butika tablo estas malplena, tiel, ke neniu, kiu ŝtelistmaniere preteriras en la malhelo de la nokto, povas kunpreni ion, la butika posedantino kun siaj infanoj kaj helpservistinoj starigas ion por si mem en la eta konstruaĵo, pri kio oni povas nek diri nek vidi, el kio ĝi konsistas, kaj kiel ĝi ekestis. Sed la posedantino nomas ĝin tamen la *cama*, la lito. La plej etan infanon ŝi kunprenas en la liton al si. La ceterajn infanojn oni rulas en kovrilojn kaj metas sur kestojn, sakojn, matojn, tabulojn kaj disiĝantajn matracojn. La servistinoj, du aŭ tri, same rampas en iun angulon por povi dormi iel en la butiko. De tempo al tempo servistino mem havas bebon aŭ pli grandan infanon.

La pli aĝaj infanoj de la butikoposedantino dormas sur la vendotablo kaj gardas tiel la butikon kontraŭ raboj aŭ rompŝteloj.

La moskitoretoj fine estas fermtiritaj, kaj la tuta butiko ripozas kaj antaŭpreparas sin por la streĉa laboro de la sekva tago.

La ejo inter la butika tablo kaj la kaduka vando, kiu fermas la butikon kontraŭ la vepron, servas ne nur kiel komerca ĉambro

kaj dormejo, sed samtempe ankaŭ kiel kuirejo, salono, akceptejo por vizitantoj, manĝoĉambro kaj kiel festohalo por bruemaj renkontiĝoj, se la ino festas sian sanktulan tagon.

Tiuj butikoj, kiaj ajn aĉaj, mizeraj kaj primitivaj, kiuj tamen ĉiam okupas laborĝojajn homojn, plenumas gravan taskon en la loko. Sed ne eble tiun, kiel oni emas supozi, do provizi la vojaĝantojn kaj karavanojn per nepre necesaj aĵoj por ties longa kaj streĉa vojaĝo. Tio okazas nur krome. Ilia plej grava tasko estas havigi enspezojn al la loka sekretario. Ĉiu butiko, kiom ajn malgranda kaj aĉe aspektanta kaj ĉiu eta kuirejo, kiu en la loko volas vendi tortiljojn kaj *frijoles*, do fazeolojn, kaj ĉiu indiĝeno, kiu sur la tero sternas bananojn kaj oranĝojn por vendi ilin al preterirantaj mulpelistoj, devas pagi impostojn, kaj la impostojn oni transdonas al la loka sekretario.

La loka sekretario faras kalkuladojn pri la impostoj nome de la registaro de la federacia ŝtato. Tiuj kalkuladoj estas tre komplikaj kaj eksterordinare detalemaj kaj devige pedantaj pro la multaj malgrandaj kaj tre etaj butikoj. Kelkaj estas tiom etaj, ke ili devas pagi nur du centavojn kiel ĉiutagan imposton. Tio estas la indiĝenaj etkomercistoj, kiuj disvastigas sur la tero kelkajn mem rikoltitajn oranĝojn, cepojn aŭ akran kapsikon kaj kaŭriĝas malantaŭ ĉio ĉi kaj atendas ĝis fine iu venos, kiu pensas, ke li ĉi tie ĉe la indiĝenoj ricevos ion kiel donacon.

La ununura viro surtere, kiu ĉe la impostkalkulada negoco de la loko nome de la ŝtato precize scias de kie venas la impostoj kaj kiom oni kalkuladis, estas la loka sekretario. Ĉar li ja ne estas altlerneje edukita ekonomo, neniu atendas de li, ke li trovas la fadenon en tiuj kalkuladoj. Kaj ĉar la impostadministrantoj trovas en tiu kaoso eĉ multe malpli la fadenon kaj ĝuste pro tio, ĉar ili estas altlerneje studintaj kalkulistoj, kaj ĉar finfine nur la

loka sekretario sole povas difini kiel la imposta alto devas esti fiksata por ĉiu negoceto en sia loko laŭ la enspezoj de la butikoj, kaj ĉar neniu matematikisto kapablas kontroli tiun kaoson de dekalkuloj, rabatoj, altigoj, specialtarifoj kaj brandolicencoj, kiujn la loka sekretario laŭ la propra juĝo difinas, solvas kaj dismembrigas, tial la posteno kiel sekretario por tiu vigla trapasa loko estas tre pretendata.

Krom la impostoj aldoniĝas monpunoj, por kiuj la sekretario laŭ plaĉo donas kvitancojn aŭ ne. Kaj ankaŭ tion, kio estas punenda, li ordonas mem. Neniu povas kraĉi en lian supon. Li estas la aŭtoritato, li havas revolveron kaj kvar indiĝenajn policanojn kun ŝrotfusiloj kaj maĉetoj.

**Rimarkoj**
*fonda* = gastejo kun manĝejo

## 6/2

Reveninte *don* Gabriel tuj rajdis al la *cabildo* por saluti la sekretarion. Li havis la intencon pasigi la nokton en la municipo, ĉar tio donas la okazon al li paroli kun la sekretario pri negocaj aferoj. Tia konferenco okazis tiel, ke du lokaj sekretarioj, kiuj renkontiĝis ie, interŝanĝis konsilojn, je kia maniero iliaj enspezoj plialtigeblus. Ili distingiĝas pri tio neniel de la animpaŝtistoj, kiuj same iafoje faris konferencojn en siaj distriktoj, malpli kun la intenco paroli pri la savo de la animoj de siaj ŝafoj ol multe pli kaj ofte eĉ eksluzive pri tio, kiel la ofico aranĝeblas pli enspeziga kun lerta eluzado de ĉiuj ofertiĝantaj okazoj.

Kiel en ĉiuj lokoj de tiu speco, tiel ankaŭ tie la sekretario kontraŭ kutima pago donis al la vojaĝantoj de pli alta rango je deziro kaj

se estis spaco, nutraĵojn kaj tranoktejon. Tiu hotelrajto estis parto de liaj enspezoj. Estis la sola negoco en la loko, kiu ne pagis impostojn. Aŭtokrataj reĝoj ĉie estas liberaj de impostoj. Pere de tiu gastejo la sekretario kompreneble fariĝis sufiĉe grava konkuranto por la ceteraj *fondas*, kiuj faris siajn negocojn en la longa portiko de la konstruaĵo. Ĝuste tiuj vojaĝantoj, kiuj bone pagis, nur tiukaze venis al la *fondas* en la longa konstruaĵo, se la sekretario havis tro multe da gastoj kaj ne povis akcepti pliajn.

Li perlaboris ne nur je la manĝoj, kiujn li donis al la vojaĝantoj, sed ankaŭ je la maizo kaj alia, kion la bestoj de la vojaĝantoj, fakte la ĉevaloj kaj muloj, bezonis kaj krome je la manĝo por la servoknaboj de la vojaĝantoj.

Krome li havis brandovendejon, kiu ofte honorige estis vizitata de ĉiuj vojaĝantoj loĝantaj ĉe li, pro kio estis forprenataj multaj klientoj de la aliaj vendejoj en la loko, kiuj tamen devis pagi altajn tarifojn por brandolicenco.

Kvazaŭ tio ne sufiĉus, li posedis krome en la municipo butikon, kie li ofertis la samajn specojn de varoj, kiujn vendis la inoj en la barakoj kaj kabanoj por tiel trovi vivtenon por si mem kaj siaj familioj.

Sed estu foje dirate tie, ke li neniam uzis sian postenon kaj aŭtoritaton kiel loka sekretario por oficiale favorigi tiujn vojaĝantojn aŭ loĝantojn, kiuj tranoktis ĉe li aŭ aĉetis ion ĉe li.Tio multe atribuis al tio, ke la negocistoj de la loko ne plendis pri la konkurenco ĉe la registaro, sed kontentis pri tiuj rilatoj.

Tiaj plendoj en ĉiu kazo havas pli da malavantaĝoj ol avantaĝoj. La plendantoj devas sciigi siajn nomojn. La sekretario ekscias tiujn nomojn, kaj li havas la potencon tiom ĉikani kaj skuadi la

portantojn de tiuj nomoj, ke ili pentas dum jaroj, ke ili unufoje plendis pri io.

Tamen ekzistas sufiĉe da bravuloj, kiuj plendas. Sed ekzistas pli el tiuj, kiuj neniel defendas sin kontraŭ la maljustecoj kaj arbitroj de la sekretario.

Tial inter la sekretario kaj la ladinoj en la loko, la meksikanoj, ekzistas ĉiama akra malamikeco. Tiu malamikeco ne estas publika. Vidalvide la vizaĝoj montras ŝajnan konkordon. Sed en la fono estas nenio alia krom malamo.

## 6/3

*Don* Rafael Sariol, la sekretario de la loko ne estis hejme. Lia edzino akceptis la alvenantojn. Ŝi estis precipe helpema kaj amikema al la edzino de *don* Gabriel; ĉar ŝi sciis el propra sperto, kion signifas por ino tia tiom longa vojaĝo kun mulo kaj sur nedireble aĉa vojo. Kvankam la meksikaj inoj vivantaj en foraj ranĉoj kaj haciendoj, estas pli fortikaj kaj pli eltenemaj dum longaj vojaĝoj ol kruda rezistema maljuna teŭtona rabkavaliro. Sed eĉ, se ili kapablas el glaso verŝi gorĝen per unu fojo kvaronlitron da akra tekilo, sen eĉ tiki per brovhareto dum tio, tiuj longaj vojaĝoj tamen estas efektive torturadoj pro la eterne stumblantaj, saltantaj kaj falemaj muloj kaj ĉevaloj. Estas jam torturo por viro, sed eĉ multe pli por ino. Kaj tiom pli por ino, kiu jam plurfoje naskis infanon en foraj ranĉoj, kie la ununura kuracista helpo, kiun ŝi povas ricevi, estas tiu de maljuna indiĝenino.

La vojoj estas tiaj, ke eĉ sperta maljuna mulo, eĉ se ĝi volus, ne povus paŝi laŭ sia ĉiam trankvila irmaniero.
Jen kuŝas gigantaj arboj transverse de la vojo, derompitaj en la

lasta aŭ antaŭlasta uragano, dikaj metron aŭ eĉ metron kaj duonon. La mulo saltas, ĉar ĝi devas salti. Krome la rajdobesto sinkas en profundajn ellavitajn truojn kaj fosaĵojn aŭ ĝi firmkroĉiĝas piede inter surteraj arboradikoj. Foje aperas profunda kruta deklivo kaj la besto malsupreniĝas je ĝi tiel, ke la postaj kruroj troviĝas preskaŭ vertikale super la kapo. Tiam ĝi devas transsalti larĝan fosaĵon. La postaj kruroj pendiĝas post la salto rande de la abismo. La rajdistino ne scias dum kelkaj hastaj sekundoj, ĉu la besto kapablos posttiri la postajn krurojn aŭ ĉu ĝi glitas malsupren kun la ino sur la dorso en la fosaĵon, kiu, pli precize dirate, estas dudek metrojn profunda abismo, kun la rezulto, ke la ino glitas sub la beston, se ambaŭ, ino kaj mulo post la falo alvenas sube sur la grundon de la abismo. Tiel tio okazas dum la tuta vojo, sed kun eĉ pli vigligaj ĉeokazaj danĝeraj malhelpaĵoj. Kaj tiel tio funkcias plu dum la vojaĝo ses, sep, dek du tagojn. Ĉiutage de la sesa matene ĝis la kvara aŭ kvina posttagmeze. Ĉio ĉi estus ankoraŭ sufiĉe eltenebla, se la ino rajtus sidi sur la mulo aŭ la ĉevalo, kiel ĝi estas plej komforte al ŝi je tia tiom longa kaj streĉa vojaĝo. Sed la moroj ne permesas al ŝi ĝui komforton, kiu eksplicite ne estas permesita en la mora kodekso de la meksika ino. Ŝi ne rajtas rajdi en viroselo, eĉ multe malpli laŭ la maniero de viro. Ŝi sidas en la selo, eĉ sur tiuj torturplenaj longaj vojaĝoj tra vepro, ĝangalo kaj marĉoj, same tiel kiel la hispanaj nobelinoj rajdis dum ĉaso, kiam imperiestro Karlo V. ricevis la unuan mesaĝon, ke li ricevis kun la konkero de Meksiko novan provincon. Ja kiel ŝi povus sidi alie en la selo! Kiel ŝi rajtu tion! Kion la mondo pensu kaj diru pri ŝi, se ŝi estus renkontata sur la vojo de la inoj de honorindaj ranĉistoj sidanta sur la mulo maldece kaj malĉastege kiel protestanta gringino, kiu kredas nek al sanktuloj nek al la Senpeka Koncipiĝo de Maria! Nu, kaj kion la sinjoro *cura* diru, se li aŭdus tion aŭ eĉ vidus ŝin tia! Neniu moro ekzistas, kiu ne alportas malkomforton.

Kaj ĉar la edzino de *don* Gabriel dece kaj ĉaste rajdis, la edzino

de *don* Rafael sciis kiel ŝi devas akcepti sian gastinon por mildigi la durecon de tia vojaĝo.

Kiam ili pli poste ĉiuj sidis ĉe la manĝo, rakontis la edzino de *don* Rafael pri la deruliĝo de la negoco, kiun la edzo ĵus tiam estis plenuminta, kaj kiu estis la kaŭzo de lia vojaĝo.

Ĉar neniu alia ĉe la manĝo ĉeestis, ŝi ja tute libere rajtis paroli, kiel ŝi emfazis tion dum la enkonduko de sia rakonto; ĉar *don* Gabriel ja same estis sekretario. Kaj tiel la rakonto restis interne de la kliko.

**Rimarko**
*cura* = pastro

## 6/4

Sur la publika placo proksime de la preĝejo, kie malvasta vojo kondukis malsupren en la indiĝenan lokon, ekentreprenis armilforĝisto sian metiejon. Li estis mestizo.

La metia armilforĝejo estis kabaneto malfermita al ĉiuj flankoj, kun ses fostoj, kiujn oni pelis per batoj en la teron, kaj sur tiuj estis palmtegmento.

Tie troviĝis malgranda movebla forĝfajreja instalaĵo. Krome tie estis ankoraŭ amboseto, kiu eble estis sufiĉe granda por servi al horloĝofaristo. Kaj al arboŝtumpo, kiu putris en la tero, estis fiksita vajceto. Jen la armila forĝejo.

Ĉu la viro, al kiu apartenis tiu kanonfabriko, efektive estis armilforĝisto, oni ne povis konstati. Li same verŝajne povus esti tanisto aŭ peltisto. Sed neniu demandis lin pri la atesto pri

sukcese finita metia lernotempo.

Kie ne troviĝas konkuranto, kaj kie oni ne scias tion pli bone, tie korvo akcepteblas tiel bone kiel pavo aŭ kiel najtingalo. Kaj ĉar la plej proksima sekva armilforĝisto loĝis kvardek mejlojn malproksime kaj simile estis nur armilforĝisto, ĉar ŝnurfarejo ne indis la penon, tial la armilforĝisto tie havis sufiĉe da laboro. Ĉiuj indiĝenoj, kies buŝe ŝarĝendaj pafiloj havis defekton kaj pafis malantaŭen, devis iri al tiu viro. Li surmetis novajn pafkapojn, enmetis novajn ĉanojn, instalis novajn risortojn en la kulaso, marteladis la ĉanojn tiom longe, ĝis ili reuzeblis kaj li elboris plenŝtopitajn kaj rustiĝintajn fusiltubojn. La viro ne devis laboradi ĝis renversiĝo. Li prenis al si sufiĉe da tempo. Laboron, kiun li facile povus fari dum kvin minutoj, li lerte plilongigis ĝis tagduono.

Indiĝena kliento sidis pacience apud li kaj atendis same pacience, se la forĝisto interrompis sian laboron por manĝi ie kaj du horojn restadis ĉe sia manĝo. Ju pli da tempo li uzis por la laboro, des pli komplika ĝi ŝajnis al la kliento, kaj des pli volonte pretis pagi la indiĝena kliento al la armilforĝisto peson por la laboro, se ĝi senprobleme estus farebla nur por dankvorto aŭ por dek centavoj.

Tie, ĉe la armilforĝisto ĉiam kaŭris dum la tuta longa tago dekoj de indiĝenoj por observi la viron ĉe ties interesa laboro. Pafilo, eĉ se ĝi estas nur pafilo buŝe ŝarĝebla, estas grandioza aĵo en la vivo de tiuj indiĝenoj. Kaj viro, kiu komprenas kuraci la malsanojn de ŝrotfusilo, estas grava kaj eminenta viro, kies laboro meritas admiron.

Okazis ĉe tiu armilforĝisto, ke du komercistoj, kiuj vojaĝis kaj samtempe tranoktis en la loko, ekkverelis. La kaŭzo de la kverelo

estis opinia diferenco pri la kalibro por ĉasfusiloj, kiu plej bone taŭĝas por ĉasi jaguarojn kaj pumojn. Tri kalibroj konsidereblis: la kalibroj dek du, dek ses kaj dudek. Se neniu havas la intencon provoki seriozan kverelon, kaj se ne postrestis malamikeco el pli fruaj kunpuŝiĝoj, kiuj okazis sur forirplacoj, tiukaze oni kutime rapide interkonsentiĝas ĉe tia opinidiferenco pri tio, ke oni povas ĉasi pumon kun ĉiu kalibro, se oni bone trafos ĝin; ĉar tiukaze, se oni ne trafos ĝin, tio eĉ ne joton ŝanĝos je la rezulto, ĉu oni pafis laŭdire granaton dek-du-colan al la pumo, ĉu ne.

Unu el la komercistoj, *don* Ismael estis arabo, la alia, *don* Martin, estis meksikano. Ambaŭ ĉiam kverelis, kie ajn ili renkontiĝis. Ĉiu el ili riproĉis la alian, ke li fuŝadas la negocon de la alia, kaj, ke li kondukas la alian en la malsatmorton, ĉar li ĉiam ofertas pli malaltajn prezojn ol oni mem. Kaj ili riproĉis sin reciproke, ke tiukaze, se unu el ili havas ĉe sia stando inon, kiu volas aĉeti silkajn ŝtrumpojn kaj tenas la monon jam en mano, la alia tuj krias: „Sinjorino, jen tiuj aŭtentike francaj ŝtrumpoj, hieraŭ importitaj, mi vendos ilin al vi du realojn malpli koste.“

Tio estis fia. Sed ĉiu el ili faris tion por kolerigi la alian.

Ĉi tie ambaŭ foje rerenkontiĝis. *Don* Martin venis de Montekristo malsupren, kaj *don* Ismael venis de *Tuxtla* por vojaĝi al Tumbala.

La demando pri la ĝusta kalibro por tigro estis nur la enkonduko. Sekvis tre baldaŭ la kulpigo de *don* Ismael, ke la meksikanoj estas tiom stultaj, ke ili tute ne scias, kio estas la diferenco inter mitralo kaj repuŝada kanono. Ambaŭ ne sciis, kio estas repuŝada kanono. *Don* Ismael ie legis la nocion. Sed *don* Martin estis ofendita. Li respondis, ke la araboj estas tiom sovaĝaj paganoj, ke ili ne hontas dormi kun porkoj, kameloj, azenoj, infanoj kaj dek inoj en la sama sterko.

Tial respondis *don* Ismael, ke *don* Martin ja nur tial vivas plu, ĉar lia patrino, kiam ŝi elĵetis monden ses hundojn kaj tial havis la intencon dronigi ĉiun el ili, pro eraro lasis vivi hundidon, kaj ĝuste tiun kun absceso, ĉar lia patro de la certa malsano, kiun li ja bone konas, je duono estis jam vorita. Kion *don* Martin diris poste ne ripeteblus tiel „simple kaj mildigite“. Sed ĝi estis tia romantika diro, kia ĝi povas esti, se meksikano, speciale, se li estas migranta komercisto, havas la intencon provoki sian kontraŭulon tiel, ke tiu eltiru la revolveron kaj kvazaŭ senkonscie pafu ses kuglojn.

*Don* Ismael ne havis sian revolveron ĉe la zono. Li lasis ĝin en la gastejo, ĉar li intencis ja nur komforte promenadi tie. Sed li havis tranĉilon en ingo ĉezone.

Per unu rapida movo li eltiris la tranĉilon. *Don* Martin simile tiel rapide eltiris la revolveron. Sed lia movo daŭris iomete pli longe, kaj la revolverĉano ne streĉiĝis sufiĉe rapide. Tiel okazis, ke li havis fortan pikon en flanko, antaŭ ol ekpafis la revolvero. La kuglo tondre batiĝis ie kontraŭ la tegmento de la preĝejo. Antaŭ ol li povis pafi duan fojon, *don* Ismael batis malsupren de *don* Martin la brakon kun la revolvero. Kaj ties manon, kiu tenis la revolveron, li kaptis tiel kaj tiom tordis, ke la armilo falis teren.

*Don* Rafael, la sekretario de la loko, staris dum tiu okazaĵo nur proksimume cent paŝojn for de ili, kie li parolis al kelkaj mulpelistoj.

Aŭdinte la pafon, li kuris kun kelkaj saltoj al la armila forĝejo, kien li alvenis ankoraŭ ĝustatempe por malhelpi la reprenon de la revolvero, sur kiun *don* Ismael metis piedon, fare de *don* Martin.

Same allogite de la pafo, alkuris la kvar policanoj de la loko.

Ili estis indiĝenoj nudapiedaj, sen ĉapeloj, kun maĉetoj ĉe flanko kaj kun surŝultre pendigitaj malnovaj buŝe ŝarĝataj ŝrotfusiloj.

Vidinte, ke la kverelantoj ne estis indiĝenoj, ili haltis en distanco de kelkaj paŝoj. La indiĝenaj policistoj de malgrandaj lokoj estas tre memgardemaj en siaj oficaj agoj kontraŭ tiuj homoj, kiuj ne apartenas al la propra raso. Se meksikanoj aŭ aliaj *caballeros* kverelas per pugnoj aŭ eĉ rapidpafas unu al la alia, ili enmiksiĝas nur en tiu kazo, se ili ricevas rektan ordonon de la aŭtoritato de la loko, de la sekretario, ĉar la *caballeros* havas sian propran manieron plezuriĝi. Krome la kverelantaj sinjoroj povas esti ja altaj oficistoj, kiuj tuj ordonus enkarcerigi policanon, se tiu miksiĝus en aferojn, kiujn li ne komprenas. Iom alie statas pri indiĝenoj. Ties agojn komprenas la indiĝena policano, kaj se ili bonvoleme ne lasas aresti sin, li donas al ili sukan baton per la ligna polica bastono sur la kranion.

Sed la indiĝena policano scias ankaŭ, ke *caballero* ne forkuras, eĉ tiukaze, se li pafmortigis sian kontraŭulon. *Caballero* ankaŭ ne havas kaŭzon forkuri, *caballero* estas kuraĝa kaj ĉiam akceptas la konsekvencojn de siaj agoj. Li bone konscias, ke li vivas en Meksiko, kaj ke oni ne faros ion kontraŭ li pro ĉeokaza murdo en malgranda loko kaj, ke li trovos en pli grandaj urboj ĉiam juĝiston, kiu suprize facile konvinkeblos pri tio, ke ne temas pri murdo, sed nur pri memdefendo en kazo de bezono aŭ eĉ pri ofendita honoro.

Indiĝeno ne tiel facile povas elturni sin, se li iam estas kaptita en karcera kaptilo. Tial li provas fuĝi, tiom longe, kiom eblas ankoraŭ.

*Don* Rafael diris kvazaŭ amikece: „*Caballeros, siento mucho,* mi tre bedaŭras, sed mi vidas min devigita aresti vin ambaŭ, pro ĝenado de la publika paco. Bonvolu iri kun mi transen al la *cabildo*. “

*Don* Martin sentis sin malfortiĝanta pro la tranĉilpiko en la korpo. Tial li devis rezigni pri la kverelo. Kaj ĉar *don* Ismael ne plu povis rigardi lin kontraŭanto, ankaŭ li trankviliĝis.

Ambaŭ lante iris kun la sekretario al la municipo, sekvata de la indiĝenaj policanoj.

*Don* Martin, la meksikano loĝis en la municipo, estis do hotelgasto de la sekretario.Kaj *don* Ismael, la arabo, tranoktis en unu el la gastejoj en la portiko.

„Envenu, *caballeros“*, diris *don* Rafael, kiam li antaŭiris la du arestitojn en la grandan *sala*. La *sala* estis oficeja ĉambrego, loĝejo, manĝohalo kaj dormejo por la gastoj, ĉio ĉi samtempe. La ejo estis sufiĉe granda por tio, ke dudek gastoj tie samtempe povus tranokti, iafoje eĉ tridek personoj.

La viroj sidiĝis. *Don* Rafael alportis plenan botelon kun komiteko. Antaŭ ol la procesaj debatoj komenciĝis, oni cirkle transdonadis la botelon dufoje.

La kvar policanoj kaŭris antaŭ la enirejo de la malfermita pordo por havigi la necesan dekoracion al la procesa kunsido, kvankam tute ne libervole siaflanke.

Dum la du rondoj kaj la sekva aldono de plia rondo de la oportune sidantaj buŝgargaristoj, parolis la tri *caballeros* pri la vetero kaj malbonaj negocoj, pri ĉevalprezoj kaj pri traveturintaj konat-

oj.Tiam diris *don* Martin: „*Oiga,* aŭskultu foje, sinjoro sekretario, ĉu via sinjorino Esposa eble havas iom da pansaĵo ĉemane? Mi supozas, ke mi devos iom ŝtopi la pikvundon.“

„Do, vi havas pikvundon, *don* Martin, ĉu?“ diris la sekretario. „Lasu min foje ekzameni ĝin.“

*Don* Martin malfermis la pantalonzonon, ŝirante elprenis ĉemizan parton, kiu estis malseka de la sango, kaj montris la vundon.

Eŭropano, kiu havus tiun pikvundon, apenaŭ mem rigardus ĝin kun mieno de fakulo, sen pensi pri morto, testamento, hospitalo kaj operacio, kaj tiam falus en profundan senkonsciecon.

Sed meksikano pro tia bagatelo ne senkonsciiĝas, des multe malpli li pensas pri morto. Li rigardas la vundon kun granda faka scio, komparas ĝin kun multaj aliaj pik- kaj pafvundoj, kiujn li jam transvivis kaj kiujn li vidis ĉe aliaj, boradas perfingre en la vundo, lasas prijuĝi ĝin de siaj tablokunuloj kaj permesas al ili, por ke ili eble eĉ ne eraru pri la juĝo, ke ankaŭ ili boradu perfingre en la vundo por konstati ties profundon kaj vaston.

Tio tiel okazis ankaŭ en tiu ĉi kazo. Kaj ĉiu el la tri sinjoroj donis sian ekspertizon pri tio, kiom da tempo necesos ĝis la vundo estos kuracita. Pri kuracisto aŭ hospitalo pensis neniu. Tio ankaŭ estus sen utilo, ĉar la plej proksima kuracisto loĝis tiom malproksime, ke la vundo certe estus kuracita antaŭ ol la vundito alvenus ĉe la kuracisto.

La edzino de la sekretario alportis kotonan lanon kaj bandaĝon. Oni ellavis la vundon, poste enverŝis brandon kaj fine ŝtopis la kotonlanon sur ĝin kaj surmetis la bandaĝon.

Kiam tio estis finita kontentige al ĉiuj, diris *don* Rafael:„Nun ni devas ekzameni la aferon ĉi tie. Mi havas la devon konduki vin ambaŭ al la distrikta ĉefurbo, por ke la juĝistoj decidu.“

„Kion la juĝistoj en tiu kazo decidu?“ diris *don* Martin. „Ke mi havas pikvundon de tiu filo de putino, tion neniu juĝisto devas decidi, tion mi scias. Mi havas tion nigre surblanke aŭ pro mi ruĝe surbrune. Kaj ke mi ne devas permesi impertinente diri al mi de tiu abscesotubera turko, ke mia patrino estas dekcentavo-putino, por tio mi ne bezonas juĝiston kaj neniun distriktan ĉefurbon. La pikvundo nun ja jam foje estas en mi, kaj tiun neniu juĝisto povas sorĉforigi.“

„Sed kial tiu seksperfortisto ne diras ankaŭ, kion li, tiu stinkanta kojotosakulo, diris al mi?“ demandis nun *don* Ismael. „Mi ne bezonas juĝiston en la distrikta ĉefurbo kaj lian idiotecan bonan konsilon, ke mi ne movu min, se tiu rabmurdisto kaj seksperfortisto eksvingas la revolveron por bori en miajn intestojn ses 45-kalibrajn kuglojn. Kiun utilon havu juĝisto, se mi jam glutis la ses kuglojn kaj ne povas digesti ilin?“

*Don* Rafael ne miksiĝis en la privatajn aferojn de la du komercistoj. Sed kiam li ekhavis la opinion, ke ambaŭ sufiĉe malŝarĝis sian animon kaj ne plu posedas rezervojn en sia riĉa vortostoko, li diris: „Mi vidas, *caballeros*, ke vi ne volas uzi juĝiston en la distrikta ĉefurbo. Tiel ni povos reordigi tion ja inter ni. *Justicia*, la justeco devas esti en la lando. Tion vi konsentos al mi, sinjoroj miaj. *Don* Ismael, ĉar vi ĉi tie en tiu paca loko tranĉilpikis viron, mi devas puni vin pro grava korpovundigo per cent kaj kvindek pesoj. Kaj pro la ĝenado de la publika paco per kvindek pesoj. Tio sumiĝas al ducent pesoj, kiujn vi devos pagi ĉi tie, aŭ mi devos reteni vin en aresto, ĝis la *multa* estos pagita.“

*Don* Ismael volis diri ion kontraŭ tio, sed *don* Rafael diris: „Unu momenton, mi troviĝas en ofica ago.“

Li turnis sin nun al *don* Martin: „Vin, sinjoro, mi devas puni per kvindek pesoj, ĉar vi eltiris la revolveron en paca loko sen videbla kaŭzo por pafmortigi alian viron. Kaj ĉar vi, tiel kiel *don* Ismael, ĝenis la publikan pacon mi devas puni vin per kvindek pesoj. Tio sumiĝas al cent pesoj, kiujn vi devos pagi ĉi tie, aŭ mi devos reteni vin en aresto ĝis la la punpago estos pagita.“

Ĉiuj tri sinjoroj, kaj la sekretario kaj ambaŭ komercistoj sciis, ke tio ne estis la lastaj vortoj en la afero. Nun venis la tempo por apelacioj, kiujn ambaŭ tuj metis. La apelacia juĝisto estis la sama, kiu diris la verdikton. Pro tio la proceduro fariĝis pli simpla kaj la ŝtato ŝparis multajn elspezojn.

La sekretario havis la rajton aresti ambaŭ komercistojn kaj en kazo de bezono perforte treni ilin al la distrikta ĉefurbo. Sed en urĝaj kazoj li ankaŭ rajtis plenumi la aferojn en la loko mem. Ke la afero urĝis, estis nekontestebla. Ambaŭ komercistoj faris negocvojaĝojn. Estus damaĝinta iliajn negocojn, se ili devus iri al la distrikta ĉefurbo por tie atendi tri, eble eĉ ses semajnojn, ĝis komenciĝus la proceso. Kiel ajn ili rigardis la aferon, estis en ĉiu kazo pli malmultekoste kaj pli oportune travadi ĉiujn instancojn tuj tie en la loko. Kio koncernis la punojn mem, ili estis ĉe la laŭorda juĝisto neniel pli malmultekostaj ol ĉe la sekretario. Aldoniĝus la kostoj de la proceduro, kiuj ne estis pli malkaraj.

Kompreneble la sekretario povus tute pretervidi la aferon. Rilate al siaj bonaj amikoj kaj influhavaj oficistoj li ja agus tiel. Sed li devis vivi. Kaj tia bona okazo enkasigi konsiderindan sumon je unu fojo, ne troviĝas ĉiutage.

Sed li estis ankaŭ sufiĉe da diplomato por fari el neniu malamikon. Ĉu li ĉiam estos sekretario tie, tio estis dubinda. Se en iu aĉa tago la impostkaso aŭ la poŝteja kaso aŭ la telegrafa kaso ne plu estus en ordo, tiam la moŝta vivo havus finon. Tiam povus okazi, ke li mem devos vagadi kiel komercisto aŭ kiel brutaĉetisto en la federacia ŝtato, kaj eblus eĉ, ke *don* Martin tiam ie estos sekretario kaj tiukaze venĝos sin je li. Krome povus okazi, ke li iam bezonos la subtenon de *don* Ismael.

„Mi ja nun povus lasi foriri vin tute liberaj, *caballeros“*, li diris, „sed tion mi ne rajtas. Mi estas ĉi tie en ofico. Ĉe la aliaj loĝantoj, kaj eĉ ĉe la indianoj, tio farus tre aĉan impreson, se mi pretervidus la kazon. Mi povus perdi ĉi tie mian tutan aŭtoritaton. Tio ne eblas. Tion vi ja akceptas. Nur kun justeco kaj senpartieco regeblas la mondo.“

*Don* Martin respondis: „Tio ja ĉio estas tute ĝusta, sed mi ne havas la monon. Kaj ĉi tie en la karcero mi krome ne povas restadi. Mi devos ĝustatempe alveni antaŭ la *feria* La Sanktulan Foiron. Alie mi ricevos malbonan standon.“

„Mi sidas en la sama kaĉo“, diris *don* Ismael, „mi ne povas perdi eĉ nur tagon, mi jam sen tio perdis duonon de semajno pro la diodamnita vojo!“

Kiam la apelacia instanco ŝmirita de kelkaj pluaj glasenhavoj da komiteko fine decidis, ke *don* Martin kiel puno devos pagi dudek pesojn, kaj *don* Ismael kvindek pesojn. *Don* Ismael ne povis pagi per kontanta mono, ĉar li bezonis ĝin ĉe la negocoj en la vojaĝo. Li pagis anstataŭ per mono per superflua ĉevalo, kiu, kiel *don* Ismael certigis, validis cent kaj dudek pesojn.

*Don* Rafael penis rapide vendi la ĉevalon, ĉar li preferis bonan

kontantan monon kompare al bona ĉevalo.

Estis tiu ĉevalo, kiun li, foririnte, intencis vendi, kaj kiu estis la kaŭzo, ke *don* Gabriel ne renkontis lin en ties hejmo.

**Rimarkoj**
*feria* = foiro, jarfoiro
mestizo = miksitulo el indiĝenaj kaj blankaj gepatroj, en Ĉiapaso ankaŭ uzata por diferencigi blankulojn de indiĝenoj
*multa* = punpago
r*ealo* = dudek kvin centavoj

# Ĉapitro 7

## 7/1

*Don* Gabriel vidis sian edzinon, kiu estis envolvita en longan babiladon kun la edzino de *don* Rafael. Ĉar tiu babilaĉo ne interesis lin, li promenadis sur la placo, esperante, ke li trovos iun, kun kiu li povos babili.

Viroj ekscitiĝas pri trista babilaĉo nur en tiu kazo, se temas pri babilaĉo inter inoj. Sed se viroj renkontiĝas, ili estas centfoje pli babilemaj kaj milfoje pli eltenemaj pri trista babilaĉo ol ses foiraj fiŝvendistinoj. La diferenco estas nur tiu, ke la viro opinias siajn lacigajn babilaĉadojn inteligentaj interparoladoj pri politikaj kaj ekonomiaj demandoj, dum li prijuĝas la salivumadojn de la inoj kiel senenhavan babilaĉadon. Sed rigardate sen antaŭjuĝo, vira babilaĉado dum horoj estas eĉ ne joton pli valora kaj ideoriĉa ol la klaĉado de inoj. La interesokampoj estas iom diversaj, sed la celo kaj la rezulto de la babilaĉoj estas tiel similaj kiel *Ford*- kaj *Dodge-Brother*-aŭtoj.

Dum tiu vagado *don* Gabriel fine venis en la portikon, kie troviĝas la gastejoj. Li certis, ke li renkontos tie komerciston aŭ konatan *arriero*-n, la gvidanton de pakmula trupo, kun kiu li povus babili dum la sekvaj horoj.

Je tiu tago ne estis multe da vivo en la portiko. Kelkaj indiĝenaj portistoj kaŭris apud siaj ŝarĝoj, fumis dikajn cigarojn kaj observis kiel faboj kuiriĝis en kaldroneto ĉe bivakfajro, kiu milde ardis kaj fumis sur la placo antaŭ la portiko.

Du mulportistoj flikadis portoselojn, elŝiris sekajn herbojn el la remburaĵo, solvis ilin per tiretado kaj reŝtopis ilin en la remburaĵon por moligi la selojn. La seloj aspektis nun kiel ŝvelintaj matracoj de fianĉina lito el partopaga magazeno. Se tiuj seloj tiam estis uzataj dum tago, ili reestis tiel bretformaj, rigidaj kaj ostecaj, plataj kaj ftizaj kiel matraco de tiu fianĉina lito post nuptonokto. Muloj kutimiĝis pri tiuj rapidaj ŝanĝoj de la moleco de siaj seloj, simile obeante certan bezonon kiel la junaj geedzoj sekvas certan bezonon, kiuj esperas ĉeokaze povi partopagi semajnon pli malfrue, se ili tenas la meblokomerciston en bona humoro, ĉar ili ne plendas ĉe li pro la malbona kvalito de varo.

Ĉe la fostoj kaj kolonoj de la portiko staradis, pigrumis kaj pigre gapadis kelkaj viroj, indiĝenoj kaj mestizoj, kiuj ŝajne ne sciis, kial ili fakte estas en la mondo. La loko kutimiĝis pri tiaj viroj, kiel ĉie en la vasta meksika respubliko. En tiu ĉi loko kaj en aliaj lokoj la panoramo ne estus kompleta, se mankus tiuj pigrumantaj junuloj kaj olduloj. Ie ili pasigas la noktojn, sed neniu scias kun certeco, kie. Kaj iel ili trovas ĉeokazajn tortiljojn kaj eble eĉ tortiljojn plenŝtopitajn kun fazeoloj kaj akra kapsiko, sed neniu scias, kiam kaj de kiu.

Se iu demandas ilin, kio ili estas, kaj kion ili faras, jen ili diras, ke ili estas *mozos*, servistoj, kiuj atendas vojaĝantojn por akompani ilin.

Sed, se vojaĝanto foje efektive bezonas iun *mozo*-n, ĉar la propra fariĝis malsana, ili postulas tiom altan salajron, ke la vojaĝanto povas ricevi por tio tri tre ekzercitajn kaj spertajn ĉevalservistojn kaj pakportistojn, se li serĉas ilin inter profesiaj servistoj. Sed la profesiaj pelistoj kaj akompanantaj knaboj ne pigrumas en lokoj, kie okupoj nur hazarde riceveblas. La profesiaj *mozos*, tuj kiam ili finis komision, iras de hotelo al hotelo, de *fonda* al *fonda* por trovi vojaĝantojn, al kiuj ili ofertas siajn servojn. Male la pigrumantaj junuloj atendas je tio, ke vojaĝanto nepre bezonas akompananton, por ke ili mem povu fari la prezojn.

**Rimarko**
mozo = servisto, servoknabo, servutulo, stalservutulo, portisto ks.

## 7/2

En tia kazo de bezono pri honesta kaj fidinda ĉevalservisto troviĝis *don* Ramon Velasquez, kiu balanciĝis en hamako en la portiko. Li estis elpendiginta kruron maldekstre trans la randon de la hamako, kaj la alian kruron dekstre. La manojn li estis kunmetinta post la kapo, kaj nun li gapis vitrece kun vaste malfermitaj okuloj supren al la tegmento, kvazaŭ li volus nombri la tegolojn, kiuj estas disrompitaj.

Li estis jam dum tri tagoj tie en la loko kaj ne povis vojaĝi plu, ĉar li ne havis akompanantan servobubon. Ĝis tien li venis sen servisto. Li esperis, ke li tie povos dungi indiĝenan junulon kun helpo de la sekretario. Sed li ne sukcesis, ĉar la sekretario ne ĉeestis. Li povis interkonsentiĝi pri la servoprezo kun neniu el la

pigrumantaj vagabondoj. Kaj sendepende de la salajro neniu el ili volis malproksimiĝi pli ol du tagojn de la loko kaj de sia bela pigra vivo. *Don* Ramon estus devinta pagi ne nur la du tagojn de la akompanado, sed ankaŭ la du tagojn, kiujn la servisto sola vojaĝus hejmen.

Preskaŭ li interkonsentiĝis kun unu el la pigrumantaj vaguloj rilate la salajron por kvar tagoj. Sed kiam ili ekparolis pri la detaloj, la servoknabo volis havi ĉevalon por la rajdado, kiun *Don* Ramon devus lui en la loko. Sed eĉ tio ne sufiĉis, la servoknabo postulis krome, ke kuniru dua servoknabo, kiu same estu pagenda de *don* Ramon, kaj kiu same volis havi ĉevalon; ĉar la unua servoknabo klarigis, ke li ne volas retrorajdi la du tagojn sola al la loko, ĉar sur la vojo estas indiĝenoj, kiuj volonte murdas iun, se troviĝas okazo.

Pro tiaj cirkonstancoj *don* Ramon fine rezignis pri intertraktado kun la vagabondoj. Li volis nun atendi la revenon de la sekretario, kiu eble povus havigi fidindan servoknabon al li. Se li ne povus helpi, li atendus ĝis mulokaravano irus sur la sama vojo, kiun li devos uzi.

## 7/3

Promenante en la portiko, don Gabriel aŭdis subite, kiel iu vokas al li: „h*ombre, don* Gabriel, *hijo de mi alma*, korfrato mia, kion faras tia, kia vi en tiu de Dio damnita kojotoloko?“

Estis *don* Ramon, kiu, aŭdinte la paŝojn de *don* Gabriel, turnis la kapon flanken kaj tuj ekkonis la alveninton. Li glitis el la hamako planken kaj iris renkonte al *don* Gabriel, ĉirkaŭbrakante lin laŭ meksika maniero kaj dirante:„Vin mi tute certe ne atendis ĉi tie. Ĉe Dio, kiun sur la vasta tero oni renkontu ĉi tie, kiu havas

civilizitan vizaĝon sub la ĉapelo? Ĉu cigaredon?“
„*Gracias!* Dankon!“ diris *don* Gabriel kaj eltiris alumetojn. Tiu, kiu ricevas cigaredon kiel donacon, devas liveri kiel rekompenson alumeton por ne damaĝi la alumetan monopolon de la svedoj kaj por malhelpi, ke la svedoj en la hispana Ameriko eldevigu leĝojn, ke estu punata per prizono almenaŭ dum du jaroj ĉiu, kiu eble provos bruligi sian cigaredon je jam ardetanta alia cigaredo, aŭ, kio estus eĉ pli malica, ekbruligi la cigaredon je ardanta bastoneto, kiu estas tirita el bivakfajro. Unu aferon la svedaj alumetomonopolistoj jam atingis per lerta propagando, fakte, ke neniam pli ol du viroj ekbruligas je la sama alumeto siajn cigaredojn, ĉar tria viro, kiu eventuale uzas la saman alumeton, je kiu jam du aliaj ekbruligis siajn cigaredojn, dum la resto de sia vivo estas persekutata de seninterrompa malfeliĉo. Li povas liberigi sin el tiu anatemo nur per tio, ke li ŝpinas komploton pri revolucio en latinamerika respubliko, kun la celo, ke oni enmetu por monopolafablan prezidanton monopolmalamikan.

*Don* Ramon kaj *don* Gabriel sidiĝis sur oblikvan kadukan benkon, kiu staris sur la seka argila tero de la portiko.

**Rimarkoj**
hamako = ŝnura reto aŭ tolaĵo, horizontale pendigita per siaj du ekstremaĵoj kaj formanta porteblan liton en kiu oni kuŝas, aŭ sin balancas

## 7/4

Ambaŭ *caballeros* estis malnovaj konatoj. Ili jam konis sin kiel knaboj kaj pli poste ofte ĉe sia brutkomerco kaj aliaj negocoj estis de tempo al tempo eĉ dum tagoj en la sama loko kaj en la sama gastejo kaj nenombreble ofte ili renkontiĝis dum vojaĝoj tra la ŝtato, survoje aŭ en foraj ranĉoj.

„Ĉu vi ankoraŭ nun komercas pri brutoj?“ demandis *don* Gabriel.

„Ne, jam de certa tempo ne plu“, respondis *don* Ramon. „Nun ja jam ne multe pli enspezeblas per tio. La prezoj estas aĉaj. Mi havas de certa tempo negocon multe pli bonan ĉemane. Pli enspezigan, ĝi estas pli sekura kaj oni havas malpli da perdoj. Estas alia komerco. Mi estas agento por la monterioj, ĉeokaze ankaŭ por la kafoplantejoj. Mi varbas la peonojn, la laboristojn kontrakte. Por ĉiu viro, kiun mi kondukas al *Hucutsin* kaj tie je la Sankta Festo de la *Candelaria* transdonas por kontrakto, mi ricevas de la kompanioj tridek orajn purajn pesojn. Sed, se mi kondukas la ulojn eĉ ĝis monterio, mi ricevas por ĉiu el ili kvindek pesojn. Elspezojn mi havas ja nur por mia manĝo, kiam mi vagadas en la bienoj, ranĉoj kaj sendependaj indiĝenaj vilaĝoj por aĉeti virojn. Perdojn mi havas nur, se iu formortas survoje tra la vepro, aŭ se li tiel lerte forkuras, ke ni ne plu povas kapti lin. Sed tio okazas malofte. Jen brila negoco, mi diras al vi, *don* Gabriel. Triono, ja eĉ duono de la peonoj formortas dum jaro en kelkaj el la monterioj. Jen oni devas havigi anstataŭulojn. Kaj tial mi havas eterne prosperan negocon dum la tuta jaro. Centfoje pli bonan ol la komerco kun brutoj aŭ kun porkoj aŭ ĉevaloj aŭ muloj.“

Li deskuis la cindron de sia cigaredo kaj atendis, ke *don* Gabriel diru ion pri si.

Sed *don* Gabriel revis en pensoj. Li vidis por si leviĝi oran estontecon kaj li pensis uzi tiun okazon ĉi tie por ekscii la detalojn kiamaniere deruliĝas tia negoco. Sed li evitis tuj krude rekte demandi la alian, ĉar li timis, ke *don* Ramon povus esti konkuranto kaj sendi lin al falsa spuro, se li mem demandus tro evidente. Li pripensis kiel li povus logi la sekreton de la negoca deruliĝo el *don* Ramon.

Kiam li ne respondis ion kaj daŭrigis la silentadon, *don* Ramon finfine frapis lin amikece sur genuon kaj diris: „Kaj kion faras vi do, *hombre*? Ĉu ankoraŭ nun vi komercas pri brutoj aŭ varoj, ĉu?“

„Mi havas postenon“, rediris *don* Gabriel, „sekretario en Bujvilum.“

„Malbone, amiko, malbonege, tre tre malbona negoco“, diris *don* Ramon, dum li tordis malŝate la buŝon, „en la indiĝenaj vilaĝoj oni ne povas enspezi laŭordajn pesojn. Ili havas ja nenion. Kaj se ili havas kvindekon, ili tuj aĉetas *aguardiente*, brandon. Kiel sekretario en tiaj cirkonstancoj kapablu pagi eĉ nur la kostojn?! Mi ja mem estis iam en tia marĉa truo, du jarojn. Amaso da laboro, ĉiam kun la timo, ke iu dorsen pikos per maĉeto miajn intestojn aŭ ke fusila ŝarĝo el kvincent gramoj de dishakitaj plumberoj ŝiros mian kranion for de la ŝultroj; kaj se vi ne devas ĉiam timi ion, vi estas tro bonkora kun tia fibando kaj malsatmortos kun viaj mizere malmultaj pesoj, kiujn vi kapablas honeste elpremegi el via plendinda fatrasa vendejo.“

„Vi pravas, *don* Ramon“, respondis *don* Gabriel. „Tiel estas, ĝuste tiel estas. Sed mi havas nenion pli bonan.“

„Kion vi do faras ĉi tie en *Cahancu*?“

„Mi travojaĝas“, diris *don* Gabriel. „Mi devas konduki ulon al Jovel, por verdikto. Li iun mortbatis hejme. Mi volis klarigi la aferon en la loko; sed li ne havis monon. Ignori mi ne povas la kazon. Ĝi estas tro grava. Por teni min en aŭtoritato, mi devas fari ion, alikaze mi havus ĉiun semajnon murdon je la nuko, ĝis kiam okazos, ke eĉ vojaĝantaj komercistoj ne plu estos sekuraj, kaj mi mem ne plu kuraĝos iri el la domo, je hela tago, kiel tio okazis al

la sekretario en *Bicocac*, ĝis li fine ricevis dum kelkaj semajnoj soldatohelpon. Kun soldatoj en la loko estas same, jen afero por si mem. Pli da ŝtelado kaj krome eternaj kvereladoj kun la inoj. Mi prefere evitas soldatojn, tiom longe, kiom tio eblas. Ili malbonigas la negocon kaj oni havas pli da malpaco kaj maltrankvilo ol kutime."

„Kiom aĝa estas la viro, kiun vi konduku al Jovel?" demandis *don* Ramon.

„Mi supozas, ke dudek ok jarojn."

„Ĉu forta kaj sana?"

„Kiel virbovo en la kvara jaro", diris *don* Gabriel.

„Je kiom vi volis puni enloke lin pro la murdo? Mi celas la sumon de la *multa*."

„Por kvindek pesoj mi volonte estus liberiginta lin", diris *don* Gabriel, „sed li havis eĉ ne kvin pesojn, kaj estas neniu espero, ke oni iam ricevos la restaĵon, ne sufiĉe da porkoj kaj ŝafoj kaj la maizo ne havas prezon."

„Aŭskultu, amiko", diris *don* Ramon post mallonga pripenso. „Ĉu vi raportis la kazon, kaj ĉu vi skribis, ke vi kondukos la viron al Jovel por verdikto?"

„Ne, tion mi ne faris" respondis *don* Gabriel. „La poŝtsendaĵo ne pli frue estus alveninta ol mi. Ni ne havas regulan poŝttrafikon. Kaj mi povas kunsendi leterojn nur tiam, kiam iu traveturas, aŭ, se iu el niaj homoj, kiu havas sufiĉe da menso, iras al foiro."

*Don* Ramon ree frapis genuon de lia amiko kaj diris: „Mi pensas, ke ni kune povos fari negocon. Vendu la ulon al mi por la *multa* kaj dek pliajn pesojn por la kostoj, kiujn vi jam havis. Mi sendos la viron kun trupo en monterion. Mi ne perdos ion ĉe tio. Tiujn sesdek pesojn, kiujn mi pagos al vi por la viro, mi ŝarĝos sur lian konton, same tiel, kiel la monterio ŝarĝos la varbomonon, kiun mi ricevas por ĉiu viro, sur ties konton."

**Rimarkoj**
Candelaria = *Kandelofesto, Purigo de Sankta Virgulino*
*montería* = monterio: laborkoncentrejo en la ĝangalo, kie indiĝenoj ofte sub la gvidado de eksterlandanoj dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn por povi fortransporti ilin de tie. Tiu laboro ne fareblas per maŝinoj pro la altaj kostoj.
*multa* = punmono

## 7/5

Don Gabriel diris nek jes nek ne. Tial *don* Ramon supozis, ke li eble havas konsciencriproĉojn pro la vendo de la viro. Li rapidis detrui tiujn malutilajn pensojn en *don* Gabriel, antaŭ ol ili povus fariĝi danĝeraj por li kaj damaĝi la komercon.

Li diris: „Nu, kio okazos kun la viro en Jovel? Tion mi demandas vin. Li kaptos kvin jarojn aŭ dek en punkoncentrejo. Aŭ li pasigos la tempon en prizono. La prizonon li ne transvivos pli longe ol tri monatojn. Li ne eltenos tion, ĉiutage kaj ĉiunokte sidadi inter fridaj muroj kaj post feraj kurtenoj. Se li ne vidos ĉielon super si, arbojn kaj herbojn ĉirkaŭ si, li forvelkos dum kelkaj semajnoj pro hejmsopiro. Kontraŭ tio ne estas savo. Pli bone, se oni mortpafus lin. Kaj tiun gracon oni ne cedos al li, ĉar lia murdo estas nur mortbato. Se li meritas punon, li same tiom bone povus pasigi ĝin en monterio, kie lia laboro estas pli utila ol la laboro en prizono

aŭ kien ajn li venus. En la monterio li devos streĉe labori. Tio estas ĝusta. Sed li estas eltenema kaj li kutimiĝis al dura laboro. Li estos ĉiam rekte sub ĉielo kaj li troviĝos inter siaj homoj. Inter ni dirite, *don* Gabriel, vi vere punpardonus lin, se vi translasus lin al mi."

*Don* Gabriel montris mienon tute indiferentan kaj diris: „Mi ne havas intereson pri la viro, kaj mi ne havas kaŭzon punpardoni lin aŭ ne. Kial koncernu min indiano?"

Sed tiumomente li interrompis sin, senintence. Aperis antaŭ li la bildo, kiam li renkontis Gregorion kun edzino kaj infanoj kaŭrantaj ĉe la vojo, en tiu momento, kiam tiu adiaŭis ilin. Lin mem Gregorio neniam suferigis. Li ekhavis senton de kompato. Ne tian kompaton, kian li havus al alia homo, sed kompaton tian, kian li havus al suferanta ĉevalo, kiu rigardas lin kun malĝojaj okuloj kaj kun iomete da espero en ili, ke la homo povus helpi, ĉar Dio ĝin ja ne kompatas.

Estis certe ne la mono, almenaŭ ne en tiu momento, kiun li povus ricevi, kio *don* Gabrielon decidigis akcepti la proponon de *don* Ramon. Li pripensis la aferon, kaj li konvinkiĝis, ke vere estos pli bone por Gregorio, se li sendos lin ne en la prizonon, sed en monterion. Ĉu li revenus el la prizono aŭ el punkoncentrejo, estis dubinda. La verdikto povus esti kvin jaroj, aŭ ok, aŭ eĉ dek jaroj. Dependus de tio, en kia humoro troviĝus la juĝisto, ĉu li kverelis matene kun sia edzino, ĉu la matenmanĝo ne gustis al li, ĉu unu el liaj amatinoj, kiujn li vivtenis, faris komplikaĵojn, ĉu li estis ebria en la lasta nokto, ĉu la prezentata indiĝeno plaĉas al li aŭ ĉu li naŭzas lin, ĉu li foje volas meti avertan ekzemplon, ĉu li ekvidis inter la aŭskultantoj en la procesejo lindan knabinon, en kiu li volas veki simpatian aŭ severan aŭ brutalan impreson, tute laŭ tio, kiel li esperas plej bone frapi la atenton de la ina estaĵo pri si

mem. De ĉiuj ĉi aferoj, influoj kaj cirkonstancoj dependus, ĉu la indiĝeno Gregorio estus liberigita aŭ ĉu lia puntempo estas du, kvin, dek kvar aŭ dudek jaroj aŭ ĉu oni ekzekutos lin per pafmortigo.

Akuzita indiĝeno ne scias ion pri advokato. Li ne havas monon. Kaj pro la formo, por ke oni povu nomi la ŝtaton civilizita ŝtato antaŭ la mondo, oni donas al la indiĝeno advokaton, kies tasko estas nur unufoje preni la vorton kaj diri: „Mi petas pri mildigaj cirkonstancoj por la akuzito!“ Tiam li prenas siajn paperojn kaj forlasas la ĉambron, por iri al procesdebato, je kiu li enspezas monon, ĉar li devas vivi kaj zorgi pri familio.

Eĉ se *don* Gabriel ne konsideris ĉiujn ĉi flankajn aferojn en procesdebato kontraŭ nescianta indiĝena samlandano, ĉar li ne zorgis pri tiaj detaloj, li tamen sciis, ke Gregorio en la procesejo starus antaŭ mondo, kiu por li troviĝas sur la alia flanko de ne malkovrita planedo. Male al tio al Gregorio la mondo de la monterio estis tiom proksima, kiom la mondo de lia hejma vilaĝo.

Efektive tio ne postulis longan pripensadon, por konduki *don* Gabrielon al la konvinko, ke la monterio por Gregorio laŭ la leĝo ja estas maljusteco, sed laŭ la juĝo de la homaj rilatoj, kiujn Gregorio konis kaj kapablis kompreni, tio ofertis solvon, kiun Gregorio preferus, se li havus la rajton elekti kaj povus elekti.

*Don* Gabriel ne rigardis sin hompersekutanto, tiel, kiel *don* Ramon ne sentis sin homkomercisto.

Li ordonis alvoki Gregorion.

## 7/6

„Vi ja scias, *muchacho“*, parolis *don* Gabriel al li, „kion oni faros kun vi en Jovel. Verŝajne oni mortpafigos vin.“

„Jes, tion mi scias, p*atroncito*.“

„Kaj se oni ne mortpafigos vin“, daŭrigis *don* Gabriel, „tiukaze oni metos vin en prizonon je dudek jaroj. Jen vi vidos nek la ĉielon nek la sunon kaj krome oni skurĝos vin.“

„Tion mi scias, patrono“, ripetis Gregorio.

„Jen *caballero*, Gregorio“, *don* Gabriel mansignis al *don* Ramon, „li estas preta kunpreni vin al monterio. Tie vi ĉiam estos rekte sub ĉielo, ĉiam en arbaro. Vi vidos bestojn kaj birdojn. Kaj tie vi laboros kun aliaj, kiuj estas indiĝenoj kiel vi, kiuj povos paroli kun vi kaj kun kiuj povos paroli vi. Vi laboros fervore, tiukaze neniu suferigos vin. Vi perlaboros vian punmonon kaj la kontraktmonon. Post tri jaroj vi denove estos libera kaj povos iri hejmen al via *mujer* kaj al viaj infanoj.“

„Tion mi volonte farus, *patroncito*“, diris Gregorio.

„Post tri jaroj ĉio estos forgesita en la vilaĝo. Kaj vi vivos tie kiel antaŭe, paceme kaj ĝoje.“

„Jes ja, *patroncito*.“

„Tiukaze vi do konsentas, ke vi iros en monterion, ĉu? Jen, kun tiu ĉi *caballero*, kun *don* Ramon?“ demandis *don* Gabriel.

„Jes, *patroncito*.“

„Tiukaze mi do zorgos pri tio, ke oni ne metos vin en prizonon. Kaj ni tuj ĉi tie faros la kontrakton“, diris *don* Gabriel.

**Rimarkoj**
mujer = edzino

## 7/7

La kontrakto estis pretigita. La ŝuldojn, kiujn Gregorio transprenis sur sian ĉiutagan salajron da du realoj kaj dudek kvin centavoj estis sesdek pesoj, kiujn *don* Gabriel ricevis por la translaso de la viro. Kvindek pesojn punmono kaj dek pesojn por kostoj. Krome kvindek pesoj, kiujn devos pagi la kompanio al la agento por la laboristo, sumon, kiun oni skribis sur la konton de la laboristo. Fine aldoniĝis dudek kvin pesoj por la kostoj de la stampoj, kiujn la urbestro, la prezidanto de la municipo en *Hucutsin* enkasigis por ĉiu viro, kaj per kio la kontrakto ricevis sian oficialan ofican konfirmigon. *Hucutsin* estis la plej proksima loko en la monteria regiono. Pro tiuj dudek kvin pesoj por stampokostoj la urbestro de *Hucutsin* transprenis la devon rekapti ĉiun viron, kiu forkuras de sia kontraktlaboro kaj por rekonduki lin al la kompanio. Sed la kostojn por la rekaptado kaj rekondukado la laboristo devas transpreni mem kaj notigi kiel ŝuldon en sia ŝuldokonto.

*Don* Ramon prenis sian liston, enskribis la nomon Gregorio, la lokon el kiu li devenis, la garantianton *don* Gabriel kaj la sumon, per kiu komenciĝis la konto.

Gregorio subskribis per kelkaj inkomakulaj strioj apud sian nomon. Per tio li devigis sin repagi cent tridek kvin pesojn. Ĉe sia salajro da dudek kvin centavoj ĉiutage, tio signifis laboron dum kvincent kvardek tagoj. Ĉiun ĉemizon, kiun li devis aĉeti dum sia

kontraktempo el la *tienda* de la kompanio, ĉiun tabakpakaĵeton, ĉiun bastĉapelon, ĉiun kovrilon oni notis kiel novan ŝuldon sur nova konto, tiom longe, kiom la malnova konto ne estis libera de ŝuldoj. Se la ŝuldoj de la unua konto post kvincent kvardek tagoj estis pagitaj per laboro, komenciĝis la laborado por la ŝuldoj de la nova konto, kiu pro necesaj aĉetoj, kiujn la viro faris dum la kvincent kvardek tagoj, estis pli altaj ol tiuj de la unua konto, kiuj estis skribitaj en la kontrakton. La laboristo ne rajtis forlasi la monterion, tiom longe, kiom li havis eĉ nur dek centavojn da ŝuldo ĉe la kompanio.

Tiel la indiĝeno Gregorio pro la granda bonkoreco kaj kompato de siaj inteligente superaj kaj bone katolikaj kuncivitanoj kaj kunhomoj estis konservata de la prizono, kiun aliaj de ties kristanaj kunhomoj estis konstruintaj kaj tenis pretaj por li. La espero revidi sian edzinon, siajn infanojn, sian patrinon, siajn amikojn kaj sian hejmlokon plenumiĝos, precize kalkulite, post dumil sescent tridek kvar jaroj, sub la kondiĉo, ke li aĉetos en la *tienda* de la kompanio ne pli ol li nepre bezonas, kaj se estus eĉ nur sandalrimeno.

## 7/8

La plej proksimaj ĝojigaj okazaĵoj, kiujn elgustumis *don* Ramon kaj *don* Gabriel, estis, ke *don* Ramon por sia pluvojaĝo nun havis fidindan serviston, kiu kostis nur iom por la manĝo al li kaj, ke *don* Gabriel enposte havis sesdekpesan ĉekon de kompanio, kiun li povis uzi por iu pago en ĉiu magazeno en Jovel sen dekalkulado.

La sesdek pesoj, sumo, kiun *don* Gabriel dum la du lastaj jaroj eĉ ne unufoje havis iam enposte, faris lin ambicia. En siaj plej bonaj tempoj kiel brutkomercisto li enspezis por ĉiu kapo ne tiom, kiom ĉe tiu plenumo de kompato al indiĝeno.

*Don* Ramon ne konservis sciatajn sekretojn pri negocoj kontraŭ sia malnova amiko *don* Gabriel. Li rakontis al li ĉiujn detalojn kaj trukojn, kiuj estas uzendaj, se oni volas enspezi monon. Nepre evitenda estis nur senkaŝa homrabo, kaj ankaŭ tiu nur kun la limigo, ke la rabo ne okazu tiel, ke oni povu pruvi ĝin kiel rabon. La meksika civitano estas libera kaj sendependa. Sklaveco estas severe malpermesita kaj severe punata. Neniun meksikan civitanon, ĉu kreolon, ĉu mestizon, ĉu indiĝenon oni rajtas okupi kiel sklavon aŭ vendi kiel sklavon.

Sed ŝuldodevigo ne estas sklavigo. La homo, ĉiu homo estas libera fari ŝuldojn aŭ ne fari ŝuldojn; kaj se ili estis eldevigitaj per mortminaco aŭ torturado, ili estis senvalidaj laŭ la leĝo. Se alte civilizita lando kiel Britlando ankoraŭ uzas enprizonigon pro ŝuldo kaj senpardone praktikas ĝin, se aliaj alte civilizitaj landoj permesas transskribitan prizonpunon pro ŝuldo per enprizonigo de homo, kiu rifuzis ĵuri deklaron pri senposedo, jen ne ekzistas kaŭzo nomi Meksikon necivilizita lando, se la diktaturo agnoskas ŝuldodevigojn kaj ties pagon subtenas per ŝtata potenco. Kiu faris ŝuldon, tiu devas pagi ĝin. Tio estas bona malnova roma juro, estimata de ĉiu nacio, kiu nomas sin civilizita. Kiu ne povas pagi la ŝuldon, kiun li faris, devas pagi ĝin per tio, kion li posedas. Se li posedas nenion alian krom sia laborforto, li do devas pagi la ŝuldon per sia laborforto. La proleto, kiu supozas, ke li ne povas vivi sen modernaj nuksomebloj kaj tial pagas ilin partopage, ne devas miri, se lia libera movebleco estas limigata kaj se li fariĝas sklavigita. Neniu devigas la indiĝenojn ebriigi sin, bruligi piroteknikaĵojn por sanktuloj, aĉeti al sia edzino vitroperlajn kolĉenojn kaj brilajn orelringojn.

„Kaj krome, se oni rigardas ĉion en ĉio“, diris *don* Ramon, klarigante la laŭleĝecon kaj kristanecon de sia negoco, „la monterioj kaj la kafoplantejoj devas havi laboristojn, se la

prospero de la meksika lando estu akcelata kaj la respubliko estimata, honorata kaj respektata inter la civilizitaj nacioj surtere. Nur streĉa laboro, nelacigebla kaj eltenema laboro povas antaŭenigi nian ŝatatan respublikon. Tion diris ankaŭ jam nia prezidanto *don* Porfirio en sia novjara publika proklamado al la meksika popolo.“

„Jes, tio estas prava“, konfirmis *don* Gabriel, „tion li diris centfoje. Kaj tio estas la pura kaj neŝminkita vero.“

„Ĝuste, amiko mia“, diris *don* Ramon, “brutkomerco estas multe pli kruela kaj pli senkompata. Tion mi sufiĉe ofte spertis. Jen bela ĉevalo, pia kiel ŝafo, kutimigita al bonkora traktado kaj je afablaj vortoj. Kaj jen venas la aĉetisto, kruda brutala ulo, pri kiu estas konata, ke li traktas siajn bestojn kruelege. Li palpas la ĉevalon. La besto instinkte sentas sub la palpantaj manoj de la aĉetisto la brutalecon de la viro. Ĝi tremas kaj ekŝvitas. Sed ĝi ne estas demandata, ĉu ĝi volas iri al tiu aĉetisto, ĉu ne. La vendisto bezonas monon kaj devas vendi la ĉevalon. Mi ne povas demandi la mulojn kaj ĉevalojn, ĉu ili volas iri al tiu viro, ĉu ne. Tio estus ridinda. Sed mi demandas ĉiun peonon, ĉu li volas iri en la monterion, ĉu ne. Kaj ĉu ni ne demandis Gregorion, ĉu li prefere iros en prizonon, ĉu en monterion? Ni demandis lin. Kaj kion li respondis?“

„Ke li preferas iri en monterion“, diris *don* Gabriel.

„Prave“, konfirmis *don* Ramon. „Kaj notu, kara amiko, tia estas tiu negoco.La negoco estas efektive honesta. Neniu estas devigata al io. Sed oni devas akcepti ja ankaŭ tion, ke la ŝuldoj, kiujn iu faris, estas pagendaj. La grava ĉe la afero de la negoco estas konvinki la homojn pri tio, ke ili devas pagi siajn ŝuldojn kaj, ke ili tie trovas okazon povi pagi siajn ŝuldojn.“

## 7/9

*Don* Gabriel ne komprenis malrapide. Li komprenis, ke ĉe tiu negoco estas enspezebla multe da mono, facile kaj sen risko pri perdoj. Li ne opiniis sin pli stulta ol *don* Ramon kaj li estis konvinkita, ke li povos entrepreni tiun negocon same tiel sukcese kiel *don* Ramon mem. Intelekto ne necesis. En la distrikto, kiun li konis, estis miloj de peonoj kun ŝuldoj kaj sendependaj indiĝenoj. Jam en sia loko li konis pli ol dek homojn, kiuj havis sufiĉe da ŝuldoj ĉe li, tial li estis rajtigita enkasigi tiujn ŝuldojn je ĉiu nur iel pensebla maniero, kiun la leĝo ne malpermesas eksplicite. Oferti al la homoj kontrakton por monterio por liberigi ilin de ŝuldo, ne estis neleĝe. Male, la registaro volonte vidis, ke ŝuldoj estu pagataj. Kaj la registaro eĉ multe pli atentis pri tio, ke la kompanioj, kiuj havas licencojn kaj koncesiojn kaj pagas por tio altajn sumojn, ĉiam estu bone provizitaj per laboristoj, por ke oni povu produkti kaj eksporti ion. Ju pli grandaj la eksportoj estis, des pli bone statis la financoj de la lando, kaj tiom pli alte statis la kursvaloro de ties mono kaj de ties ŝtataj monpruntedonoj en la mondomerkatoj en Nov-Jorko kaj Londono. Havigi al la monterioj kaj kafoplantejoj laboristojn kaj ĉiam havigi novajn al ili, estis tial tre patriota ago, samranga al la glorriĉa agado mizere elsangi por la honoro de la patrolando por esti certa pri la paradizo kaj ĉiuj enĉielaj ĝojoj.

Kaj *don* Gabriel kaj *don* Ramon tuj estus eltirintaj la revolveron, kaj al tiu, kiu dubas pri ilia patriotismo, krake pafintaj kuglon aŭ tuj ses kuglojn en la intestojn. La amata patrolando superu ĉion. Damaĝas al la indiĝeno neniel, se tiu iom kontribuas per sia laboro en la monterio pri tio prosperigi la agnoskon, la famon kaj la financan aĉetoforton de la patrolando, al kiu li devas danki sian vivon, sian tegmenton sur la kapo kaj sian naciecon. Ja kio estus la homo, eĉ la senscianta povra indiĝeno, se li estus sen

patrolando, sen ŝtataneco, sen la rajto nomi sin ano de la plej nobla, plej kuraĝa kaj plej fama nacio? Li estus nenio. Vermo, pulo, pediko, ŝanceliĝanta fragmito, kiun disrompas ĉiu ŝtormo. Li estus perdita en la vasta universo, polvero, tien kaj tien blovata laŭ la plaĉo de ĉiu venteto.

El tiu priplorinda ekzisto de polvero savi kaj levi indiĝenon en staton de individuo, doni al li la eblon partopreni ĉe la bonfarto de la ŝtato kaj kunlaborigi lin je la stabileco de ties financa sekureco interne de la internaciaj borsaj haloj, estis laŭdinda ago, je kiu eĉ la eklezio devas havi sian plaĉon. Ĉar ankaŭ la eklezio perdas monon, se suferas la ĝeneralaj negocoj.

Kion la indiano, plena de pedikoj, havas en sia vilaĝo? Nenion. Kaj kion li faras por la prosperigo de la honoro de l‘ ŝtato? Ankoraŭ eĉ malpli. Li pagas nek impostojn nek similan. Ne kalkulante kompreneble la altajn impostojn, kiujn li pagas por ĉiu gluto da brando, kiun li trinkas; por ĉiu cigaredo, kiun li fumas; por ĉiu peco da lanŝtofo, kiun li aĉetas. Sed tiujn impostojn oni metas nenecese, ĉar jam la komercisto devas pagi altajn impostojn, kiujn li aldonas al la prezoj.

Sed li havas la devon fari pli por la ŝtato ol nur ĝuste per la ĉirkaŭvojo de persona ĝuado transdoni impostojn al la ŝtato.

Tiun devon li plej bone povas plenumi per tio, ke li metas ĉiujn siajn fortojn ĝis la lasta elspiro en la sanktan kaj honorplenan servon de la produktada evoluo por la eksporto.

Komerci brutojn estas egoisma. Sed disponigi indiĝenon por tio, ke li fariĝu grava elemento por konkurenckapabla produktiva forto de la ŝtato, estas patriota ago. Kun la neskuebla konvinko en la koro agi patriote, oni povas esti nek maljusta nek kruela,

nek oni povas detrui familiajn ligojn, nek rabi al individuo ĉion tion, kio estas por li la esenco de lia vivocelo. Ĉiun fiagon oni povas senkulpigi antaŭ si mem kaj antaŭ la tuta mondo kaj eĉ sanktigi ĝin, se oni trovas la ĝustan formulon.

## 7/10

*Don* Ramon estis trovinta la ĝustan formulon. Pli precize dirate, li trovis ĝin en la paroladoj de la granda *don* Porfirio kaj li knedis ĝin por la propra uzo.

Ĉe sia havigado de laboristoj por la monterioj kaj kafoplantejoj li devis, se li volis fari negocojn kaj kontentigi siajn komisiistojn, praktiki ĉiajn krimojn, kiajn praktikeblis. Falsigoj de la kontoj de indiĝenoj estis la plej etaj deliktoj, kiujn li praktikis por devigi homojn en la kontrakton.

De tempo al tempo li estis donacema kaj disdonis sufiĉe da brando en loko, kie la sekretario havis la ununuran brando-vendejon. Tiel la sekretario enspezis monon kaj lia koro pro la enspezoj vaste malfermiĝis.

Se sufiĉe da brando estis enverŝita, kelkaj indiĝenoj ekkverelemis. D*on* Ramon sukcesis inciti la kverelon per artifikoj kaj ruzaĵoj. La kverelo sovaĝiĝis kaj ŝanĝiĝis en sangajn pugnobatalojn. Se sufiĉe da viroj estis envolvitaj en tiujn pugnobatalojn, ofte pliampleksigitajn per mortbatoj, tiukaze ĉiuj viroj estis arestitaj. Je la sekva mateno ricevis ĉiu kvindek aŭ okdek pesojn da punmono de la sekretario sur la nukon. *Don* Ramon pagis la punsumojn al la sekretario kaj la viroj ekhavis altan ŝuldosumon, kiu ŝarĝis ilin. La sekretario konfirmis la kontraktojn kaj *don* Ramon havis per unu atako dek kvin aŭ dudek virojn por la monterioj. Tiun, kiu ne akceptis la

kontrakton, la sekretario kulpigis, ke li faris la mortbaton. Li havis la elekton esti kondukata antaŭ juĝiston aŭ iri kun *don* Ramon en monterion. Tia homo ĉiam preferis monterion.

Ne ĉiam li sukcesis kvereligi la virojn. Aŭ ili estis pli pacemaj ol plaĉis al la agentoj, aŭ, kaj tio ofte okazis, la edzinoj kaj patrinoj de la viroj provis kun ĉiuj nur iel eblaj tentoj kaj influoj la virojn, se tiuj ebriis, kunpreni en la hejmajn kabanojn. Se la viroj jam estis en siaj hejmoj, estis facile por la inoj, movi ilin per karesoj aŭ energia kaptado tiel, ke ili sternu sin por eldormi sian ebriecon. Se ili jam dormis, ili kutime ne plu leviĝis ĝis kiam ili estis sobraj.

Sed de tempo al tempo la agentoj bonŝancis instigi la virojn, se ili iom ebriis, akcepti monon kiel antaŭpagon por la kontrakto. Se ili akceptis la antaŭpagon kaj nomis sian garantiulon, jen la kontrakto estis valida kaj la agentoj havis la viron en la maŝo.

Ĉe aliaj okazoj la agentoj uzis la ĉeeston de vagantaj komercistoj por forlogi la homojn aĉeti varojn, por kiuj ili bezonis monon. La agentoj estis pli ol nur pretaj antaŭpagi al la homoj ĉiun sumon por la kontrakto.

Kun la helpo de koruptaj kaj monavidaj sekretarioj kaj de aliaj oficistoj ofte estis encirkligita kaj kaptita tuta trupo de indiĝenoj, kiu vojaĝis tra la loko por ien iri al foirplaco aŭ al festo de sanktulo. Oni tiukaze kulpigis ilin, ke ili havas infektan malsanon aŭ, ke oni ne vakcinis ilin, aŭ, ke ili venis el loko, kiu troviĝas pro brutepidemio aŭ pro variolo en kvaranteno. La homoj ne sciis, kio okazis kaj kiel okazis. Sed, se ili lastfine vekiĝis el tiu tumulto, ili troviĝis kiel peonoj en monterio, el kiu ili ne povis fuĝi.
Okazis, ke komercisto aŭ meksika ranĉisto ie sur la vojo estis murdita kaj prirabita. Aŭ la ago efektive okazis aŭ oni lanĉis

onidiron, ke la ago okazis kvankam neniu povis diri kun certo, kiu laŭdire estas la murdito, do la laŭdire murdita komercisto, kiel li nomiĝas, kie li loĝas kaj kiu serĉas lin.

Sed sur la vojoj uzataj de sendependaj indiĝenoj, kuŝis aĵoj, kiuj laŭdire apartenis al la prirabito. La indiĝenoj prenis la aĵojn, ĉar ili supozis, ke ili estas aĵoj sen posedanto. En la sekva loko oni kaptis kaj ekzamenis ilin. La aĵoj estis trovitaj ĉe unuopuloj. Kaj la tutan trupon inklude de la inoj kaj infanoj oni akuzis pri rabmurdo kaj por ilin puni, oni transdonis ilin al agento, kiu kondukis la trupon en monterion.

Iu tratranĉis la telefonkablojn kaj ŝtelis kelkajn metrojn de la drato. La vilaĝo de sendependaj indiĝenoj, kiu estis plej proksima al la loko, kie oni damaĝis la telefonkablojn, estis enfermita de soldatoj. Oni kaptis ĉiujn virojn, tri aŭ kvar el ili oni pendumis je arbobranĉo sur la placo en la loko kaj du dekojn da sanaj kaj fortaj viroj oni sendis punkaŭze en monterion. Kiu tratranĉis la telefonkablojn, ĉu eble estis pro bonaj kaŭzoj eĉ agento aŭ unu el ties kunlaborantoj, tion oni ekzamenis neniam. Oni kulpigis indiĝenojn kaj kun tia kulpigo la esplorprocedo estis finita.

Por uzeblaj laboristoj oni pagis sufiĉe altajn proviziojn, tiel ke verŝajne indis la penon delikti ĉiun krimon por varbi laboristojn por la kompanioj.

Kompreneble okazis, ke la agentoj agis tro sovaĝe, tiel, ke eĉ meksikaj bienuloj plendis al la registaro pri la brutaleco de la agentoj. Ĉeokaze estis humaneco, kiu instigis la bienulojn atentigi la registaron pri la misstatoj. Sed pli precize rigardate, la bienuloj kaj la aliaj posedantoj de grandaj latifundioj ne tre interesiĝis pri la sorto de sendependaj indiĝenoj. La sendependaj indiĝenoj kaj ties lokoj estis kontraŭaj al la interesoj de la

latifundiistoj. Kelkaj familioj de la peonoj, kiuj apartenis kiel senmovebla posedo al la bieno, kaj kiuj formis la laboristan kernon de la bieno kaj tiel havis por la bieno monvaloron kiel la brutaroj, povus ekhavi la ideon forlasi la bienon, tuj kiam ili estis sen ŝuldoj, kaj aliĝi al sendependa indiĝena komunumo. Tiel la bienuloj perdus siajn laboristojn.

Tial estis avantaĝe por la bonstato de la bienuloj, se la sendependaj indiĝenoj ne trovis tro da ĝojo je sia sendependeco. La peonoj de bieno estis varbeblaj de la agentoj nur kun permeso de la bienulo. Pro tiuj kaŭzoj la peonoj de bieno estis pli protektataj kaj pli sekuraj kontraŭ varboagentoj ol la sendependaj indiĝenoj.

Sed jen alia certa intereso, kiun la latifundistoj havis por ĉeokaze plendi al la registaro kontraŭ nerajtigita kaj perforta varbado de indiĝenoj por la monterioj.

Ĉar tiukaze, se oni traktis la sendependajn indiĝenojn tro brutale kaj tro maljuste fare de senkompataj agentoj kaj monavidaj suboficistoj, jen la indiĝenoj forlasis siajn vilaĝojn, kunrotiĝis, kaŝis sin en ĝangalo kaj vepro kaj formis rabistobandojn, kiuj malsekurigis ĉiujn vojojn kaj eĉ ne plu respektis la posedon je brutoj aŭ domoj de la bienoj. La damaĝo, kiu ekestis, antaŭ ol la registaro povis sendi soldatojn, estis tiom granda, ke la bienuloj havis sufiĉe da kaŭzoj ne permesi al la varbaj agentoj sen kontraŭo tro nelimigitajn agojn. Se lastfine anonciĝis tro da plendoj kaj se okazis varboj de laboristoj, kiuj havis la karakteron de krimoj, kaj se okazis eĉ, ke iel aperis sciigoj en usonaj gazetoj, kiuj raportis pri barbaraj laborkondiĉoj en Meksiko, kun eksplicitaj ekzemploj, jen oni arestis kelkajn agentojn kaj kondukis ilin al tribunalo.

La defendo de la agentoj limiĝis ĉiam nur je unu punkto: patriotismo. Ĉion, kion ili faris, ne okazis pro negocaj kialoj, multe malpli pro monavido, sed pro pura nefalsita patriotismo.

Tio facile pruveblis. *Don* Porfirio, la prezidanto de la meksika respubliko kontraŭ multe da mono donis licencojn al fremdaj kompanioj por eluzi la riĉon de la lando je tre deziratoj altvaloraj lignospecoj. Ju pli oni eluzis tiujn naturriĉaĵojn de la lando des pli alta kaj des pli bona fariĝis la kredito de la lando sur la internacia merkato. Tial estis alte patriota ago alirebligi tiujn riĉaĵojn al la cetera mondo. Sed la kompanioj ne povis ekspluati tiujn riĉojn, se ili ne havis manojn por la laboro. Sen laboristoj ankaŭ la plej bonaj licencoj estis senvaloraj kaj la riĉo de la lando putriĝus en foraj ĝangaloj kaj praarbaroj. Havigi laboristojn tiel fariĝis patriota ago. Se la laboristoj ne venis libervole, oni devis havigi ilin perforte por prosperigi la bonfarton de la lando. Tio estis ilia devo kiel ŝtatcivitanoj, tiel, kiel estas la devo de ŝtatcivitanoj marŝi en la muĝantajn faŭkojn de sovaĝiĝintaj kanonoj, se ordonas tion la registaro de la ŝtato. La individuo ne havas propran rajton je sia vivo. Multe malpli je sia laborforto, se la ŝtato alie juĝas pri tio ol la individuo.

Tian logikon neniu juĝisto povus nei. La juĝisto estis dungito de la ŝtato kaj li dankis sian ekziston kiel juĝisto, sian altan socian rangon kaj sian estontecan karieron al la lando kaj al ties bonfarto.

La procesdebato, al kiu neniam perfortita indiĝeno estis invitita kiel atestanto, ĉar indiĝeno kiel atestanto estis nefidinda kaj ĉar li havis nur la rajton kiel akuzito aperi en proceso antaŭ la juĝisto. La proceso finiĝis tiel, ke la juĝisto dankis al la akuzita agento en la nomo de la lando por la streĉa malafabla laboro, kiun tiuj agentoj devas fari por prosperigi la bonfarton kaj la riĉon de la

lando. La indiĝeno krome havis ja nenion, kion li povus oferti al la ŝtato. Do estis nun lia de Dio ordonita devo, ja memkomprenebla devo, servi al la grando kaj la famo de la lando per tio, ke li laboras en monterio.

Kompreneble oni ĉiam diris al la agentoj, ke ili ne estu tro ekstremaj rilate al siaj varboj de laboristoj, kaj ke ili respektu la personajn rajtojn de la indiĝeno en deca formo, ĉar ankaŭ la indiĝeno estas homo kaj baptita katoliko kiel ĉiuj aliaj.

La agentoj promesis fari tion kaj ili promesis tion kun la ĵura aserto, ke ili neniam praktikis maljustecon, sed ke ĉio okazas laŭjuste kaj laŭleĝe, tiel, kiel oni povas ĉiutempe konvinkiĝi el la libroj, el la kontoj kaj el transkalkuladoj de la kontoj.

„Vi certe komprenas“, finis *don* Ramon sian klarigon pri la negoco, „ĝi deruliĝas tute glate, kiel lubrikite. Mi havas preskaŭ la tutan agoliberecon kaj mi havas bonegajn rilatojn kun la guberniestro kaj kun ĉiuj aliaj aŭtoritatoj, kiuj povus fari al mi nedigesteblan salatkaĉon. Ankaŭ la politikaj ĉefoj, la urbestroj de la lokoj kaj la policaj ĉefoj volas vivi. Kaj tion mi forgesas neniam. Kiun valoron havu tia pedikohava indiano! Ĉu tiu vivas aŭ ne vivas, tio ne faras kapdolorojn al la mondo. Sed, ke li laboras, tio estas jam pli grava. Ni okupiĝas ja ankaŭ pri bovoj kaj ĉevaloj nur, se ili laboras; se ili ne uzeblas nek por laboro nek por vendo, tiam ilia ekzisto por ni valoras eĉ ne cendon.“

## 7/11

*Don* Gabriel pensis, ke li povus fariĝi memstara en tiu negoco kaj tuj dekomence stari sur la propraj piedoj. Sed la longaj klarigoj de *don* Ramon kondukis lin al la konkludo, ke eble estos pli bone, unue partopreni kiel negoca kompaniano. Povas esti hokoj kaj

kaptiloj en la afero, kiujn oni devas detale scii, por fari tiajn negocojn sen forskrapita haŭto.

Li estis sufiĉe lerta por ne lasi gliti el la manoj la okazon, kiu ofertiĝis tiom neatendite.

„Mi pensis pri tio, *don* Ramon“, li diris, „mi bone pripensadis tion, kiam vi klarigis la negocon al mi, ĉu ne estus pli avantaĝe por vi, se vi akceptus negocan kompanianon? Por tuj veni al la kerno de la afero sen antaŭe longi babili: „Kiel vi pensas pri tio, se ni estontece farus la negocon kune?“

*Don* Ramon estis tute perpleksa pri la proprono. Sed kiel bona komercisto, kiu li estis, li tuj konsentis, ke tiel ofertiĝus grandaj avantaĝoj, se li akceptus *don* Gabrielon en la negoco. *Don* Gabriel sciis regionojn, kiuj estis preskaŭ tute nekonataj al *don* Ramon. Li estis la amiko de multnombraj aliaj sekretarioj de indiĝenaj lokoj, li havis bonajn rilatojn kun la *jefe politico* kaj li konis ĉiujn bienulojn de la distriktoj, kie troviĝis bonaj foirplacoj por la aĉetado de indiĝenaj laborfortoj. Pere de *don* Gabriel kiel kompanianon *don* Ramon havus la eblon konsiderinde pliampleksigi la negocon.

Ankoraŭ alia afero aldoniĝis, kiu *don* Ramon instigis rigardi la akcepton de kompaniano per tre afablaj okuloj.

Tio estis la sekva: *don* Ramon kondukis la varbitajn indiĝenojn nur ĝis *Hucutsi*n, kie li transdonis ilin je la tago de la sanktula festo de la *Candeleria* al la inspektistoj de la monterioj, post kiam la kontraktoj estis konfirmitaj de la urbestro de *Hucutsin*. Li transprenis la respondecon por la alveno de la varbitaj viroj nur ĝis tiu ĉi loko kaj ĝis la tago de la *Candeleria*-festo. Por tio li ricevis por ĉiu paro da sanaj manoj tridek pesojn. Sed, se li

kondukus la varbitojn ĝis la monterio, de kiu li ricevis la komisiojn, li ricevus por ĉiu viro kvindek pesojn. Kelkaj kompanioj pagus eĉ sesdek pesojn al li. La laboro de la transporto de la viroj de *Hucutsin* ĝis la monterioj estis simpla afero, se oni komparis tion kun la vagado en la lando por varbi homojn por la kontrakto.

Sed tiu laboro de la transporto en la ĝangalo estis danĝera kaj laciga. Li nur unufoje transprenis tian transporton. Kiel helpantojn li uzis ladinojn, meksikanojn. Kaj tiuj meksikaj pelistoj estis multekostaj. Ili estis nefidindaj rilate la malobeemon de indiĝenoj en la marŝo. Ili ricevis nur sian fiksan salajron kaj ne tro zorgis pri tio, se homoj fuĝis kaj forkuris. Ili ne lasis tiri sin en batalon pri la predo. Male kun kompaniano tio estus tute alia afero. La kompaniano havus intereson pri la negoco, kaj li tial estus fidinda kaj tage kaj nokte sur posteno, por ke ne perdiĝu viro.

Ĉiu unuopa viro estis multekosta. La agento pagis la ŝuldojn por ili, eble eĉ donis antaŭpagon al tiu kaj tiu por pli dolĉigi la kontrakton. Al tio aldoniĝis la kontraktaj kostoj ĉe la instancoj en *Hucutsin*. Ĉeokaze kontanta sumo de cent kvindek pesoj estis fiksita por varbita viro. La rekaptado de viro daŭras semajnojn. Sed povis okazi ankaŭ, ke la viro estis trovita neniam. Aŭ li perdiĝis dum sia fuĝo en la ĝangalo aŭ li atingis vilaĝon aŭ regionon, kie li povis bone kaŝi sin, ĉar li estis inter amikoj de sia popolo kaj evitis ĉiun meksikanon, kiu venis en tiun regionon.

Du viroj en la negoco povas pli bone kaj pli sukcese labori ol sola viro. Dum la varbado ĉiu irus sian propran vojon en la regionojn, kiujn li scias plej bone. Pro tio eblus en pli mallonga tempo varbi pli da homoj. Ankaŭ pli facile aranĝeblus varbi indiĝenojn, ne nur por la monterioj, sed ankaŭ por la kafoplantejoj kaj tiel

entrepreni la negocon en pli granda amplekso por praktiki ĝin dum la tuta jaro. La monterioj laboras sen interrompo, dume la kafoplantejoj bezonas grandajn kvantojn de laboristoj nur en certaj tempoj en ĉiu jaro. Precipe dum la rikoltoj. Tiuj homoj estis dungataj nur por du aŭ tri monatoj; ili migradis post la rikolto aŭ post la elsarkado de la fiherboj de la plantejoj en siajn vilaĝojn. Ili estis pli facile varbeblaj. Kostis ofte preskaŭ neniun laboron mil indiĝenojn ricevi por la kafoplantejoj, ĉar multaj centoj da laboristoj, kiuj laboris en la pasinta rikolto en la kafodistriktoj, tuj libervole ofertis sin, kiam venis konata agento en vilaĝon kaj lerte komprenis trakti ilin malavare per brando kaj devigi ilin al antaŭpaĝoj.

## 7/12

Don Ramon rapide pripensis ĉion. Sed kiom ajn rapide li decidiĝis akcepti *don* Gabrielon kiel kompanianon, li tamen ne forgesis avantaĝojn kaj malavantaĝon pese taksi reciproke unu kontraŭ la alian.

La malavantaĝo estis, ke *don* Gabriel en la distriktoj, kiujn li rigardis kiel siajn proprajn, povus evolui kiel akra konkuranto, por fari tiam en iu bela tago la tutan negocon sola. Por lasi pagi al si tiun malavantaĝon tuj dekomence tiel bone, ke pli postaj perdoj pro la konkurenco de *don* Gabriel estos ekvilibritaj, *don* Ramon metis siajn kondiĉojn.

„Tio vere ne estus aĉa, *don* Gabriel“, li diris pripenseme. „Ni estas bonaj amikoj kaj certe sufiĉe glate povos labori kune. Sed pripensu, vi fakte estas nur la metia lernanto. Mi devas enkonduki vin en la negocon. Mi starigis la negocon kun multe da peno. Mia kadavra korpo kaptis kelkajn pafojn kaj maĉetobatojn kiel daŭran rememoron pri mia lernotempo. Mi povas doni al vi

centojn da bonaj konsiloj kaj sciigi al vi bonegajn artifikojn, tiel, ke restos ŝparitaj al vi kelkaj pafoj kaj pikoj. Mi neniam pensis pri tio akcepti kompanianon; ĉar mi povas fari ĉion tion tute bone sola. Jen la pruvo: Mi entreprenas la ŝakradon jam dum pluraj jaroj kun sukceso tiom bona, ke mi ŝparis por malbonaj tempoj beletan monteton da arĝentaj moneraj sikloj.“

„Tion mi akceptas volonte, *don* Ramon“, diris *don* Gabriel. Li diris tion kun agnoska tono en sia voĉo, post kiu embuskis la mallaŭta timo, ke *don* Ramon eble ne favore inklinos al la kompanianeco.

*Don* Ramon en tiu negoco fariĝis bona konanto de homoj. Li lernis surprizi la bienulojn, kiuj ne volis transdoni peonojn, en malfortaj kaj malmulte gardataj flankoj, simple per tio, ke li vagadis sur bieno du aŭ tri tagojn ĝis li tute elesploris la bienulon kaj ĝis kiam li scis sufiĉe bone la rilatojn en kiuj vivis la bienulo kun siaj peonoj, antaŭ ol li transiris al la negoco.

Tre atenteme kaj rapide komprenante ĉiujn aferojn, kiuj koncernas liajn negocojn, li fulmrapide perceptis la necertan timon, kiu embuskis en la tono de *don* Gabriel. Kaj li uzis ĝin tuj rigore je sia avantaĝo. Li altigis la provizion, kiun li volis proponi je du pesoj kaj kvindek centavoj je sia favoro.

„Kompreneble“, li diris nun, „se vi vere volas partopreni tiun ĉi negocon kaj volas labori kun mi, nu, en ordo, pro pura elkora sento mi ne facile povas rifuzi ion al bona amiko kia estas vi, *don* Gabriel. En ordo, *muy bien*, ni faru la aferon kune. Akceptite, sed vi ja komprenas, ke per tio, ke mi dispartigas la negocon kun vi, mi bezonas certan rekompencon.“

„Kompreneble, kompreneble“, fervore interrompis lin *don*

Gabriel, „tion mi konsentas.Mi ja ne estas stultulo. Tamen, dirate konfide, *amigo mio*, tiom da mono mi ne havas. En la plej bona kazo mi povus havigi eble ducent, kaj se la vento blovas tre forta, eble ducent kaj kvindek pesojn. Sed tio estas la maksimuma sumo.“

Ankaŭ tiu konfeso falis ĉe *don* Ramon sur fruktoportan grundon. Li eĉ ne pensis pri tio, ke *don* Gabriel pagu al li sumon por la eniro en la negocon. Sed li uzis tiun oferton. Nur ne lasu kuŝi ion sur la vojo, se ĝi saltas fakte per si mem en vian poŝon kaj se ĝi aspektas kiel mono.

„Nu, do, mia propono, kiun mi volas fari al vi, estas tiu: Vi pagos al mi cent kvindek pesojn kontante por la eniro en la negocon. Por ĉiu viro, kiun vi havigos, vi donu al mi kiel rekompencon sep pesojn kaj kvindek centavojn. Tiukaze restos por vi tamen ankoraŭ por ĉiu viro dudek du pesoj kaj kvindek. Kaj se ni mem kondukos la ulojn en monterion, restos al vi kvardek du pesoj kaj kvindek centavoj ĝis kvindek du pesoj kaj kvindek. Tio validas por la unua jaro de nia kunlaboro. Por la dua jaro vi donos tiam al mi nur kvin pesojn kiel rekompencon por ĉiu viro. Kaj post la forpaso de la dua jaro ni laboros por la sama provizio, tio estas, ke ĉiu ricevos la plenan provizion por ĉiu viro, kiun ĉiu por si mem havigis. Kaj se ni ie devos labori kune, ĉar ankaŭ tio okazos, ricevos ĉiu duonon de la gajno, egale kiom ajn ĉiu unuope havigis. Ĉu konsentite, *don* Gabriel?“

„Konsentite“ diris *don* Gabriel. „Mian promesvorton al via promesvorto.“

*„Palabra de honor de caballero*. Mian promesvorton al via promesvorto“, rediris *don* Ramon. “Jen ni ja interkonsentiĝis. Ekde kiam vi povos kunlabori, *amigo*?“

„Komence de la sekva monato“, diris *don* Gabriel. „Mi devos nur plenumi ankoraŭ tion kaj tion en Jovel. Tiam mi reiros, rajdos tuj je la sekva tago supren al la distrikta loko kaj transdonos mian oficon al la politika ĉefo. Mi ĉirkaŭrigardos en Jovel pro viro, kiun mi povos rekomendi al la ĉefo. Aŭ mia frato transprenos la oficon, ĝis la ĉefo trovos iun.“

## 7/13

„Interkonsentite, mi konsentas pri ĉio“, diris *don* Ramon. „La cent kvindek pesojn vi povos doni al mi per du partopagoj. Kvindek pesojn vi tuj donu al mi. Per tio nia kontrakto ekvalidos laŭjure. La mankantajn cent pesojn vi donu al mi komence de la sekva monato. Ni renkontiĝos ĉi tie en *Cahancu*. Tie ni skizos nian planon. Mi inicos vin en la misterojn. Vi starigos vian ĉefkomandejon en Chiilum, de kie vi rastos radioforme en ĉiuj direktoj ĉiujn bienojn kaj sendependajn vilaĝojn. Mi starigos mian komandejon en *Oshchuc*. Tuj kiam ni kunhavos cent aŭ cent kaj dudek virojn, ni ekmarŝu. Eble jam kun okdek viroj. Tio estos pli sekura. Tro multe estus pli danĝere. Mi ja donos al vi la ĝustajn „narkotaĵojn“, por ke tio fareblu plej bone. Pri tio vi ne devos zorgi. Nur ne lasu enŝteliĝi sentimentalaĵojn en la negocon. Tion mi konsilas al vi dekomence. Sobre kaj klare. Nur pura komerco. Vi ja sufiĉe longe estis brutkomercisto por scii kiel tio deruliĝas. Se vi volus aŭskulti ĉiun kurbigitan bovidon, kiu blekas pro la bovino, ĉar ĝi ne scias bleki ion alian krome, jen ne estus bovida viando sur la merkato. La merkato estas tio, pri kio temas, *amigo mio*. La homoj volas manĝi bovidan viandon kaj ili volas pendigi siajn vestaĉojn en mahagonŝrankojn. Se la monterioj ne ricevas laboristojn, tiukaze ne plu estos bele poluritaj mahagonfonografoj kaj neniuj mahagonaj frizotabloj por la inaĉoj. Se oni pro ĉiu blekanta bovido viŝus la okulojn al si, kion tiukaze meti

en la kuirpotojn? Se ni ne farus la negocon kun la monterioj, jen aliaj farus ĝin. La mondo volas esti priservata. Ĝi pagas por tio. Ni ne estas respondecaj por tiu mondo. Ĉiam pensu pri tio, tiukaze vi havos dudek virojn post unu semajno. Ili ja ĉiam gedormas, ĉiun jaron unu infano. Kien do la amasojn? Pli bone, se ni prenos ilin kaj faros kelkajn pesojn el tio ol ke la pesto forportos ilin aŭ, ke ili mortbatos sin reciproke. Mi pensas, ke mi ne devas diri plian al vi. La instancojn vi ĉiam havos je via flanko. Tiuj bezonas impostojn kaj ankoraŭ pli ili bezonas riĉajn kromenspezojn. Tion ili ja ne pagas el siaj poŝoj. Por kio la indiano estas en la mondo? Ili faras nur problemojn al ni. Ili estas naskitaj por labori, bone, ni ebligu al ili la plezuron, por ke ili sciu, por kio ili taŭgas. Ankaŭ al ni ne falas io el la ĉielo en la poŝojn. Vi ja spertos, kiom streĉe ni devos perlabori niajn pesojn“.

*Don* Gabriel atenteme aŭskultis por ne preteratenti la trukon. Duonon li lernis jam kiel sekretario. La dua duono pli facile lerneblos.

Li akceptis tion, kaj li vidis la grandan brilan estontecon, kiu estas antaŭ li.

Volonte li transdonis la postulitajn kvindek pesojn al *don* Ramon, kiel la unuan kontribuon en la komunan grandan negocon.

Tiel kostis la akirita Gregorio nun plu nur dek pesojn al *don* Ramon. Tiel malmultekoste li malofte ricevis sanan, fortan kaj indiĝenojn kutimiĝintajn pri laboro.

Li foriris por aĉeti du buntajn kandelojn ĉe komercistino sur la transa flanko de la placo. Li portis la kandelojn en la preĝejon, metis ilin sur la etan tablon antaŭ la bildo de Sankta Virgulino, ekbruligis ilin, atentis pri tio, ke ili bone brulas, surĝenuiĝis,

krucosignis sin, preĝadis pie vicon de *„Ora pro nobis“*, denove krucosignis sin, kliniĝis trifoje antaŭ la bildo, ekstaris, forlasis la preĝejon kaj konsciis, ke li praktikis pian agon.

Gregorio intertempe estis lavinta la ĉevalon de sia nova mastro kaj ĵetis grandan kvanton da sekaj maizaj folioj antaŭ ĝin.

# Ĉapitro 8

## 8/1

*Don* Gabriel postlasis sian edzinon en Jovel, kie ŝi luis domon por tie starigi la novan hejmon. Ŝi ĝojis supermezure pri tio, ke ŝia edzo forlasis sian oficon kiel sekretario kaj, ke ŝi ne devis reiri en la indiĝenan lokon, kie ŝi supozis devi frue morti pro granda soleco. En la urbo ŝi estis denove inter homoj de sia speco. Ŝi laŭdis sian edzon, ke li tiel lerte atentis pri sia ekonomia avantaĝo, kiam ofertiĝis okazo al li partopreni en honesta kaj kristana negoco, ŝi ekkonis, ke ŝia ekonomia estonteco nun fine estas certigita. Tial ŝi aĉetis multajn meblojn, vestaĵojn kaj dommastrumilojn. Oni pruntedonis ĉion volonte al ŝi, kiam la komercistoj aŭdis en kiun sekuran kaj profitigan negocon *don* Gabriel glitis. Pro rekomendo de *don* Ramon, *don* Gabriel tuj ricevis abundan krediton de la prezentantoj de la monterioj, kiuj havis sian ĉefkomandejon en Tabasko. Tiel volonte, kiel la agentoj donis kreditojn al laborfortaj indiĝenoj, tiel volonte la kompanioj kaj ties prezentantoj donis altajn kreditojn al la agentoj. Akceptitaj kreditoj estis pli grandaj garantioj ol skribitaj kontraktoj. Kreditojn oni devis pagi, ne nur indiĝenoj, sed ankaŭ agentoj. Ju pli alta estis la donita kredito, kiun agento havis, des pli forte li penis plenumi ĝeneralajn kaj specialajn dezirojn de la kompanioj.

*Don* Gabriel estis nun membro en la ĉeno, kiu etendiĝis de la profundoj de la ĝangaloj ĝis la vestoĉambroj de aktorinoj kaj ĝis la konferenca halo de konsilantaro de ministroj. La ĉeno moviĝis, kaj ĉiu ĉenero devis kunmoviĝi, ĉu ĝi volis, ĉu ne.

## 8/2

Du semajnojn *don* Gabriel vojaĝis. Dum tiu tempo li estis postlasinta sian fraton *don* Mateo kiel vicsekretarion en la loko.

*Don* Mateo tiujn du semajnojn rigore eluzis. Li volis montri, kiel oni devas regi. Laŭ lia opinio lia frato havis eĉ ne ideon pri tio kiel oni regu.

En la karcero estis ses viroj, kiujn *don* Mateo pro ties ebrieco arestis, post kiam li vendis al ili sufiĉe da brando, kiam ili jam ebriis. Li punis ĉiun viron per kvin pesoj pro ĝenado de la publika paco. Li atendis nun, ke la arestitoj aŭ iliaj parencoj alportu la monon, por ke ili povu forlasi la prizonon.

Li ne lasis sidi la homojn pigraj en la karcero. Li sendis ilin en la vepron, kie ili devis haki lignon, kiun li intencis vendi, tuj kiam troviĝos okazo por tio. La manĝon por la viroj devis alporti ties edzinoj aŭ ties patrinoj.

La kvanto de la kaptitoj, kiujn li arestis dum tiuj ĉi du semajnoj, kreskis fine ĝis dek kvin personoj, sed la ceteraj povis pagi la punmonon. Tio estis kvardek kvin pesoj en la portmonujon de *don* Mateo. Li sciis regi.

## 8/3

Okazis ankoraŭ alia afero.

Kiam *don* Gabriel alvenis, li trovis sian fraton ĉirkaŭiri kun bandaĝita brako.

„He, kie vi tion kaptis?“ demandis lin *don* Gabriel.

„Nu, kion vi pensas, *Hermanito*, kie mi kaptis tion, ĉu?“ li diris. „Unu el viaj ŝafetoj volis mortbati min per maĉeto. Sed mi ankoraŭ sufiĉe rapide povis kapti la baton per mia brako. Jen vi povas vidi, kian murdistobandon vi ĉi tie bredis al vi. Se mi estus tiom longe sekretario ĉi tie kiom vi, mi estus kreinta ordon. Tiukaze io tia ne povus okazi. Tion mi diras al vi, frateto.“

„Kaj kial la ulo volis mortbati vin?“ demandis *don* Gabriel.

„Pro nenio. Pro tute nenio. Impertinenta kaj ribelema estas tiu pedikohava murdistobando ĉi tie. Jen la tubero en la afero.“

*Don* Gabriel sciis, ke la homoj ne celas mortbati iun, se ili ne havas gravan kaŭzon. Sed li ne demandis plu. Li konis sian fraton sufiĉe por scii, ke li ne ricevus precizan respondon.

## 8/4

Kiam la tribestro eksciis, ke *don* Gabriel revenis, li alvenis por saluti lin. Kaj kiam ambaŭ estis solaj, *don* Gabriel eksciis la rakonton.

Juna indiĝena knabino, kies gepatroj mortis, kaj kiu nun vivis

kun siaj geonkloj, venis en la vendejon por aĉeti alumetojn. Ŝi plaĉis al *don* Mateo, kaj li ordonis al la indiĝena tribestro de la loko, ke tiu knabino venu ĉiutage en la municipon por kuiri por li, ĉar li, *don* Mateo, laŭaserte ne povis digesti la manĝon, kiun kuiris la kuiristino, kiu laboris por *don* Gabriel kaj ties edzino endome.

La knabino estis nur du tagojn en la domo, kiam *don* Mateo jam provis seksperforte ataki ŝin, provinte kapti komplezemojn de la knabino dum horoj kun tre flatemaj vortoj kaj kun kelkaj silkorubandoj trovitaj en la vendejo.

Ĉe la seksperforta atako li ne tute atingis la celon, nur proksimume duone. La knabino kuris kriante el la domo, kun disŝirita jupo.

Indiĝenaj knabinoj estas tiom silentemaj, ke ili neniam parolas pri tia okazaĵo al iu. Eble nur al ŝia patrino. Sed ĉiu homo en la loko kaj precipe la plej proksimaj familianoj kaj parencoj sciis kaj komprenis tuj, kio okazis, ankaŭ sen tio, ke la knabino devus paroli pri sia honto.

La knabino havis junan amikon, al kiu ŝi estis promesita jam dum du jaroj. La junulo laboris streĉe por kunkolekti la monon por donacoj al la onklo de la knabino kaj por la nupto.

Je la tago, kiam okazis la seksperforta atako, la junulo estis en la vepro por kapti serpentojn, kies eltanitaj haŭtoj estas bone pagataj.

Je vespero, en tenebro*, don* Mateo estis irinta antaŭ la pordon. Jen saltis el la nokto du viroj al li, kiuj, hakante per maĉetoj, provis trafi lin. Ĉar li lasis malfermita la pordon, li rapide povis

fuĝi en la domon. Kaj tio savis lian vivon. Sed li kaptis du sukajn batojn surbraken.

Kiuj estis la du atakintoj, povis malkaŝi nek li nek *don* Gabriel. Kaj la junulo kaj la onklo estis en la domo de la kaciko, kaj ĝuste en tiu momento, kiam *don* Mateo estis vundita. Tio estis tre ruza de ambaŭ. Ĉar la fianĉo kaj la onklo kun certeco estus eksuspektataj, ke ili atakis la oficiston, kiu estis *don* Mateo tiutempe. Tial ili aperis ĉe la kaciko pro amikeca vizito. La atakon entreprenis membroj de la etna grupo aŭ de la parencaro aŭ amikoj, kiuj ne suspekteblis. La etnaj grupoj kaj parencaroj reciproke bone konas sin. Sed estas komplike, se ne eĉ maleble por homoj ne apartenantaj al la indiĝenoj de la loko, eltrovi kiu apartenas al kiu etna grupo, kaj kiuj junuloj kaj viroj estas fakte sangaj amikoj.

**Rimarko**
*cacique* = kaciko, indiĝena vilaĝestro, tribestro

## 8/5

„Mi ne supozis“, diris *don* Gabriel al sia frato, „ke vi povus esti tiel mallerta. Vi ja devus scii sufiĉe bone la homojn kaj ties manieron por eviti tiajn stultaĵojn. Tuŝi la virgulinecon de knabino ĉi tie estas ĉiam malica afero. Indiĝeno respektas tion, ĉar li scias, ke tio alikaze kostus la vivon. Tre ĝoju, ke vi ankoraŭ tiel bone elturniĝis. Mi pensas entute, ke nun estas tempo, ke vi skuu la polvon de la piedoj. Vi ne plu estas sekura ĉi tie, ne en la loko, ne sur la vojoj. Nur ĝuste ankoraŭ en la municipo.“

*Don* Mateo sidiĝis sur la tablon, svingadis la gambojn kaj diris kun oblikva buŝo: „Tio ankoraŭ mankis al mi, ke vi ĉi tie elĵetos min. Kia bona frato vi estas al mi! Sed egale. Mi povas diri al vi,

ke mi jam estas preskaŭ sur la vojo. Antaŭhieraŭ venis ĉi tien *don* Belisario, la siria komercisto. Li havis bonan sciigon por mi. La polica ĉefo, kun kiu mi ŝanĝis pafojn en *Balún-Canán*, estis transloĝigata al *Huixtla*, ĉar lia kompadro, kiun li havas tie, fariĝis urbestro. *Don* Belisario diris ankaŭ al mi, ke la ĉefo pardonas al mi la interpafadon. Li jam delonge ree bone surpiedas. Postmorgaŭ mi foriĝos kaj rajdos malsupren al *Balún-Canán*. Jen ja nun certe iu posteno fariĝos libera por mi. Eble mi nun mem estos la polica ĉefo. Ni ja fajlos la feron ĝis kiam ĝi konvenos! Nur ne zorgu pri tio!“

„Tiel mi ja ne opiniis tion pri la elĵeto“, diris trankvile *don* Gabriel. „Vi scias sufiĉe bone, ke mi ne lasas droni mian fraton, se ĝi estas en bezono. Kion mi volis diri, estas nur tio, ke estos pli bone por vi, se vi foriros. Mi aŭdis hodiaŭ sufiĉe pri vi. Vi estas ĉi tie tute ne plu dezirata. Ĉiuj, sen iu escepto, estas sur via spuro. Mi ne scias, kiel vi atingis tion dum nur du semajnoj. Mi ne volas scii. La monon, kiun vi dum mia mallĉeesto ĉi tie elpremis, vi ne devos redoni, prenu ĝin por la vojaĝo.“

*Don* Mateo laŭte elridis: „Ja, ĉu vi eble pensis, ke mi donos la monon al vi? Se vi tion pensis, vi estas azeno, frateto. La monon mi perlaboris pene kaj streĉe. Se vi tion same tiel farus, kiel mi montris tion al vi, dum la unuaj du semajnoj, jen vi povus aĉeti al vi post du jaroj la plej belan bienon. Sed tiom stulta, kiom vi estas naskita, vi ankoraŭ estas nun. Por vi ne estas espero. Tion mi opinias ne malice. Mi diras tion al vi nur, por ke vi fine foje sciu tion.“

*Don* Gabriel ne diris al sia frato ion pri tio, ke li nun fariĝis laborista agento kaj tial havas postenon, al kiu saltus *don* Mateo kiel virkapro enfermita tri monatojn, kiam ĝi ekvidas la unuan kaprinon en libero. Li ja nun intencis diri tion al li, sed ĉar la

interparolado turnis sin al alia flanko, *don* Gabriel pensis tion pli prudenta diri nenion. Tio povus gvidi *don* Mateon al ideo, kiu ne estus favora al la nova negoco. Li ne volis nenecese helpi kreskigi maloportunan konkuranton.

## 8/6

*Don* Mateo je la sekva mateno ne povis forvojaĝi. Li ne havis serviston, kiu akompu lin. Ĉiuj viroj, kiujn *don* Gabriel vizitis en la loko, trovis iun akcepteblan elturniĝon, kial ili ne povos kuniri, ĉar ili aŭ devos labori en sia *milpa*, do en sia kampo aŭ, ĉar ili havas laman piedon aŭ ĉar la edzino estas malsana aŭ ĉar ili ion ajn alian ne povus neglekti.

*Don* Gabriel komprenis, ke neniu volas akompani la fraton. Li promesis duonon de peso kiel tagsalajron por la vojaĝo tien kaj reen. Sed eĉ tio forlogis neniun akompani *don* Mateon kiel servisto.

Sed posttagmeze venis en la lokon alia araba komercisto, kiu vojaĝis al *Achlumal*. Vojaĝi de *Achlumal* ĝis *Balún-Canán* daŭras surĉevale nur du tagojn, kaj survoje estas multaj ranĉoj, bienoj, kortegoj kaj eĉ kelkaj loketoj. Sed la vojo estas soleca ĝis *Achlumal*.

Tial *don* Mateo decidis vojaĝi kun tiu komercisto, *don* Elias, ĝis *Achlumal* kaj de tie sola plu, sub la kondiĉo, ke li ne ricevos serviston en *Achlumal*.

Kio nun okazis sur la vojo al *Achlumal*, eksciis *don* Gabriel nur kvar jarojn poste, kiam li ĉeokaze renkontiĝis kun tiu komercisto en *Yalanchen*. *Don* Gabriel dum tiuj kvar jaroj vivis kun la supozo, ke lia frato ĝustatempe alvenis en *Balún-Canán*, en bona

stato. Ke lia frato sciigus sian alvenon letere aŭ telefone, tion *don* Gabriel ja tute ne atendis. Krome li mem povis foriri kvar semajnojn poste el tiu loko kaj de tiam li vagadis tiom ofte kiel agento, ke facile eblis, ke letero de lia frato, se li efektive estus skribinta ĝin al li, ne atingis la celon.

## 8/7

*Don* Mateo ekrajdis kun *don* Elias tre frue matene.

Kvankam la vojo ĝis *Hucutsin* estis tre senhoma, okazis sur tiu vojo nenio. Ambaŭ vojaĝantoj, kun du pakmuloj de la komercisto, alvenis je la tria tago en la frua posttagmezo en *Hucutsin*-on.

La komercisto faris ĉi tie kelkajn negocojn kaj enkasigis monon, kion iuj ŝuldis al li en la loko, ĉar li iam vendis ion al ili. Tial ambaŭ ĉi tie restadis plenan tagon.

Je la sekva tago ili rajdis plu, sur la vojo al *Achlumal*. La vojo estis senhoma. Ĉe la vojo troviĝis kelkaj grandaj bienoj, kiuj estis tiom grandaj, ke oni devis rajdi de unu mastra domo ĝis alia mastra domo proksimume kvar horojn. Kelkaj pli malgrandaj bienoj, kies posedantoj estis indiĝenoj aŭ mestizoj, troviĝis malproksime de la vojo. Trapasinte la riveron *Jatate* kaj rajdante sur malvastaj padoj tra la vepro, la vojaĝantoj rimarkis, ke jen maldekstre de ili kaj jen dekstre rompiĝas branĉoj kvazaŭ tie rampadus io.

Unue ili pensis, ke tiu io estas bovinoj, kiuj vagadas en la vepro, por detiri certajn foliojn de certaj arboj kaj arbustoj, kiujn ili preferis al la drataj herboj de la ebenaĵo. Sed baldaŭ ili eksciis, ke tio, kio vagadas tie, ne povas esti bovinoj aŭ antilopoj.

Ili ekkonvinkiĝis pri tio, ke oni persekutas ilin. *Don* Elias ektimis. Li pensis, ke homoj el *Hucutsin* sekvas lin por forpreni la monon, kiun li tie enkasigis. Li volis reiri. Sed *don* Mateo diris, ke tio ne havas sencon, ĉar en tiu kazo, se oni celas lian monon oni povas ataki ilin same sur retromarŝo, kiel en tiu kazo, se ili rajdas plu tiel kiel antaŭe. Ne estis alia eblo krom rajdi plu.

Ili rajdis unu apud la alia por interparoli survoje. Ambaŭ pakmuloj, kiuj sufiĉe ofte iris la vojon kaj bone sciis ĝin, trotante marŝis antaŭe. Kaj la du rajdistoj sekvis ilin.

*Don* Mateo parolis ŝajne trankvile plu, sed li rigardis atenteme la vepron sur ambaŭ flankoj kun la espero, ke li foje fine ekvidos tiujn, kiuj tie embuskas ilin.

Li ĉagreniĝis nun, ke li iris kun la komercisto. Li estis konvinkita, ke la banditoj celis nur la monon de la komercisto, sed ke ili tuj, kiam ili estus trovintaj ĝustan lokon por la atako, ne murdus nur la komerciston, sed ankaŭ lin, por forigi atestantojn. Laŭ lia opinio sendube estus estinte pli bone por li rajdi sola. La pakmuloj iris nur paŝante, pro sia ŝarĝo. Tial li ankaŭ ne povus galopi bone por rapide sturmi el tiuj kavaj vojoj, kiuj estis plej danĝeraj, se iu baras tie la vojon al ili.

„Jen“, li vokis subite, interrompante la interparoladon, „jen mi vidis iun el ili. Estas indiĝeno kun ŝrotfusilo.“

*Don* Elias volis enflustri kuraĝon al si. Li diris kun raŭka voĉo: „Tiukaze ne gravas. Tio estas indiĝenoj de la bieno ĉi tie, ili vage ĉasas. Verŝajne ili sekvas la spuron de antilopo.“

*Don* Mateo eltiris sian revolveron, prenis la bridilon per la maldekstra mano kaj tenis la revolveron pafprete en la dekstra.

Kiam ili jam rajdis proksimume cent paŝojn plu, *don* Mateo rigardis rapide dekstren kaj vokis: „Ekstaru, *cabron,* filo de putino! Elvenu de tie aŭ mi ekpafos!“

La movado en la densa folio- kaj branĉokirliĝado de la vepro finiĝis en la sama momento.

*Don* Mateo pafis rapide trifoje sinsekve en la torditan verdon de la vepro, kiu moviĝis.

„Mi pensas, ke mi ekkonis ulon el ili“, li diris ne laŭte.„Li estas unu el la junaj viroj en Bujvilum. Mi rekonis lin je la ĉapelo. Damnite, tiu filo de hundo, mi ne povis vidi lian vizaĝon! Eble mi trafis lin.“

Li deseliĝis kaj iris renkonte al la loko, kien li pafis. Li ŝovis la branĉojn flanken, sed vidis nenion krom tio, ke tie efektive iu staras; ĉar de la arbustaĵo ĵus estis derompitaj branĉoj, antaŭ tiom mallonga tempo, ke ili eĉ moviĝis ankoraŭ.

Antaŭ ol li denove surseliĝis, li firmtiris la selorimenojn, elpuŝis la tri vakajn kartoĉojn de la revolvero kaj ŝarĝis tri novajn.

Dum li ankoraŭ okupiĝis pri la revolvero, li vidis je la maldekstra flanko en la vepro denove movon kaj li vokis laŭte: „Ĝuste, *Don* Elias, jen viroj de Bujvilum, mi konas ilin ambaŭ.“

Li tuj pafis kvarfoje en tiu direkto, poste li ekiris por rigardi, ĉu li trafis iun.

Li malrapidiĝis dum tio, ĉar li pli profunde enpenetris en la vepron, ĉiam kun la revolvero je la mano.

*Don* Elias intertempe rajdis plu, ĉar li devis sekvi siajn pakmulojn, por ke ili eble eĉ ne eskapu kaj perdiĝos ie kaj tiam defrotos la pakaĵojn kaj forĵetos ilin, kaj li tial perdus kaj la varojn kaj la mulojn. Li estis certa, ke *don* Mateo postsekvos lin; ĉar li ja sciis la vojon kaj kutimiĝis pri la vojaĝado en la vepro.

Kiam *don* Elias posttagmeze atingis bienon, li haltis por atendi.

Fariĝis pli malfrue kaj lastfine nokto.

*Don* Elias deŝarĝis siajn mulojn kaj restadis dum la nokto en la bieno, ĉiam esperante, ke *don* Mateo ankoraŭ venos. La bienulo diris: „Nur ne afliktiĝu pri *don* Mateo, *don* Elias. Tiu ne pereos. Kio okazis, mi povas diri al vi, pro la pafado lia ĉevalo sovaĝiĝis kaj fuĝis. Verŝajne ĝi retrogalopis ĝis Bujvilum. Kompreneble *don* Mateo serĉas ĝin. Li volas perdi nek sian ĉevalon nek sian selon. Tio estas klara. Li tranoktos tie en malgranda ranĉo, li ja ne plu estas infano.“

„Sed jen ja la *muchachos*, la indiĝenoj“, *don* Elias kontraŭdiris.

„Fantomoj“ diris la bienulo, denove verŝante komitekon en la glasetojn. „La *muchachos* neniun suferigas. Ili ĉiuj estas bonuloj. Mi vivas ja ĉi tie kvindek jarojn. En paco. Mi rajdas sole tra la vepro, mi ne scias kiom malproksimen, kaj mi ne scias, kien ajn.“

„Sed *Don* Mateo ja ankoraŭ vokis al mi, ke li konas la virojn. Ke ili venis el Bujvilum“, diris *don* Elias.

La bienulo ridis eĉ pli forte: „Nur pro tio vi ja jam devas ekkoni, *Don* Elias, ke tio ne estas ĝusta.Vi ja ne pensas tute serioze, ke de tie ses junaj viroj forkuras tri aŭ kvar tagojn de sia vilaĝo por sekvi *don* Mateon. Tion ili ne farus. Se ili efektive persekutus lin,

tiukaze ili embuskus ĉe la vojo, marŝhoron ekstere de sia vilaĝo. Ili evitas ĉiun superfluan marŝon.“

Sed *don* Elias ne trankviliĝis pro tio. Li restis ankoraŭ la tutan sekvan tagon sur la bieno kaj la bienulo sendis tri peonojn sur la vojon por kontrole rigardigi ĝin, ĉu ili trovos spuron de *don* Mateo.

La peonoj vespere revenis.

Ili diris, ke ili trovis pro la spuroj de la ĉevaloj la lokon, kie deseliĝis *don* Mateo; ĉar apud la multaj spuroj de la staranta ĉevalo, ili vidis ankaŭ la spurojn de la botoj de *don* Mateo. Ankaŭ la vepron ili traserĉis tiuloke; sed ili rimarkis nenion krom tio, ke kelkaj indiĝenoj kun sandaloj sur la piedoj stamfadis tie. Fine ili ankoraŭ tre bone observis, ke la spuroj de la ĉevalo retrokondukis al *Hucutsin*.

„Tiukaze neniu zorgo pri tio necesas“, diris la bienulo. „Tio estas viroj, kiuj tie ĉasadis en la vepro. Estas tiel, kiel mi diris al vi, la ĉevalo pro la pafoj eskapis kaj *don* Mateo persekutis ĝin. Povos eĉ okazi al li, ke la ĉevalo retrogalopos ĝis Bujvilum, kie ĝi estis dum la lastaj semajnoj sur paŝtejo. Kaj se *don* Mateo volas regajni sian ĉevalon kun la selo, ne restos alia eblo al li ol lui en *Hucutsin* ĉevalon kaj retrorajdi ĝis Bujvilum. Estas pridubinde, ĉu li denove uzos tiun ĉi vojon. Se li volas vojaĝi de Bujvilum ĝis *Balún-Canán*, li havos ankoraŭ du aliajn vojajn eblojn, ne nur tiun ĉi vojon. Tial vi povus atendi lin dum longa tempo ĉi tie, se vi volus atendi lin. Ĉu vi ankoraŭ akceptas plian glaseton da komiteko, *Don* Elias?“

Ĉar ĉio tio estis sufiĉe komprenebla al *don* Elias, li ne plu afliktiĝis pri la pluforesto de *don* Mateo. Tiaj okazaĵoj kiel ĉi tiu,

ke ĉevalo forkuras kaj dum tagvojaĝoj retrogalopas al sia paŝtejo aŭ eĉ erare retroviĝas sur fremda paŝtejo, kie ĝi renkontas simpatiajn kunulojn. Kaj la rajdisto estas devigita retroiri sur la vojo, sen siaj akompanantoj, kiuj antaŭrajdas sur ĉevaloj, ĉar ili supozas, ke li sekvos ilin, efektive tio tiom ofte okazas, ke oni ne povas kulpigi *don* Eliason, ke li tute trankviliĝis pro la parolado de la bienulo. Kiam li fine alvenis en *Balún-Canán*-on, atendis lin multnombraj negocoj kaj zorgoj, tiel, ke li forgesis tute pensi plu pri la ebla sorto de *don* Mateo. Ĉion ĉi li rememoris denove, kiam li rekontis kvar jarojn poste *don* Gabrielon, kiu diris al li, ke li ne scias, kie estas lia frato.

## 8/8

*Don* Mateo nenie denove aperis, kaj neniam plu iu aŭdis ion pri lia sorto kaj li mem. Ankaŭ lian ĉevalon oni neniam trovis nek en Bujvilum nek sur alia paŝtejo. Se ĝi ie estus trovita kun la selo sur la dorso, la trovinto eble estus raportinta pri tio al najbaro. Sed la ĉevalo eble denukigis la selon, post kiam la zonorimeno estis trafrotita. Krome ankaŭ eblas, ke la ĉevalo pretiriris solan malgrandan ranĉon. La ranĉisto akceptis la beston kaj atendis kelkajn semajnojn. Li fine liberigis la beston kaj ĝi serĉis ie paŝtejon, dum la ranĉisto konservis la selon kaj la bridaĵon plu. Kiam neniu demandis pro ĝi, li kutimiĝis pri la uzado de la selo kaj fine forgesis tute, ke ĝi povus aparteni al iu alia. Ĉar li estis tre malproksima de iu urbo, li havis ĉiam sufiĉe da senkulpigoj prisilenti la trovaĵon; ĉar li ne estis devigita entrepreni longan vojaĝon al la plej proksima instanco por raporti pri la trovo. Ankaŭ la brulmarko de la besto ŝanĝeblas kun granda lerteco. Kaj tio, kion Dio sendas al pia kristano tiel afable kiel bonvenigatan donon en la domon, oni ne malestimu. Ĉar tio estus peko.

Aŭskultinte kvar jarojn poste pri la sorto de sia frato, *don* Gabriel

ne plu funebris pri li. Pasis tro da tempo por verŝi ankoraŭ larmojn pro tio. Li ankaŭ ne penis rasti la lokon en la vepro, kie *don* Mateo laste estis vidata, por povi entombigi sian fraton laŭ kristana maniero. Li sciis, ke tio estus tute vana post tiom longa tempo serĉi sukcese la kadavron. Se li estas enterigita, kio tre certe supozeblas, por ke ne hundoj, kiuj ĉasas kun sia mastro, povu ekflari la spuron aŭ vulturoj perfidu la lokon, super tiu terpeco estis kreskinta sufiĉe da arbustoj, por ke restu eĉ ne eta espero trovi la mortulon.

Eble eĉ vojaĝi al Bujvilum kaj tie enketi, kiuj viroj je tiu tago ne estis en la loko, kiuj do suspektindus pri tio, ke ili persekutis *don* Mateon, estus eĉ pli desperiga ol serĉi la kadavron. Ke la viroj sekvis *don* Mateon dum tiom longa distanco por eviti murdi lin en la sama distrikto, pruvis ja sufiĉe, ke ili agis tre lerte kaj tre pripenseme por plenumi sian ekzekucian punverdikton. Eĉ se ili hazarde estus ekviditaj de ranĉisto sur tiu vojo, kie okazis la atako, ili estus sekuraj kontraŭ ĉiu malkovro, ĉar ili tiom malproksime de sia hejmloko estis tute nekonataj. Krome, kiun tio helpus, se oni malkovrus la virojn post tiom multe da tempo? *Don* Mateo ne revekiĝus pro tio, ĉu la viroj estus mortpafitaj ĉu ne.

Tial ankaŭ *don* Gabriel facile trankviliĝis pri la perdo de sia frato kaj honoris lian memoron per tio, ke li lasis legi por la savo de la animo de l‘ malaperinto meson por dek ok pesoj en la katedralo de Jovel. Tiel *don* Gabriel abunde plenumis sian devon al sia frato.

## 8/9

Kiam *don* Mateo je tiu mateno estis forrajdinta de Bujvilum, *don* Gabriel iris al la prizono, malfermis ĝin kaj liberigis la ulojn, kiujn

*don* Mateo tie retenis kiel arestitojn. Li demandis ilin, kial la frato enprizonigis ilin.

Ĉiu diris la saman, ke li estis iom ebria, sed ne tre, kaj ke li mortbatis neniun en la loko kaj vundis neniun per maĉeto.

Kiam *don* Gabriel jam tre zorgeme konvinkiĝis pri tio, ke neniu el la arestitoj estus kapabla pagi eĉ nur peson da punmono, ĉar ili havis malfekundajn agrojn kaj grandajn familiojn, li okupis ilin en la domo kun la kunpakado de la malmultaj havaĵoj, kiujn li kaj lia edzino kunportis tien, kiam li komencis labori en la ofico. Tiam li ordonis, ke ili kiel puno por sia delikto, kaj por ke ili ne devu pagi punmonon, surpaku la aĵojn kaj portu ilin al Jovel.

Tio kostus konsiderindan sumeton al *don* Gabriel, se li devus transporti la aĵojn sur luprenitaj muloj dum kvin aŭ ses tagoj, kiujn daŭras tiaj transportoj. Tiel la arestitaj indiĝenoj multe pli ebligis profiton ol se ĉiu el ili pagus kvin pesojn da *multa*.

Li laŭdis sin por tiu negoco tre rajtigite.

Poste li ordigis sian impostan finkalkuladon. Li faris tion tiel bonege, ke por la registaro elvenis nur favora donaceto. Krom tio ankoraŭ necesis rekompenco por la *jefe politico*. Ties enspezoj fontis grandparte el tio, ke la sekretario kaj la oficistoj kiujn li nomumis, tiel prikalkulis impostojn kaj aliajn enspezojn, ke ĉiam elvenis konsiderinda procentaĵo por li kaj la sekretario. Tio estas ja la kaŭzo, kial li nomumas siajn amikojn kaj parencojn kiel oficistojn, kiam li mem ekhavas honoratan postenon.

La politikan ĉefon *don* Gabriel devis varmteni kiel nekuiritan ovon. Tial li ensorĉis la finkalkulojn kun la registaraj impostoficejoj tiel lerte, ke la *jefe politico* enspezis multe pli ol la

registaro. Li translasis glatigi la aferon kun la oficejoj de la registaro al la *jefe politico*. Ĉar nenio estus postkontrolata, ĉar tio farus nur superfluan laboron, kaj ĉar oni havigus al si ĉiuflanke nur malamikojn.

*Don* Gabriel kalkuladis favore al la *jefe politico* konsiderindan sumon por inspektaj vojaĝoj, kiujn la ĉefo laŭskribe ofte faris al Bujvilum. Efektive li estis dum la ofica tempo de *don* Gabriel nur unufoje en la loko, ĉar li timis la manĝon kaj la ratojn en la etaj ranĉoj, kie li devis tranokti. Li vojaĝis tiel, ke li tranoktis ĉiam nur en la grandaj riĉaj bienoj, kaj se la okazo estis precipe bona, li restadis eĉ kelkajn tagojn en la grandsinjora domo de bienulo kaj raportis tamen, ke li entreprenis kvar tagajn vojaĝojn kaj alvenis poste je la kvina tago tiun bienon. Kion li intencis raporti rilate al la regionoj, kiujn li laŭsaserte vizitis, li lasis rakonti al si de bienuloj aŭ de brutkomercistoj, kiujn li trovis sur la vojoj. Kiam la *jefe politico* ricevis la mirinde belan finkalkuladon de *don* Gabriel, li trovis ĝin tiel bone aranĝita laŭ sia plaĉo, ke *don* Gabriel rajtis krei vastajn limojn de la regiono por siaj varbadoj de indiĝenoj, antaŭ ol li devos timi, ke la *jefe politico* enmiksiĝos por ekparoli pri leĝoj kaj la konstitucio.

Li ja ne parolus pri leĝoj kaj la konstitucio kun la intenco, ke estu protektataj la konstituciaj rajtoj de la indiĝenoj, kiuj estis plenrajtaj ŝtatcivitanoj kiel li mem, sed li ĵetus la kaptoŝnurojn de la leĝoj nur kun la intenco fari komplikaĵojn al la varboagentoj, por ke ili havu la okazon liberigi sin de tiuj malfacilaĵoj pere de kelkaj monsumetoj. Se agentoj de laboristoj tiom bone perlaboras monon, ke ili povas aĉeti dum malmultaj jaroj grandajn bienojn kaj vivas sur ili kiel eŭropaj dukoj, kial tiukaze ankaŭ la *jefe politico* kaj aliaj oficistoj ne kunenspezu iom? Ili devis ja plenumi la streĉigan komplikan kaj nedankatan taskon cementi la fundamentojn de ordigita kaj sukcesa negoco, tiun de

la ŝtato, kaj konservi ĝin kontraŭ skuado.

## 8/10

Se oni estas justa, oni ne povas diri pri *don* Gabriel, ke li eble estis neglektema. Li estis fervora kaj diligenta viro, pri kiu la ŝtato kaj la eklezio povas fieri. Ĝis tiam mankis nur ĉiam la ĝustaj okazoj, por konstruadi je fundamentoj. Se oni ne havas vendejon kaj neniujn varojn, jen helpas malmulte, ke oni estas bona komercisto. Certa bazo devas ekzisti, por ke oni povu komenci.

Tuj kiam li jam finis sian raporton, kaj kiam la finkalkulado pri la impostoj ŝajne tiom pravis, ke por ĉiu kontroloficisto, kiom ajn inteligenta li estus, estus komplike eltrovi, kie troviĝas la tubero en la afero favore al la raportinto, li tuj komencis vivigi la futurriĉan merkaton malfermiĝintan al li, kaj kun varoj kaj kun klientoj. Estas la eco de granda komercisto, kapti kaj eluzi la bonŝancojn, tuj kiam ili ofertiĝas. Studi ilin oni povas pli malfrue, se oni jam havas la monon en la kaso. Detale esplori, ĉu okazis eraroj, maljustaj agoj aŭ brutalaj aferoj ĉe la komerco, kaj eble eĉ penti ilin, estas ĉiam pli bone tiutempe, kiam la ŝafoj de la negoco estas jam tonditaj. Tiutempe aperanta honto aŭ ronĝanta pento ne plu kostos monon. Honto kaj pento lasas bridi sin kaj endormigi per dek kandeloj, kiujn oni bruligas antaŭ la bildo de Sankta Virgulino. Kaj ĉar ja pro naturo ĉiuj homoj estas malfortaj, se temas pri la karno, tial la afero kun la *señor cura*, la bona viro, kiu zorgas pri la animoj, facile aranĝeblas. La sinjoro pastro diras jam en la ĝusta tempo, kiom kostas la lavado de la animo. Ne estas peko, kiu ne pardoneblas, se oni penas iri al tiu, kiu pro unktado intimiĝis kun la ĉielaj potencoj kaj kiu precize scias, kion Dio en ĉiu speciala kazo pensas kaj faras.

## 8/11

*Don* Gabriel ordonis voki la tribestron en la municipon. Li plenigis glaseton kaj tiam ankoraŭ pluan.

„Jes ja, mi nun foriras de ĉi tie, *don* Narciso“, diris *don* Gabriel.

„Tio estas tre bedaŭrinda, *don* Gabriel“, diris la kaciko. „Ni bone kunlaboris.“

„Ĝuste, ĝuste“, respondis *don* Gabriel, „ne ĉiuj sekretarioj estas tiel bonaj viroj kiel mi, kaj ne ĉiuj havas tian bonan kaj bonintencan koron por la kompatindaj indiĝenoj kiel mi. Trinku ankoraŭ plian, *don* Narciso.“

„*Gracias*“, diris la tribestro hispanlingve.

„Bele kaj bone kaj bone kaj bele“ daŭrigis *don* Gabriel sian paroladon. „Sed kio fariĝas nun el la mono, kiun ĉi tie en la loko tiom da homoj plu ŝuldas al mi? Tion mi volus scii.“

Pripenseme respondis la tribestro: „Tio malfacile direblas, *don* Gabriel.“

„Vi konsentos kun mi, *don* Narciso, ke mi ne povas perdi tiom da mono. Ŝuldo estas ŝuldo. Pri la multnombraj punmonoj, kiujn oni ŝuldas al mi, mi ja tute ne volas paroli, aŭ tamen. Mi ja volas paroli ankaŭ pri tio. Mi volas montri nun al vi, *jefe*, kian bonan koron mi havas kaj kiel pasie mi kunsentas kun la povraj nesciantaj indiĝenoj. Mi donacos ĉiujn punmonojn al la homoj.“

„Tio la virojn tre ĝojigos“, diris post tio la tribestro.

„Tio estas tre nobla ago de vi, *don* Gabriel. Tio ĉiujn vilaĝanojn amikigos al vi poreterne.“

Ĝuste tiun amikecon bezonis *don* Gabriel. Ĝi donis al li la antaŭtakton por la melodio, kiun li deziris ludi.

„Sed la ceteraj ŝuldoj estas kontanta mono, sonanta pura mono el mia monujo. Tion mi ne povas fordonaci.“

„Tion vi certe ne povas, *don* Gabriel“, konfirmis la tribestro al li.

„Vi ja konas ĉiujn virojn ĉi tie, kiuj havas ŝuldojn je mi, *don* Narciso.“

*Don* Gabriel eltiris sian kajereton kaj legis la nomojn kaj la ŝuldosumojn por ĉiu nomo.

Atinginte la finon de la listo, li diris: „Kiu el ili povos pagi la ŝuldojn al mi? Neniu. Ankaŭ neniu el la garantiuloj povos pagi. Ĉe kelkaj estas kvar aŭ kvin rikoltoj. Mi faros nun bonan kaj justan proponon, *don* Narciso. Vi elserĉos al mi ses fortajn junajn virojn. Amikojn aŭ filojn aŭ nevojn aŭ aliajn parencojn de la ŝuldantoj kaj garantiuloj. Tiuj ses junaj viroj kolektiĝos je si la tutajn ŝuldojn. La *muchachos* povas prikalkuli tion kun siaj familioj. Ni prenos tiajn ulojn, kiuj volonte volas geedziĝi, kaj kiuj ne kunhavas la monon por povi fari al la patro de la fianĉino la necesajn nuptodonacojn kaj por povi pagi la geedziĝon. Mi havas certan amikon, honestan kaj bonan homon, tiu *caballero* havas koron por la kompatindaj indiĝenoj, lia koro estas kiel pura brilanta stelaro en la ĉielo. Nur ankoraŭ multe pli bonkora. Tiu *caballero* bezonas fervorajn virojn, kiu scias bone labori.“

„Ja eble ne por la monterioj, ĉu?“ diris la tribestro maltrankvile.

„Tute ne, *don* Narciso“, diris rifuzante *don* Gabriel, kvazaŭ oni volis ofendi lin. „Ne, por la monterioj la homoj ne estus je dispono. Mia amiko, ĝuste tiu *caballero*, pri kiu mi parolis, bezonas laboristojn por bieno. Komprenu, *don* Narciso, la *caballero* aĉetis bienon de la ŝtato. Malkare. Sed la bieno estas nova. Ĝi estas nun nur ĝangalo. Tial li povis aĉeti ĝin tiom malkare. El la ĝangalo oni nun devas senarbigi malgrandan areon por la bieno. La bienisto tie volas planti kafon aŭ kakaajn arbojn kaj kompreneble ankaŭ maizon.“

„Do, kafovalon, kafoplantejon“, diris *don* Narciso, malŝarĝite elspirante.

„Ĝuste, ĝuste tiel estas. Vi bone divenis tion, *don* Narciso.“

„Jes, se la junaj viroj iru al kafoplantejo“, diris la tribestro, „tiukaze estas io alia. Tiukaze ne estos tiom malfacile ricevi la virojn. Tion mi povas rekomendi al la viroj.“

„Tial mi tion ja kun vi volis priparoli, *don* Narciso“, diris *don* Gabriel. „Vi kiel *jefe* havas ĉi tie la voĉon ĉe la familioj. Se vi ordonas tion, tiukaze la viroj ekiros. Vi devas konsenti, ke tio estas la plej bona, mi volas diri, la ununura elirvojo por la loko, por ke mi ricevu mian monon. La junaj viroj transprenos la ŝuldojn kaj la kostojn por la kontrakto kompreneble krome, tion vi ja scias. Ili forlaboros la ŝuldojn sur la nova bieno kaj ili tute bone povos perlabori iom da mono. Se ili tiam revenos kaj intencos geedziĝi, ili havos ankoraŭ sufiĉe da mono por aĉeti ŝafojn kaj kaprinojn. La junaj viroj ricevos kvardek centavojn ĉiutage. Se ili fervore laboros, eĉ kvindek centavojn. Pensu foje, duonon de peso ĉiun tagon. Tio estas en unu jaro cent kaj okdek belaj kaj puraj duraj pesoj.“

„Multe da mono por junaj viroj, kiuj volas edziĝi. Tion mi devas diri“, respondis la tribestro.

„Tio estas vera monto de mono, opiniias mi, *don* Narciso. Trinku ankoraŭfoje *copita*-n. Kaj nun rakontu tion al la homoj. Vi scias la nomojn de tiuj, kiuj ŝuldas sumon al mi, kaj kiom da mono. Kaj vi povas elkalkuli tion trankvile kun la viroj, kiom da ŝuldoj ĉiu el la junaj viroj volas transpreni. Post jaro, aŭ ni eble diru post jaro kaj ses monatoj la viroj ĉiuj povos esti denove ĉi tie kaj tiam ni festos en unu semajno tuj du nuptojn, kaj neniu havos ŝuldojn kaj ĉiu viro en la vilaĝo ĉi tie povos vendi sian maizon kaj siajn porkojn kaj sian lanon al kiu ajn li volas kaj je kia ajn prezo li ŝatas vendi ilin. Kaj tion mi volas diri aldone, ke la viroj, kiuj volas vendi siajn porkojn kaj sian lanon kaj kion ajn ili krome havas, jam povas vendi libere, kiam la viroj ĉiuj ĵus estos alvenintaj en la novan bienon, ĉar la ŝuldoj tiam ja estos transprenitaj.“

„Tio estas ĝusta“, diris la tribestro. „Mi nun ekiros kaj interkonsiliĝos kun la viroj kaj informos pri tio, kion vi proponis.“ „Bone, *don* Narciso“, respondis *don* Gabriel.

Kiam la tribestro atingis jam la pordon, diris *don* Gabriel: „Aŭskultu, *don* Narciso, ni ĉi tie ĉiam estis bonaj amikoj, mi havas ĉi tie ankoraŭ konsiderindan restaĵon de la brando. Eble estas tridek litroj, kiuj postrestos. Post malmultaj tagoj mi foriros. Mi ne pensas, ke mi vendos en tiu ĉi tempo la tutan brandon. Se mi bonŝancos eble tri aŭ kvar litrojn el la tuto. La restaĵon mi donos al vi kiel donacon de amikeco. Ĝin vi povos vendi ĉi tie. Mi ne pensas, ke nova sekretario venos tre baldaŭ. Kaj tiom longe, kiom ne estos sekretario ĉi tie, vi povos vendi tiom da brando ĉi tie kiom vi volas.“

Ĉu Narciso ĝojis pri la dono aŭ ne, tion li ne montris, nek per

gesto nek per vortoj, kiuj esprimas, kion li pensas efektive. Li diris nur koncize: *„Gracias!“* Kaj li diris tion kun la sama simpla ĝentileco, kvazaŭ li volus danki, ĉar oni ofertis seĝon al li por eksidi.

**Rimarko**
*copita* = glaseto por brando, ekz. por komiteko aŭ por ĉerizbrando

## 8/12

Simile al multaj naturaj homoj, kiuj scias nek legi nek skribi kaj des pli ne scias ion pri pli altaj potencokalkuloj kaj la grafika emocia kurbiĝo en diserigita dramo de Ŝekspiro, la tribestro havis jenan grandan prudenton, kiu estas grava en la vivo: Rapide rigardi en la animon de homo kaj tuj ekkompreni kial li agas tiel aŭ tiel.

*Don* Gabriel en la malmultaj tagoj, kiujn li ankoraŭ restadis tie, ne povis vendi la brandon, kiun li ankoraŭ havis en la deponejo. Se li povus vendi ĝin, li ne fordonacus la brandon. Kunpreni la restantan brandon, li ne povis, ĉar li devis transporti sufiĉe da aliaj aĵoj. Ne restis al li alia elekto krom foriri de tie. Kaj ĉar li devis fordoni la brandon, li eĉ pli utile povis uzi ĝin por tiel subaĉeti la tribestron.

La tribestro ekhavis nur pro tiu provita subaĉeto la supozon, ke en la proponoj de la sekretario estas elmetita iu hoko, per kiu li volas surhokigi ion.

Sed kiom ajn Narciso pensadis pri tio, li tamen ne povis trovi la trukon. Per senarbigo de areo gajni bienon el la ĝangalo kaj fari el tio kafoplantejon, estis honesta laboro, kiu iam havos finon. Krome tia nova bieno, precipe, se la mastro estas agrabla kaj

afabla patrono, eble taŭgus akcepti junajn indiĝenajn parojn kiel peonojn kaj oferti al ili vivon, kiu, eĉ se ĝi estas plena de laboro kaj mallibera, tamen promesas pli da vivsekureco ol la ne tre fekunda tero de la sendependa loko. Se la familioj pliiĝis tro, la tero, kiu estis asignata al la unuopaj familioj, fariĝis pli kaj pli malgranda. Kaj ĉar la komuna lando jam per si mem estis ne tre fekunda kaj eĉ mizeriga – pro tio ĝi kiel komuna lando estis ja konservata – tial la vivo de la familio je la loko kun la ekesto de ĉiu nova familio fariĝis pli kaj pli aĉa.

Sur nova bieno la traktado de la peonoj estas ĉiam pli bona ol sur bieno, kiu jam ekzistas kelkajn jarcentojn. La bienulo volas kreskigi la nombron de la familioj, kiujn la peonoj disponigas al li. Li allogas ilin el sendpendaj vilaĝoj kaj ili rajtas elserĉi mem siajn agrojn el la pralando. Se tio ne kontraŭas al la planoj ĉe la finkonstruado de la bieno, li lasas al ili tutan liberon ĉe la elekto de tiuj lokoj en la ĝangalo, kiujn ili volas ŝanĝi en agrojn. Tiu virgeca ĝangalolando estas treege fekunda kaj donas al la familioj, kiuj prilaboras ĝin, tre riĉajn rikoltojn.

La bienulo donas al ili, por kateni novajn familiojn al si, konstrumaterialon por iliaj kabanoj, li donas al ili malmultekoste junajn porkidojn kaj junajn kaprinojn kaj ŝafojn. Li donas al ili malmultekostajn kontantajn antaŭpagojn kaj faras ĝin facila por ili forlabori la antaŭpagojn. Tio rapide diskoniĝas en la sendependaj vilaĝoj kaj la bienulo havas baldaŭ pli da familioj en la bieno ol li intencis loĝigi. Tuj kiam li havas pli da ofertoj de familioj ol li bezonas, kaj tuj kiam la pli frue setlintaj peonoj kun la pli novaj peonoj jam komencis parenciĝi kaj boparenciĝi kaj komencas ŝati la teron, kiun ili pene kultivis el areo de la ĝangalo kaj kiam fariĝis malfacile disiĝi de ĝi, la bienulo komencas eluzi la peonojn simile tiel, kiel la peonoj estas eluzataj en pramalnovaj bienoj.

Validas ĉi tie la samaj leĝoj de malrapida mizerigo kaj sklavigo de la proletaro kiel en la industrio de ĉiuj civilizitaj landoj.

Se branĉo de la industrio, kiu sekve de nova eltrovaĵo promesas eksterordinarajn profitojn, estas ekkonstruata, oni ofertas nekutime altajn salajrojn al la laboristoj kaj la plej allogajn salajrojn pagatajn laŭ laborintenso por ensuĉi laboristojn el ĉiuj tavoloj de la proletaro, eĉ el la agrikultura proletaro, kaj por disvolvi la novan industrian branĉon plej rapide kiel eble plej alten. Se la disvolviĝo fine sukcesis, la industria branĉo estas jam tro satigita per laboristoj. Sed la alfluo de novaj laboristoj iras plu kaj premos la jam establiĝintan stokon de laboristoj tiom, ke de tiam la plej bonaj laborkondiĉoj malboniĝas ĝis la sklavigo de ĉiuj, kiuj tie estis kaptitaj kaj kiuj ne plu povos reiri en siajn originajn profesiojn, ĉar tiuj pli fruaj profesioj ŝanĝiĝis, aŭ estas okupitaj de aliaj laboristoj, kiuj troviĝis range sur pli malalta ekonomia ŝtupo.

Simile estas ĉe la konstruado de nova bieno. La unuaj kvin jaroj estas tre fekundaj rikoltaj jaroj por la peono, en ĉiu maniero. Ĝui tiujn unuajn kvin jarojn forlogas multajn sendependajn indiĝenojn fariĝi peono en nova bieno. Ili alvenas tien kun la espero, ke ili ja ĉiam povos foriri, se la kondiĉoj kaj la traktado pli malboniĝos. Sed, se tiuj favoraj kondiĉoj komencas fariĝi malfavoraj kaj neelteneblaj, ili ne plu povos foriri. Aŭ ili havas tiam jam tiom da ŝuldoj, ke ili libere ne povos foriri, aŭ ili intertempe jam tiom kunkreskis kun la nova hejmlando, ke ili pro parencaj kaj aliaj sentimentalaj kaŭzoj ne plu estas sendependaj rilate siajn agojn.

## 8/13

Estis bonega truko, kiun *don* Gabriel tie uzis por komenci sian

negocon. La tribestro ja ne povis scii, ke temas pri diablaĵo, kiun *don* Gabriel entreprenis. Li fidis al la vortoj de *don* Gabriel, ĉar li pensis, ke oficisto, sekretario de la loko, kiun li tiam jam konis pli longe ol jaron, ne povas esti tiel bestaĉa, ke li parolas pri la starigo de bieno, dum li celas monterion. Iu misfido povas esti kiom ajn granda, sed ĝi tamen trovas iam limon, kie pro nuraj homaj kaŭzoj oni rajtas supozi, ke la fido al kunhomo neniel trompeblas, ĉar ja ĉiu homo havas koron kaj animon kaj kunsenton al sia homa frato. Por indiĝeno, kiu vivas en la naturo, kun la naturo, kiu inter siaj popolaj kunuloj metas ĉiujn siajn agojn kaj negocojn sur la bazon de pura konfido, kie neniuj paperoj povas esti skribitaj kaj stampitaj, ĉar neniu povus legi ilin, estas certa limo, kie la misfido fariĝas malforta, multe pli malvasta ol ĉe homoj, kiuj vivas enmeze de la civilizacio, kie oni ĉiun transprenitan monsumon sen tiko de brovo kontestas kaj ĵure malagnoskas, se ne antaŭmontreblas kvitanco. Tial por la tribestro estis la supozo nepensebla, eĉ ne dum sekundo, ke *don* Gabriel, kiun li vidis tie antaŭ si kaj kiun li rigardis amiko kaj honesta oficisto, kapablas trompi lin tiel fie sen montri klare ekkoneblan signon de honto en sia vizaĝo.

Pro la ofertita donaco de la postrestinta brando la tribestro kompreneble ne tute povis trankviliĝi. Sed li ne povis senti la subaĉetadon. Nur en tiu kazo, se li sentus la subaĉetadon, li scius, ke la negoco havas trukan hokon.

Dum li iris al la vilaĝo por paroli kun la viroj, li devis pensi seninterrompe pri la donacita brando. Sed li ne povis neglekti la simplan klarigon, kiu ŝajnis al li tute komprenebla, ke *don* Gabriel donacis la brandon nur tial al li, ĉar li ne volis fortransporti ĝin kaj ĉar li pro pura zorgemo prefere postlasas ĝin en la konservado de la tribestro ol en la manoj de iu ajn viro en la vilaĝo. *Don* Gabriel povis disdoni la brandon inter la viroj. Sed ili

ebriiĝus kaj eble eĉ okazus katastrofo en la vilaĝo. Kaj ĉar *don* Gabriel ne disdonis la brandon, sed donis ĝin al la tribestro por konservado, por ke li agu kun ĝi laŭ sia plej bona bontrovo, supozis la tribestro, ke *don* Gabriel estas en vero amiko de la vilaĝo, ĉar li volis malhelpi, ke okazu malbono en la vilaĝo, kiu eventuale kondukus al aĉaj sekvoj por multaj familianoj.

Pro la diverseco de la animaj karakteroj de siaj rasoj, pro la diverseco de la rilatoj kaj medioj, en kiuj ambaŭ plenkreskiĝis, kaj *don* Gabriel kaj la kaciko, ĉiu el ili rigardis la donacon de la brando en alia maniero ol ĝi estis celita.

*Don* Gabriel celis ĝin kiel subaĉeton por pli bone ŝmiri la negocon, kaj li pensis, ke la tribestro same akceptus ĝin kiel subaĉeton.

La tribestro supozis, ke ĝi estis donita al li kvazaŭ al la respondeculo de sia popolo kaj kiel amikeca dono por la loko, eble kiel amikeca adiaŭa donaco. Tial *don* Narciso ne pensis pri tio simple rifuzi la donon.

## 8/14

La tribestro rakontis al la kunvokitaj viroj de la loko la proponon de la sekretario en tiu maniero, kiel li komprenis kaj memortenis ĝin. Li estis al la viroj tiel honesta kiel patro al siaj infanoj. Li diris, ke en tiu kazo ofertiĝas favora okazo por junaj familioj, almenaŭ dum la sekvaj kvin aŭ ok jaroj havi pli bonan vivon ol la hejma loko povus ebligi al ili. La bonaj terpecoj hejme ĉiam estas je dispono por la pli maljunaj familioj, kiuj devas nutri pli grandan nombron de buŝoj, dum la novaj aldonaj junaj familioj laŭ malnova moro kaj bone elprovita deveno devas kontentiĝi pri tio, kio postrestas. Pri tio ne ekestas kvereloj; ĉar ĉiu rigardas tion

ne nur justa, sed kiel solan laŭnaturan elirvojon. Kaj ĉar en la rilatoj, kiel ili hejme estas, tio estas la ununura elirvojo, tial ĝi ankaŭ estas justa.

Ĉiuj viroj, kiuj tie interkonsiliĝis pri la propono de la sekretario ne povis ekkoni ion, kio estas nedeca. Estis en ordo kaj justa, ke la sekretario repostulis la monon, kiun li luis. Iel oni devos doni ĝin al li, se li postulas ĝin. Tion jesis ankaŭ la garantiuloj, kiuj por parenco aŭ amiko ĉe la sekretario estis transprenintaj la garantion. Ili urĝis la ŝuldantojn, ke tiuj pagu siajn ŝuldojn. Ja neniu iun devigis fari ŝuldojn. Ke la origine malaltaj ŝuldoj pro la strangaj interezokalkuladoj de *don* Gabriel elkreskiĝis al konsiderinda sumo, la indiĝenoj ne rigardis fiago de la kreditoro. Estis sufiĉe konate al ili, ke al neniu homo, plej neverŝajne al indiĝeno estas pruntata ankaŭ nur peso kun malalta interezo, se la garantio de la sekureco por la pruntita mono estas tiel vente dubema, ke la kreditoro ĉiam estas en danĝero perdi la pruntitan monon. Kvincentprocentaj interezoj sub tiaj ŝanceliĝemaj financaj sekurecoj, kiel ilin povas oferti indiĝeno, sekve estas certe milda kaj justa procentaĵo.

Kiu volas havi rangon en konsilio devas koni kaj kompreni la rilatojn, kiuj ĉirkaŭas lin. Belsonaj alte flugaj paroloj pri ĝeneralaj kaj praeternaj kaj neskueblaj homrajtoj nur ridindigas ĉiun en konsilio, ĉar ankaŭ la plej bela parolo akordigeblas aŭ tute ne aŭ nur per akrobata kunpremo kaj knedado kun la ekzistantaj faktoj kaj kun la frida sobreco de la ĉiutaga vivo.

Tion eĉ simpla indiĝeno akceptas. Kaj tiu foje pli bone ol kelkaj civilizitaj proletoj, kiuj pensas, ke tuj la tuta mondo banos sin en brilaj sunradioj, tuj kiam ĉiuj homoj samtempe fidos pri la sole feliĉiga programo, kiu tiel bele lumas sur la papero kaj kiu kaŭzas ekflamiĝantan entuziasmon, se ĝi estas prelegata kun emfazo en

nokta kunsido de laciĝintaj, malsataj kaj ĉifonitaj proletoj.

La interkonsiliĝantaj viroj venis al la rezulto, ke la propono de *don* Gabriel estas la ununura, kiu ofertas solvon de la konfuzita situacio, kiu laŭ ili estis kreita pro tio, ke la sekretario devos forlasi la lokon kaj tial devos enkasigi ĉiujn nepagitajn ŝuldojn. Neniu povas postuli de li, ke li donacu la ŝuldon. Tion ankaŭ neniu atendas. La postulo de la sekretario por ĉiuj ekzistis laŭrajte. Ĉiu, egale, ĉu li estis unu el la ŝuldantoj aŭ ne, agnoskis tion. Ne estis eble diri ion kontraŭ tio, ke la sekretario tiam postulis la monon. Li neniam devige urĝis sian monon aŭ siajn varojn al iu. Kiam la ŝuldantoj bezonis la monon aŭ iujn varojn, ili estis tre ĝojaj, ke oni pruntis ion al ili. Ili tial do ne havis la rajton esti malkontentaj, ĉar la mono estas repagenda. Des malpli, ĉar la lasta tago de la repago por ĉiu ŝuldo jam delonge estis pasinta.

La viroj interkonsentiĝis pri tio, kiuj viroj el ili transprenu la dispartigitajn ŝuldojn. Sed ne necesis eble eĉ minaci la junulojn per la potenco de parencaro, por ke ili akceptu la kontrakton de *don* Gabriel. Kelkaj junaj viroj, kiuj ne ricevis ŝuldodevon, ĉar en ties familioj aŭ ne estis maljuna viro kun ŝuldoj aŭ ĉar la knabino, kiun ili elektis kiel edzinon, same ne havis proksiman parencanon, kiu havis ŝuldojn, venis libervole por ricevi kontrakton, tuj kiam ili aŭdis, ke temas pri laboro en nova konstruenda bieno. Ili ekkonis tiukaze eblon perlabori monon dum malpli longa tempo kaj pli rapide atingi propran hejmon, ol se ili restadus plu en la loko.

Dudek fortajn sanajn kaj junajn virojn ricevis *don* Gabriel per unu fojo el la loko. Lia negoco komenciĝis bone. Li apenaŭ povis atendi tion vidi la okulojn, kiujn *don* Ramon montrus, se li estos alveninta kun tiu predo en *Hucutsin*-on.

## 8/15

Kiam ili ekkonis kelkajn monatojn pli poste, kien ili iris, la viroj protestis kontraŭ la kontraktoj.

Ili estis subskribintaj tion, kio laŭ la vortoj de *don* Gabriel devus esti legebla en la kontrakto, sed ne estis legebla tie, ĉar alie tio ja ne estus negoco por *don* Gabriel. Legi scipovis el ili neniu. La sola viro, kiu povis legi, kaj kiun ili konis kiel legulon, estis ilia sekretario, *don* Gabriel. En tiu kazo ankaŭ iu *licenciado*, iu advokato, estus povinta antaŭlegi la kontrakton al ili. Sed tiu postulus pagon. Kaj ĉar la kontrakto estis en la manoj de *don* Gabriel, estis li vokenda. La advokato, antaŭ ol li komencus legi la kontrakton, unue demandus *don* Gabrielon, kion li antaŭlegu kaj ĉu *don* Gabriel pagos pli al li por korekta antaŭlegado de la kontrakto ol la pedikohavaj indiĝenoj, kiuj en la antaŭĉambro de la advokato ne sidis sur seĝoj, sed kaŭris laŭ sia kutimo sur la planko.

La junaj viroj kompreneble ankaŭ povis iri al publika instanco, kie ili povus peti oficiston antaŭlegi la kontrakton al ili. Sed ĉiam *don* Gabriel havus la kontrakton. Li irus kun la kontrakto al la oficistoj kaj dirus: ‚*Como estas, compadre?* Kiel vi fartas, korfrato? Mi havas ĉi tie kelkajn sonorantajn purajn *duros* por vi. Dek bonajn durajn pesojn. Kion? Kion vi diras?‘

‚La *muchachos* volas scii, kio estas skribita en la kontrakto.‘

‚Tion mi ja diris al ili, kiam la antaŭpagoj okazis. Nun, kiam ili jam gargaris la belan monon tra la gorĝo kaj tiel enstomakigis ĝin, ili kompreneble volas eliri el la kontrakto.‘

‚Kompreneble, tio ne estas miraklo', dirus la oficisto. ‚Kion vi do volas, kion mi antaŭlegu? Mi povas fari tion, diru al mi, kiel vi volas havi tion. Kaj se la uloj ĉi tie multe bruos, mi metos ilin ĉiujn en la karceron, kie mi tenos ilin en sekureco, ĝis vi bezonos ilin'.

Ses viroj provis fuĝi. Estis la jnunuloj, kiuj venis libervole. La ceteraj, kiuj transprenis la ŝuldojn de siaj parencoj kaj de la estontecaj bopatroj, ne provis fuĝi, ĉar tio estus rompo de la konfido al la parencaro, post kiam ili iam konsentis la devigon.

Unu el la ses viroj, kiuj fuĝis, estis pafmortigita. Du el ili oni kaptis kaj senkompate skurĝis ilin. Du el ili perdiĝis dum la fuĝo en la ĝangalo. Oni neniam aŭdis denove ion pri ili.

Iu el ili alvenis en la hejmlokon. Ĉifonite, sanganta, magriĝinta ĝisskelete, kun lipoj, kiuj rompiĝis de febro. Li rakontis en la loko, kien oni kondukis la virojn.

## 8/16

*Don* Narciso ne plu estis tribestro, kiam tio okazis. Intertempe la parencaroj elektis alian *jefe*.

Kelkaj viroj iuvespere venis en la kabanon de *don* Narciso por paroli kun li.

*Don* Narciso sciis, kial la viroj venis, kaj kion ili volas priparoli kun li.

Estis konate al ĉiu viro en la loko, ke *don* Narciso, kiam li ankoraŭ estis *jefe*, ricevis barelon kun brando de *don* Gabriel, de la tiama sekretario. Neniu el la viroj, kiuj tiam parolis kun *don* Narciso, faris eĉ la plej etan aludon, ke tiu brando estis subaĉeto. Tia

suspekto tute ne venis en iliajn kapojn, ĉar la honorindeco de *don* Narciso ekster ĉiu dubo.

Oni demandis lin nur, ĉu li memoras, ke *don* Gabriel eĉ nur unufoje donis glaseton da brando al kiu ajn viro de la loko sen intenci ion dum tio.

Narciso diris trankvile: „Mi tute ne povas memori pri tia kazo."

Li ekstaris, ĉirkaŭrigardis en sia domo, kiu estis aĉe lumigata de kelkaj kenaj torĉoj. Li iris al sia plej juna infano, kiu dormis sur petato sur la tero, palpadis ties kapeton, ankoraŭfoje rigardis ĉirkaŭ si kaj tiam sekvis la virojn al eksteren en la nokton.

Du horojn poste la viroj portis la kadavron de *don* Narciso en ties domon. Oni mortbatis lin per maĉeto.

Okazis sekve de bedaŭrinda eraro, ekstere sur la kampoj, kiam la viroj volis forbati subkreskaĵon por serĉi kaj kapti junan mulon, kiu evidente perdis la vojon. Ĉiu en la vilaĝo postrakontis tiun ĉi historion. Kaj ĉiu sciis en la vilaĝo, kio kaŝiĝas en la historio.

La edzino kaj la filinoj de *don* Narciso ekkriis.

Tuj poste la kabano plenigis sin per ĉiuj inoj de la propra parencaro kaj per tiuj de la amikaj parencaroj.

La kadavron oni kuŝigis sur stablon el sveltaj arbetoj. La edzino de Narciso lavis la sangon de lia vizaĝo kaj ellavis la sange kungluitan hararon kaj kombis ĝin.
Oni alportis kenajn torĉojn kaj bruligis ilin.

Poste ĉiuj inoj kaŭris sin sur la teron ĉirkaŭ la kadavro, vualigis

siajn kapojn per rebozo, aŭ per *jorongo* kaj komencis elpuŝi la funebrajn kriojn.

La viro, kiu sukcesis fuĝi el la monterio ĝis la vilaĝo, mortis kvar tagojn poste. Lia tute elĉerpita korpo ne povis rezisti la sovaĝan febron.
Ambaŭ rajdantaj ĉasistoj postsenditaj de la kompanio por kapti kaj rekonduki la forkurinton, trovis lin surstabligita en la kabano de lia patro. La du monteriaj policanoj postulis, ke la patro kaj la fratoj de la mortinta junulo, ĉar li fuĝis, transprenu ties ŝuldojn. Tiuj rifuzis tion kaj la policanoj klarigis al ili pro tio, ke ili raportos tion al la loka estro de *Hucutsin*, kiu estas respondeca por la kontrakto kaj krome al la *jefe politico*. La familio ekscios, kio okazos post tio.

Sekretario, kiu povus helpi al la kaptistoj de la monterio, ne ĉeestis, ĉar la *jefe politico* ekde la foriro de *don* Gabriel trovis neniun, kiu ŝajnis al li sufiĉe taŭga por transdoni la oficon al li.

**Rimarkoj**
*jorongo* = ĥorongo, lankovrilo ĉiam kun entranĉaĵo por la kapo en la mezo, uzata kiel mantelo, similas al sudamerika „ponĉo“
*rebozo* = tuko

## 8/17

La loko restis pli ol du jarojn sen sekretario. Tial putriĝis ankaŭ la pordo de la karcero. Super la oficeja ĉambro de la municipo, kie staris la tablo kun la inkoboteleto kaj kun la plumingo, kiu havis rustiĝintan deformitan plumon, kaj kie kuŝis la fasketoj kun la ordonoj, kiuj temis pri la bonfarto kaj la edukado de la indiĝenoj, trarompis la tegmento malsupren.

Ĉar la indiĝenoj ne riparis la kaputajn tegmenterojn, la tegmentopartoj restis rompite malsupre kaj postŝiris pliajn.

La telefonlineo estis en ordo. Ankaŭ la aparatoj en la oficeja ĉambro ŝajne estis en bona stato, se ili ne estis trafitaj de la falinta tegmento.

Sed estis tie neniu, kiu penis telefoni. Tamen la suno moviĝis plu en la ĉielo. Tamen la maizo kreskis sur la kampoj. Tamen la indiĝeninoj naskis seninterrompe infanojn en la familioj. La viroj en la vilaĝo bone ekzistis por si mem. Eĉ ne al iu el ili iam venis en la kapon la penso, ke la loko troviĝas ja en la ege malĝojiga situacio ne havi sekretarion, kiu estis sendita en la vilaĝon por regi tie. Neniu el ili pensis eĉ nur dum momento pri tio, ke la mondo povus perei kaj la homaro malaperi, se ĝi ne estus regata.

Tial neniu iam havis la ideon, nek la tribestro, nek unu el konsilantoj, sendi serveman raporton al la guberniestro aŭ al la *jefe politico* kaj memorigi la sinjorojn pri tio, ke tie en la loko mankas sekretario kaj, ke la loko sekve de tio havas neniun rilaton kun la moŝta registaro.

Geronimo, kiu nun estis la tribestro en la loko, diris iutage, kiam la viroj interkonsiliĝis pri la nova disdonado de la komunuma lando inter la novaj familioj: „Mi ja plej prefere dezirus, ke la registaro forgesu nin eterne. Mi diris, kion mi devis diri, fratoj kaj amikoj miaj.“

# Ĉapitro 9

## 9/1

Kiel tio ofte okazas en tiu ĉiu mondo, kie kara Dio gvidas ĉiujn sortojn de la homoj nur por ilia plej granda bono kaj neniam agas erare, tiel ankaŭ en tiu ĉi kazo Fortuno estis ĉiam sur la flanko de *don* Gabriel, dum la senkulpuloj kaj ŝarĝatoj de ĉiuj plagoj devis elteni ĉiun malfeliĉon, kiu brue ĵetiĝis iam ajn de ie ajn kaj per io ajn sur ilin. Jen saĝa destino de la plej alta Dio, kiun neniu homo surtere rajtas kritiki. Ju pli malkomprenebla estas okazo por la homo des pli certas, ke Dio kun sia granda saĝo kaj kun sia eterna neesplorebla homamo uzas tiun nekompreneblan okazon por realigi iujn nur al Li mem konatajn celojn ie en spiralnebulo de la universo.

Pro tiuj tiel bone prezentitaj kaŭzoj okazis, ke *don* Gabriel estis tiom persekutata de la bonŝanco, ke li ne povis eviti ĝin. Pasis apenaŭ tago, je kiu li ne sukcecis ligi plian viron per kontrakto. Kaj kun ĉiu plia unuopa viro, kiun li kaptis, pligrandiĝis lia posedo je dudek kvin ĝis sesdek pesoj.

Li ne tuj prenis kun si la virojn, kiujn li devigis kontrakte. Tiukaze li estus devinta kunvenigi ilin en ĉiuj bienoj kaj konduki tra ĉiuj lokoj.

Tuj kiam li ligis iun en kontrakto, li respondecigis la lokan sekretarion aŭ la bienulon aŭ la polican ĉefon por la ĝustatempa kaj sekura alveno de la viro je la tago de la *Calendaria*-sanktulofesto en *Hucutsin*, kie ĉiuj varbitaj viroj estis kolektataj, por ke ili estu ekmarŝigataj de tie de la limloko de la civilizacio al la monterioj.

La lokaj sekretarioj, la lokaj prefektoj, bienuloj aŭ policaj ĉefoj ricevis de la agentoj la monon por la ŝuldoj aŭ por la monpunoj, je kies sumo la viro estis transprenita por forlabori la ŝuldon en monterio.

La varboagento estis sufiĉe lerta por neniam tuj elpagi la plenan sumon al la kreditoroj de la ŝuldohava indiĝeno. Nur proksimume kvarono de la sumo tuj estis pagata. Tio ebligis al la agentoj labori kun pli malgrandaj sumoj. La resto de la ŝuldosumo estis pagata de la agentoj al la kreditoroj de la indiĝenoj nur tiukaze, se la varbitaj laboristoj alvenis en monterion. Tiam la agentoj ricevis la ĉekojn de la monterio, kiujn ili elaĉetis en Jovel aŭ en *Tuxtla*, kaj tiam ili havis sufiĉe da mono por pagi la restsumojn de la transprenitaj ŝuldoj por la varbitaj indiĝenoj.

Tiel apenaŭ estis danĝero por la agentoj, ke ili perdos sian monon; kaj okazis nur tre malofte, ke ne venis unu el la varbitaj indiĝenoj. Tio okazis nur en tiu kazo, se li mortis en la tempo inter la varbado kaj la tago de la *Candelaria*-festo. Se viro rifuzis pro iu kaŭzo forlasi ĝustatempe la hejman lokon por povi alveni je certa tempo en *Hucutsin*-on, li estis punata pro kontraktrompo, la plej granda delikto, kiun indiĝena laboristo povis krimi sub la diktaturo de *don* Porfirio. Indiĝeno, kiu murdis iun popolanon, do alian indiĝenon, validis kiel malpli puninda ol indiĝeno, kiu rompis kontrakton.

Ĉu indiĝeno en Meksiko aŭ ie alie sur la usona kontinento vivis aŭ ne, tio ne estis grava. Ili sufiĉe plimultiĝis, eĉ se dum tio formortis kvar kvinonoj de la infanoj antaŭ ol ili havis dek du jarojn. Grave, tute grave, male al tio, estis, ke la fremdaj kompanioj, kiuj ekspluatis la riĉon de la lando havis ĉiam sufiĉe da laboristoj. Tion oni eksplicite garantiis al ili per la koncesioj kaj licencoj. Kontraktrompo fare de indiĝena laboristo estis

ŝtatperfido. Tial oni punis strikojn per morto, ĉar tio estis kontraktrompo antaŭ kunveninta laboristaro kaj kun ĝi. Indiĝeno, kiu rompis la kontrakton, malpliigis la eksporton. La malpliigita eksporto malbonigis la financan ekvilibron de la lando kun aliaj landoj. Per tio la patrio estas enmanigata al la eksterlando mem, kiu ĉiam estas la malamiko, ĉar ĝi estas ja eksterlando. Kaj tial kontraktrompo de la indiĝena proleto estas ŝtatperfido.

Do, se indiĝeno en kontrakto ne forlasis la hejman lokon ĝustatempe, jen la polico aŭ soldatoj kaptis lin. La kostojn por la kaptado oni skribis kiel debeton sur lian konton. Se li tre bonŝancis per tio, ke Dio prenis lin sub sian protekton, li ricevis nur kvindek senkompatajn skurĝobatojn. Se li faris problemojn ĉe la kaptado, li ricevis ducent kvindek batojn, kaj se Sankta Virgulino tute forlasis lin kaj ne plu volis scii ion pri li, jen kvincent batojn.

Tiel ŝajnas nenecese detale klarigi, kial la agentoj neniam afliktiĝis pri tio, ke la varbitaj viroj dum la antaŭlegado de la listoj ne ĉeestas je la lasta posttagmezo antaŭ la tago de la ĝenerala ekmarŝo en la ĝangalon. Se iu ne venis, jen en naŭdek naŭ el cent kazoj estis supozeble, ke li estas aŭ morta aŭ, ke li perdis gambon aŭ brakon kaj fariĝis nevalora pro tio por la monterio kaj tiel ankaŭ por la patrio.

## 9/2

*Don* Gabriel tiom bonŝancis, ke li ĵus venis je la ĝusta tempo al Pebvil, kie bona predo kuris en lian neston.

Pebvil estis loko, tiel sendependa kaj tiel memstara, ke *don* Gabriel neniam pensis ricevi tie eĉ ununuran viron.

Al la loko apartenis proksimume dek kvin mil sendependaj indiĝenoj, kiuj distribuiĝis sur vasta tereno kaj havis en Pebvil sian ĉeflokon. Tie estis municipo kaj preĝejo. En tiu municipo la sekretario loĝis kaj havis sian oficon. La pueblosetlejo, la federativa komunumo de la puebloparencaroj estis gvidata de indiĝena *jefe*.

Fiaskiĝis ĉiuj provoj de la hispanoj forigi la pueblokomunumon kaj disdividi ĝin en privatajn kaj ŝtatajn bienojn dum la tri jarcentoj de la hispana regado. La pueblokomunumo estis tro forta. Tie, kie unuopaj grupoj kaj parencaroj ne povis rezisti, ili retiriĝis ien. Kiam la soldatoj retiriĝis kaj kiam bienulo eksetlis, oni murdis aŭ forpelis lin. La hispanoj rezignis pri tio subigi la pueblokomunumon. La hispanaj guberniestroj, kiujn bone konsilis komercistoj kaj metiistoj de hispana deveno, fine konvinkiĝis, ke estas pli utile al ĉiuj negocoj kaj por paca kaj sukcesa komerco kaj trafiko, se oni agnoskas la sendependecon de la pueblokomunumo kaj vivas kun la popolo en konkordo, se oni aĉetas ties produktojn kaj vendas por tio aliajn varojn al ili. Ambaŭ, kaj la indiĝena pueblosetlejo kaj ankaŭ la granda meksika loko, kiu plej proksimis al tiu pueblokomunumo kaj tial estis la centrala foirplaco por la pueblosetlejo, prosperis bonege ĉe tiu paca reciproka respektado. Duono de la komerco de la meksika urbo havis ja rilaton al tiu pueblosetlejo.

Pebvil estis la federativa nomo por kvar triboj, kiuj ĉiuj parolis la saman lingvon, ĉiuj havis la samajn morojn kaj tradiciojn kaj same vestis sin kaj tiom interamikiĝis, ke viroj el iu tribo en ĉiu alia el la ceteraj triboj povis geedziĝi, se plaĉas al ili knabino el alia tribo kaj la svatantodoto al la patro respondecas al iliaj ekonomiaj kapabloj.

La placo, kie troviĝis la preĝejo kaj la municipo, kaj kie loĝis pli

ol tridek familioj, ricevis la federativan nomon Pebvil, laŭ kies nomo estis nomata la tuta nacio. Tiu ĉi loko estis la politika mezpunkto de la nacio. Tie la parencaroj venis al la jarfesto kaj tien sendis la unuopaj triboj kaj parencaroj siajn elektitajn virojn al la interkonsiliĝoj.

Ekde tiu politika centra loko grupiĝis la diversaj triboj aŭ *barrios* laŭ kvar direktoj. Plej ofte loĝis kune en grupoj nur tri ĝis dek familioj. La sekva grupo loĝis laŭ tio, kiel tion permesis la tereno kaj la fekundeco de la agroj, ĉiudirekte tricent ĝis pli ol mil paŝojn malproksime de la sekva grupo.

Ĉiuj ĉi grupoj el tri aŭ kvar familioj formis laŭ tio, ĉu ili troviĝis interne de la norda, orienta, suda aŭ okcidenta limigita tereno, *barrio*-n norde, sude, oriente kaj okcidente. Ĉiu *barrio* havis sian praan indiĝenan nomon. Sed sub la influo de la katolika religio kaj por ke Satano povu praktiki malpli da potenco kaj fiaĵoj, oni antaŭmetis al ĉiu praa indiĝena nomo pian nomon. Tiel unu el la *barrios* havis la nomon *San Andrés,* la alia *San Marco*, la sekva *San Pedro*, kaj la kvara *San Miguel.* Ĉiu unuopa el tiuj kvartaloj havis jarfoiron, grandan feston, kiam la sankta patrono de la loko, do *San Marco* aŭ *San Pedro* havis sian festtagon en la kalendaro.

Ĉiu *bario* aŭ ĉiu tribo aŭ kvartalo posedis de praaj tempoj sian propran metion, kiu de ĉiuj aliaj triboj estis respektata. Neniam tribo provis ekokupiĝi pri la metio de alia tribo. Unu el la triboj produktis potojn kaj aliajn argilajn varojn, la dua produktis ĉapelojn, la tria korbojn kaj petatojn kaj la lasta lanokovrilojn. Neniu tribo el la nacio produktis sian propran ĉapelon. Estis kutimo kaj moro aĉeti la ĉapelon de tiu tribo, kiu havis la praan privilegion produkti ĉapelojn. Tiel ankaŭ neniu ino en la nacio uzis poton, kiu ne estis produktita de tiu tribo, kiu posedis la

privilegian rajton produkti la potojn kaj pelvojn por la popolaj kunuloj. Kaj tion oni faris tiel, spite al tio, ke ĉiu indiĝeno estas kapabla mem fari al si ĉapelon, sin mem povus plekti petaton sin mem povus formi kaj baki argilan kuirejan ilaron.

Ĉe la indiĝenoj, kiuj vivas sendependе, estas preskaŭ tiom da regadaj formoj, kiom estas nacioj kaj lingvoj. Estas kacikoj aŭ *jefes,* kiuj estas elektataj je vivtempo, kun la limigo, ke ili estas eksigeblaj, se ili montras sin nekapablaj en sia ofico; ekzistas kacikoj, kiuj ne estas elektataj sed kiuj supreniĝas iom post iom de pli subaj rangoj; estas regentecoj, kiuj ne konsistas el unu tribestro, sed el kvar viroj kun samaj rajtoj kaj devoj; estas kacikoj, kies ofica tempo daŭras kvar jarojn, kaj ekzistas tiaj, kies ofica tempo daŭras nur jaron; estas nacioj, kie viro, kiu iam estis kaciko, neniam denove elekteblas dum sia tuta plua vivo en tiun oficon, eĉ se li estus kiom ajn kapabla; male en aliaj nacioj homo denove elekteblas, se intertempe enofocis almenaŭ du aŭ tri aŭ kvar aŭ eĉ pli da aliaj kacikoj, de kiam li estis la lastan fojon mem kaciko. En kelkaj nacioj neniam elekteblas viro, kies patro iam estis kaciko. Kiom ajn diversaj estas ĉiuj ĉi formoj, ili tamen ĉiuj laŭbaze estas sen escepto de respublika kaj demokrata naturo.

En Pebvil tiam validis ankoraŭ alia sistemo. Oni certe povus rekonduki ĝin, se oni sukcese esplorus tion, ĝis tiu tago, kiam en tiu regionon alvenis la nacioj dum la serĉado de nova tero, kiuj tiam estis setlontaj tie kaj tiam dekomence kun kvar triboj okupis tiujn kvar terpecojn, kiujn ili ankoraŭ nun priloĝas. Pro utileco kaj pro pli bona defendoforto kontraŭ la nacioj en la najbareco formis la kvar triboj federacion, en kiu ĉiu parencaro konservis sian sendependecon.

Por akcepti kaj la rajtojn kaj la apartaĵojn de ĉiu unuopa tribo, kaj

ankaŭ por konservi la unuecon kaj forton de la federacio, la viroj en la konsilio de la nacioj decidis la sekvan: La nacia kaciko en ĉiu jaro estu denove elektenda. Tiu, kiu iam estis kaciko ne fariĝu kaciko je dua fojo. La ofica tempo daŭru jaron. En ĉiu jaro alia tribo elektu la nacian kacikon. Nur membroj de la tribo, kiu en la aktuala jaro disponigas la nacian kacikon, rajtu esti elektata. La enofica kaciko dum sia ofica tempo ekloĝas en la centra loko de la nacioj, kie oni asignas al li fekundan terpecon, kiun li rajtu kultivi kun sia familio. Salajron por sia ofico li ne ricevu. Por eraroj de sia administrado li respondecu al ĉiuj senditoj de la kvar triboj de la nacio.

La ceremonio de la enoficigo de la nova tribestro okazis en rimarkinda maniero.

Je la sesa tago, post kiam la suno leviĝis denove en sia kuro, laŭ nia kalendaro je la dudeksepa aŭ dudekoka de decembro, okazis la festo de la enoficigo.

La ceremonio nun tute adaptiĝis al nia kalendaro, tiel, ke ĝi nun ĉiam okazas je la unua de januaro.

Frumatene je la sesa almarŝas la tuta tribo sur placon antaŭ la municipon, kiu en la nova jaro disponigas la tribestron. Kaj la nova tribestro venas kun la aliaj. Ĉiuj anoj de la aliaj tri barioj mem decidas ĉu ili same volas partopreni en la festo.

Kelkaj viroj kuras al la preĝejo kaj sonorigas la sonorilojn. Pastro ne estas en la loko. Li nur unufoje en la jaro faras la tre penigan vojaĝon en tiun izolitan lokon de alta roka montara regiono por haste praktiki meson, por bapti infanojn, por beni geedziĝojn, kiuj daŭras jam kvindek jarojn kaj tempe kaj peke ĝue, por aspergi tombojn kun baptoakvo, kies preciza situo ne plu

konstateblas, por doni al ĉiuj ŝafetoj, ĉu al homaj, ĉu al lanaj, la apostolan kaj sole multefektan benon kaj por enkasigi la monon por la baptado, por la meso, por la benado, por la foruzo de baptoakvo kaj por la pardono de la kontentigitaj voluptaj ĝuoj sur nebaptitaj kaj nebenitaj geedzaj tabulaj kuŝejoj. Je la festo de la enoficigo de la nova tribestro *señor cura* ne aperas, ĉar je tiu tago, la novjara tago, aranĝeblas pli enspeziga la servo en la vitejo de la plej alta Dio en la preĝejo de pli granda loko en la federacia ŝtato.

Dum nun por la ofica transdono sonoras la sonoriloj, oni bruligas piroteknikaĵojn. Oni faras muzikon, dancas kaj ĝoje bruadas.

La novelektita tribestro estas prezentata antaŭ la kvartalo de la municipo de la plej preferataj viroj de sia tribo, de la eksiĝinta tribestro kaj de ties konsilantoj. Kun tiu prezento la kontrolo de la balotaj dokumentoj estas finita.

La eksiĝinta tribestro faras parolon en indiĝena lingvo, kiu estas metita en poezian formon, kaj eble jam tre malnova.

La nova tribestro respondas ĝin modeste kaj ĝentile. Ankaŭ lia parolo okazas en la indiĝena lingvo, kaj ankaŭ li uzas malnovajn rimojn, kiuj estas antaŭviditaj por tiu agado verŝajne jam de mil aŭ eĉ pli da jaroj.

Post kiam fine estas transdonita kun multaj ceremonioj la ofica bastono, oni alportas seĝon.

Tiu seĝo estas malalta, ĝi estas farita el basteca ligno kaj aspektas kiel plektaĵo. Sed la sidloko estas eltranĉita laŭ la grando de la postaĵo.

Sub ridado kaj gajaj ŝercoj kaj frivolaj diroj de la ĉeestantaj viroj, kiuj amase partoprenas la ceremonion, la nova tribestro nun ŝovas sian blankan kotonpantalon parte malsupren kaj sidigas sin kun la nevestita pugo en la truon de la seĝo.

Li portas la ebonan bastonon kun la arĝenta kuglo, la ofican bastonon, per la dekstra brako kaj li sidas nun inda sur la seĝo, la vizaĝon turnatan al ĉiuj viroj de la nacioj, kiuj staras antaŭ li.

Li sidas nun tie tiel serioza kaj majesta kvazaŭ li volus komenci sian unuan solenan ofican agadon.

La ŝercado kaj ridado de la ĉirkaŭstarantaj viroj nun dum certa tempo silentiĝas. Ili vekas la impreson, kvazaŭ ili ĉiuj volas aŭskulti devote al la unuaj gravaj vortoj de sia nova tribestro.

Sed nun alvenas tri viroj, kiuj estis senditaj al tiu festo de tiu tribo, kiu devos elekti la kacikon en la sekva jaro.

Tiuj viroj portas argilan poton, en kies flankoj estas boritaj multaj trablovotruoj. La poto estas plenigita per ardantaj lignokarboj, kiuj sekve de tiuj trablovaj truoj vigle ardadas.

Helpe de rimita parolo en indiĝena lingvo la viro klarigas nun, kio estas la celo de la ago, kiun li entreprenos tuj.

Kiam li estos fininta sian parolon, li metas la poton kun la ardanta lignokarbo sub la nevestitan postaĵon de la nova tribestro.

En la parolo la viro diris, ke tiu fajro sub la postaĵo de la tribestro, kiu inde sidas sur sia ofica seĝo, memoru lin pri tio, ke li ne sidas sur tiu seĝo por ripozi, sed por labori por la popolo, li restu plu vivanta, eĉ se li sidos sur la ofica seĝo; krome li ne forgesu, kiu

metis la fajron sub la postaĵon. Tiu tribo submetis la fajron al li, kiu disponigos en la sekva jaro la tribestron. Kaj tio okazis, por ke oni memorigu lin jam hodiaŭ pri tio, ke li ne firmgluiĝu sur la seĝo, ke li devos transdoni tiun oficon, tuj kiam lia tempo estos finita, por malhelpi vivolongan regadon kaj diktaturon, kiuj damaĝus al la prospero de popolo. Sed, se li tamen volus firmgluiĝi, tiukaze oni metus sub lian postaĵon fajron, kiu estus sufiĉe granda kaj eltenema, por ke nek de li nek de la seĝo ankoraŭ postrestos io.

Tuj kiam la poto kun la ardantaj lignokarboj estas submetita, oni diras rimitajn sentencojn fare de viro el ĉiu tribo, ĉu fare de viro el la tribo, kies elektito nun eksiĝas, ĉu fare de viro el la tribo, kiu elektas sian *jefe* en la sekva jaro, ĉu fare de viro el la tribo de la ĵus elektita kaciko.

Tiom longe, kiom la diroj ne estos finitaj, la nova tribestro ne rajtas leviĝi de sia seĝo.

Dependas de lia ŝatateco aŭ de lia malŝateco kiel popolkunulo, ĉu la viroj, kiuj diras tiujn sentencojn kantadas malrapide kaj pripenseme aŭ kun tia rapideco, kiel tio ankoraŭ iel eblas por ne tute evidente malkaŝi la intencon. Se al la viro, kiu laste diras sian diron, ŝajnas kvazaŭ la du viroj parolintaj antaŭ li, tro rapide parolis, jen li povas sufiĉe amplekse korekti la troigitan rapidecon per hezitemo en sia parolo.

La tribestro, kiom ajn li sentas, per neniu mieno evidentigas, kiom proksima estas la ardo al li.

Tute male. Se la sentencoj ĉiuj estas diritaj, li ne tuj eksaltas, ĝoĵigite pri tio, ke la varmego nun jam pasis, sed li restadas ankoraŭ dum sufiĉe longa tempo sur la sidloko, por alludi ke li ne

intencas forkuri de la doloroj, kiujn la ofico eble tenos preta por li. Sufiĉe ofte li tiam ankoraŭ faras eĉ ŝercojn. Kaj tio altigas la amuzon de la viroj, kiuj observas lin kaj kiuj, tiom avide atendas pri tio, ke li montru signon de malagrablo, por povi ridi pri li. Sed ju pli gajaj estas liaj ŝercoj kaj ju pli longe li restas sur la sidloko des pli li gajnas la respekton kaj konfidon de la viroj.

Per siaj ŝercoj li penas direkti la ridindecon al aliaj viroj. Li diras al iu: „Malfortulo, vi ja ne havas pulmon, kiel vi volas plidikigi supon de via edzino, se vi estas tro malforta ĉi tie flamigi la fajron sub mia postaĵo tiel, ke mi foje fariĝu varma sub la truo. He, vi, Elizeo, venu ĉi tien kaj forskrapu la glaciaĵon, kiu kroĉiĝis sur mia nudaĵo.“

La karboj nun efektive sufiĉe elbruladas.

Malrapide leviĝas la tribestro. Sed la glaciaĵo, pri kiu li parolis, ne estas tiom sendanĝera. La haŭto estigis nun grandajn blazojn sur la pugo, kaj je pluraj lokoj estas sufiĉe da bruligita krusto, kiun oni povas flari ankoraŭ sufiĉe malproksime.

Amiko proksimiĝas, kaj frotas lian postaĵon per oleo, kaj tiam surmetas postaĵen bandaĝon kun pistitaj folioj, dum alia enverŝas por li grandan glason da tekilo.

Dum semajnoj la nova tribestro ne forgesas, kion li havis sub sia seĝo. Tio helpas al li konsiderinde en la komenco de lia ofica tempo gvidi la oficon tiel, kiel oni atendis tion la nacio dum lia elekto.

En preskaŭ ĉiuj kazoj sufiĉe da cikatroj restis sur tiu korpoparto, tiel, ke li ne nur povas pruvi ĝis lia plej granda aĝo per nedetruebla dokumento, ke li havis iam la honoron esti tribestro

en sia nacio, sed ankaŭ, ke li ne pensas elektigi sin dum dua fojo en tiun oficon, kontraŭ la moroj de sia popolo.

Al la proletaro serioze konsilindus uzi tiujn bone elprovitajn indiĝenajn balotmetodojn, precipe al la oficistoj de siaj sindikataj kaj politikaj organizoj. Ne nur en Ruslando, kie tio estas plej necesa, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj eŭropaj landoj, kie Marks kaj Lenin estas deklaritaj kolonosanktuloj, sukcesus batalantaj proletoj kun pli granda certeco, se ili metus al siaj gvidantoj ĉiujare fortan fajron sub la postaĵon. Neniu gvidanto estas neanstataŭigebla. Kaj ju pli ofte novaj gvidantoj estas metitaj sur ardan seĝon, des pli vivanta restos la movado. Nur ne estu hezitema, proleto. Kaj tute ne sentimentala.

**Rimarko**
*barrio* = urboparto, kvartalo ktp...

## 9/3

Diktaturo supre faras diktaturojn malsupre neeviteblaj. *Don* Porfirio reelektigis sin ĉiun kvaran jaron, kiam finiĝis lia ofica tempo kiel prezidanto. La kliko, kiu sub lia regenteco fariĝis pli kaj pli grasa, elektis lin. Kiu sub lia regado ne fariĝis grasa, ne havis balotrajton. Al li mankis, kiam li estis elektita la unuan fojon, la fajropoto sub la postaĵo por memorigi lin pri tio, ke surtere ekzistas eĉ ne unu homo, kiu kapablas gvidi la vivon de popolo, ĉar ĉiu deka viro en ĉiu popolo kapablas regi. Ne estas io mistera je la regado. Estas multe pli komplike konstrui uzeblan maŝinon ol regi popolon, se la maŝino estas uzeble preta kaj moviĝas. La regadon oni deklaras kiel profunde misteran arton ne tial, ĉar ĝi estas tia, sed por fortimigi revoluciulojn kaj ne montri al la simplaj subuloj, kiom malmulte oni devas kapabli kaj kiom pli malmulte oni devas scii por povi regi. Kiom da

ŝtipkapuloj kaj idiotoj regis popolojn pace kaj benoplene dum kvindek jaroj!

*Don* Porfirio opiniis sin la plej bona kaj plej granda kaj plej inteligenta ŝtatestro surtere. Tial li opiniis tion tute memkomprenebla, ke li ĉiam denove estis elektita. Kaj ĉar estis tiel supre, oni tiel imitis tion sube. La guberniestroj, urbestroj, policaj ĉefoj, ministroj kaj inĝenieroj restis en la ofico ĝis kiam la morto savis la popolon de ili. Disfalo pro cerba paralizo aŭ idiotismo aŭ infanecismo ne estis evidentaj kaŭzoj por eksigi ilin. Ili estus postulantaj pensiojn. Por la financoj de la ŝtato estis pli bone lasi la sinjorojn en la ofico ĝis la entombigo ol pagi salajron al du personoj, al la pensiulo kaj al la aktuala oficisto.

## 9/4

En Pebvil la sekretario estis *don* Abelardo, kaj *don* Amalio estis la kaciko de la indiĝenoj. Li estis dum la aktuala jaro la elektita *jefo* de la kvartala tribo *San Andrés*.

*Jefe* Amalio estis drinkemulo, lia alia eraro estis, ke li lasis facile influi sin de *don* Abelardo. *Don* Abelardo sciis, kiel fine tiri iom post iom la kacikon sur sian flankon. Li promesis al li, ke tiukaze, se Amalio bone laboros kun la registaro, li instigos la guberniestron de la ŝtato asigni al li grandan pecon da tero, kiun oni forprenus de haciendo, kiu okcidente limigas la terenon de la indiĝena nacio.

La sekretario tiel faris tre lertan proponon. Li sciis, ke la *jefe* de la indiĝenoj ne perfidus aŭ ne vendus sian popolon. Sed, se la tribestro per sia bona kunlaboro kun la registaro gajnus aldone fekundan grandan pecon da nova tero por la nacio, jen tio okazus favore al la nacio. Li transloĝiĝus al la nova terpeco kun sia

familio, kaj per tio la terpeco, kiun li havis antaŭe, fariĝus libera por nova familio.

*Don* Abelardo konsilis al la kaciko ne rakonti ion pri tiu propono al la tribo, por ke li ne incitu nenecesan ekscitiĝon; ĉar, se eble okazos, ke la guberniestro asignos alian pecon da tero al li, eventuale oriente de la regiono, la popolo pensus, ke ĝi estas trompita, ĉar ĝi ja certis pri tio, ke la nova terpeco troviĝas en okcidento. Tio kondukus nur al longa babilado kaj intertraktado, kiu servus al neniu. Kvankam la kaŭzo, kiun la sekretario nomis, vere ne tre klare estis ellaborita kaj ligiĝis nur tre loze kun la propono, la kaciko tamen supozis, ke la sekretario pravas, se li konsilas ne raporti pri la propono al la popolkunuloj.

La *jefe* laŭ la volo de la sekretario bone laboru kun la registaro. Sed per tio la sekretario celis, ke la indiĝeno bone laboru kun li, ĉar li estis ja la registaro tie. Almenaŭ li rigardis sin mem kiel registaron.

Se proletoj bone kunlaboras kun la kapitalistoj kaj la burĝaj partioj, tiukaze tio signifas eĉ jam de cent jaroj, ke la proletoj devas pagi la kostojn por la bona kunlaboro. Tiel estas ankaŭ rilate la indiĝenojn. Se ili bone laboras kun la oficistoj, jen ilia felo estos en la vico.

## 9/5

Kun la helpo de la kaciko, kiu ne estis sufiĉe inteligenta ĉiam sufiĉe frutempe ekkoni la taktikon de la sekretario, kaj kiu ankaŭ ne povis rezisti la brandon, se li vidis ĝin antaŭ si, ĉar lia karaktero jam pro naturo estis malforta, eblis, ke la sekretario atingos grandajn sukcesojn sur la tereno de la regado.

Li zorgis, ke la guberniestro, la landa kaj la federacia registaroj sufiĉe havu de la fruktoj de la regado, ĉar ja estis tiel, ju pli li fordonis al tiuj institucioj, des pli neniu pensis pri tio konsideri liajn oficajn negocojn el pli proksima distanco.

Ĉe la guberniestro oni plendis seninterrompe pri la senrespekta administrado de la nacio fare de la sekretario: okazis plendoj pri maljustaj impostoj, plendoj pri konfiskoj de brutoj aŭ kampofruktoj, kiujn la indiĝenoj ne povis porti al la foirplacoj, kiel necesus, ĉar ilin antaŭe forprenis la sekretario kiel pagojn por impostoj aŭ monpunoj, pri kies ekzisto la indiĝenoj eksciis ion nur tiam, kiam jam okazis la konfiskoj. Tutaj trupoj de viroj estis komanditaj malproksimen por labori devige je stratoj kaj publikaj domoj sen ricevi por tio salajron kaj manĝon. La salajroj pagendaj por la laboro de la indiĝenoj kaj aperantaj en kalkuloj de la ŝtato aŭ de la federacia registaro kaj ankaŭ aperantaj en la buĝetoj, por ke oni pagu ilin pere de la impostoj de la popolo, estis disdividitaj inter la guberniestro, la gvidanta registara inĝeniero kaj la sekretario, kiu disponigis la laboristojn. La indiĝenojn, kiuj faris la laboron, oni konsolis per tio, ke oni diris, ke ili ĝoju, ke la registaro lasas vivi ilin kaj iliajn familiojn, kaj ke ili havas nek rajton nek pretendon pri io ajn sur tiu ĉi Tero, ĉar neniu vokis ilin veni al tiu ĉi Tero.

Se en meksika urbo fabrikisto bezonis homojn aŭ komercisto veturanta kun siaj varoj tra kamparoj volis ŝpari la elspezojn por muloj, tiukaze li sendis heroldon al la sekretario, kiu komandis al li la necesan kvanton da viroj je la sekva mateno al la pordo, por la fabrikisto la laboristojn kaj por la komercisto la virojn, kiuj transprenis la laboron de la transportmuloj. La sekretario ricevis la salajrojn por la homoj, kiujn li sendis, dum la indiĝeno, libera civitano de la respubliko devis kunpreni eĉ la manĝon por si.

Ĉiujn ĉi aferojn la sekretario ne povis sole entrepreni. Li ne havis la komandorajton pri la sendependaj indiĝenoj. La komandopovo estis la rajto de la kaciko. Nur la kaciko rajtis senpere komandi siajn popolajn kunulojn.

Tio estis tre lerta de la registaro, ĉar tiukaze, se la registaro estus komandinta la naciojn, pli da soldatoj estus necesaj por sufoki la ribelojn de la indiĝenoj ol la registaro kapablus pagi al la militministerio.

La sekretario ĉiam havis instrukciojn de certa speco ĉemane, per kiuj li pruvis, ke la nacioj devas disponigi tiom kaj tiom da viroj por publikaj laboroj, ĉar la registaro respektas ja la komunuman teron de la nacioj kaj ne konfiskas ĝin kaj permesas al la indiĝenoj migri sur la vojoj de la ŝtato, permesas al ili transporti kaj konduki siajn kampajn fruktojn kaj sian bruton al la foirplaco, permesas al ili pagi tie por ĉiu vendo la impostojn kaj ne malpermesas al ili festi festojn en ilia loko kaj donas al ili la liberon trinki brandon, se ili pagas ĝin kaj ne pensas pri tio malpermesi al ili la fiŝ- kaj ĉasrajton interne de la regiono.

Ĉiuj ĉi rajtoj, kiujn la indiĝeno kompreneble posedis jam mem, tiom longe, kiom ekzistas la amerika kontinento, ĉiutage denove devis esti pagataj kaj konfirmataj de la registaro. Se ne estus tiel, oni ne bezonus registaron.

La indiĝena *jefe* ne povis fari ion alian krom obei la instrukciojn kaj ordonojn de la registaro kaj tiel obei ilin, kiel la sekretario kapabla legi kaj skribi ŝatis kompreni kaj interpreti la leĝojn. Se la kaciko estus rifuzinta agnoski la leĝojn de la registaro, tiukaze la registaro povus nei, ke li estas la *jefe* de sia nacio.

## 9/6

La indiĝenoj havis sufiĉe ofte tre inteligentajn kaj talente dotitajn virojn kiel tribestrojn, viroj, kiuj estis tiaj bonaj diplomatoj, ke ili, sen malkaŝe ribeli kontraŭ la registaro, estis tiom ŝparemaj rilate al laborfortoj kaj mono, kiujn ili disponigis al la registaro, ke ilia nacio prosperis kaj pli bonfartiĝis dum ties ofica tempo, kiam do ne praktikeblis kruda ekspluatado aŭ maljustecoj al la popolkunuloj.

Bonaj diplomatoj la kacikoj devis esti. Ili ĉiam devis teni la ekvilibron inter tri partioj: la registaro, la sekretario kaj la propra popolo. Se oni foje efektive volas paroli pri regada arto, jen la *jefe* de granda sendependa indiĝena nacio en tiuj rilatoj devis havi dekoble pli da diplomataj kaj regaj kapabloj ol la viro, kiu troviĝis je la supro de la meksika respubliko. La eraroj de tribestro de siaj popolkunuloj ne estis indulgataj. Oni respondecigis lin por ĉiu misago. Li havis la devon regi inter la tri partioj tiel, ke lia popolo ne nur ne estu disfrotata, sed ke ĝi kresku, kaj ke ne eblu eĉ ununura riproĉo al li, ke li ne sufiĉe atentis tion aŭ tion ĉi rilate la avantaĝojn de sia popolo. Se li devis rifuzi postulojn de la registaro, li denove ne rajtis troigi tion; ĉar alikaze okazus, ke oni metus batalionon da soldatoj en la centran pueblosetlejon, kaj tiukaze oni prirabus la naciojn dum malmultaj monatoj tiel, ke nek ŝafo, nek kapro estus plu renkontebla sur la paŝtejoj. Se oni lokigas foje soldatojn en indiĝenan pueblon, ili pagas por nenio, kion ili konsumas aŭ disipas nur pro plezuro.

La uzadon de la soldatoj la *jefe* simile respondecas antaŭ sia popolo, ĉar li ne malhelpis tion antaŭe.

## 9/7

Estas home rigardate klarigeble, ke *don* Abelardo, ĉar li trovis tian obeeman kaj malmulte inteligentan *jefe* kiel Amalion, provis per ĉiuj siaj fortoj teni tiun *jefe* tiom longe en la ofico, ĝis kiam li mem sufiĉe estos plenŝtopinta sian sakon por povi rezigni fine pri la posteno.

La plendoj ĉe la registaro plioftiĝis. La oficistoj komisiitaj pri la traktado de la plendoj, ĉar ja temis pri civilizita ŝtato, kie oni rajtas plendi je la propra amuzo, havis bonan rilaton kun la sekretario, ĉar li ĉiam enspezigis ilin, al li oni fidis, ĉar li estis ja la sekretario. Li deklaris, ke la plendoj estas idiotaj mensogoj, laŭ li la homoj estis eternaj grumbluloj, nenio estas ĝusta kaj bona por ili, kaj se oni akceptus aŭskulti la plendojn, tiukaze li prefere rezignus esti ankoraŭ dum pli da tempo la sekretario. Kaj la registaro ne trovus iun alian, kiu estus preta transpreni la oficon.

Prudenta kiel li estis, li akceptis kelkajn negravajn plendojn. Ĉar ili estis negravaj, li laŭjure agnoskis ilin. Li promesis forigi la kaŭzojn de tiuj plendoj. Tiel la registaro ekkonis, kian bonegan reprezentanton ĝi havas en tiu pueblosetlejo.

## 9/8

*Don* Abelardo plena de energio komencis labori je la konservado de la *jefe*, kun kiu li povas labori tiel sukcese.

Li timis tiun viron, kiu, kiel li aŭdis, havis la plej bonajn ŝancojn esti elektita kiel tribestro de la nacioj. Li konis lin kiel sobran, tre ruzan kaj tre obstinan homon, kun kiu oni sukcesas pri preskaŭ nenio pri tio, kion bezonas la sekretario entute.

La aktuala *jefe* faris sin sufiĉe nepopulara ĉe sia popolo. La tuta nacio atendis la tagon, ĝis kiam nova viro ekloĝos en la municipo. Kaj ĝuste tial, ĉar la viro, kiu havis en sia kvartalo la plej bonan ŝancon por la elekto, estis la decida malo de *don* Amalio, tial estis preskaŭ certa, ke oni elektos lin. Oni farus tion jam por ĉagreni la sekretarion, ĉar ĉiu infano sciis, ke li malamas neniun viron tiom, kiom tiun, kies elekto ŝajne estis certa.

*Don* Abelardo skribis longan raporton al la guberniestro, en kiu li detale verkis pri la balotsistemo, kiu en Pebvil estas uzata. Li skribis tute malkaŝe, ke tiu balotsistemo estas stultaĵo, ĉar tuj kiam iu *jefe* kutimiĝis al la laboro, kaj ĵus volis komenci el ĵus gajnita sperto fari servon, kiu alportos fruktojn, li devos jam forlasi la oficon, ĉar nova *jefe* estas elektita.

Estis nenio nova, kion diris la sekretario, la saman oni diras de miloj de jaroj. Estas la kaŭzo, kial ekzistas heredaj reĝoj, kial ekzistas eterne reelektitaj landoprezidantoj kaj deputitoj kaj kial estas diktatoroj. Ankaŭ la oficistoj en la laboristaj organizoj, kiuj ne volas forlasi la fotelon, kiam ilia tempo jam dekfoje estas veninta, sin apogas je tiu opinio.

La guberniestron la raporto profunde impresis. Li akceptis, ke tie ekzistas sistemo, kiu ne estas favora al trankvila kaj konservativa regado. Povus okazi, ke tia sistemo trovas imitadon. Kaj se oni havus ĉiujare novan ŝtatprezidanton kaj novan guberniestron, tiukaze la popolo povus eĉ supozi, ke iu ajn povus regadi, ĉar dum dudek jaroj estis dudek regentoj, kaj ĉiuj kapablis regi. Sekve tion regado ŝajne ne estas tiom komplika kiel oni provas enflustri tion al la regatoj.

Krome la guberniestro estis viro, kiu je daŭro volis restadi en la ofico, ĉar ĝi estis oportuna kaj signifis por li la plej bonan

negocon.

Kaj ankaŭ tute supre je la pinto de la meksika popolo staris viro, kiu ne volis forlasi la fotelon, kiom ajn oni skuadis kaj puŝadis je tiu foteleto.

Ĉar *don* Porfirio volis sidi sur ĝi dum sia tuta vivo kaj ĉar ankaŭ la guberniestro intencis sidi sur ĝi dum sia tuta vivo, klarigis la guberniestro, ke la sistemo en Pebvil estas stulta, kaj ke tio pruvas, ke temas pri la sistemo de indiĝenoj, kiuj ankoraŭ profunde troviĝas en la barbara tempo.

Li ordonis per dekretoj, ke la aktuala ĉefo *don* Amalio aŭ denove estu elektenda, se la nacioj spite tion supozas, ke ili nepre devas elekti, aŭ li restadu en la ofico pro sia antaŭa elekto.

## 9/9

*Don* Abelardo antaŭlegis la dekreton en la ĉeesto de *don* Amalio kaj de kelkaj indiĝenaj viroj, kiuj hazarde ĉeestis en la municipo.

Estis ne bone ekkonebla ĉu la dekreto estis bonvenigata de la *jefe* ĉu ne.

Li diris: „Se tio estas la ordono de la registaro, jen ni devas akcepti tion.“

„Neniu demando do“, interdiris *don* Abelardo, *„orden es orden*, ordono estas ordono. Jam neniu intertraktado pri tio plu eblas. Vi, *don* Amalio, estos plu *jefe*, decidite!“

La ceteraj indiĝenoj, kiuj ĉeestis, diris nenion. Ili aŭskultis trankvile, sen moviĝi aŭ tordi vizaĝon. Estis novembro, kiam tio

okazis.

## 9/10

Je la lasta tago de la dua semajno, post kiam tiu dekreto venis, alvenis iumatene delegitaro de viroj el *San* Miguel en la municipon por interparoli kun la sekretario.

*San* Miguel estis la bario, kiu elektos en la sekva jaro la kacikon.

Navidad, la viro kies elekto kiel tribestro por la sekva jaro estis certa, ne troviĝis en tiu delegitaro.

Ĉiuj viroj de la delegitaro, sepopo, estis laŭ aspekto kutimaj simplaj indiĝenoj. Malgrandaj kamparanoj. Ili portis sandalojn je la nudaj piedoj. Ili havis *spick and span* blanklavitajn lankotonajn ĉemizojn kaj pantalonojn . Tiuj vestaĵoj estis ĉe kelkaj el ili tiom ofte flikitaj, ke ŝajne eĉ ne unu peco de la origina ŝtofo postrestis, el kiu tiuj vestoj estis faritaj. Sur la supra duono de la korpo ĉiu el ili havis surĵetintan ĥorongon, kiu estis farita el griza lano, kun franĝoj je ambaŭ finaĵoj. La pantalonon ili suprenruligis laŭ la maniero de sia nacio super la genuojn, tiel, ke la fortikaj gambojoj okulfrape montriĝis. La gamboj aspektis kvazaŭ elnoĉitaj el malnova dura bruna ligno, kiel oni vidas tion de tempo al tempo je lignaj skulpturoj, kiuj aĝas kvincent jarojn.

Enirante en la laboroficejon de la municipo, la viroj demetis la ĉapelon. Ĉiu el ili paŝis antaŭ la sekretarion, diris sian nomon kaj tuŝis per fingropintoj manon de la sekretario, kliniĝis profunde kaj tiam repaŝis en la grupon. *Don* Abelardo ofertis cigaredojn. Ĉiu prenis cigaredon kaj komencis fumi ĝin. Tiam la sekretario demandis, ĉu ili volas sidiĝi sur la benkon. Ili respondis, ke ili prefere staros plu.

Ĉiuj kunhavis maĉetojn kaj tri el ili portis ŝrotpafilojn. La kutimajn hispanajn fusilojn, ŝarĝeblaj nur tra la buŝo.

Sed ili lasis la armilojn ekstere en la portiko de la municipo. Du viroj, kiuj venis kun ili, kaŭris sur la stamfita teroplanko en la portiko, fumis kaj babilis. La hundoj, kiuj antaŭe sekvis la virojn de la delegitaro, nun persekutis sin reciproke sur la placo antaŭ la municipo kaj kverelis kaj ludis kun la hundoj el la loko.

**Rimarko**
*spick and span* (angle) = ege pura

## 9/11

Post kiam la homoj kolektiĝintaj en la oficejo, dum kelke da tempo fumis, demandis la sekretario: „*Que puedo hacerle?* Kion mi povas fari por vi?“

Jen unu el la indiĝenoj paŝis antaŭen. Li nomiĝis Tomaso kaj estis la elektita parolanto de la delegitaro.

„Ni aŭdis, ke estis farita dekreto de la registaro por nia *comarca*, la loĝtereno de nia nacio.“

„Tio estas ĝusta“, diris *don* Abelardo, la sekretario.

„Ni havas la rajton scii, kion signifas tiu dekreto.“

„Tiun rajton vi havas“, respondis la sekretario. „La dekreto de la guberniestro en *Tuxtla* difinas, ke la balotsistemo, kiun vi uzas en via nacio, estas nuligita.“

„Nek la guberniestro“, diris al tio Tomaso, „nek la federacia

registaro de la respubliko Meksiko povas forigi la balotsistemon validan por nia *comarca* sen peti antaŭe nian konsenton. Niaj moroj validas nur por ni. Ni devigas nek la latinojn, la meksikanojn, nek iun indiĝenan nacion akcepti niajn morojn kaj kutimojn. Tial ni permesas al neniu, eĉ se estus la prezidanto de la respubliko, devigi al ni morojn kaj kutimojn, kies utilecon ni ne elprovis, kaj je kies uzo ni ne vidas avantaĝon por nia popolo. Ni ne malemas esplori la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de nova balotordo kaj elprovi ties utilecon. Sed ni ne povas kaj ne volas koncedi, ke la registaro enmiksiĝu en niajn rajtojn, kiuj celas nur nian *comarca*."

Tomaso parolis tion ne per unu elspiro kaj ne glate. Li parolis lante kaj tre pripenseme. Li parolis en neperfekta hispana lingvo. Iafoje li diris la frazon unue en la indiĝena lingvo, por klarigi la penson, kiun li volis esprimi, al si mem kaj por aŭdigi la diritan al siaj kunuloj en la delegitaro, el kiuj nur du personoj parolis la hispanan.

La sekretario komprenis la indiĝenan, kiu estis parolata en Pebvil, kvankam li mem povis paroli ĝin nur kun peno.

Li sidis post la tablo, metis unu gambon sur la alian kaj aŭskultis trankvile. En tiu momento li bruligis novan cigaredon kaj prezentadis la tabakon en la rondo, sed neniu el la viroj akceptis ĝin.

„Tio estas dekreto de la registaro", li diris fine, „mi ne povas fari ion kontraŭ tio. Mi ne ordonis la dekreton."

La viroj sciis pro longa sperto, ke neniu ordono estas farata, plej malmulte dekreto rilate la indiĝenan nacion, sen tio, ke oni demandis la sekretarion pri lia konsilo kaj pri lia juĝo. La

sekretario estas la peranto inter la indiĝena nacio, kie li estas enoficigita kiel sekretario, kaj la registaro. Ordono estas farata aŭ malofte aŭ neniam, se la sekretario vivanta en la indiĝena nacio kaj konanta ties morojn, kutimojn kaj apartajn rajtojn, emojn kaj malemojn, ne konsentas aŭ eĉ avertas kontraŭ ĝi.

Kaj ĉar tio estis konata al la viroj, ili juĝis la vortojn de la sekretario laŭ tio, kion ili valoras.

Ili ne diris, ke li povis malhelpi tian dekreton, se li estus celinta tion. Ili ne kritikis liajn agojn aŭ iujn de la registaro.

Tomaso, la parolisto, diris: „Ni venis por diri al vi, ke ni ne agnoskas la dekreton, kaj ke ni rigardas ĝin ne ekzistanta. Ni elektas niajn *jefes* kiel ni faris tion ĝis nun. Kaj por nia nacio estas nur tiu la kaciko, kiun elektis ni. Kun *jefe*, kiun ni ne elektis aŭ kiu estas ekster ofico por ni, ni ne intertraktas. Ĉu vi aŭ via registaro povos atingi ion kontraŭ aŭ en nia nacio kun la helpo de viro, kiun ni ne akceptas kiel nian *jefe*, tion vi ja baldaŭ ekscios, *don* Abelardo.“

„La dekreto celas nenion, kio iel malavantaĝus por la granda kaj nobla nacio de Pebvil“, diris nun la sekretario. „Amalio estas bonega *jefe*. Li spertis kaj lernis multon ĉe la laboro kun mi ĉi tie en la municipo. Nova tribestro devas lerni tion denove antaŭ ol li komprenus ĉion kaj vere utilus al vi.“

Pri tio diris Tomaso: „Ĉu Amalio estus bona aŭ malbona *jefe* por ni, tion decidi ne estas nia tasko, kaj tial ni ankaŭ ne estas ĉi tie. Supozite, ke li estus bonega *jefe*, la plej bona, kiun ni havis de jardekoj, tiukaze tio ne estus kaŭzo ŝanĝi niajn pramalnovajn kutimojn en unu tago kaj nur je lia favoro. Povas facile okazi, ke la sekva *jefe* ne estos tiom bona, kiom Amalio, sed eĉ tiukaze ni

ne povus liberiĝi de li, eĉ se ni volus liberigi nin de li.“

„La respubliko Meksiko estas milfoje pli granda ol Pebvil“, diris *don* Abelardo. „Kaj en tiu granda respubliko Meksiko *don* Porfirio nun jam dudek tri jarojn estas la *jefe*. Li estis denove kaj denove elektita. Tio montriĝis kiel tre taŭga. Jaron post jaro li fariĝis pli riĉa pri spertoj kaj li povis uzi tiujn spertojn je la bonfarto de la respubliko. Ankaŭ la guberniestro ĉi tie en tiu ĉi federacia ŝtato, kiel la guberniestroj en la ceteraj federaciaj ŝtatoj de Meksiko denove kaj denove estas elektataj.“

Tomaso atendis ĝentile certan tempon por doni okazon al la sekretario ankoraŭ aldoni ion.

Sed kiam *don* Abelardo silentis, diris la indiĝeno: „Tio estas certe ĝusta kaj bona kaj certe necesa por la ladinoj, sed tial ĝi ankoraŭ tute ne devas esti sufiĉe bona por ni, ĉar ni estas tsotsiloj. Ankaŭ ni vivis jarmilojn, kaj ni ne pereis, kvankam ni havis aliajn kutimojn, aliajn regadajn sistemojn ol la ladinoj. Kaj ĉar ni ja vivas kaj prosperis dum jarmiloj sub niaj kutimoj sen bezono de la ladinoj kaj sen peti ties konsilojn kaj sen akcepti ties morojn kaj sen voki ilin en nian landon, tial ni estas certaj, ke niaj kutimoj ne estas malpli bonaj ol tiuj de la ladinoj. Ni vivis dum jarmiloj tiel, kiel ni trovis tion ĝusta kaj bona, kaj ni tial gajnis la konvinkon, ke ni povos vivi sub niaj sistemoj kaj moroj pluajn jarmilojn sen forputro aŭ sen pereo. Ni ekkonis pro senfine longa sperto, ke estas beno por nia popolo ĉiujare elekti novan *jefe*, kaj en ĉiu jaro preni la kandidaton por la ofico de *jefe* el alia bario, kaj neniam reelekti viron, kiu jam iam estis *jefe*. Se ni estus en longa milito, kie ni bezonas la plej spertan militiston kiel *jefe* aŭ se ni estus en longa popolmigrado al novaj regionoj, tiukaze certe estus rekomendinde lasi la plej spertan viron dum pli longa tempo en la ofico. Sed laŭ la tradicio de nia popolo ni neniam

ŝanĝis nian balotordon, eĉ ne en eksterordinaraj tempoj. Neniam en nia longa historio *jefe* estis dum pli longa tempo ol dum jaro en la ofico. Se mankis spertoj kaj konoj al nova *jefe*, li trovis ĉiutempe helpon, konsilojn kaj subtenon ĉe pli fruaj tribestroj, kiuj havis pli da spertoj ol li. Ĉar estas neniu viro en nia popolo, ĉu *jefe* aŭ ne, ĉu li estis *jefe*, aŭ ĉu li iam estos *jefe*, kiu ne metus siajn konojn kaj ĉiujn siajn spertojn en la servon de nia nacio, se la popolo bezonas lian konsilon kaj lian helpon. Tial ni neniam havis reĝojn kaj neniam diktaturojn kaj neniam despotojn. Ĉiu viro, ankaŭ la plej simpla povas fariĝi *jefe* dum jaro, se li ricevas aŭ gajnas la konfidon de la plenkreskaj viroj de sia bario. Ni ofte havis certan *jefe*, kiu estis tiel prudenta kaj tiel diligenta, ke ĉiu en la popolo estus certe volonte akceptinta tion, se li pli longe restadus en la ofico por por povi plene evoluigi siajn planojn, tion mi scias el rakonto de mia *abuelo*, de mia avo. Sed plej ofte okazis la stranga afero, ke la sekva *jefe* estis ankoraŭ eĉ pli prudenta kaj pli bona ol la estinta, kaj ties sekvinto ankoraŭ eĉ pli bona ol la antaŭa. Ĉar ĉiu, kiu sekvis, lernis kiel popolano de la pli fruaj *jefes*, kaj ĉiu nova *jefe* strebas fervore por superi la viron, kiu estis antaŭ li en la ofico kaj kiu ricevis multajn laŭdojn pri la laboro kaj povo, por tiel ricevi eĉ pli da laŭdoj. Ju pli ofte nova viro kiel *jefe* elekteblas des pli da popolanoj povas fariĝi *jefe*. Kaj ju pli da popolanoj fariĝas *jefe* des pli da viroj lernas kiel oni regu. Ju pli da viroj spertas tion des pli bonajn konsilojn ili povas doni. Nia strebado estas, ke ĉiu unuopa popolano almenaŭ unufoje estu *jefe*. Tiukaze la popolano malpli ofte kritikas, sed por tio ili pli bone interkonsiliĝas. Ili formas unuecon aŭ parlamenton de regentoj. Viroj, kiuj estis *jefes*, ne kritikas tiom rapide kaj ne tiel facilanime kiel aliaj. Ili estas pli bonaj popolanoj, ĉar ili lernis kiom grave estas obei en necesaj kazoj, se io estu kreenda por la bonfarto de la nacio. Sed la plej grava afero estas tiu, ke ĉiu unuopulo enmondigas almenaŭ unu novan ideon, kiun havis neniu alia homo antaŭ li. Tiel ĉiu nova *jefe* enkondukas en la

administradon de nia popolo ideon, kiun oni povas elprovi kaj pri kiu montriĝos, ĉu ĝi estas utila aŭ malutila. Ĉiu homo pensas, ke li povas fari ĉion pli bone ol alia, se li unufoje povus esti en la ofico. Ni donas al ĉiuj el niaj popolanoj tiun okazon por montri, ĉu ili povas plibonigi ion. Ĉiu, kiu eksiĝas de la ofico, tiam lernis, ke maizo devas esti kuirita aŭ rostita, se oni volas manĝi kaj digesti ĝin. Tio estas ĉio, kion mi devas diri komisie de mia popolo kaj, kial mi venis ĉi tien. Ni ne kritikas la registarajn sistemojn de la ladinoj. Sed ni donas al neniu surtere, kiu ne apartenas al nia popolo, la rajton ŝanĝi niajn morojn kaj kutimojn laŭ ties bontrovo. Se la registaro kapablas konvinki nin, ke nia sistemo estas malavantaĝa al ni, ni pripensos kaj interkonsiliĝos kaj fine faros tion, kion ni rigardas kiel la plej bonan. La granda malavantaĝo, kiu estas en tiu sistemo, kiun la registaro ordonis al ni estas tiu: Se viro, kiu estis elektita kiel *jefe*, seniluziigas la konfidon de siaj balotintoj, kaj ne tio estas, kion la popolo atendis de li, tiukaze li aŭ ne aŭ nur kun granda peno povas esti forigita el la ofico. Se li estas eĉ fripono, al kiu validas personaj avantaĝoj pli ol tiuj de la popolo aŭ, se li estas viro, kiu estas vanta, regema, egoista, gloravida, tiukaze li provos restadi plu en la ofico pere de intrigoj kaj per spirita venenigo de grandaj popolpartoj. Tio devas konduki al koruptado, al malpaco kaj al ribeloj interne de la popolo. Sed ni volas vivi en paco, inter ni kaj kun ĉiuj niaj najbaroj, ĉar ni lernis dum jarmiloj, ke nur paco kaj konkordo estas prosperigaj por la homoj.“

**Rimarkoj**

*bario* = tribo aŭ kvartalo en pueblosetlejo

tsotsilo = ano de indiĝena tribo en Meksiko, ekz. en Ĉiapaso

## 9/12

Ne estas supozeble, ke la sekretario komprenis, kion la indiĝeno diris kaj, kion li opiniis. Parte estis tial, ĉar li ne vere aŭskultis lin. Por li la dekreto estis valida, kaj por li la pedikohavaj indiĝenoj ne havis la rajton kritiki la dekreton. Ili estis sklavoj sen influo. Tial ili devis obei kaj fari tion, kion la diktatoroj opiniis taŭga ordoni al ili. Parte lia nekomprenado de la parolisto havis la kaŭzon, ke la indiĝeno parolis pri mondo kaj vivsinteno, kiuj estis tiom malproksimaj de li, de la sekretario, kiel la notoj de la signaloj, kiuj vokas al la Lasta Juĝo.

Sed unu aferon la sekretario komprenis. Tomaso tre bone aranĝis sian parolon. La punkton, pri kiu temis en tiu precipa kazo unuavice, kaj kiu de la sekretario estis uzata kiel decida kaŭzo atingi tiun dekreton, metis Tomaso lerte kaj bone pripensite al la fino de sia parolado.

Amalio, la aktula *jefe*, en tiu fina parolturno ne estis menciita laŭnome. Sed *don* Abelardo tuj komprenis, kiun li celis. Kaj tiel bone parolis la indiĝeno, ke tiu fina parolturno estis plena de senkompataj batoj sur la sekretarion sen tio, ke li povus diri, ke oni ofendas lin, aŭ, ke oni kulpigas lin korupti la indiĝenan nacion kaj apartigi ĝin por gajni el tio personajn avantaĝojn.

Li sentis sin tute nekapabla kontraŭi ion al la parolo. Li ne scius kiel komenci la parolon. La parolo de la indiĝeno estis kirasita kun tiuj mil aŭ dekmil jaroj, en kiuj la nacio lernis, verŝajne pro ĉiamaj konfliktoj interne de la popolanoj, kiuj minacis detrui la popolon, ellabori tiun ĉi registaran sistemon kaj uzadi ĝin. Kontraŭ sukcesoj, kiuj havas sian radikon en spertoj el miloj de jaroj oni ne povas batali per paroloj. Sen eĉ havi la kuraĝon por eventuale trovi kontraŭargumentojn, ĉar li estis certa, ke la

indiĝeno venkus lin, li diris nur: „Dekreto estas dekreto, Tomaso. Vi devas obei ĝin. Tion vi povas raporti al viaj homoj. Amalio estos plu *jefe* dum la sekva jaro. Kaj, ĉu li estos ankoraŭ pliajn jarojn *jefe*, tion ordonos nova dekreto, tuj kiam la tempo estos veninta por tio.“

„Mi tion laŭvorte raportos al la viroj de Pebvil“, diris Tomaso trankvile. „Mi havas nek la oficon nek komision, respondi al vi, *don* Abelardo.“

Li iris pli proksime al la tablo.

La sekretario ekstaris, li iris ĉirkaŭ la tablo kaj iom renkonte paŝis al Tomaso.

Tomaso tuŝis la fingropintojn de la mano, kiun la sekretario entendis al li, kaj diris: „*Adios, señor !*“ Li tre kliniĝis kaj forlasis la oficejon.

La ceteraj viroj de la delegitaro samtempe adiaŭis lin kaj sekvis sian ĉefan parolanton.

En la portiko ili levis siajn maĉetojn, jetis la ŝrotpafilojn tranŝultren kaj ekmarŝis.

Ili ne parolis kune.

## 9/13

La tuta nacio sciis, ke la delegitaro estas ĉe la sekretario. Sed eĉ ne unu viro el la centra loko, laŭ kies agava ĉirkaŭbarilo la delegitaro nun iris por migri hejmen al sia *bario*, venis al ili por demandi, kio estas la rezulto de tiu interparolo kun la sekretario.

Oni eble povus supozi, ke tio estis manko de intereso de la indiĝenoj.

Sed en kazo, kiel estis tiu, indiĝeno konas nek viglan nek mankantan intereson. Pri tia demando li tute ne montras individuan intereson.

Kio okazas kaj kio devos okazi, tion li scias; pli li ne devas ekscii.

Sciis ja ĉiu membro de la nacio longe antaŭ ol tiu delegitaro estis kunmetita, ke la intertraktado kun la sekretario en vero ne estis intertraktado, neniu provo trovi kompromison, neniu parlamenta ekvilibrigo de la partioj. La intertraktado kun la sekretario estis la lasta averto. Nenio pli.

Sed militdeklaro ĝi ne estis. La nacio volis havi militon nek kun la registaro nek kun la ladinoj. Ili ne estis tiel stultaj ataki kun maĉetoj kaj ŝrotpafiloj mitralojn kaj montaran artilerion. Tion faras civilizitaj popoloj por ambaŭflanke perdi du milionojn el siaj plej bonaj viroj kaj sklavigi sin cent jarojn pro la ŝuldoj.

La necivilizitaj indiĝenoj, kiuj kapablis nek legi, nek skribi, kiuj tial do ankaŭ ne tiel facile lasis logi sin al stultaĵoj, eĉ ne pensis pri tio endanĝerigi sian popolon kaj disipi la floron kaj la riĉon de sia popolo tiel, kiel tio okazas en civilizitaj popoloj.

Ili estis popolo de regentoj, havis nek militministerion nek ŝtalkonzernojn nek fabrikistojn de municio.

Kaj ĉar ili estis popolo de regentoj, riĉaj je viroj, kiuj lernis en mallonga regenteco doni bonajn konsilojn kaj ĝuste povi juĝi uzeblan konsilon, tuj, kiam tiu ekaŭdeblas, tial grego da sovaĝiĝintaj kriuloj ne povis peli ilin en konfuziĝon, por ke ili fine

ĉiuj iru en la saman kaptilon.

Ili agis kiel barbaraj indiĝenoj, sed ili agis ĝuste, sukcese kaj nerevokeble. Kaj ĝustatempe.

## 9/14

La unua de januaro estis veninta.

La densaj nebuloj de la mateno ŝarĝis ankoraŭ peze la teron, kiu banis sin en roso.

Kiam la tago falis malsupren sur Pebvilon kaj la nebuloj disiĝis kontraŭvole, kiam ili solviĝis kaj forbloviĝis, la suno aperis kvazaŭ per salto sur la dorso de la montoj kaj la vasta placo en Pebvil plenigis sin kun miloj kaj miloj de indiĝenoj.

La amasoj tiel subite ĉeestis, kvazaŭ ili estus kuŝintaj nokte en la vepro kaj kvazaŭ ili atendis nur la sekundobaton, kiam komencas ekbrili la unua glimo de la suno sur montosupro, por plenigi la placon tiel rapide kaj tiel dense per homoj, ke oni povis supozi, ke tiuj miloj de homoj kuŝis inter la herbotigoj kaj en la naturaj sulkoj de la tersurfaco kaj nun leviĝis per unu fojo.

Estis svarmado sur la placo, kiel tio kutime estas nur sur la plej grava jarfesto de la nacio.

Viroj, inoj kaj infanoj kaj hundoj kunis en densaj grupoj kaj vaste are. Ĉiuj estis gajaj kaj bonhumuraj. Jen ridado, jen kriado, babilado, vokado, kantado, muzikado, sur la tuta vasta placo.

Kelkaj parencaroj havis longajn bastonojn kun buntaj tufoj da plumoj sur ili, kiujn ili pikis teren kiel standardojn enmeze de la

grupo.

Aliaj parencaroj alvenis kun flagoj, sur kiujn bone kaj malbone estis kudritaj la sanktulo Antonio aŭ Sankta Virgulino.

Inter la amasoj oni vidis ĉie la *capitanes,* la estrojn kun siaj ĉapeloj, de kiuj flirtis longaj multkoloraj silkorubandoj kiel signo de la indo de la kapitanoj. Ankaŭ la estroj estis nove elektitaj de ĉiu parencaro en ĉiu jaro. Ili estis la elektitoj kaj delegitoj de sia parencaro aŭ grupo, kiuj prezentis sian parencaron dum la grandaj interkonsiliĝoj, kiujn prezidis la *jefe* de la nacio. Ĉi tie, ĉe tiu kunveno de la tuta nacio pri eksterordinara afero, ili estis la gvidantoj kaj ordigantoj de siaj grupoj. Tiel ĉiu grupo dum ĉiu minuto havis ligon kun la Centra Konsilio de la nacio. Ĉiuj kapitanoj ricevis en la lasta decida konsilia kunsido siajn ordonojn, kion ili faru kun siaj grupoj dum certaj okazaĵoj kaj je certaj tempoj, kaj kiel kaj kien ili devos konduki siajn parencarojn, se certaj signaloj de la Centra Konsilio estos senditaj.

*Don* Abelardo, la sekretario, tre miris vidi tiel frue matene la tutan nacion sur la placo, kiu kolektiĝis antaŭ la municipo. Li ne povis klarigi tion al si. Ne estis foirplaca tago kaj ne tago de sanktulo de iu ajn el la kvar *barrios*.

Li ankoraŭ ne estis du plenajn jarojn ĉi tie, kaj tial li ne konis ĉiujn festojn kaj kaŭzojn por la kunsidoj de la nacio. Tial li trankviliĝis por momento.

Tiam li rememoris, ke la tago estas la unua de januaro kaj li pensis, ke la nacio kunvenis por festi la novan jaron. Ke la indiĝenoj ne festas novan jaron, li ne sciis. Sed li havis nun klarigon kaj foriris por matenmanĝi.

Tiam li retropaŝis en la portikon kaj demandis kelkajn indiĝenojn, kiuj staris proksime kaj interparolis, kio estas la kaŭzo de tiu amasa renkontiĝo.

La demanditoj strange rapide respondis. Ili diris, ke ili venis, ĉar estas la unua de januaro. Per tio *don* Abelardo kontentiĝis.

## 9/15

Li sendis la policanojn, indiĝenojn el Pebvil, sur la placon, por ke ili zorgu pri ordo.

Dum li ankoraŭ staradis kaj pripensis, kion li povus fari ankoraŭ por vidigi kaj sentigi, ke li estas tie la aŭtoritato, la sonoriloj de preĝejo komencis sonori.

Li rigardis transen al la preĝejo kaj vidis, ke la malalta sonorilturo estis okupata kun aro de junuloj, kiuj sovaĝe svingadis la sonorilradojn en la framoj kun krioj kaj kriaĉado kaj kriĉado.

Jen alvenis el la ĝangalo oriente de la loko aro de indiĝenoj kun gaja muziko. Ili havis tamburojn, timbalojn, flutojn, gitarojn kaj violonojn kaj ludis dancmuzikon.

La homoj portis bastonojn kun floroj kaj buntaj tufoj el plumoj; la preĝejostandardojn de ilia *barrio* antaŭportis kelkaj junaj viroj, kiuj provis konduti inde.

Je la flagoj la sekretario ekkonis, ke estas la *barrio San Miguel*, kiu tie alpaŝas kun fermita marŝordo.

Tuj kiam la amasoj sur la placo aŭdis la muzikon de la almarŝanta kvartala tribo, superfortis ilin granda ekscitiĝo. Ili kriis transen

al la alvenintoj, kaj junaj viroj en granda kvanto rapide kuris tien por akompani la marŝantojn ĉe la enmarŝo sur la placon.

En la enmarŝanta aro oni ekvidis proksime malantaŭ la flagoj la kapitanojn de la parencoj el la bario. Kaj inter tiuj kapitanoj marŝis Navidad, la viro, kiun la bario San Miguel elektis kiel tribestron.

Navidad mallevis la ĉapelon sen rubandoj, ĉar la surmetado de la rubandoj estis ago en la ceremonio de la enoficigo. Sed li portis transverse sur la brusto du buntajn skarpojn, kiuj distingis lin de la ceteraj viroj kiel elektiton.

La kolono apenaŭ atingis la eksteran randon, kiam Amalio, la *jefe,* kiu estis en la ofico kaj laŭ dekreto restadu en la ofico, sturme kuris al la municipo, la pordon de la oficeja ĉambro malfermŝiris kaj kriis al la sekretario: „Ili venas, ili venas, *me mataron*, ili mortigos min.“

„Sensencaĵo, *que loco*“, diris *don* Abelardo, „neniu mortigos vin, *don* Amalio, la registaro vin gardas.“

Dirinte tion, la sekretario ŝajne tamen ne estis tiel trankvila kaj konfidinda kiel li provis esprimi tion per siaj vortoj. Li paliĝis, ŝovadis sian revolveran zonon tiel, ke la revolvero moviĝis pli antaŭen kaj estis apogata de la koksa osto. Li rigardis malsupren de si kaj nombris la revolverajn kartoĉojn, kiujn li estis metinta en sian kartoĉozonon. Li iom trankviliĝis, kiam li konstatis, ke la zono ĝis la lasta hoketingo tute estis okupata per kartoĉoj de la kalibro 45, ĉiuj kernoj estas platigitaj kaj per fajlilo noĉitaj. La platigado de la kernoj havis la celon fari pli terura ĉiun pafon trafintan oston de trafito, dume la fajlitaj noĉoj sur la plataĵo servis por ke en tiuj noĉoj kolektiĝu koto kaj mikroboj, kiuj eĉ

negravan karnovundon faris mortiga, pro la infekto. Tial li portis ĉiujn siajn kartoĉojn ĉiam en la zono, por ke ĉia aĉaĵo kroĉiĝu al ĝi.

Kiam la indiĝena kaciko nun tiel sturmante kuris en la oficejon, kun esprimo de hororo sur la vizaĝo, kiel tio estas malofta ĉe indiĝeno, *don* Abelardo sciis per unu fojo, kial la dekmiloj de indiĝenoj tie en la loko kolektiĝis. Sed la tutan seriozecon de la situacio li ne ekkonis. Kiel sekretario kaj kiel reprezentanto de la registaro li supozis sin sufiĉe forta povi trankviligi la minancantan situacion sole helpe de sia aŭtoritato.

## 9/16

Sed Amalio, kiu certe pli ĝuste juĝis la seriozecon de la okazaĵoj sur la placo ol la sekretario, ĉar li ja konis la morojn de sia popolo, ne sentis sin sekura en la oficeja ĉambro.

Li paŝis en la portikon kaj rigardis al truo, tra kiu li povus fuĝi.

Sed en vasta duoncirklo staris kaj kuŝis la amasoj de indiĝenoj kiel netrarompebla muro. Ili estis ankoraŭ sufiĉe malproksimaj de la municipo, tiel, ke Amalio ne povis vidi la unuopajn vizaĝojn de la viroj. Sed sen tio, ke li kapablus legi la mienojn de la viroj pro la distanco, li sentis tamen la senkompaton de la amaso turnata al li mem. Estis al li, kvazaŭ la tuta aro havis nur unu okulon, kaj kvazaŭ tiu okulo estus direktata nur al li, tute fikse kaj senkompate.

Jen Abelardo iris al la pordo kaj diris: „*Don* Amalio, tute ne timu, laŭ dekreto de la registaro kaj laŭ speciala deziro de la registaro vi nepre estu plu en la ofico. Mi nun telefonas al la garnizono, por ke oni tuj sendu skadron de la kavalerio, kun mitraloj. Iru supren

en la lernejan ĉambron, jen vi pli sekuros ol ĉi tie malsupre. Intertempe venos la soldatoj.“

Kontraŭ la ordono de la registaro la kaciko ne povis ribeli. Tion oni traktus en lia kazo kiel malobeemon kontraŭ la registaro. Kaj li eble estus enprizonigita dum jaroj. Povus eĉ okazi io pli malica, se juĝisto lian malobeemon kontraŭ precipa dekreto de la guberniestro estus rigardinta kiel provitan ribelon kontraŭ la ŝtata potenco, jen oni pafmortigus lin. La okazon, demeti la oficon, li preterlasis.

Sed sendepende de la ordono de la registaro ne permesis al li la obstineco de sia indiĝena karaktero kaj lia honoro kiel viro cedi en la momento de minacanta danĝero kaj klarigi sin venkita. Per tia konduto li estus tiom malhonorigita en sia parencaro kaj en la nacio, ke li devus forlasi la nacion, se li ne preferus iri en la ĝangalon kaj tie libervole malsatmorti aŭ lasi disŝiri sin de jaguaroj.

El la situacio, en kiu li nun troviĝis, ne eblis fuĝo. Estis nur unu elirvojo prokrasti la okazaĵojn, se la soldatoj venus kaj gardus lin.

## 9/17

En la supra etaĝo de la municipo troviĝis je unu flanko la lerneja ĉambro kaj je alia flanko hotelĉambro por oficistoj kaj komercistoj vizitantaj la lokon. Je la orienta flanko de la domo ekstere troviĝis ligna ŝtuparo al la supra etaĝo. La supra etaĝo havis malfermitan verandon ĉirkaŭ la domo. Nek la lernejo, nek la hotelĉambro havis fenestron, la lumo al tiuj ejoj venis tra la pordo.

Amalio forlasis la portikon, iris trans angulon de la domo al la

ŝtuparo kaj grimpis supren al la lerneja ĉambro, rigardata de la miloj de homoj, kiuj kuŝis sur la placo.

Eblis, ke la edzino de Amalio samtempe el malproksimo vidis kiel la edzo grimpas supren de la ŝtuparo. Instinkte ŝi sentis, ke tial li iris al la plej supra etaĝo, ĉar malsupre li ne plu sentis sin sekura. Pro tio la edzino ekkonis, ke tio estis certe la lasta ago de ŝia edzo, kiun li povis fari ankoraŭ libervola.

Ŝi kuris al la kabano, prenis kruĉon kun akvo, poton kun tamaloj, faskon da fazeoloj envualitajn en bananfoliojn, kunvokis siajn kvin infanojn kaj kuris transen al la municipo.

Sen interparoli kun la sekretario, kiu laboris telefone por ricevi respondon, ŝi tuj kuris al la ŝtuparo, pelis tien la infanojn antaŭ si, firme kuntiris la tukon sur la brusto, en kiu ŝi portis dorsflanke la bebon, kaptis kaj ŝovis inter la brakojn la kruĉojn kaj la manĝon, kiujn ŝi demetis por certa tempo sur la plej malsupran ŝtupon, ĉar la tuko super la brusto loziĝis pro la rapida kurado, kaj sekvis la infanojn supren en la lernejan ĉambron.

Neniu el la miloj de homoj, inter kiuj la edzino kun siaj infanoj devis tragliti, parolis al ŝi. Neniu haltis ŝin dum la kurado. Kiam ŝi kunpuŝiĝis kun la amasoj, tuj formiĝis trairejo por ŝi. Nur ŝi sole eble divenis, ĉu la trairejo eble tiel rapide ekestis, por ke neniu devos tuŝi ŝin aŭ ĉu la trairejo tial tiel rapide formiĝis, ĉar oni volis faciligi la fuĝon.

## 9/18

La kolono kun la elektita nova tribestro en la aro intertempe ĝoje kaj kun gaja kuraĝo marŝis plu, rekte al la municipo.

La grupo iris senafliktite sur sia vojo, kvazaŭ scius neniu el ili, kio okazas en la municipo. Ĉion tion, kio ĝis nun estis parolata pri la dekreto kaj la restado de Amalio en la ofico, traktis ŝajne neniu serioze, se oni juĝus tion laŭ la konduto de tiu kolono. Ili agis, kvazaŭ ne ekzistus dekreto. Ili avancis tiel, kiel jam de centoj de jaroj antaŭenpaŝis la grupo, kiu ĉiufoje enoficigis la novan tribestron. Ili agis obeante al siaj malnovaj elprovitaj moroj. Kaj ĉar ili ne povis ekkoni aŭ pensi ion en sia agado, kio povus damaĝi al iu, ĉu li apartenas ĉu ne al tiu nacio aŭ al alia nacio aŭ eble eĉ al alia raso. Tial neniu povus konvinki ilin, ke ili tiel entreprenis ribelon aŭ krimis ion aŭ iel alie fiagis aŭ agadis kontraŭleĝe. Ili ne miksiĝis en la politikajn morojn kaj kutimojn de la meksikanoj kaj tial ili ne povis akcepti, ke ili ribelas, nur ĉar ili ne permesas al la meksikanoj, ke tiuj miksiĝu en iliajn politikajn kutimojn, kaj ke oni ŝanĝu ties pramalnovajn balotmetodojn pro pura kaprico kaj kun perforto.

Sen tio, ke estis blovita signalo, sen tio, ke iu svingadis flagon, subite ĉesis kvazaŭ per unu bato la zumado, la bruado, la kriĉado kaj muzikado de la dekmiloj da kolektiĝintaj indiĝenoj. Timoplena premanta silento plenigis la placon. Oni aŭskultis nur de tempo al tempo grakadon de bebo, kiu apenaŭ komencinta, falis en la ĝeneralan silenton, ĉar la patrino trankviligis la bebon. Kelkaj hundoj provis boji, sed ili mutiĝis kun subita ekhurleto, ĉar la mastroj evidente per piedbato silentigis ilin.

Nur la kolono kun la nova tribesto plu viglis. Ili marŝis seninterrompe al la celo.

En la kolono oni faris muzikon, parte kantis kaj ĝoje bruis. Tie oni svingadis tien kaj tien la flagojn, kelkajn kun meksikaj koloroj kaj la meksika aglo sur ili, aliajn kun bildoj de Dipatrino kaj kun surkudritaj sanktulaj bildoj, gaje kaj inter alvokaj krioj. Antaŭ la

kolono kaj en la flankoj troviĝis viroj kun verdaj skarpoj, kiuj ne marŝis, sed en speco de duondanco saltetis tien kaj tien, gestadis kaj aldone kantis monotone. Kelkaj el tiuj dancistoj havis morne kolerajn maskojn antaŭ siaj vizaĝoj. Maskoj kun la vizaĝo de jaguaro, aliaj kun la vizaĝoj de demonoj, kun grandaj bovokornoj supre surmetitaj. Tiuj ordigantoj de la marŝkolono portis skurĝojn, kiujn ili ŝajne kolere klakigis en la aero.

La kampanta amaso el homoj formis tre vastan trairejon por liberigi la vojon de la kolono de ĉiu malhelpo sen tio, ke la ordigantoj per voko postulis ion de ili.

## 9/19

Estis kutimo, ke la transdono de la ofico okazis en la antaŭa portiko de la municipo; en tiu portiko, tra kiu oni atingis la ofican ĉambron.

La sekretario kompreneble ne havis decidajn vorton aŭ agoaŭtoritaton pri tiu transdono de la ofico, kiu estis de pratempoj la afero de la indiĝenoj mem. Li estis nur spektanto. Lia tuta agado limigis sin pri tio, ke li konstatis, post kiam estis finita la ofictransdono, la nomon de la nova *jefe* kaj raportis ĝin al la registaro, por ke tiu povu doni sian konfirmon.

Sed ĉifoje la kolono ne marŝis al la antaŭa portiko, sed ĝi marŝis al tiu flanko de la municipo, kie troviĝis la ŝtuparo al la lerneja ĉambro.

En la amaso de la indiĝenoj, kiuj kampadis sur vaste etendiĝanta placo, nun ekkoneblis moviĝo. Granda parto de tiu homamaso kampadis antaŭ la antaŭa portiko. Tiuj aroj transiris nun en la

dorso de la amaso al la orienta flanko de la municipo por esti vidalvide al la ceremonio.

Sed la migrado de tiu amasa parto okazis sen bruo kaj sen alvokoj. Kaj ĉar tiu transiĝo de la plimulto de la amaso okazis tiel kviete, la impreso, kiun *don* Abelardo ricevis, tiom afliktis lin, ke li deprenis sian selon kaj la rimenojn de la fosto kun la intenco fuĝi. Li fermis ĉiujn pordojn kaj riglis ĉiun kun transversa trabo. Li iris al la kuirejo kaj diris al sia edzino, kiu balancis sian plej junan idon sur la genuoj, ke ili pretiĝu, ĉar li pensis, ke estas pli bone, se ili fuĝos, tiom longe, kiom tio eblos ankoraŭ. Li sendis sian dekjaran knabon sur la paŝtejon, por ke li serĉu kaj alkonduku la ĉevalojn.

*Don* Abelardo observis la okazaĵojn sur la placo tra la fendoj de la pordoj. Li rimarkis nun, ke kelkaj indiĝenaj knaboj atentigis siajn patrojn pri tio, ke lia knabo de la domo kuris al la paŝtejo.

Sed la indiĝenoj tute ne atentis tiun novaĵon. Ili eĉ ne per turnado de la vizaĝo sekvis al tiu direkto, al kiu iliaj ekscititaj knaboj mangestis. El tio konkludis *don* Abelardo, ke neniu havis iun intereson je lia persono kaj, ke lia familio estas des pli sekura.

Jam dum duono de horo li plurfoje provis ricevi telefonan konekton kun la garnizono en Jovel. Kelkfoje li havis iomete da kontakto. La indiĝenoj do ne distranĉis la telefonlinion. Tiu fakto plifortigis lin pri la opinio, ke la indiĝenoj ne troviĝas en malferma kaj malamika ribelo kontraŭ la registaro.

## 9/20

La telefonlinioj en tiuj malproksimaj regionoj estis en tia stato de sovaĝiĝo, ke oni ne plu demandas tie, ĉu oni troviĝas en civilizita

lando ĉu ne. Oni ofte trovis la telefonliniojn en distanco de kilometroj kuŝantajn sur tero. La telefonlinion oni ne fiksas al specialaj fostoj. Nur en regionoj, kiuj estas puraj urboj, oni starigas specialajn fostojn. Tiuj fostoj estas arboj, kiuj estis dehakitaj en la plej proksima vepro. Ili estas kurbigitaj, oblikvaj kaj torditaj, miskreskintaj, do tiel, kiel arboj kreskas en la vepro. Tiujn arbotrunkojn oni ne senŝeligas. Estus tro da laboro. Oni enbatas ilin tiel, kiel ili estas. Kaj ĉar oni ne senŝeligas ilin aŭ iel ajn traktas plu, tial ili ofte ekradikiĝas kaj verdiĝas, ofte mankas porcelanaj izoliloj aŭ oni disbatis la porcelanaĵojn, oni tiukaze simple volvas la draton supre ĉirkaŭ la trunkon.

Ĉar la fostoj, tiel neglekte kiel tio eblas, estis enbatitaj, tial duono de ili ĉe la unua forta vintro tuj renversiĝas kaj la drato ekkuŝas sur tero.

Tie, kie la telefonlinio etendiĝas tra la ĝangalo kaj tra arbara tereno, oni tute ne starigas fostojn, sed la linio simple estas fiksata al la arboj, kun aŭ sen porcelanaj izoliloj, ĉiam laŭ tio, ĉu la provizo de porcelanaj izoliloj sufiĉis aŭ ĉu la flegantoj de la linioj estis bonhumuraj aŭ fihumuraj.

La uraganoj, kiuj de tempo al tempo subite ekestas en la tropikaj zonoj, ofte elradikigas kaj forbalaas eĉ la plej pezajn arbojn. Do ankaŭ arbojn, je kiuj troviĝas telefonlinioj; ĉar la uraganoj kutime ne tre konsideras tion, ĉu la homoj havas telefonon ĉu ne. Eĉ se la arboj ne havas telefonliniojn je siaj trunkoj, sed nur ties branĉoj falas sur aliajn sinkantajn arbojn, ili falas sur linion kaj ŝiras la linion teren aŭ sur malsekan arbustaĵon.
La indiĝenoj, kiuj iras sur certa vojo, renkontas la linion kuŝantan sur la tero, ili povus levi tie kaj tie la linion kaj refiksi ĝin provizore je arbo. Ili eble eĉ farus tion, nur pro helpopreteco. Sed, se ĵus alvenas oficisto aŭ milita patrolo sur vojo, dum indiĝeno

faras ion ĉe la linio, tiukaze oni tuj pafmortigas lin je la sama loko, egale kiun senkulpigon li prezentus, ĉar leviĝis la suspekto, ke la indiĝeno volis detrui la telefonlinion. Ĉar ĉiu indiĝeno scias tion, li preteriras en granda cirklo la telefonlinion, kiu falis malsupren.

Sed ankaŭ bienuloj kaj posedantoj de haciendoj sur ĉevaloj pretervagas survoje, edukitaj homoj, kiuj tute precize scias, kiom da valoro havas la telefono por la instancoj kaj en la okazo de malsano por la alvokado de kuracisto, do por ili persone. Sed ili neniam penas deseliĝi de la ĉevalo kaj levi la telefonlinion. Se ili kunhavas servistoknabon, tiukaze ili eble komisias lin, ke li levu la telefonlinion kaj metu ĝin sur la sekvan verdan arbuston ĉe la vojo. Plej ofte ili eĉ ne lasas halti sian servistoknabon, sed ili diras al si: „Kial koncernu la telefonlinio ĝuste min? Mi havas aliajn zorgojn.“

Tial sekretario fakte devas danki al multnombraj hazardoj, kiuj kunpuŝiĝas tre bonŝance, ja devas tiel bonŝance kunpuŝiĝi, se sekretario ekhavas telefonan konekton ĝuste tiam, kiam li bezonas ĝin. Li ricevas la konekton plej ofte nur tiam, kiam la tuta afero, kiun li volis reguli per la telefono, jam estas ordigita pere de heroldo. Ofte sekretario sidas dum la tuta tago ĉe la telefono kaj atendas la favoran momenton, se ĉiuj arboj kaj arbustoj estas oste sekaj kaj neniu terkonekto ĝenas la kontakton. Se sekretario je la frua mateno, kiam la peza roso ŝarĝas arbojn, arbustojn kaj herbojn, atingas telefonan konekton, li rigardas tion kiel tian raran okazaĵon, ke li rakontas tiun aferon dum la resto de sia vivo kiel la plej grandan miraklon, kiu iam ajn okazis al li.
Kial tia malproksima ŝtato kun tia malatento pri la plej simplaj konstrureguloj de telefonlinio entute aranĝas kaj vivtenas telefonlinion, estus tute neimagebla kaj tute ne komprenebla, se oni ne konus la esencan motivon de la melodio. La ŝtato deziras esti rigardata kiel civilizita ŝtato. Tial troviĝas en statistiko de la

ŝtato la sciigo, ke la ŝtato havas kelkajn milojn de telefonaj linioj. Ĝi havas tiun dekmilon da telefonlinioj. Ĝi havas eĉ kelkajn centojn da kilometroj pli ol tiujn. Sed uzebla telefonlinio estas nur tiukaze, se iam plaĉas al linio permesi esceptokaze lasi uzi sin.

*Don* Abelardo esperis la tagmezon, kiam ĉiu roso forsekiĝis kaj ne falis pluvo, ke li eble povus demandi en Jovel, kion li faru kun tiuj dekmiloj da indiĝenoj, kiuj kamapadas sur la placo.

## 9/21

La suno jam leviĝis kaj ĝi apogis sin nun kun sia suba rando sur la dorso de proksima montoĉeno, kiu limigis la altebenaĵon al oriento.

Precize en tiu momento la grupo kun la novelektita tribestro venis al la flanko de la municipo apud la ŝtuparo.

La malalta tronseĝo kovrita per krude tanitaj bovofeloj kaj la vasta truo en la mezo estis starigata en sufiĉe granda distanco al la municipo por havi la necesan lokon por la spektantoj.

Indiĝeno alportis la argilan poton kaj flamigis la lignokarbon.

La seĝo, la fajropoto, tiel kiel ĉiuj aliaj aĵoj, kiuj necesis por la ceremonio, estis kunportitaj en la grupo.

La viroj kun la flagoj kaj la longaj bastonoj, je kiuj troviĝis buntaj tufoj el plumoj, starigis sin en duoncirklo.

La *capitanes* antaŭenpaŝis, parolis siajn dirojn kaj poste vokis Navidadon, la novan tribestron, ke li paŝu antaŭen.

Navidad paŝis en la duoncirklon.

La *capitanes* alvokis la virojn kun la ekleziaj standardoj kaj la landoflago.

Navidad surgenuiĝis. Ĉiu standardoportisto paŝis antaŭ la surgenuan Navidad, svingadis la flagon trifoje tien kaj tien.

Tiam Navidad ekkaptis anguleton de la standardo kaj kisis ĝin.

La *capitanes* post ĉiu kiso faris tri krucosignojn per siaj bastonoj super la kapo de Navidad kaj parolis dum tio mallongan diron.

Kiel ĉiuj diroj parolendaj en la ceremonio, ankaŭ tiuj estis parolataj en indiĝena lingvo.

La diroj, kiuj estis parolataj, kiam oni faris la krucosignojn super Navidad, estis prenitaj el katolikaj ceremonioj aŭ almenaŭ sufiĉe multe miksitaj kun katolikaj preĝoformoj. Ĉar oni aŭdis inter la indiĝenaj vortoj, la vortojn Maria, avemario, *pro nobis* kaj kelkajn aliajn hebreajn kaj latinajn lingverojn.

Nun la *Primero Capitano*, la ĉefa ceremoniestro, prezentis sin. Li portis du skarpojn transverse de la brusto kaj li havis buntajn silkorubandojn sur sia ĉapelo. Per la dekstra mano li portis longan bastonon, je kiu troviĝis supre dika tufo el longaj buntaj plumoj.
En unu el la diroj, kiujn li parolis kun monotona kvazaŭ kantanta intonacio, li alvokis Amalion, la aktualan tribestron antaŭenpaŝi por esti salutata, por saluti la novan tribestron kaj transdoni al li la ofican bastonon.

La moro postulis, ke tiam aperu, dum la diro estas parolata, la

malnova tribestro kun la ofica bastono en sia dekstra mano. Se la diro estus parolita, la nova tribestro devus respondi. Li simile per diroj salutus la unuan estron, tiam la ceterajn estrojn kaj fine ĉiujn virojn, al kiuj li dankus por la honoro, kiun ili montras al li per tio, ke ili vizitas lin ĉe tia granda okazaĵo.

Post tio li salutus la novan tribestron kaj dirus, ke li sentas sin tre honorata povi transdoni sian oficon al tia inda posteulo, kies honorindeco, saĝo, kuraĝo kaj riĉa vivosperto estas tre konata al ĉiu viro en ĉiu *barrio* de la altvalora nacio. Li aldonus, ke li ne kapablis pro sia malforto plenumi ĉion tion, kion la nacio atendis de li, kvankam li tre penis ĉiam esti justa al ĉiu; sed ke li esperas, ke lia tiom inda kaj respektata posteulo administros multe pli bone kaj multe pli sukcese la oficon transdonatan nun laŭ la moroj de sia popolo, ol li povus fari tion mem.

Post kiam tio estus dirita, la nova tribestro devus paŝi antaŭen kaj surgenuiĝi antaŭ la eksiĝonta *jefe*. La eksiĝonta tribestro batus tiam kun la bastono trifoje la krucosignon super la kapo de la nova *jefe*, tiam li transdonus la bastonon kaj la nova *jefe* kisus ĝin. Tiam la nova *jefe* prenus la bastonon en la manon, ekstarus kaj paŝus en la lokon, kie la eksiĝonta *jefe* staras, dume tiu tiumomente haltus en tiu loko, kie la nova *jefe* staris antaŭe. Tiam la adiaŭanta *jefe* surgenuiĝus antaŭ la nova *jefe*. La nova *jefe* transdonus la bastonon al li kaj la eksiĝonta *jefe* kisus la bastonon. Tiam la nova *jefe* farus tri krucosignojn kun la bastono super la eksiĝonta *jefe*. Tiu ekstarus, donus al la nova *jefe* la manon kaj tuŝus kun siaj vangoj la vangojn de la nova *jefe* kaj poste retropaŝus por tute retiriĝi el la ceremonio.

La nova *jefe* parolus nun siajn dirojn, kiuj enhavus, ke li, tia malforta kaj eraranta homo, ricevis tian malfacilan oficon; promesas, ke li praktikas tiun novan oficon nur por la bonfarto

de la popolo, kaj ke li estos justa al ĉiu, sen preferi dum tio iun personon.

Se tio estus dirita, komenciĝus la pliaj ceremonioj de la enoficigo.

**Rimarko**
*Ora pro nobis* = Petu por ni! (Alparolado de sanktulo en la latina lingvo.)

## 9/22

Sed ĉiuj tiuj ceremonioj, kiuj deruliĝis de multaj jarcentoj je ĉiu novjara tago ĉiam en la sama maniero kaj formo, ĉifoje ne deruliĝis.

Fremdaj potencoj, kiuj interrilatis kun la homoj tie neniel alie ol nur per frida alproksimiĝo, kiu baziĝas sur tute politika potenco, sentis sin destinitaj ŝanĝi morojn kaj kutimojn laŭ propra bontrovo, por aranĝi la mondon laŭ eŭropeca modelo kaj doni al ĝi per tio la vokon, ke tiu mondo estas nun civilizita kaj ke la Ligo de Nacioj ne havas rajton bari al tiu ĉi mondo la eniron al tiu dignoplena institucio, kiu jam je la vespero de la unua tago de sia ekesto havis sklerozon kaj estis metita en ladoĉerkon.

Kiam la estro finparolis sian diron, la amaso sur la placo ekscitiĝis je la una fojo.

Ĉiuj viroj ekstaris tiel, kvazaŭ ili sekvus ordonon. Ĉiuj okuloj turniĝis al la pordo de la lerneja ĉambro supre sur la verando. La pordo restis fermita. La *jefe,* kiu eksiĝu, ne paŝis antaŭen kun la ofica bastono.

Por tia okazaĵo la ceremoniestroj ne havis pretan rimitan diron.

Ĉar tia konduto de eksiĝenda tribestro neniam estis atendita. Tia okazaĵo ankaŭ ne okazus, se la popolo plu povus esti fidela al siaj malnovaj kutimoj, ĝis kiam ĝi mem decidus, ke la novaj ekonomiaj rilatoj devas obei novajn kutimojn.

La *capitanes* iris nun tute sen ceremonio supren, tion ili faris rapide kaj rezolute. Ili frapis laŭte la pordon kaj kriis, ke Amalio elvenu, ĉar ili devas paroli kun li.

Amalio ja akceptis, ke la pordo neniukaze povos plu protekti lin.

Li malfermis kaj elvenis.

Per simplaj kaj ne rimitaj vortoj diris nun la estroj al li, ke ili venis por enoficigi la novan *jefe* kaj, ke ili insiste petas lin transdoni la ofican bastonon, tiel kiel estas moro kaj kiel ordonas tion lia devo.

Eble Amalio nun estus preta transdoni la bastonon kaj poste trankvile iri hejmen. Sed lia honoro certe ne permesus tion, ke li nun cedas al la viroj, kiuj staras minacante antaŭ li kaj en momento, kiam ĉiu en la nacio dirus, ke li cedis en tiu momento nur pro dentklakada timo al la postuloj, ĉar li vidis, ke la situacio fariĝis danĝera por li kaj la soldatoj ankoraŭ ne estis videblaj.

Li klarigis, ke la guberniestro ordonis dekreton, kaj ke li pro tiu dekreto ankoraŭ estos plian jaron en la ofico, ĉu tio plaĉas al la nacio ĉu ne. Li aldonis, ke li obeas la registaron kaj ne la nacion, kaj ke li faros tion, kion la guberniestro ordonis al li.

Al tio diris la viroj, ke ili donos du horojn da tempo al li, por ke li trankvile pripensu ĉion, sed ke ili atendos post du horoj, ke li obeos la morojn kaj kutimojn de la nacio, al kiu li dankas sian

vivon kaj sian ekziston, kaj kiu honoris lin per tio, ke ĝi elektis lin en la antaŭa jaro kiel tribestron. Ili diris plu: „Kion la registaro aŭ la guberniestro faros kontraŭ vi aŭ ni, se ni ne sekvos la dekreton, tion ni unue atendu. Se io okazos flanke de la registaro, tiukaze ni donos nian respondon, tiam estos sufiĉe da tempo por tio. Sed nun kaj en tiu ĉi momento vi devos fari tion, kion la nacio atendas de vi. Kaj tio estas, ke vi devos transdoni vian oficon al la laŭrajte elektikta nova *jefe*, do al Navidad. Vi ĉion tion pripensu dum tiuj du horoj, kio sekve de via perfido eventuale okazu al la nacio kaj kio okazos. Post du horoj ne plu estos nova pripensa tempo. Tiam ni agos. Kaj tion vi scias. Estas sufiĉe aĉe, ke vi pelis la aferon ĝis tiu ĉi punkto, ke la festo estas fuŝita. Jam nur tio neniam estos forgesita al vi, kvankam ni pretas rigardi tion nur kiel eraron.“

Sen atendi lian respondon, la viroj grimpis la ŝtuparon malsupren kaj iris al sia grupo. La grupo ekkamapadis proksime de la ŝtuparo.

Neniu el la amaso de la indiĝenoj scivole proksimiĝis por ekscii, kion diris *don* Amalio. Kaj eĉ en tiu grupo neniu parolis pri la interparolado. La viroj fumis, babilis kaj ridis. Oni muzikis. Je multaj lokoj de la placo oni dancis. La infanoj petoladis kriĉante tien kaj tien.

## 9/23

Tuta horo eble pasis, kiam Amalio malsupreniris la ŝtuparon.

La viroj de la grupo plu kaŭris sur la tero.

Ili nur rigardis supren kvazaŭ ili atendus, ke li parolos al ili por sciigi, ke li decidis sin.

Je la fino de la ŝtuparo Amalio haltis. La ofican bastonon li havis en la mano.

Li demandis, ĉu la viroj havas ion kontraŭ tio, ke li iros al la sekretario por paroli kun li.

La *capitano* klarigis, ke li povas iri tien, kien li volas, ke li estas tute libera paroli kun tiu, al kiu plaĉas al li, kaj kio plaĉas al li, kaj ke ili havos denove intereson je li nur post la fino de la du horoj. Kion li intencos fari dum tiuj du horoj, estis laŭ la estro afero lia, kaj estis ankaŭ lia afero, ke li rajtas interkonsiliĝi kun kiu ajn li volas. Sed oni ne permesos al li forlasi la placon sen transdono de la ofica bastono. Se li volas, li povas transdoni la ofican bastonon sen ĉia ceremonio. Sed transdoni li devos ĝin antaŭ ol li povos forlasi la placon.

Amalio iris al la norda flanko de la municipo kaj frapis al la pordo de la oficeja ĉambro, samtempe vokante, ke li, Amalio, estas ĉe la pordo por paroli kun la sekretario.

*Don* Abelardo malfermis la pordon je fendeto kaj enlasis Amalion.

„Sinjoro sekretario“, diris Amalio, „mi ne scias, kion fari, la situacio estas tre danĝera, ĉu vi ne pensas, ke estos pli bone, se mi cedos?

La sekretario, kiu de tiu momento, kiam lia knabo sen danĝero rajtis iri al la paŝtejo por rekonduki la ĉevalojn, precize sciis, ke lia felo estos sekura, kaj ke tiukaze, se iu estos la viktimo, ne estos li, sed Amalio, diris: „*Don* Amalio, tion vi ne rajtas. Vi ne devas cedi al tiuj ribeluloj. Vi estas *presidente*, vi estas oficisto kaj devas elteni en via posteno. Kiel oficisto vi devas obei la dekreton de la

guberniestro. Se vi ne faros tion, oni mortpafos vin pro rezisto kontraŭ ordono de la registaro. Mi ĵus ricevis konekton kun Jovel. La soldatoj, eskadrono de la kavalerio kun tri mitraloj estas jam sur la vojo ĉi tien. Ja ne timu, la tuta meksika registaro subtenas vin kun sia tuta armea forto por vin protekti.“

Paroli pri la tuta armea forto sonis bele kaj svingoplene, estis same tiom lirike kaj cerbokonfuzige kiel la bombasta diro, ke la popolo marŝas kontraŭ la malamiko. Tio sonas laŭte fanfare, se pompas kun grasaj literoj transvere de la unua paĝo sur la ekstraj gazetaj eldonoj. Ankaŭ la firme starantaj kontraŭ-io-kaj ĉio-uloj falas vidalvide al tia bombasta diro glate sur la dorsan spinon, kiu dek du horojn antaŭe fariĝis kaŭĉuko pro oportunaj negocoj kaj tial, pro neatendita okazo, ne plu rompeblas.

Amalion tiu bela frazaĉo pri la tuta armea forto tute ne impresis. La plena armea forto, kiun li konis, estis ne pli granda ol bataliono. Li sciis la distancon de la loko al la garnizono kaj li konis sian popolon. Se interne de dek minutoj la armeo ne aperos sur la placo, jen por li estus tute sen diferenco, ĉu la armea forto de la registaro konsistas nur el ses viroj kaj serĝento aŭ el kvincent mil bone dresitaj soldatoj. Li hezitis iom kaj volis demandi, ĉu li rajtas restadi en la oficeja ĉambro de la sekretario. Sed la sekretario delonge komprenis, ke tia afableco al gasto povus fariĝi danĝera. Facile bato preteriras la celon, se la batoj okazas en la sama ĉambro. Kaj se batoj zigzage flugadas en la aero, ili kutime ne havas tempon longe pripensi antaŭe, ĉu ili pro hazardo hajlos malsupren sur sekretarion, ĉu ne.

Tial *don* Abelardo tute ne lasis la okazon al la indiĝeno demandi pri tia gastamikeco. Li diris ĝustatempe: „Estas plej bone por vi, *don* Amalio, ke vi nun denove iru supren en la lernejan ĉambron. Vi estas ĉi tie en mia oficejo sen viaj delegitoj. Tio facile povus

veki la suspekton, ke ni ambaŭ ĉi tie elpensas ion malbonan kontraŭ la nacio. Ion tian oni povus rigardi kiel grandan fiaĵon de vi, kaj kontraŭ mi oni povus meti plendon pri nehonesta ofica agado pro neleĝa prefero de persono. Iru tute trankvile al la lernejo. Okazos nenio al vi. Vi estas sub la plena protekto de la guberniestro.“

La indiĝeno iris al la pordo sen diri ankoraŭ plian vorton.

*Don* Abelardo ree malfermis la pordon je fendeto, tiel, ke Amalio iel sukcesis ankoraŭ trabaraktiĝi. Tuj, kiam la indiĝeno premis sin eksteren, la sekretario tuj refermis la pordon kaj forte riglis ĝin.

Ne afliktis lin, ke li mensogis al la indiĝeno. Ĝis nun li ankoraŭ ne ricevis konekton al Jovel, kaj tial ankaŭ ankoraŭ ne marŝis soldatoj por leĝigi la kapricon de monavida guberniestro per mitraloj.

La malnovaj moroj de la indiĝena nacio estis vaste ekstere de ĉiu vidpunkto de la guberniestro. Kaj tial li supozis, ke dekreto de li povas ŝanĝi la morojn de popolo kvazaŭ dum unu nokto.

Amalio ree iris supren sur la ŝtuparo sen tio, ke iu ajn malhelpis tion, aŭ ke iu pridemandis lin.

Ŝajne atentis lin neniu.

La grupo, kiu malsupre kampadis ĉe la ŝtuparo lasis ĝeni sin neniel. Oni plu babilis, kaj kelkaj junaj viroj gaje muzikis per buŝharmonikoj kaj gitaroj.

Tio faris la impreson, kvazaŭ la homamaso sur la placo fariĝis pli

ĝoja. En multaj grupoj komenciĝis la kutimaj dancoj.

## 9/24

Sed tiam, kvazaŭ per unu fojo, la homamaso falis en afliktigan silenton. Ĉiu amuzo estis finita.

Multnombraj grupoj vigliĝis kaj surpakis siajn aĵojn. Oni alvokis la infanojn kaj retenis ilin proksime de la gepatroj. Oni envolvis la bebojn kaj ligis ĉiun sur dorson.

La viroj surmetis siajn pakaĵojn.

Sed ĉiuj ankoraŭ sidis.

Ĉiuj okuloj turniĝis nun al la municipo.

La grupo, kiu venis kun la novelektita tribestro, ekstaris kaj retroiris pli ol dudek paŝojn de la ŝtuparo.

Nun la tri *capitanes* antaŭenpaŝis kaj iris al la ŝtuparo.

Ili vokis de malsupre laŭte supren: „Amalio, la du horoj pasis. Ni venis por transpreni la ofican bastonon kaj transdoni ĝin al la nova tribestro Navidad. Navidad laŭrajte estas elektita laŭ la moroj de la plenkreskintaj viroj de nia *barrio.*“

Amalio elpaŝis jam el la lerneja ĉambro kaĵ staris nun ĉe la balustrado de la ŝtuparo. Kiam la estroj jam finparolis, li diris: „La dekreto de la guberniestro ordonas al mi ne transdoni la bastonon, sed reteni ĝin dum plia jaro.“

Nek la *capitanes* nek iu alia en la grupo respondis ion pri tio.

Sed, kvazaŭ la tuta popolamaso aŭdis ĉiun vorton sur la placo, kiun Amalio diris, nun ĉiuj tiuj dekmil viroj ekstaris.

Estus kiel liberigo el premanta sufokiteco, se la viroj estus kriintaj aŭ kriaĉintaj. Sed ili silentis plu. Nur kelkaj beboj laŭte ploris kaj kelkaj hundoj bojis, vekitaj kaj surpiedigitaj, ektimigite pro la leviĝo de la amaso.

Kaj nun elsaltis ne el la grupo de la komisiitoj, sed el alia grupo, kelkaj junaj viroj, kiuj antaŭe kampadis kiel algluitaj tute malantaŭe ĉe la ekstera rando en angulo de la ondanta homamaso.

Ili kuris en densa aro. Tial oni ne povis nombri kiom da ili estas. Eble estis ses viroj, eble dek.

Parte kiel fuĝantaj kapreoloj, parte kiel atakantaj tigroj, ili jetiĝis kvazaŭ furioze impete atakante antaŭen, ĉirkaŭ la amason de la indiĝenoj al la municipo.

Ili efektive ne kuris antaŭen, sed sagis antaŭen per longaj saltoj. Iliaj korpoj kliniĝis proksime al la tero, dum ili jetiĝis antaŭen.

Ĉiu el ili havis maĉeton ĉemane. Dum la kurado tiuj maĉetoj tre antaŭis la korpojn.

La viroj estis nudapiedaj. La gamboj nudaj ĝis supren al la pugo. Ĉirkaŭ la supra korpoparto pufiĝis flikitaj, sed purlavitaj bluzoformaj blankaj ĉemizoj, kiuj estis suprenŝovitaj preskaŭ ĝispuge kaj tie kunnoditaj.

Tiel dense kunigitaj la kurantoj moviĝis dum sia kvazaŭa ĉasado, ke neniu el la amaso povis ekkoni la vizaĝon de individuo. Sekve

de la impeto de iliaj saltegoj kaj saltoj la vizaĝoj de ĉiuj kurantoj estis tute torditaj. Iliaj buŝoj estis vaste malfermitaj, kaj iliaj okuloj estis kunpinĉitaj al strioj. Forta ekscitiĝo formis la fruntojn tiel, ke ekestis fortaj kaj malhelaj haŭtsulketoj. Ilia longa kaj fortika nigra hararo flirtadis ĉirkaŭ iliaj kapoj. Ĉio tio ŝanĝis iliajn vizaĝojn tiom, ke apenaŭ troveblis spuro de iliaj efektivaj vizaĝoj.

Estis nur sekundoj, kiujn ili bezonis por veni de ilia malproksima randogrupo ĝis la ŝtuparo.

La ŝtuparon ili surgrimpis per du saltoj. Tiam ili estis sur la verando.

Amalio, kiu povis rigardi la amason de sur la verando ĝis la plej malproksimaj grupoj, rimarkis la suprensaltadon de tiuj viroj. Li sciis tuj, kion tio signifas.

Li fuĝis en la lernejan ĉambron, vokis rapidan vorton al siaj edzino kaj infanoj kaj firme fermtiris la pordon.

La pordo havis nur pendoseruron eksteran. De interne ĝi estis tenata per fermtordilo el ligno, kiun oni fiksis tie, por ke vojaĝantoj, kiuj tranoktas en la lerneja ĉambro, ankaŭ de interne provizore povu fermi la pordon.

Du el la viroj ĵetis sin per siaj ŝultroj kontraŭ la pordon. La pordo tuj tiel forte malfermiĝis, ke ĝi estis tirita el siaj duraj lignaj hinĝoj.

Terura ŝrika krio, kiu disŝiris la silenton sur la placo tiel, kvazaŭ ĝi volus disŝiri la aeron per rapida bato, fajfante elsagis el la lerneja ĉambro en la homamason.

La krio estis elpuŝita de la edzino de Amalio. Estis la sola sono, kiu atingis la homamason sur la placo.

La grupo de la nova tribestro, kiu staris plej proksime al la municipo, aŭdis nur rapidan brueton el la lerneja ĉambro kaj obtuzan faladon de korpoj.

Kvazaŭ dum ono de sekundo staris unu el la viroj ĉe la balustrado de la verando kaj vokis: *„Ahora!“* kaj ĵetis la ofican bastonon tiel lerte al la unua estro, ke tiu povis kapti ĝin permane sen tio, ke ĝi falis teren.

La grupo de la nova tribestro rigardis tion kiel bonŝancan signon; ĉar ĝi estas hontiga, se la ofica bastono de tribestro ie kaj iam kuŝas sur la tero. La tribestra bastono, kiu estas por la indiĝeno tia inda, ja sankta simbolo kiel por la reĝo de civilizita lando la sceptro, devas ĉiam troviĝi en la manoj de tribestro, kaj kiam la tribestro laboras aŭ kuŝigas sin por dormo, la ofica bastono estas metenda aŭ sur domaltareton antaŭ la bildo de la sanktulo aŭ ligenda per kaptuko de la indiĝeno aŭ per lia lana *sash*, la vestozono, kiun li portas dum la tago ĉirkaŭ la koksoj, al la kruco, kiu troviĝas starigita en la kabano de la tribestro.

La viro, kiu kiel fantomo dum kvarono de sekundo staris je la balustrado tuj foriĝis.

Kaj nun flugis el la lerneja ĉambro trans la balustradon de la verando unue la fortranĉita kapo de Amalio, tiam la kapoj de lia edzino kaj la kapoj de liaj infanoj sur la herbejon de la placo. Tuj poste sekvis la dishakitaj korpopartoj de la senkapigitoj.

Ĉio ĉi okazis tiel rapide, ke ĝi devis aspekti kiel kaosa sonĝo por ĉiuj homoj, kiuj estis turnintaj siajn okulojn al la municipo.

Ekde tiu momento, kiam la sturmintaj indiĝenoj venis al la piedo de la ŝtuparo, ĝis tiu momento, kiam la lasta dishakita korpoparto estis ĵetita en granda cirklo trans la balustradon, pasis certe ne pli ol dek sekundoj.

Kaj nun eliris la aliaj viroj. Sed ne estis vere elirado.

Ili saltis en kuna grupo kun unu salto trans la balustradon, ruliĝis kelkajn fojojn sur la herbejo, saltis rande preter la amaso kun siaj grandaj saltoj, kaj antaŭ ol ili kapteblis per okuloj, ili jam foriĝis en la vepro, kiu finiĝis je tiu flanko de la placo.

Ĉiuj viroj en la amaso, kiuj ial ne staris ĝis tiam, tiumomente ekstaris. Ankaŭ la edzinoj. Kelkaj tenis siajn infanojn alte.

Ĉiuj okuloj turniĝis al la nova tribestro.

La *capitanes* levis lin supren sur siajn ŝultrojn, por ke li estu vidata de ĉiuj anoj de la nacio.

Alte per sia dekstra mano li tenis la ofican bastonon kun la arĝenta bulo sur ĝi kaj kun la nigra silka kvasto sub la bulo volvita ĉirkaŭ la bastono. La nigra silka kvasto estis la signo, ke la bastono ne apartenas al malgranda pueblo aŭ nur al tribeto, sed al granda nacio, kiu konsistas el pluraj triboj kaj *barrios*.

Kiam Navidad nun svingadis la bastonon kelkfoje tien kaj tien por saluti la virojn de la nacio, leviĝis ununura jubilkrio de dekmiloj da indiĝenoj, viroj, edzinoj kaj infanoj.

Estis la ĝoja venkokrio de popolo, kiu spitis al fremda potenco, kiu volis influi ties sorton. La spitokrio de la indiĝenoj kontraŭ la

tiraneco kaj avido de fremda kaj ne bonvena raso.

**Rimarkoj**
*ahora* = (ĉe Traven ‚ahoa', supozeble skriberaro por la hispana ‚ahora': nun, de nun
*sash* (arabe: شاش, *shash*) estas vesta zono por teni kune robon, kaj kutime ligita ĉirkaŭ la koksojn

## 9/25

La homamaso, plene konscia pri tio, kio okazos, jam antaŭe surpakis siajn aĵojn. La venkokrio estis ilia lasta ĝenerala agado kiel kuna popolo.

La lasta elspiro de ilia spitokrio, de la ununura nacia kanto, kiun ili konis kaj kapablis kanti, ŝvebis ankoraŭ super la homoj, kiam jam komencis disiri la dekmiloj da homoj.

Ili fariĝis tiumomente denove parencaroj, familioj, grupoj kaj individuoj. Ĉiu havis sian propran vojon, parto el ili havis tre penigan vojon trans krutaj montoj, la aliuloj facilan vojon trans ebenaĵoj. Kaj ĉiu devis iri sian propran vojon sola por povi iri plu senobstakle, ĉiam laŭ la tute propra plaĉo kaj la propra elekto kaj prefero.

La popolamaso tiel rapide disiris kaj solviĝis en erojn kaj disajn erojn kun tia hasto, ke post malpli ol tridek minutoj post la ĝojokrio la vasta kampo kuŝis tiom vaka, kvazaŭ vento forbalais ĉiun objekton kaj ĉiun hometon per unu fojo.

Eĉ ne peco de gazeto plu postrestis por pruvi, ke tie sur la granda placo ekde la unuaj horoj de la tago kampadis homoj por neniu alia celo krom evidentigi, ke ili vivas kaj por sciigi, ke ili, tiom

longe kiom ili vivos, defendos tion, kion ili lernis kiel la ĝustan kaj laŭmoran de siaj antaŭuloj.

## Ĉapitro 10

### 10/1

Dum deruliĝis tiuj okazaĵoj sur la placo, la sekretario, lia edzino kaj liaj infanoj surgenuiĝis en la loĝejo antaŭ sia altaro kun la pentraĵo de Dipatrino kaj nombris nervoze la perlojn je la rozarioj, kiujn ili tenis pie kaj plenaj de timo en siaj ŝvitantaj manoj, dum ili petegis arde dezirante Sanktan Virgulinon, ke ŝi protektu ilin kontraŭ la kolero de la *salvajes*, de la sovaĝuloj. Ili ĵurpromesis al Dipatrino, ke ili faros pian pilgrimadon al Tila, krome ili promesis dudek pesojn da kontanta mono kaj po unu peso dek du kandelojn.

Dipatrina Virgulino pro tio havis komprenon al siaj piaj adeptoj kaj aldonis sian parton, ke la indiĝenoj rapide kaj trankvile foriĝu, post kiam ili konvinkiĝis pri tio, ke la ofica bastono estis transdonita en la ĝustajn manojn.

La indiĝenoj pro tiu afero neniam intencis respondecigi la sekretarion. Li ne estis ano de ilia nacio kaj tial ankaŭ ne submetita al la moroj kaj kutimoj de ilia popolo. Estis ilia plano forlasi la placon, tuj post la atingo de la celo. Kaj ili agis laŭ sia plano sen konsidero, ĉu *don* Abelardo kaj lia edzino preĝante nombris la globetojn de rozario ĉu ne. Kun la persona favoro de Sankta Dipatrino ilia nacia kunveno havis nenion komunan.

Tamen *don* Abelardo kaj lia edzino imagis, ke ili nur al Dipatrino kaj al la piaj preĝoformuladoj kaj al materiaj ĵurpromesoj povas

danki, ke la indiĝenoj ne okupiĝis pri la sekretario, sed tiel kondutis kvazaŭ tiu tute ne estus en la mondo.

*Don* Abelardo kaj lia edzino kompreneble ne entreprenis la ĵure promesitan pilgriman vojaĝon, tio, home rigardate, estas komprenebla, ĉar tiu pilgrima vojaĝo estis interplektita kun multaj maloportunaĵoj kaj eĉ kun pli da kostoj. Ili ankaŭ ne oferis la promesitajn dudek pesojn, same kompreneble tial, ĉar kelkajn tagojn poste araba komercisto aperis en la loko, kiu elmetis diversajn belajn robojn, el kiuj unu robo tiom plaĉis al la edzino de la sekretario, ke ŝi klarigis, ke ŝi eĉ pretus morti por la posedo de la robo. Por povi aĉeti ĝin, necesis kunuzi ankaŭ tiujn dudek pesojn. Krome la bildo de Dipatrino devis kontentiĝi en la loĝoĉambro de la sekretario per kutima lampa petrolo, je kiu la geedzoj eĉ plu ŝparis, ĉar la edzino de la sekretario uzis nur tute mincajn meĉojn, kiuj drivis sur ladodisko en petrolo, kaj el kiuj dek du pecoj kostis dek centavojn.

**Rimarko**
*salvajes* = sovaĝuloj

## 10/2

Ankoraŭ je la sama tago sukcesis al la sekretario ricevi telefonan konekton kun Jovel. Tio estis ĉirkaŭ tagmezo.

Sed la garnizona komandanto mem ankoraŭ ne atingeblis, ĉar estis la novjara tago, kaj ĉiun novjaran tagon antaŭas, kiel estas konate, silvestra vespero. Je tiu silvestra vespero partoprenis ankaŭ la garnizona komandanto, li tiel sukcese partoprenis, ke li povis demandi nur je la kvina posttagmeze sian adjutanton, kio intertempe eble okazis ie aliloke.

Pro la bonega telefonlinio, kiu kiel kutime sur tero treniĝis, la telefonparolado alvenis nur kripligita kaj dishakita, en la deĵorĉambron de la komandejo. La sekretario ne havis rektan linion al la komendejo. La interparolado estis perita helpe de telefoncentraloj. Ĉiu peranto pludonis buŝe la raporton. Kaj ĉiu periganto sentis sin rajtigita kaj devigita akcepti kaj pludoni la interparoladon laŭ sia kaprico, laŭ sia temperamento, sia inventa talento kaj sia aŭdokapablo.

Tial alvenis la raporto en la deĵorĉambron de la komandejo tiel, ke kvindek mil indiĝenoj en Pebvil estas en tute flamiĝinta ribelo kontraŭ la registaro, kaj ke ili murdis la kacikon kaj la sekretarion de la centra komunumo kaj ties familianojn.

En la *cuartel, en* la kazerno, ĉeestis nur la gardistoj, ĉar la soldatoj sekve de la novjara festo havis la permeson forlasi la kazernon kaj ne estis revenontaj antaŭ la deka vespere, kaj konsiderinda parto de ili sufiĉe zigzagema.

La komandanto por la novjara tago havis jam aliajn planojn. Li ankaŭ ne volis nenecese eksciti la pacan urbon ŝanceliĝantan en la noktorevo, kio okazus, se li kunblovus per mobilizaj signaloj la soldatojn, kiuj en ĉiuj eblaj anguletoj kaj anguloj ĝojis kun siaj damoj, ke denove komenciĝis nova jaro.

Li estis plifortigita pri sia neŭtrala konduto, kiam malfrue posttagmeze la telefoninterparolado estis korektita per redemandoj kaj montriĝis, ke la indiĝenoj ĉiuj formigris kaj, ke nur la nacia estro, la *jefe* de la indiĝenoj estis murdigita, dum la sekretario, meksikano, vivas kaj persone telefonis.

La komandanto tial ordonis, ke sekvamatene kapitano kun tridek kavaleristoj ekrajdu al Pebvil, por ekscii rekte en la loko, kio fakte

okazis kaj ĉu estas kaŭzo por sendi pli grandan grupon kaj tie kampadi dum certa tempo.

## 10/3

Estis je la posttagmezo de la sekva tago, kiam *don* Gabriel alvenis Pebvilon, li tiutempe rastis la sendependajn vilaĝojn de la indiĝenoj por aĉeti laboristojn por la monterioj.

*Don* Abelardo rakontis la okazaĵojn tiel arde al li, kiel ili ankoraŭ furiozis en lia tuta korpo.

*Don* Gabriel, kiu pro la negoco penis lerni la grandan arton legi la karakteron de homoj el iliaj vizaĝoj kaj ilia konduto por sukcesigi sian agadon, provis tuj uzi la jam lernitajn komencajn ĉasterenajn lecionojn de tiu scienco. Kompreneble necesas diri, ke *don* Gabriel nur supozis uzi novan sciencon, ĉar la vero estis, ke li sufiĉe longe konis *don* Abelardon por scii kiel li devas trakti lin por trovi la nodon de la vivo, tio estas por li negocoj, kiuj enspezigas monon.
Li diris, kiam *don* Abelardo jam malŝarĝis sian animon kaj sian korpon per rakontado: „Mi devas diri, *don* Abelardo, ke mi admiras vin pro tiu eksterordinara persona kuraĝo, kiun vi montris vidalvide al tridek mil ribelantaj indiĝenoj. Mi supozas, ke la tuta meksika historio ne konas ununuran duan ekzemplon de tia sangofrideco kaj kuraĝo kontraŭ miloj de murdavidaj indiĝenoj. Kiel vi tion realigis, ĝuste en tiu momento, kiam la manoj de la sovaĝuloj ankoraŭ gutis pro la sango de la ekzekutitoj, kiel vi sola, ja tute sola kaj sen revolvero rekte kaj senkaŝe paŝis el la pordo kaj iris sur la placon kaj vokis, ke la amaso refariĝu prudenta kaj kiel vi donis al ili sangofride la ordonon, ke ili iru hejmen kaj, ke ili iru en ordo kaj en paco, tio estas admirinda. Mi certe ne kapablus tion. Mi estus rampinta

kun mia edzino en la plej malhelan lokon de mia loĝejo kaj farus nenion alian krom surgenui antaŭ *Purísima*, antaŭ la purega madono.“

Modeste respondis *don* Abelardo:“Por diri la veron, *don* Gabriel, *la verdad es asi*, mi terure timtremis dum kelkaj momentoj, kiam la korpopartoj falis de la verando.“

„Tio estas ja tute memkomprenebla, ke vi estis iom ekscitita“, diris lerte *don* Gabriel. „Per tio ja montriĝas la aŭtentika heroo, ke li konas la danĝeron. Kaj foje iam timtremi, tio estas la laŭorda rajto de ĉiu heroo; ĉar tiŭkaze, se iu neniam timtremus, li simple ne konus la danĝeron, kaj kiu ne scias ĝuste prijuĝi la danĝeron, neniam povus esti nomata heroo, kiam li estas konfrontata al iu danĝero.“

„Prave, pravigite, *don* Gabriel“, diris la sekretario, „precize tiel estis pri mi. Sed mi venkis min kaj mi foje montris al la uloj, kion meksikano en tiaj cirkonstancoj kapablas fari. Mi tenis alte la aŭtoritaton. Tion tiuj uloj ankaŭ tuj komprenis, ke ili ne povas ludi kun mi. Tial ili ankaŭ volprete plenumis tiel rapide kaj senreziste mian deziron iri hejmen trankvile kaj en paco.“

Kvazaŭ li jam starus antaŭ la guberniestro, diris *don* Gabriel: „Mi ja zorgos por tio, ke via kuraĝa ago estos vaste konata.Translasu tion nur tute al mi kaj al mia bona konateco kun la guberniestro kaj la *jefe politico*, sciigi vian grandiozan konduton al la ĝustaj instancoj. Tia ago, kia via, ne estu forgesita. Ĝi lumu kiel brila ekzemplo pri la kuraĝo de oficisto, kiu troviĝas sur perdita posteno, por ke tio lumu tra la tuta meksika popolo. Tuj kiam mi alvenos en *Tuxtla*-n la gazetoj, por ke tiu historio estu publikita. Se tio iam estos legebla en la gazetoj, via ago ne estos forgesita dumeterne. Gazetoj vivadas, eĉ se ĉiuj homoj iom post iom devas

mortaĉi. Mi konas ĉiujn tiujn korespondantojn, kaj ili ĉiuj estas komplezemaj al mi.“

Oni ne supozu, ke *don* Gabriel estis tiom granda ŝtipkapulo, ke li serioze akceptus por si la rakonton, kiun la sekretario kvazaŭ jam varmigis por li. Li estis ja mem sekretario. Li mem sciis plej bone, kiel li kondutus dum tia okazaĵo, kiu okazis en Pebvil. Kaj ke iu ajn sekretario, tute egale kiel li aspektis, tute egale, kiel li nomiĝis, egale, kiom ajn da revolveroj li portis zone, egale kiom ajn grandiozajn parolojn li sciis svingoplene disvastigi, en vero estus aginta tiel, kiel asertis *don* Abelardo, tion eĉ la arkiepiskopo de Meksiko ne povus enflustri sukcese al *don* Gabriel. *Don* Gabriel konis sin kaj li konis kelkajn dekojn da sekretarioj, kaj ke li mem aŭ nur unu alia el la dekoj estus escepto, pri tio *don* Gabriel ne vetus eĉ peson je cent pesoj.

Sed, ĉar li konis sin sufiĉe bone, tial li konis sufiĉe bone ankaŭ *don* Abelardon.

Kaj li prijuĝis lin ĝuste.
*Don* Gabriel post tiu interparolado estus ricevinta ĉion de la sekretario, la edzinon de la sekretario, la plej bonan ĉevalon kaj cent indiĝenojn por la monterioj, se *don* Abelardo povus libere disponi pri ili.

*Don* Gabriel ne estis en tiu loko por gluti kaj digesti la fanfaronaĵojn de la sekretario kaj laŭdi lin pli ol la nekonatan soldaton kaj fari al li kaŝitajn promesojn pri la prezidanteco de la respubliko, sed li estis tie por aĉeti indiĝenojn por la monterioj. Kaj kion li faris kaj diris, okazis pro tiu celo.

Ĝis tiam li ankoraŭ ne tute klare vidis kiel la indiĝenoj kuros en liajn vaste etenditajn retojn. Sed li jam havis ideon kaj planojn.

Li bezonis plu nur la alvenon de la soldatoj por povi komenci la laboron. Li esperis, ke la majoro kaj la *coronel*, la kolonelo, kiu alkondukis la soldatojn, estos alirebla al bonaj proponoj. Ankaŭ koloneloj estas homoj, kaj ankaŭ ili havas eterne monbezonojn. Kiu bezonas monon, tiu kutime ne tre zorgas sin pri la sorto de aliaj homoj, se tiuj sortoj iel ne interligeblas kun la solvo de la propraj financaj problemoj. Se tiuj sortoj eĉ rilatas al homoj, kiuj estas indianoj, kaj tial propre ne povas pretendi esti rigardataj plenrajtaj kiel homoj kaj traktataj kiel tiaj, jen la konscienco ne interesiĝas pri tio, ĉu tiuj estaĵoj havas sortojn ĉu ne.

**Rimarko**
*coronel* = kolonelo
*la verdad es asi* = por diri la veron
*periodico* = gazeto,
*Purísima* = Purega Madono

## 10/4

*Don* Gabriel kaj *don* Abelardo ĝuste matenmanĝis, kiam alvenis la taĉmento de kavaleristoj kun kapitano Primero kiel komandanto antaŭ la municipon.

La taĉmento por la rajdado tien bezonis sufiĉe da tempo. La kapitano survoje haltigis kelkajn horojn por entrepreni ekskursĵeton al proksima ranĉo, ĉar tie vivas ranĉisto, kiu havas tre lindan nevinon, kiu ĝuste vizitis lin.

La kapitano havis la kutiman inteligentecon de oficiroj. Pro tiu inteligento li diris al si, ke la indiĝenoj povas atendi kaj, ke li renkontos ilin ankaŭ tiukaze, se li alvenos tien post du tagoj. La indiĝenoj ne forkuras, ĉar ili amas sian teron. Kontraŭe al tio ne estis tiel sekure, ĉu la nevino ankoraŭ morgaŭ ĉeestos, ĉar ŝi loĝas

en *Tapachula* kaj povus esti, ke ŝi ne tiom longe estus plilongigonta sian tiean ĉeestadon.

La kapitano estis ne nur inteligenta, sed ankaŭ prudenta en surteraj aferoj, kiuj ne havas multan komunecon kun la kondukado de milito kaj kun la dresado de soldatoj. Li ricevis por la danĝera ekspedicio altajn tagsalajrojn, militpagon. Aliaj popoloj ofte militas kontraŭ siaj najbaroj por povi koncedi kaj pagi militsalajrojn al siaj oficiroj. Meksiko havas tiun avantaĝon nur en tre limigita mezuro. Tial militistaj ribeloj kaj indiĝenaj ribeloj devas helpi por povi pagi al la generaloj kaj al la ceteraj militistaj rangoj militsalajrojn. Se oficiroj ne povas ricevi ĉeokaze militsalajron aŭ se tiuj altigitaj salajroj ne estas almenaŭ daŭre bonŝance atingeblaj kun la helpo de kriantaj gazetartikoloj, tiukaze ili fariĝos acidaj kiel vinagro kaj eble eĉ enmiksiĝos per krudaj manoj en la politikon.

Oni tial ne enviu la kapitanon, ke li atentis pri sia avantaĝo kaj provis daŭrigi la ekspedicion kiel eble plej longatempe. Eĉ kvaronojn de tagoj oni pagis kiel tutajn tagojn. Se Pebvil ne havus telefonon, kiu ĉeokaze efektive foje serioze emis labori, la kapitano verŝajne farus grandan cirklon antaŭ ol li atingus la cellokon. Kaj li motivus la grandan cirklon per tio, ke li raportus, ke li devis plurfoje batali kontraŭ la indiĝenoj antaŭ ol li povis gajni la aliron al la loko.

Estas tute ne tiom malofte, kiom oni eble pensas en Gronlando, ke oficiroj liveras batalojn kontraŭ ribelaj indiĝenoj kaj banditogregoj, en kiuj ĉe tiu okazo multaj maŝinpafiloj kaj la aldona municio fariĝas la predo de la indiĝenoj aŭ de la banditoj, ĉar ŝanceliĝemas la milita bonŝanco. Sed la ĝeneralojn tiu ŝanceliĝanta kaj mistifika milita bonŝanco ne trafas, ĉar je la tago post la batalo alvenos la bandita gvidanto kaj pagos al la generalo

konsiderindan sumeton por la konkeritaj maŝinpafiloj. La banditogvidanto aŭ la tribestro de la ribelemaj indiĝenoj scias ŝati la valoron de maŝinfusiloj. Krome donas la generalo al li kelkajn tagojn antaŭe precizan informon, kiom la bandita estro devos pagi por la maŝinfusiloj, kiujn li konkeros en la batalo.

Paroli pri perfido de la patrio kaj pri disipo de ŝtata propraĵo estas malsprita en tia kazo, ĉar temas en tiu kazo nur pri etaj negocoj. Sur la batalkampoj en Eŭropo, kie oni batalas pri honoro kaj ŝtata konservado, laŭ supozo de la ekscitemaj ordinaraj civitanoj, tiuj negocoj estas nur pli ampleksaj. Jen la diferenco. Kaj nur en tre fuŝitaj cirkonsancoj la ordinaraj civitanoj ekscias, se magnatoj vendas al fremdaj potencoj nafton, karbon, submarŝipojn, kanonojn, militŝipojn kaj kirasplatojn por tankoj je duono pli malkare ol al la propra amata patrolando. La ago de meksika generalo aspektas nur tial fia, ĉar ĝi estas honeste kaj tute malkaŝe praktikata kaj ĉar ĝi deruliĝas laŭ sumetoj, kiujn civitano ankoraŭ komprenas. Nur se la negocoj komenciĝas kun cent milionoj de dolaroj, konsistas la eblo, ja la certo, ke oni pretekstas ŝtatajn kaŭzojn por eviti ekzamenojn kaj procesojn. Ĉar tuj, se temas pri ŝtataj interesoj, oni ekskludas la publikon; kaj ĉar ĉiuj partoprenantoj sidas ĉe la sama manĝotrogo, inklude de la juĝistoj de la plej supra ŝtattribunalo, oni ne elbabilas ion. Oni ne forgesu en tia kazo, ke en tiaj negocoj kiuj komenciĝas je sumo, kiu ne estas pli malalta ol cent milionoj da dolaroj, funtoj aŭ markoj, nur tiaj personoj povas partopreni, kiuj rajtas laŭplaĉe premi la sonorilbutonon de la registaro.

## 10/5

La subranga kapitaneto de tiu ekspedicia taĉmento rigardis sin jam sur bona vojo, se li povas enspezi cent pesojn je rando de vojo. Se generalo kondukus la taĉmenton, jen *don* Gabriel

verŝajne ne povus fari negocon pro la balotsistemo de la indiĝenoj.

La kapitano ordonis deseliĝon kaj transdonis la komandon al la serĝento Primero.

*Don* Abelardo kaj *don* Gabriel jam venis kaj salutis la oficiron.

La sinjoroj reciproke skuis forte la manojn. Ĉe tio jam ĉiu el ili pensis, kiom li povus enspezi per la aliuloj kaj pro la aliuloj je certa maniero.

Indiĝena domservistino alportis kukurban pelvon kun akvo. Kaj la kapitano forlavis la polvon de si.

Poste li sekvis la inviton de *don* Abelardo por partopreni je la ĵus komenciĝinta matenmanĝo.
Tio estis tre bonvena al *don* Gabriel, ĉar dum manĝado, kaj precipe ĉe bona manĝo, negocoj pli glate deruliĝas ol en sekaj cirkonstancoj.

## 10/6

La *caballeros* ankaŭ tuj komencis veni al la kerno de la afero por ne disipi tempon per paroloj, kiuj enspezigas nenion.

„La loko ĉi tie ŝajne kvazaŭ formortis“, diris la kapitano.

„Vi pravas, kapitano“, respondis *don* Abelardo. „La viroj ĉiuj forkuris. Estas nur la inoj ĉi tie kaj la infanoj.“

„Ĉu vi scias, kiu mortbatis la indiĝenan estron kaj ties familion?“ demandis la oficisto.

„Ne, tion mi ne scias“, diris *don* Abelardo, „mi vidis de la pordo proksimiĝi la murdistojn. Sed ili kuris tiel rapide kaj tiom kunigitaj, ke mi ne ekkonis vizaĝojn. Ili ne portis ĉapelojn. Kaj ĉar la ĉapeloj estas la ununura signo, je kiu oni ekkonas la tribon, al kiu apartenas indiĝeno, mi eĉ ne povus diri kun certo, de kie venis la viroj. Mi estas konvinkita, ke la murdistoj ne apartenis al tiu ĉi nacio, sed, ke ili estis vokitaj ĉi tien nur por plenumi la ekzekuton. Tion la eminentuloj de la nacio faris kun intenco por deflankigi ĉiun suspekton de la nacio kaj por tiel malhelpi, ke tiel entrepreneblas laŭleĝa punekspedicio kontraŭ la nacio. Sed malleĝe ni ne povas entrepeni ion kontraŭ la nacio. Se ni respondecigus la nacion laŭ iu maniero sen scii certe, ke la murdistoj apartenas al la nacio, aŭ, ke la nacio dungis ilin, tiukaze ni agus neleĝe, kion povas pravigi nek mi nek vi nek la sinjoro guberniestro antaŭ la registaro.“

„Jen mi vere ne scias, kion fari ĉi tie“, diris la oficisto. „Min oni komandis ĉi tien, por ke mi kreu pacon kaj ordon. Sed estas eĉ ne unu viro ĉi tie renkontebla. La nova *jefe* laŭleĝe estas senkulpa, ĉar ni ne povas pruvi, ke li dungis la murdistojn; ni ankaŭ ne havas rimedon por havigi tian pruvon. Tute male, ni devas agnoski la novan *jefe* kiel pravigitan estron de la nacio, ĉu plaĉas al ni ĉu ne. Se ni ne rekonos lin, la homoj elektos lin denove kaj denove.“

„Tio ĉio estas prava, kapitano“, diris la sekretario. „Sed ni ne povas lasi la okazaĵon por si mem, ĉar ĝi estas ĝenado de la publika paco. Pro la aŭtoritato vi devas entrepreni ion por malkaŝi al la nacio, ke ili ne povas fari tion, kio plaĉas al ili kaj,ke oni devas obei la dekretojn kaj instrukciojn de la registaro.“

„*Bueno“*, diris la kapitano. „*Muy bien, muy mucho bien. Pero, pero* – jes, sed kion vi opinias, kion mi faru en tiu kazo?“

„Tion mi mem ne scias precize“, respondis la sekretario. „Se kelkaj viroj estus ĉi tie en la loko, jen ni povus ĉaskapti ilin kaj mortpafi kvazaŭ averte. Tio ĉiam havas efikon kaj ĝi montras al la nacio, ke regas ni kaj, ke havas ni la potencon sukcesigi la postulon de la registaro.“

„Mi troviĝas en aĉa situo“, diris la oficisto. „Mi devas skribi raporton al la *‚jefe de las operaciones militares‘,* al la militista ĉefo de la ŝtato. Kaj tial mi devas fari ion ĉi tie. Mi ne povas formarŝi kaj raporti, ke mi trovis la lokon en paco kaj, ke mi faris nenion krom kampadigi miajn soldatojn ĉi tie kelkajn tagojn kaj poste ekmarŝigis ilin. Tio tre facile povas kosti al mi gravan admonon. Se vi nur povus diri al mi, kion mi faru. Vi konas la nacion kaj vi scias kiel oni instruu al ili la potencon de la registaro. Formarŝi sen fari ion ĉi tie, tio ridindigus nin. Jen la indiĝenoj supozus, ke ili estas la mastroj ĉi tie. Tion ni ne povas permesi.“

Nun *don* Gabriel enmiksiĝis: „Eble vi atendu tagon aŭ du tagojn, kapitano. Iafoje io tute per si mem rezultiĝas, se oni fidas al la tempo.“

„Tio estas bona“, diris la oficiro, „ni atendu foje, kio okazos hodiaŭ dum la tago aŭ morgaŭ.“

Post la matenmanĝo la kapitano provis ricevi konekton al la garnizono por havigi al si instrukciojn.

Oni diris al li, ke la generalo ordonis, ke li agu laŭ propra bontrovo kaj, ke li revenu tuj, kiam li estos certa, ke similaj okazaĵoj ne ripetiĝos plu.

Tiel la kapitano, juna viro, estis ŝarĝita per la plena respondeco

kaj la generalo restis sen kulpo.

## 10/7

La *caballeros* ekde tiam pasigis la tempon per kartludado kaj drinkado.

La sekretario komisiis la anojn de la loko alporti provianton por la soldatoj.

Baldaŭ venis inoj kun ovoj, kokinetoj, tortiljoj kaj fazeoloj.

La sekretario pagis kelkajn centavojn. Tiom malmulte, ke tio ne suferigis lin. Li jam sciis kiel li prikalkulos kun gajno tiujn eldonojn por la provianto de la soldatoj. La baza principo de vivo estas, ke oni preterlasu neniun okazon enspezi ion. Okazoj ne havas alian taskon.

Ĉirkaŭ la kvara posttagmeze fine venis okazo, kiu helpis al ĉiuj tri sinjoroj turni sin la malfacilaĵoj, kiujn havis ĉiu el la triopo.

## 10/8

Dek kvar indiĝenoj, anoj de la nacio, proksimiĝis trans la placon por veni hejmen al sia *barrio*, kiu troviĝis oriente de la centrala loko.

Ili estis en *Balún Canán* pro la kristnaska foiro, kie ili vendis felojn, porketojn, petatojn kaj lanon kaj aĉetis varojn por la enspezoj, kiujn ili bezonis en sia dommastrumado kaj por la laboro sur la kampoj.

Pri la aferoj, kiuj okazis je la novjara tago, ili estis tute senkulpaj,

ĉar ili ja ne troviĝis en la loko. Ili ankaŭ ne sciis ion pri tiuj okazintaĵoj, alie ili tute certe ne estus marŝintaj tute senkaŝe trans la placon. Kaj tute evidente ili survoje renkontis neniun, kiu avertis ilin ne tuŝi la centran lokon. Ili iris trans la altaĵojn, ĉar tio estis la plej mallonga vojo al la municipo. Se ili estus irintaj alian vojon, ili sufiĉe frue estus vidintaj kampadi tie la soldatojn.

La ĉeesto de soldatoj estas ĉiam suspektiga. Ĉie surtere. Kaj ĉu oni estas civilizita eŭropano, ĉu parte civilizita indiĝeno, oni en ambaŭ okazoj instinkte evitas iri sur vojo, sur kiu iras soldatoj, kaj oni agas bone tiel.

Tute speciale en Meksiko ĉiu estas memgardema rilate la soldatojn. En Meksiko ne estas deviga militservo. Sed en revolucioj kaj militistaj ribeloj okazas milfoje, ke senkulpa viro, kiu iras trankvile sian vojon, estas kaptita de soldatoj kaj devige enigata en trupon por batali pro io, kio ĵus plaĉas al Fortuno pri li, aŭ por la federacia registaro aŭ por ribelema generalo aŭ por gvidanto de granda banditogrego. Se li falas en batalo en la manojn de la kontraŭulo, oni aŭ pafmortigas lin pro perfido aŭ oni envicigas lin en trupon de kontraŭulo por esti pafmortigita ĉe nova ŝanĝo de la batala bonŝanco de la antaŭa trupo pro perfido kaj dizerto. Se tiu varbado povas okazi eĉ al meksikanoj kaj sufiĉe ofte al fremduloj, al usonanoj aŭ al britlandanoj, tiukaze tiom pli al indiĝeno, kiu estas rigardata senmastra homa feĉo de ĉiu, kiu renkontas lin.

Sed kiam la indiĝenoj survoje transiris la altaĵon, ili estis tuj tiom proksimaj al la starigita gardulo, ke ili ne plu povis retiriĝi. Tio levus la suspekton de la gardulo kaj li tuj pafus al la indiĝenoj. Kaj ĉar la soldatoj havis ĉevalojn, oni rapide kaptus ĉiujn indiĝenojn.

Tial la viroj iris trankvile sian vojon en la direkto al la municipo. Ĉar ili pace proksimiĝis al la municipo, la soldatoj lasis preterpasi la homojn trankvile sen aresti ilin kaj konduki ilin al sia ĉefo.

La kaŭzo, kial la viroj ne elektis la vojon trans la centran lokon, estis ne nur sole tiu, ke la vojo havis la plej malgrandan distancon al ilia *barrio*, sed ankaŭ ĉar kelkaj viroj devis plenumi negocan aferon ĉe la sekretario.

Unu el ili kunportis leterojn de poŝtejo. Alia devis sciigi mesaĝon de komercisto al la sekretario. Kroma viro ricevis de la sekretario la komision aĉeti por li en *Balún-Canán* kelkajn aĵojn, kiujn li nun volis transdoni. Kaj la plimulto de la homoj volis uzi la okazon por ankoraŭ ĝustatempe pagi ion pagendan al la sekretario, kion ili tiumomente povis fari, ricevintaj en *Balún-Canán* kontantan monon por siaj produktoj.

Sed ĉiuj havis la intencon ripozi en la ombro de la municipo, kirladi sian posolon, fumi cigaredon kaj eble aĉeti glaseton da komiteko de la sekretario. Ekde la municipo ili havis ja ankoraŭ marŝon trihoran antaŭ si.

## 10/9

La *caballeros* starigis tablon en la portiko de la municipo. Tie ili sidis kaj ludis kartojn, dum la botelo kun komiteko staris sur benketo en facile atingebla proksimo.

La indiĝenoj proksimiĝis. Ili deĵetis siajn pezajn pakajojn kaj iris proksime al la fostoj de la portiko, kie ili ĝentile restadis starante por atendi ĝis la sekretario trovos ĝin konvena paroli al ili kaj demandi, kion ili celas.

Ili salutis lin kaj ambaŭ aliajn sinjorojn, ĉiufoje metante platan manon al sia kapo, kaj tiam kliniĝante etendis la platan manon al ĉiu salutato.

La sekretario diris al ambaŭ kunludantoj: *„Con su permiso, caballeros“,* li ekstaris kaj iris renkonte al la viroj.

Li invitis ilin veni en la laborĉambron por fini la komisiojn.

La indiĝenoj transdonis la leterojn kaj la menditajn varojn, kaj tiuj, kiuj devis pagi ŝuldon al la sekretario, pagis la sumeton.

Dum tiu tempo *don* Gabriel kaj la oficiro estis solaj en la portiko.

Ili disetendis pro enuo siajn membrojn, rigardis trans la placon, enversîs novan komitekon kaj ekbruligis cigardeon por si. Ili leĝere leviĝis, tretadis per la piedoj sur la planko por movi la piedojn kaj ree sidiĝis.

## 10/10

Tiam *don* Gabriel komencis paroli: „Aŭskultu, kapitano, jen bonega eblo por vi por fari ion. La okazo, kiu nun kaj ĉi tie ofertiĝas, ne revenos. Se vi kun via taĉmento iros en la *barrios,* vi trovos eĉ ne unu viron. Tio disvastiĝas kiel kanonpafo en la tuta nacio, ke vi, kapitano, kun via taĉmento marŝas al ĉiuj kvartaloj por tie elkonduki homojn kaj puni ilin. La plej bona, kion vi povas fari, kaj la sola eblo estas, ke vi arestos ĉi tiujn dek kvar indiĝenojn kaj kondukos ilin kiel kaptitojn al la garnizono. Translasu tion poste al la generalo aŭ al la tribunalo, kion ili faros kun la kaptitoj. Sed vi tiukaze almenaŭ ne tute vane venis ĉi tien por krei pacon.“

„*Maravilloso*“, vokis la kapitano. „Tio estas bonega ideo de vi, *don* Gabriel, *caray*. Nenio estas pli bona en la mondo ol tio. Vi pravas, mi translasos tion al la generalo, kion li volas fari kun la homoj. Kaj mian haŭton sekve povos grati neniu. Mi divenas, ke vi iam estis bona sekretario. Vi scias kiel trakti tiajn aferojn.“

La kapitano alvokis la serĝenton kaj ordonis al li, ke li arestu la homojn, tuj kiam ili ĉiuj estos denove kune, kaj se ili estos finintaj siajn negocojn kun la sekretario.

Oni metis la dek kvar indiĝenojn en la karceron, kiu havis sufiĉe da spaco por enloĝigi maloportune kvar personojn.

**Rimarko**
*caray* = fulmotondro!

## 10/11

La tago finiĝis kaj la *cabbaleros* kunsidis ĉe la vespermanĝo.

Jen diris *don* Gabriel, kiam la teleroj estis forportitaj de indiĝena knabineto: „Oni povas fari kun la kaptitoj ankoraŭ ion alian, kapitano.“

*Don* Gabriel antaŭ la vespermanĝo, kiam la kapitano okazigis la vesperan paradon kaj elserĉis la gardistojn por la nokto, jam priparolis ĉion kun *don* Abelardo, kio estos necesa, kaj li ricevis ties konsenton sen tio, ke la kapitano sciis ion pri tio.

„Kion vi opinias, *don* Gabriel“,demandis la kapitano, „kion mi faru kun la *prisoneros,* kun la prizonuloj?“

„Kunpreni la homojn“, klarigis *don* Gabriel, „tio povus havigi

malfacilaĵojn. Ili survoje eble forkurus. Povus okazi, ke la tuta nacio atakos vian taĉmenton por liberigi la homojn, kaj tiam nek vi nek iu el viaj soldatoj restos vivanta."

„Eble tio pravas", respondis la oficiro pripenseme.

„Kaj kion oni faros kun la homoj en Jovel? Nenion", respondis *don* Gabriel al si mem. „Oni liberigos ilin, ĉar ili povas pruvi, ke dum la ribelo ili ne estis en la loko. Ili estis en *Balún-Canán*, pri tio ne ekzistas dubo. Jen la tuta peno ĉi tie do estus vana. Mi nun konsilas, ke vi tuj mem verdiktu la kaptitojn ĉi tie."

„Sed mi ne havas la rajton mortpafi ilin", la kapitano interdiris.

„Ĝuste tial", diris *don* Gabriel, „ĝuste tial, ĉar vi ne havas la rajton pafmorti la homojn, tial vi povas fari ion alian, kio estas same tiel efika. Punu la kaptitojn per sufiĉe alta monsumo. Ĉar la homoj apartenas al la nacio, kiu ĉi tie faris la masakron aŭ ordonis ĝin, la nacio transprenos la monsumon. Ĉiu unuopulo de la nacio devas kontribui sian parton por transpreni la monpunon de tiuj homoj. Per tio ĉiu el la nacio estos trafita kaj la nacio lernos, ke ĝi ne povas ludadi kun la registaro."

„Tio estas ĝusta", opiniis la oficiro. „Kion opinias vi pri tio, *don* Abelardo? Vi estas ja ĉi tie la sekretario kaj viaj vortoj ja gravas pri tio."

„Mi havas la opinion", respondis la sekretario, „ke la propono de *don* Gabriel estas la plej bona, kiu eblas en tiu ĉi kazo. Per monpuno oni trafas la homojn pli forte ol per pafmortigo aŭ prizono. Pafmortigo aŭ prizono tute ne impresas ilin, tio estas sen efiko. Mi scias tion pro sperto. Kaj mi pensas, ke mi ĉi tie estas sufiĉe longe sekretario por scii, kiel oni traktu la homojn por

devigi ilin al agnosko de la registaro.“

„Se vi havas tiun opinion, *don* Abelardo“, diris pri tio la kapitano, „tiukaze mi povas ekagi. Al mi oni ordonis, ke mi interkonsiliĝu kun vi pri taŭgaj punoj kaj preventaj striktaj reguloj pri estontecaj ribeloj kaj sekvu al viaj proponoj tiom longe, kiom ili estas akordigeblaj kun mia militista ekspedicio.“

„Bone do“, diris nun *don* Gabriel. „Pri la principo ni do interkonsentiĝis. Ĉu ni nun povos paroli pri la detaloj? Mi proponas, ke por ĉiu prizonulo estu fiksata monpuno je cent kvindek pesoj. Sed ni ĉiuj devas vivi. Ankaŭ vi, kapitano. Ni diru do, ke vi ricevu po kvindek pesojn el ĉiuj cent kvindek pesoj, kiujn ni ne metos en la kalkulon. Tio restas ĉi tie inter ni, *caballeros*. Kvindek pesoj restu por ni ambaŭ, por *don* Abelardo kaj por mi. Kaj kvindek pesojn por ĉiu viro vi kunprenu al via ĉefo, al la generalo. Ni ĉi tie skribos sur ĉiun punkvitancon kvindek pesojn. La uloj ja ne scias, kiom grandan sumon ili subskribas kaj la generalo neniam havos la okazon pridemandi la ulojn. Li ne enmiksiĝas pri bagateloj tiaj, kiaj estas la pridemandado de indiĝenoj, kiuj ne regas la hispanan. Krome ni tiujn virojn tuj forigos el la vilaĝo, tiom malproksimen, ke neniu povos pridemandi ilin.“

„Kiel forigi ?“ demandis la oficiro.

„Mi simple kunprenos ilin al la monterioj, kie ili povos forlabori la monpunojn. Antaŭ ol ili revenos de tie, la garnizono en Jovel dekfoje estos ŝanĝinta la garnizonan komandanton.“

*Don* Gabriel kapablis klarigi tion tiel bone, ke la kapitano lernis rigardi ĝin kiel la plej bonan solvon de la komplika tasko de la punekspedicio.

## 10/12

La oficiro ne estis fripono, li estis nur en eterna bezono de mono, tio estis la malavantaĝo de lia vivo. Mono estis al li same tiel bonvena kiel al ĉiu alia homo, kiu havas pli elspezojn ol enspezojn.

Kiel vere bona kaj taŭga oficiro li konis la karakterajn ecojn de siaj superuloj bonege. Bonega sciado kaj ĝusta karaktera prijuĝado de superuloj helpas certe al pli da subuloj transsalti rangoŝtupojn kaj por ricevi privilegiajn postenojn en la armeo, en la ministerioj kaj en la ambasadorejoj ol iuj aliaj scioj kaj konoj, eble eĉ la profunda scio de militistaj sciencoj. Koni siajn superulojn bone kaj juĝi ilin bone, estas centfoje pli grava por rapida rangaltigo de oficiro ol admirinda kuraĝo antaŭ la malamiko aŭ la aŭdaca konkero de kirasita fortikaĵo. Oficiroj, kiuj havas fajnajn antenojn por siaj generaloj, tute ne havas okazon konkeri fortikaĵojn aŭ remparojn, ĉar ili proksimiĝas ne sufiĉe al la malamiko. Ili estas pro siaj specialaj konoj multe pli gravaj malproksime de la fronto. Kaj ĉar milito estas ja negoco kiel ĉiu alia, tial en tiu afero ne kaŝiĝas io, kion oni povus deklari kiel malindan agon de oficiro. Tiom pli, ĉar ĉiuj armeoj surtere havas la saman opinion pri tio, kio estas necesa por povi diri pri viro, ke li estas bonega oficiro.

Ĉar la kapitano tre bone konis sian generalon, li konis ankaŭ ties vivbezonojn. Kaj faciligi al sia generalo la vivbezonojn, tio estis lia devo kiel subulo.

Al la generalo kvindek pesoj dekkvarfoje estas pli bonvenaj ol dek kvar pedikohavaj indiĝenoj, kiuj estis kondukataj al li kiel prizonuloj.

La kapitano certe konsciis, ke la komandanto publike laŭdos lin, ĉar li finis la punekspedicion tiel efike kaj taktoplene.

La ŝtatkason oni kompreneble ne forgesis ĉe tiu banka transakcio. Indiĝenoj pro publika ĝenado de la ordo kaj pro endanĝerigo de la publika paco en lando estis ŝarĝitaj per monpunoj.

Ĉe la jarfina kalkulado de ŝtatbuĝeto poste aperis la monpunoj:Dek kvar indiĝenoj, *habitantes del Districto Pebvil*, pro ĝenado de la ĝenerala paco punitaj per 1,50 pesoj.

La publiko, tiel kiel precipe la raportistoj de la grandaj usonaj gazetoj ne povis skribi, ke la povraj indiĝenoj en Meksiko estas punataj severe, se ili estas verdiktataj pro tia grava delikto, kiel estas la ĝenado de la ĝenerala paco, nur per pagado de unu kaj duono da pesoj. Registaro, kiu punas ribelemajn indiĝenojn tiel milde, akiras la reputacion, ke oni povas nomi ĝin alte civilizita kaj justa registaro, ĉar ĝi havas komprenon kaj kompaton kun la povra homa frato, nomata indiĝeno.

La kapitano, pri kiu oni pensis ĉe la kalkulado de monpuno tiel bone antaŭzorgeme, ne penis pensadi pri eraro en la kalkulo.

Tiu eraro estis negrava. Ĝi signifis nur, ke la nacio ne ricevis okazon dispartigi la punon de la dek kvar senkulpaj viroj inter la popolkunuloj. Ĉu la nacio faris tion aŭ ne, ne havis influon pri la sorto de la dek kvar kaptitoj. Tiuj dek kvar viroj estis forkondukataj de *don* Gabriel al la monterioj, kie ili devis forlabori siajn monpunojn kaj la kostojn de la agento.

Por *don* Gabriel nur sole tio estis grava, ke li ricevis dek kvar centprocente sanajn, junajn kaj ursofortajn virojn por la mon-

terioj.

## 10/13

Oni prezentis la kaptitojn je la sekva tago.

La kapitano klarigis al ili, kun la helpo de *don* Gabriel kaj de *don* Abelardo, kiu interpretis, ke ĉiu el ili estas verdiktita pro la murdigo de la indiĝena *jefe* kaj de lia familio per cent kvindek pesoj da punmono kaj, ke ili, ĉar ili ne posedas la monon, devas sekvi *don* Gabrielon kiel kontraktlaboristoj en la monteriojn. Oni minacis ilin, ke tiukaze, se ili forkuros, ne nur ili mem estos mortpafitaj, sed ankaŭ iliaj filoj kaj iliaj patroj.

Agnoskinte la kontraktojn kiel laŭrajtajn, la dek kvar indiĝenoj ricevis nun la permeson iri en siajn kvartalojn, por adiaŭi siajn familiojn kaj teni sin pretaj por tiu tago, je kiu ili devos komenci la marŝon al la monterioj.

Ili rigardis tion kiel grandan bonŝancon, ke ili, por ribelo, kiujn ili ne faris, elvenis tiel malkare. Kaj ili dankis por tio kun kliniĝoj al la kapitano, al *don* Abelardo kaj al *don* Gabriel.

## 10/14

Meksiko estas civilizita lando. Tial ĝi havas ankaŭ regulatan tribunalan ordon kun kedlkaj apelaciaj instancoj. Sed pri tio la indiĝenoj sciis nenion. Neniu diris tion al ili. Kaj neniu diris al ili, kiel ili devus trakti tiujn instancojn. Por tio ili bezonus *licenciados,* advokatojn. Kaj advokatoj povas fari nenion por nenio, tiel, kiel ankaŭ la advokatoj en aliaj landoj ne povas fari tion. Tion ankaŭ la edzinoj de la *licenciados* ne permesas.

La nacioj, aŭ pli precize dirate, la gvidantoj de la nacioj, subskribas packontraktojn kaj gravajn militistajn liveradojn. Plenumi tiujn kontraktojn kaj tiujn liverojn, tion oni translasas al tiuj, kiuj ne povas politike influi tiujn kontraktojn, nome al la simplaj laboremaj civitanoj, al la proletaro kaj al la indiĝenoj, kiuj estas senrajta posedaĵo. Tio estas la rekonata sistemo de ĉiuj civilizitaj landoj, ĉu ili situas en Eŭropo, en Azio aŭ en Ameriko .La geografia situo de la landoj estas nur hazarda.

## 10/15

La kapitano ankoraŭ je la sama tago formarŝis kun sia taĉmento. Li bezonis por la remarŝado al la garnizono tri tagojn, ĉar li restadis du tagojn sur la ranĉo, kie linda kaj bone kreskinta nevino de la ranĉisto faris viziton.

Li promesis al la nevino oran brakhorloĝon, se ŝi sola aŭ kun sia onklo venus je unu tago aŭ je du tagoj al Jovel por danci tie kun li en la kazino.

La nevino ne forgesis transpreni la oran horloĝon ĉe li, kiam ŝi troviĝis en la revojaĝo al *Tapachula*.

Ŝi restadis plenan tagon kaj ankoraŭ pli plenan nokton sola en Jovel. La onklo ne havis tempon restadi dum pli longa tempo en Jovel, ĉar atendis lin grava laboro en lia ranĉo. Tial li konfidis la nevinon al la protekto de edziniĝinta fratino en Jovel.

Ĉar la kapitano ses semajnojn poste edzinigis la nevinon, ne elkreskis plia malbono el la ora brakhorloĝo.

Lia generalo promesis zorgi por tio, ke li estos promociita post du monatoj en la rangon de majoro. Kaj la generalo plenumis sian

promeson. Kiam *don* Gabriel estis certiginta la kontraktojn per garantiuloj kaj kun la aŭtoritato de la sekretario por la dek kvar indiĝenoj, kiuj krucis hazarde lian vojon, li foriris por viziti la bienojn por aĉeti peonojn kun ŝuldoj, kies bienuloj bezonis monon.

*Don* Gabriel estis senkulpa pri ĉio, kio okazis. Estis la monterioj, kiuj voris kaj digestis centope indiĝenojn, por ke la civilizitaj civitanoj kaj civitaninoj en Usono kaj en Eŭropo povu ricevi mahagonmeblojn kaj la bankieroj kaj industriaj dioj mahagonajn skribotablojn.

La tuno da mahagonligno kostis en la haveno de Nov-Jorko inter sepdek kaj cent dudek dolaroj, laŭ la moviĝoj de la merkato.

Ĉe tiaj prezoj oni ne rajtas trakti tiom skrupule la tielnomatajn homajn rajtojn de indiĝenoj kaj similajn bombastajn frazojn pri la homa kunfrato kaj la respekto de la homa digno. En la ordigataj deruliĝoj de negoco, kiu ebligu gajnon, oni ne pensu pri la pravigiteco aŭ nepravigiteco de alte flugaj diroj kaj pri la ideoj de la plibonigado de l‘ mondo. Tion oni translasu al idealistoj, kiuj estas pagataj uzi tiajn frazojn en filmoj, en kiuj la ploroglandoj devas esti malstreĉitaj, por tintiligi la kasojn.

Azeno estas tiu, kiu havas la potencon kaj ne uzas ĝin je sia avantaĝo. Neniu donas ion al iu, kaj se oni bankrotiĝas en entrepreno, la kreditoroj kraĉas al la vizaĝo de la bankrotiĝinto. Ja ne lasu timigi vin. Kaptu, kiam kaj kie io kapteblas! La balanco estas reordigita en la opero kaj en la Paska diservo,kie oni preĝas pri la releviĝo de la Savonto de l‘ homaro. La eklezio ne volas postresti kun malplenaj manoj. Per konscienciproĉoj, kiuj propre premsufoku la gorĝon, oni ne povas enspezi dolarojn. Ke dolaroj pluvu de la ĉielo al la tero oni ne atendu. Mankas la

ekzemploj por subteni tiajn esperojn. Dolarojn oni devas perlabori per streĉa laboro. Multaj manoj kaj cerboj devas diligente agi antaŭ ol oni povas ensakigi cent dolarojn por unu tuno da mahagono. Kaj se neniu elhakas mahagonon en la praarbaroj de Ameriko kaj neniu flosigas la elhakitan mahagonlignon sur la praarbaraj riveroj, tiukaze ne ekzistas mahagonŝrankoj kaj ornamitaj mahagonkestetoj. Malmultekostan mahagonon kaj samtempe la protekton de senkulpaj indiĝenoj, kiuj estas je miloj la viktimoj en la ĝangaloj favore al la mahagono, oni ne povas havi. Aŭ tio aŭ tio. Aŭ malkara mahagono aŭ respekto de la digno de l' indiĝeno. Ambaŭ aferojn samtempe la aktuala cvilizacio de la nunaj vivantaj homoj ne permesas, ĉar la konkurantaro, bredita ĝis la ekstremo en la nuntempa civilizacio, ne eltenas tion. Kompaton, jes ja, kun ĝojo kaj kun plena kristana koro, sed la dolaron oni ne rajtas endanĝerigi pro tio.

# Ĉapitro 11

## 11/1

Indiĝena grupo migris survoje.
Ili venis el siaj hejmaj regionoj norde de la ŝtato. Ili troviĝis sur marŝo al la vilaĝoj kaj setlejoj de la fekunda tero en la suda oriento de la ŝtato.

Ili ne venis por serĉi novajn terpecojn kaj akiri ilin, kvankam ili certe bezonis fekundajn agrojn kaj tial ĉiam deziris ilin. Ilia hejma tero estis magra kaj ŝtoneca montara regiono, kiu prilaboreblis nur kun grandaj penoj, se ĝi donu nutraĵojn. Sed en la sudo la terpecoj estis ne nur multekostaj, sed ankaŭ en la posedo de meksikanoj kaj de bonstataj kafoplantistoj kaj farmistoj, homoj, kiuj bezonis la terposedojn por si mem kaj volis

reteni ilin por si mem, tiel, kiel la indiĝenoj el la nordo devis reteni siajn terpecojn por si.

La migrantaj indiĝenoj serĉis junajn sanajn mulojn, kiuj estis bredataj sur la grandaj kaj malgrandaj farmoj sude. Ili aĉetis la mulojn, kiam ili estis ankoraŭ tiom junaj, ke ili ĵus komencis serĉi sian nutraĵon mem kaj jam dekutimiĝis de siaj patrinoj. Tiutempe la bestoj estas plej malmultekostaj. Kaj nur por eble plej malkaraj prezoj la indiĝenoj kapablis aĉeti ilin, se ili volis kunpreni kelkajn bestojn kun si hejmen. Mono estis ja rariĝo por ili. Ili tiurilate ne tre malsimilis al la plimulto de aliaj homoj, kiuj ne estas indiĝenoj.

Tiuj junaj muloj ne aĉeteblis tiel simple kiel tio eble ŝajnas.

La simplaj farmistoj kaj setlistoj kaj tiom pli la posedantoj de grandaj haciendoj vendis la junajn mulojn nur nevolonte, ĉar ili havis la intencon mem plenkreskigi la bestojn. Estis nur la etfarmistoj, kaj inter ili plej ofte indiĝenoj, kiuj ĉeokaze vendis junan beston, se ili urĝe bezonis kontantan monon. Juna mulo kompreneble enspezigis dekfoje, ofte eĉ dudekfoje pli da mono ol grasa porko.

La aĉetemaj indiĝenoj vagadis foje dum tuta semajno de unu ranĉo al alia sen povi aĉeti eĉ nur unu beston. Aŭ la postulita prezo estis pli alta ol ili povis elspezi por la besto aŭ la posedanto ne volis vendi ĝin aŭ ili tute ne renkontis beston.

Foje okazis ankaŭ, ke ili restadis tri aŭ kvar tagojn en ranĉo, kie estis besto aŭ eĉ kelkaj bestoj, kiujn ili volonte aĉetus, tiukaze la posedantoj ne povis decidiĝi pri vendo.

Oni tiukaze intertraktis kaj interparolis kvar tagojn de la unua

matenradio ĝis nokto. Kaj je la vespero de la kvara tago la aĉetistoj eble atingis ne pli ol en la unua horo de sia alveno, kaj tiukaze la kvar tagoj estis perditaj.

La posedanto parte volis vendi kaj parte ne. Certajn fojojn okazis, ke je la sekva mateno, kiam la indiĝenoj finfine volis migri plu, la posedanto en la nokto decidiĝis pri la vendo. Kaj nun komenciĝis la marĉando pri la prezoj, kiu daŭris denove tri aŭ eĉ kvar tagojn.

Ofte la indiĝenoj bonŝancis. Ili renkontis junan belan beston, kiu ŝajne estis nevendebla. Sed dum ili pigre vagadis en la ranĉo kaj hezitigis la formarŝon, venis komercisto, kiu elmetis kaj ofertis siajn varojn en la ranĉo.

Li havis belajn vest- kaj ĉemizŝtofojn, brodaĵojn kaj puntojn, elegantajn lakoŝuojn, superbajn buntajn silkajn rubandojn, grandajn briletantajn orelringojn, jen mirinde bele cizelitan puncitan kartoĉozonon, jen poluritajn revolverajn kartoĉojn kaj ŝtalan ĉasistan tranĉilon, paron da grandaj ŝtalbluaj kaj arĝentizitaj spronoj, ĉiukaze ĉiujn aĵojn, kiuj faris la ranĉistonprofunde malgaja, sed eĉ centfoje pli lian edzinon, ĉar ili ne estas milionuloj por povi aĉeti ĉion tion per unu fojo.

Sed tiam la ranĉero vidis stari la indiĝenojn, kiuj volis aĉeti junan mulon kaj ankaŭ kunportis la kontantan monon por tuj pagi la junan mulon, kaj tiumomente la ranĉero vidis ankaŭ sian edzinon, kiu alridis lin tiel, kiel ŝi alridis lin nur antaŭ ol ŝi edziniĝis al li. Kaj ŝi iris renkonte al li kaj karese nestigis sin je lia brako. Tridek minutojn poste la indiĝenoj estis la posedantoj de juna bela mulo kaj tri horojn poste la komercisto estis jam la posedanto de la mono, kiun la indiĝenoj pagis al la ranĉisto por la mulo.

Milfoje pli da mono eniĝas la cirkuladon pro hazardo ol pro neceso.

Centojn da kilometroj en ĉiu direkto de tiu regiono vagadis la indiĝenoj por aĉeti junajn mulojn. Ili estis ofte dum monatoj survoje kiel migrantoj antaŭ ol ili kunhavis tiom da bestoj, kiom ili povis aĉeti per sia mono. Ili ne pli frue iris hejmen ol tiam, kiam ili jam elspezis sian tutan monon por junaj muloj.

Se besto estis aĉetita, la ĝistiama posedanto skribis al ili la vendokontrakton, en kiu estis notita la brulmarko de la besto, la koloro, la precipaj rekoniloj kaj la pagita prezo. Poste la indiĝenoj iris al la *presidente* de la municipo, al kies administra regiono apartenis la ranĉo. Tie ili pagis la impoŝton por la aĉeta kontrakto, pagis la municipan kotizon por la vendo de bestoj kaj la *presidente* konfirmis por tio al ili la aĉetkontrakton per stampilo kaj subskribo.
La indiĝenoj tuj kun si forkondukis ĉiun beston aĉetitan kaj ne postlasis ĝin, kiel tio foje okazas, ankoraŭ kelkajn semajnojn sur paŝtejo, kie ĝi estis naskita.

Ili estis tre memgardemaj homoj, kiuj fidis neniun, kiu ne estis el ilia tribo, pli ol ĝis la distanco, kie ili ankoraŭ povis reteni lin je brako. Ne pro instinkto ili estis tiel malfidemaj, sed ili fariĝis tiel, kaj iliaj gepatroj instruis tion al ili pro gravaj aĉaj spertoj.

La bestoj de tiam devis partopreni en la marŝo. Ili plej ofte ne volis ekiri, ĉar ili ne kutimiĝis pri tio troti sen siaj patrinoj. Postulis specialan penon kaj multajn lertajn trukojn por instigi la bestojn al memirado. Oni ĉiam devis gardi ilin por malhelpi ties eskapon kaj ilian rapidan retrogalopon al la patrino.

Se la nombro de la aĉetitaj bestoj fariĝis granda tiel, ke formiĝis

gregeto, fariĝis ĉiutage pli facile kunteni la bestojn kaj antaŭenigi ilin. La junaj bestoj tiukaze baldaŭ perdis la memoron pri la hejma ranĉo kaj komencis senti sin tute bonfartaj en la societo de siaj sortokunuloj. Ĉu besto eskapis aŭ kapricis, ĉu ĝi hufobatis aŭ mordis iun, la indiĝenoj tamen neniam malpacienciĝis. Ili ne batis la bestojn kaj ne puŝis ilin. Juna knabino ne povas trakti bovideton pli karese ol la indiĝenoj traktis siajn bestojn.

Ĉiu indiĝeno devis porti grandan pakaĵon, en kiu li kunportis la plej necesajn aĵojn por la longa migrado. En tranoktejoj kaj gastejoj ili ne povis loĝi. Por tio ilia mono ne sufiĉis. Ili aŭ kampadis ĉe la voĵo aŭ ili dormis en la portiko de ranĉo, en kies kortego ili tenis sian bivakfajron vigla dum la tuta nokto.

Egale, kiom grandaj kaj pezaj estis la pakaĵoj, kiujn ĉiu unuopulo portis, neniu indiĝeno iam ekhavis la ideon dum la longaj kaj lacigaj tagmarŝoj ŝarĝi junan mulon eĉ per pakaĵeto. La bestoj marŝis libere kaj sen devoj, ne molestataj de iu ajn laboro.

Per tiu ĉi detenado de la bestoj for de laboro kaj for de devigoj komenciĝis jam certa trejnado de la bestoj.

Oni apenaŭ povas imagi pli bonajn trejnistojn de muloj ol tiuj indiĝenoj.

Ili havis tiom da pacienco, indulgon kaj bonkorecon por tiuj junaj bestoj, kiom Dio en la ĉielo ne kapablas disponigi al la plagataj homoj surtere, ĉar Dio devas puni kaj krude punbati la homojn per malsanoj, per pestoj, per tertremoj kaj militoj.

Se la indiĝenoj finfine alvenis kun sia grego de junaj muloj en sian hejman regionon, ili unue ekzamenis la hufojn por kuraci rompiĝemajn kaj vundfrotitajn partojn. Samtempe oni kuracis

vundojn, kiuj devenis de insektoj aŭ de la gratado per dornaj arbustoj.

Tiutempe por la bestoj komenciĝis paradiza vivo.

Tage kaj nokte ili estis sur la paŝtejoj, kie ili povis petole vagadi laŭplaĉe. Ĉiusemajne ili ricevis manplenon da maizo por kutimiĝi al ĝi. Ili ricevis salon kaj oni purigis ilin de enmordiĝintaj iksodoj.

Ĉe kelkaj triboj la bestoj estis aĉetitaj per la komuna mono el la komunumo. Kaj ĉe la vendo de la bestoj ĉiuj komunumaj anoj ricevis la saman parton de la tuta sumo. Ĉe aliaj triboj la bestoj estis aĉetataj de la mono de individuoj kaj ili estis plu la propraĵo de tiu, kiu aĉetis la beston per sia mono. Sed la bestoj de la viroj, kiuj posedis la bestojn, estis komune flegataj kaj trejnataj.

Kiam la bestoj fine atingis la aĝon de du jaroj, komenciĝis la efektiva trejnado de la bestoj, kiu donis al ili la plenan valoron.

La bestoj, kiuj havis speciale belan koloron, kiuj montris belan kaj agrablan aspekton kaj promesis fariĝi bonegaj kurantoj, estis dresataj por fariĝi rajdomuloj. La ceteraj fariĝis pakmuloj.

Oni kutimigis la bestojn per senfina pacienco vadi tra tenaca ŝlimo. Tiu tenaca ŝlimo de tiu regiono estis la hororo kaj eble eĉ la inkubo de muloj. La bestoj timis profunde sinki en ŝlimon, ĉar deglitis tero sub ili. Ili timis, ke ili ne plu povos eltiri sin aŭ, ke ili rompos siajn krurojn, se ili provos eltiri ilin. La profunda sinkado de la bestoj en la ŝlimon kaj la rompo de kruroj okazas efektive sufiĉe ofte, kaj la rajdisto, kiu ne povas desalti sufiĉe rapide kaj kapti branĉon aŭ ŝtonon, ofte endanĝeriĝas forsinki kun la bestoj. Tial la bestoj timas tiun terure kaĉan ŝlimon pli ol ŝtonplenajn kaj rompiĝemajn vojojn tra ravinoj kaj tra transpasejoj. Kutimigi la

bestojn pri la ŝlimo kaj instrui ilin, ke la ŝlimo sube plej ofte havas firman ter- aŭ rokotavolon, kiu gardas la bestojn kontraŭ la trosinkado, estas unu el la plej komplikaj taskoj de la indiĝenoj trejnantaj mulojn.

Oni dresis la bestojn ĉiam iri rekte antaŭen, aŭ en grupoj aŭ solaj, kiam ili portas rajdiston aŭ ŝarĝon. Oni instruis ilin halti, se la balanco de la ŝarĝo transŝoviĝis aŭ, se la rimenoj loziĝis kaj deglitis la ŝarĝo. Oni kutimigis ilin halti post voko kaj iri plu post komando.

Por bonaj rajdomuloj la indiĝenoj enspezis ofte, kiam la bestoj post tri jaroj estis ofertataj al vendo en la kafoplantejoj, la dekoblon de la prezo, kiun ili komence pagis por la besto. Ŝarĝmuloj bone trejnitaj enspezigis la sesopon aŭ okopon de la mono, kiu unue estis pagita por besto.

En ŝtato, kie ekzistas nek fervojo nek bonaj stratoj, kiuj ebligas aŭtomobilan – aŭ eĉ nur ĉaran trafikon – estas ĉiam kaj seninterrompe la bezono je bonaj muloj, kaj ĉiam la prezoj por altkvalitaj rajdomuloj kaj ŝarĝmuloj estas tre altaj.

Ĉar bone flegataj kaj ne seninterrompe trostreĉite uzataj muloj kapablas labori dudek aŭ eĉ dudek kvin jarojn, tial altkvalita mulo por la posedanto neniam estas tro kare aĉetita, kiom ajn alta la prezo eble estas, ĉar bone flegata besto sekve de la multaj frajtoj de tiuj regionoj ebligas al sia posedanto grandajn gajnojn. Mulo estas multe pli forta, pli eltenema kaj pli rezistokapabla kontraŭ malsanoj kaj la klimato ol la plej taŭga ĉevalo. Bona araba purrasa ĉevalo mortaĉas en tiuj regionoj post du monatoj kaj tie tial estas senvalora, kiom ajn alte ĝi eble estas taksata ie aliloke.

La indiĝenoj havis en tiu negoco de la trejnado de muloj nur tiukaze perdojn, se la bestoj mortis tro frue aŭ estis atakitaj de pumo, aŭ se ili ricevis aĉajn tumorojn sekve de serpentomurdoj kaj insektaj pikoj, aŭ – kaj ankaŭ tio okazis – ĉar la bestoj ne reagis al iu ajn pacience lerta trejnado aŭ tial, ĉar ili pro iuj kaŭzoj ne plenkreskiĝis ĝis la kutima plena forto de tia besto.

Tiu bredado de muloj ofertis al la indiĝenoj, kiuj loĝis en sendependaj komunumoj sur tre magra tero, vivon elteneblan, kiu kontentigis kaj feliĉigis ilin. La indiĝeno en la kunvivo kun bestoj kaj en la proksimeco de floroj trovas tian profundan vivkontentiĝon, kia ĝi de ne-indiĝeno apenaŭ estas komprenebla kaj sentebla.

Krom la muloj tiuj indiĝenoj bredis ŝafojn, kies lanon ili per teksado ŝanĝis en kovrilojn, krome en rubandojn, kiujn la indiĝeninoj en aliaj regionoj plektis en sian hararon.
Tiu negoco pri la teksado de lano helpis al la homoj ekonomie transvivi la longan tempon, en kiu la muloj estis plenkreskiĝantaj kaj trejnataj.

En kelkaj aliaj komunumoj de la sama regiono, kie estis trovataj la necesaj palmoj, la homoj plektis en la longa intertempo ĉapelojn kaj petatojn. Kaj en aliaj lokoj, kie troviĝis argila tero, la viroj produktis potojn kaj pelvojn kaj ludilojn por indiĝenaj infanoj.

Eĉ ne unu el ili pigris, tute egale, ĉu li estis tribestro aŭ kaciko aŭ nur kutima membro de sia komunumo. Ĉar laŭ la imagoj de ilia raso pigrado estis malmorala kaj kontraŭ la moro de la popolo.

## 11/2

Tia grupo de indiĝenoj, kiu en la sudo volis aĉeti junajn mulojn, estis tiu, kiuj migris sur mallarĝa vepropado.

Ili iris samtakte rapide trotante. Ĉiuj estis nudapiedaj. Siajn sandalojn, kiujn ili uzis nur por ŝtonecaj vojoj kaj por tiaj padoj, kiaj estis kovrataj de forrompitaj dornaj kaj pikilhavaj branĉoj, ili portis kunligite supre sur siaj pakaĵoj. Ledo por sandaloj estis sufiĉe multekosta. Tial la sandaloj devis esti konservataj ĉiam, kiam la vojo iel ebligis tion. Sur la glitigaj kaj krutaj vepropadoj oni efektive pli bone iris kaj pli simple grimpis per nudaj piedoj.

La viroj estis preskaŭ nudaj, la blankajn kotonajn pantalonojn ili ruligis alten ĝis la lasta triono de la femuroj. Tiel ne necesis restado, se oni devis vadi tra rojoj kaj riveroj. Kaj la ŝtofo ne tiel rapide aĉiĝis pro la ardanta suno, se ĝi ne estis elmetata al la suno je ĉiuj flankoj samtempe. La supraj korpopartoj de la viroj estis tute nudaj.
Ili portis sian pezan pakaĵon kun la portobendo metita trans la frunton sur la nuda dorso. La pakaĵo estis premita kontraŭ zorgeme kunfaldita kapreola felo aŭ kontraŭ felo de kapro. Tiel ili zorge traktis siajn blankajn kotonjakojn, kiuj estus tuj trafrotitaj de tiuj pezaj pakaĵoj dum nur unu marŝotago.

Mallonga vorto, kiun laŭte vokis la plej maljuna kaj plej sperta viro de grupo, kiu bone konis la vojon, ĉar li jam ofte iris ĝin, instigis la virojn troti ankoraŭ iom pli rapide. La pakaĵojn, el kiuj ĉiu certe pezis ĉirkaŭ kvardek kilogramojn, la homoj ŝajne apenaŭ atentis.

La suno estis malleviĝanta.

La viroj volis atingi la *carretera*-n, la federacian straton, sur kiu veturis la ĉaroj, antaŭ la komenco de la malhelo. Tuj kiam la suno forestis, en la vepro ekregis tenebro. Kaj eĉ indiĝenoj rezignas nokte migri tra la vepro, se ĝi ne estas tre proksima al ilia hejmloko, kie ili konas ĉiun ŝtonon kaj ĉiun arbuston.Male al tio sur la ĉarostrato ankoraŭ nokte eblas sufiĉe bone migri, se la ĉielo estas plena de steloj.

Ili sukcesis atingi la straton kun la lasta brileto de la finiĝanta tago. Tie ili ripozis dum certa tempo, sidiĝante sur la randon de la vasta strato sen demeti la pakaĵojn dum tio. Ili nur retrokliniĝis por la ripozado tiom, ke la pakaĵo ekkuŝu surtere.

Rapide, post duono de horo, ili estis en Niba, kie ili ĉirkaŭ tridek paŝojn antaŭ la preĝejo komencis ekbruligi sian bivakfajron sur la vasta herbokovrita placo kaj kuiris vespermanĝon.

**Rimarko**
*carretera* = ĉarostrato

## 11/3

Sur la transa flanko de la placo, pli proksime al la municipo, tuj apud la pramaljuna giganta arbo, kiu staris ankoraŭ en la mezo de la placo ekde la malnovaj indiĝenaj tempoj, kampadis trankvile karavano el ĉaroj. La ĉaroj post kunveturigo estis envicigitaj.

La bovoj, pezaj kaj grandegaj kiel junaj elefantoj, estis eljungitaj kaj dise kuŝis ripozemaj kaj bonfartaj, remaĉantaj kaj gustumantaj la kvieton, sur la placo.

La ĉaristoj kaŭris ĉe siaj bivakfajroj. Ili jam finis la kuiradon kaj

manĝadon. Ili kunsidis nun fumante kaj lace kune babilante, kontentaj, ke ili ĉifoje ne devas ripari radorompojn kaj displitiĝojn de timonoj.

Kiel aŭtentikaj ĉaristoj ili tamen ne povis lasi de tio jam nun denove paroli pri la laboro de la sekva tago, kaj pri la marĉaj distancoj, kiujn ili devos venki morgaŭ, kaj kiu el la ĉaroj ĉe tio eble povus disrompiĝi.

Tiel la ĉaristoj ofte faris sian laboron, laŭ ilia opinio jam sufiĉe duran, duoble pli streĉa kaj acidiga, ĉar ili ĉiufoje jam antaŭe parolis pri ĝi, kaj eĉ en dormoj sonĝis pri la laboro.

Jen la komuna sorto de ĉiuj proletoj. Ĉar ili havas tiom malmulte da sperto pri tio okupi siajn pensojn per aliaj kaj pli belaj aferoj, tial ili okupiĝas vekiĝinte kaj dum la dormo pri la malfacilaĵoj de sia laboro kaj pri la bezonoj de sia vivo. Kaj tial ili povas liberiĝi de siaj laboro kaj bezonoj eĉ ne je dimanĉo, ĉar ili jam dimanĉe frue komencas pensi pri la sekva lundo kaj timi kaj teruriĝi pri la sobra kaj frida lundo.
La estro de la karavano ordonis, ke ili ekiru tuj post noktomezo por tute eluzi la fruan matenhorojn; ĉar la sekvan tagon atendeblos klara, senventa kaj tial tre varmega tago, kun svarmoj de sovaĝaj murdantaj muŝoj.

La karavano, ĉiu unuopa ĉaro, estis ĝisplafone plenigita per frajtaĵoj, kiuj estis transportataj de la fervojstacio en la internon de la lando. Tiu karavano apartenis al *don* Laŭreano, al tre bonstata frajtentreprenisto kaj estimata komercista agento de la federacia ŝtato.

La estro de la karavano, al kiu lia mastro konfidis tiun tre valoran karavanon, estis Andreo Ugaldo, celtala indiĝeno havanta ĉirkaŭ

dudek jarojn. Sana forta juna viro, bronze bruna je la korpo, kun forta nigra faskeca hararo sur la kapo. Li servadis al *don* Laŭreano dum pli ol kvin jaroj kiel ĉaristo.

Andreo havis ĉe si junan knabinon, sian edzinon *Estrellita*, sian Steleton. Ŝi estis el lia raso kaj el lia nacio kaj parolis kiel li kiel gepatran lingvon la celtalan.

## 11/4

Forĵetinte la restaĵon de la fumita cigaredo, Andreo intencis sterni sin por dormi. Sub la ĉaro li jam preparis molan kuŝejon por Estrellita. Por si mem li elmetis petaton apud ŝi.

Sed ĉar li estis respondeca pri la bonfarto de la karavano de sia mastro, kaj ĉar lia mastro nun pagis por tiu respondeco dudekunu pesojn da salajro ĉiumonate, Andreo, antaŭ ol li sternis sin, ankoraŭfoje iradis sur la placo por rigardi, ĉu la junaj viroj dormas ĉe siaj ĉaroj, por ke oni ne ŝtelu ion dum la nokto. Kaj li observis la bovojn, ĉu ili estas trankvilaj kaj montras eble emon nokte eskapi kaj dezertigi la maizokampetojn de la malgrandaj farmistoj aŭ eĉ vagi eĉ plu flanken kaj perdiĝi en vepro.

Andreo, akompanate de Steleto, ĉirkaŭirante leĝere la vastan placon por nombri la bovojn kaj konstati, ĉu ili ĉiuj estas komplete proksimaj, venis al la bivakjafro, kie kaŭras la grupo de la indiĝenoj, kiuj marŝas en la sudajn regionojn por aĉeti junajn mulojn.

Ankaŭ la indiĝenoj jam manĝis. Kelkaj kuŝis longe etendiĝinte kun la piedoj antaŭ la fajro. Aliaj sidis ĉirkaŭe kaj fumis kaj babilis.

Andreo kaptis kelkajn vortojn kaj li aŭdis, ke ili parolas lian gepatran lingvon.

„*Buenas noches*“ li vokis al ili. „Ĉu vi estas hejme en la regiono de *Bachajón Celtal*?“, li demandis en la celtala.

„Jes, ni tie en tiu distrikto havas nian pueblon, nian setlejon“, respondis unu el ili. „Sed ni ne loĝas proksime de Bachajón. Ni loĝas iom malproksime de ĝi, pli proksime al la granda ĝangalo.“

„Mi estas el la bieno Lumbojvil“, Andreo nun prezentis sin. „Kaj jen, Estrellita, mia edzino, kiu estas kun mi, ankaŭ ŝi estas el tiu regiono, sed pli proksime sur la vojo al Tsimajovel.“

Estrellita staris du paŝojn pli malantaŭe.

Ne estas la kutimo de indiĝeninoj rapide iri en la proksimon de siaj edzoj kaj enmiksiĝi iel en ties interparoladon.

Tie, kie ŝi haltis, ŝi restadis starante. Sed estis kompreneble, ke ŝi montris sin scivola por iom ekscii pri sia hejmlando, eĉ, se ŝin ŝajne nenio plu ligis kun ŝia hejmlando. Ŝia tuta hejmlando jam fariĝis Andreo.

Ke ŝi volis ekscii ion, estis antaŭ ĉio pro la novaĵoj. De kiam ŝi forkuris de la hejma bieno por eskapi la fiaĵojn de la bienula filo, ŝi neniam plu eksciis ion el tiu regiono kaj neniun el tiu regiono ie ajn renkontis. „Kien vi iras sur via vojo?“ demandis Andreo, kiu kaŭriĝis ĉe la bivakfajro kaj bruligis novan cigaredon per ardetanta branĉeto, kiun li tiris el la fajro.

„Ni survojas por aĉeti junajn mulojn“, diris unu el la viroj.

„Muloj estas ĉi tie tre tre multekostaj“, klarigis Andreo.

La *tate*, la plej aĝa viro kaj la gvidanto el la indiĝenoj ridis: „Tiom stultaj vi certe ne konsideras nin, ŝafido mia, ke ni aĉetas la mulojn ĉi tie, ĉu? Mi jam kvarfoje faris tiun negocon, de kiam mi perlaboris la unuan kontantan monon en kafoplantejo de usonano en *Soconusco*, kie mi povis aĉeti la unuajn du mulojn, per kiuj mi komencis la negocon. Ne, *muchacito*, ni iras malsupren ĝis la fervojstacio, kaj poste ankoraŭ plu, ĝis la lagunoj ĉe la bordo de la maro, kie loĝas la *pescadores*, la fiŝistoj. Tiam ni ĉiam migros tra ĉiuj distriktoj proksime de la fervojo. Tie oni ne bezonas mulojn, sciu tion, knabeto mia. Ĉar tie, kie estas la fervojo, ĉio estas transportata per la fervojo. Sed tio estas la ĝusta grasa regiono por ni, ĉar tie la homoj havas ofte junajn mulojn, sed ili volas vendi la junajn bestojn plej prefere tuj tiam, kiam ili ĵus rampis el la patrino. Nu, komprenu, la homoj ĉe la fervojo ĉiam kaj eterne bezonas monon, ĉar denove kaj denove ili vidas ion, kion ili volas aĉeti kaj havi, ĉu ili bezonas tion ĉu ne. Kaj tio estas tre bona por ni, ĉar aliokaze estus tre malfacile aĉeti sufiĉe da junaj bestoj, por ke la longaj marŝoj indu la penon.“

„Ĉu vi venis survoje al Lumbojvil?“ demandis Andreo.

„Ni tie tranoktis“, diris unu el la viroj, dum li vigligis la fajron.

„Ĉu vi ne diris, ke vi estas el Lumbojvil?“ demandis Lazaro, atente rigardante al Andreo.

„Jes, tio mi estas“, konfirmis Andreo. „Mi estas el Lumbojvil, mia familio ankoraŭ loĝas tie, mi almenaŭ pensas tion.“

Li jam elaŭdis de tiu demando, ke Lazaro estas preta rakonti certajn novaĵojn, kiuj povus interesi lin.

Lazaro prenis flamiĝintan branĉon el la fajro kaj prilumis per tio pli proksime la vizaĝon de Andreo.

„Nun mi rekonas vin“, diris Lazaro, „vi estas filo de Criserio, kiu tie vivas en la bieno, la filo de Criserio Ugaldo.“

„Tio estas mia patro. Vi pravas. Kiel li fartas? Kaj kiel la patrino kaj ĉiuj en la domo?“ demandis Andreo.

Lazaro ne respondis. Li evitis la demandon per tio, ke li pripenseme distaŭzis tabakfoliojn, enmane rulumis ilin kaj elserĉis kovrofolion kaj poste malrapide kaj atentoplene formis cigaron, kiu, kiam ĝi estis pretiĝita, havis longon de dek du coloj kaj larĝis du da ili.

Andreo ekhavis strangan senton ie en si, kiam li vidis la cigaron. Li estis nun jam dek jarojn for de la hejma regiono. En tiu tempo li estis tute meksikanigita, li parolis bone la hispanan, kun la stranga, ne bele sonanta dialekto, kiel ĝi estas parolata en tiuj foraj sudaj ŝtatoj de la respubliko. Ke tiu dialekto ne bele sonis kaj ĝenerale kripligis la belsonan hispanan, kiu estas parolata kutime en Meksiko, Andreo kompreneble ne povis scii, ĉar li havis ĝis tiam neniun okazon kompari tiun dialekton kun la hispana en la centraj ŝtatoj aŭ eĉ en Durango. En tiuj dek jaroj li lernis tamen ne nur la hispanan kaj la legadon kaj skribadon kaj iom da aritmetiko, sed li ankaŭ kutimiĝis pri la vivo de la ladinoj. Li mem kompreneble ne povis vivi laŭ tiuj kutimoj, ĉar li vivis la mizeran kaj duran vivon de la ĉaristoj, kiuj ĉiam troviĝas kun siaj karavanoj sur la ŝtataj vojoj forlasitaj de Dio kaj de la inĝenieroj. Kaj li kutimiĝis pri la cigaroj, kiuj estis ofertataj en la *tiendas* de la urboj, cigaroj kun formo kaj grandeco, kiel ĝi estas konata ĉie en la mondo. Li mem kompreneble ne povis aĉeti cigarojn por si

mem. Ili estis tro multekostaj por li. Li devis fumi la plej malkarajn cigaredojn, kiujn li rulumis mem. Kiam li nun vidis antaŭ si la gigantan cigaron, lia hejmlando tiel klare aperis antaŭ liaj internaj okuloj, ke li pensis vidi sian patron antaŭ si, kun tia impresa cigaro inter la fingroj. Rilate la fumadon kaj formadon de la cigaroj, la baĥajontekoj transprenis la pramalnovajn kutimojn de la c*aribe*-indiĝenoj eble jam antaŭ du mil jaroj. Kaj la patro de Andreo fumis nur cigarojn de tiu grando, kiujn li rulumis por si mem, tiel, kiel ĉiuj viroj de lia popolo el tiu regiono.

Dum Lazaro nun kun granda sindediĉo rulumis sian cigaron, kaj tion faris kun mieno kvazaŭ li ne aŭdus la demandon de Andreo, diris alia indiĝeno, Emilio: „Ankaŭ mi konas vian patron Criserio, ankaŭ vian patrinon kaj ĉiujn viajn familianojn. Antaŭ du jaroj mi aĉetis de ili kvin porketojn. Sed mi devis pagi la monon por tio al la bienulo, ĉar via patro estas ŝuldanto de li. Mi tamen donis sekrete peson al via patro, kion la bienulo ne vidis, alie li eĉ tiun peson volus havi. Tiu, via bienulo, estas maliculo, *chingarse a el y su matricula,* damne kaj malbenite! Kiel li nomiĝas? Jes, *don* Arnulfo. Jes ja, tiel li nomiĝas, *don* Arnulfo. Li devus havi la nomon Lupo Avido.“

„Ĉe ni en Pueblo ni diras, ke *don* Arnulfo certe havas jaguaron kiel patron“, diris Lazaro.

„Kaj stinkantan kojoton kiel patrinon“, interdiris Emilio.

Lazaro pretigis fine sian cigaron tiel, ke ĝi ŝajne trovis lian plaĉon kaj agnoskon. Li lekadis ĝin de ĉiuj flankoj kun la karesemo de aŭtentika ĝuanto, kaj li ŝmacis per la lipoj kvazaŭ li ne volus fumi la cigaron, sed lante manĝi.

Post certa tempo fine ekbruliginte la cigaron kaj farinte ankaŭ

tion kun sufiĉe da sindonemo, li blovis kelkajn grandajn fumonubojn longe antaŭ sin, remetante ĉe tio la kapon malantaŭen, kaj kunpinĉinte la okulojn por ĝuante gustumi ĉiun momenton de la ĝuo.

Fuminte kelkajn spirtirojn, li rigardis Andreon longe kaj raste vagadigis sian rigardon laŭ la juna viro, kvazaŭ li volus taksi ties valoron.

Andreo rigardis en la fajron.

Li sciis jam nun el ĉiuj siaj sentoj, ke en la patra domo io ne estas tiel, kiel li esperis tion.

Sed li ne urĝis la aliajn, ĉar li sciis, ke la homoj de lia popolo diras tion, kio estas direnda, kiam ili rigardas la tempon kiel la ĝustatempan por tio. Ili ne estas babilaĉuloj kiuj pepas siajn vortojn jam tiam, kiam penso komencas formi sin en ili.

„Kiom da mono vi do enspezas ĉi tie ĉe la ĉaroj?“ demandis nun Lazaro.

„Sepdek centavojn ĉiutage. Kaj la porciojn por la manĝo“, respondis Andreo.

„Ĉu ankaŭ via edzino ĉi tie perlaboras monon?“

„Ne“, respondis Andreo. „Mi aĉetas por ŝi ĉion, kion ŝi bezonas, de mia mono. Sed ŝi estas tiel facile kontentigebla kiel birdeto, ŝi ne bezonas multon.“

„Sepdek centavojn ĉiutage“, ripetis Lazaro malrapide, kvazaŭ li volus kompari tiun valoron kun alia valoro, kiun li havis en la

pensoj. „Sepdek centavojn. Tio estas didamnite malmulte. Tiel vi ne povas tiri vian patron el la kaĉo. Ĉe l‘ diablo! Por tio necesas pli ol cent aŭ mi ne scias kiom da pliaj pesoj!“

Andreo ekteruriĝis. Li pene glutadis, kaj li ne povis malfermi la buŝon. Liaj lipoj konvulsie kuntiriĝis.

Lazaro ŝovis kelkaj branĉojn pli profunden en la bivakfajron. Li firme kunpinĉis la okulojn, ĉar ondo de verda fumo blovis sur lian vizaĝon.

*Estrellit*a en la dorso de Andreo kaŭriĝis kvin paŝojn for de li sur la tero, ĉar ŝi sentis, ke la interparolado de la viroj daŭros pli longe ol li supozis dum la unua saluto.

Neniu el la viroj atentis ŝin aŭ vokis al ŝi, ke ŝi venu pli proksimen al la fajro. Tio okazis ne pro iu misatento pri la ino, sed simple tial, ĉar ĉiu pensis, ke ŝi ja povas sidiĝi laŭplaĉe apud sia edzo ĉe la fajro, se ŝi sentas la deziron pri tio.

**Rimarkoj**
*Bachajón Celtal* = regiono en Meksiko, kie oni parolas la celtalan, indiĝenan lingvon.
*Buenas noches* = Bonan vesperon! Bonan nokton!
*Caribe*-indiĝenoj (ĉe Traven: „*Carribe-Indianer*“) = verŝajne estas la karibaj indiĝenoj
*tienda* = butiko, vendejo

## 11/5

Andreo turnis sin dum la antaŭa interparolado kelkajn fojojn al sia Steleto kaj kapjesis ridante al ŝi por tiel sciigi al ŝi, ke li ne forgesas ŝin.

Nun, dum sia profunda teruriteco, kiam lia buŝo ŝajne perdis la kapablon formi vortojn, li turnis sin al Estrellita. Li faris tion nekonscie kaj sen sia volo, kvazaŭ li atendus konfirmon de ŝi pri tio, kion li ĵus aŭdis, kaj kvazaŭ tie, nur pere de ŝi troveblus la savo el la doloriga turmento, kiun li sentis en tiu minuto.

La viroj ĉe la bivakfajro ne parolis laŭte. Tiel *Estrellita* ne povis formi kuntekston el la paroloj, ĉar ŝi kaptis ĉiam nur vorterojn, sen intence aŭskulti.

Kiam Andreo nun turniĝis al ŝi, ŝi iom kapjesis kaj ridis al li.

Jen okazis io stranga en la animo de Andreo.

Li vidis sian Steleton ne nur kvin paŝojn for de si, sed en tiom longa distanco, kvazaŭ ŝi sidus sur la transa bordo de maro. Kaj kun tia stranga iluzio de la vidosenso en lia koro samtempe leviĝis la certo, ke li perdis sian Steleton.

Kiel nun povus helpi Sankta Virgulino kaj Sankta Antonio Andreon dum ties mizero?! Kion farus por li la eklezio kaj Lia Moŝto, la papo de Romo?! Ili lasus lin sola dum ties doloro!

Li skuis la kolon, kvazaŭ li devus glutadi tro pene. Tiam li profunde enspiris kaj demandis: „Kion vi volas diri per tio, *hombre*,ke mi devos helpi al mia patro?!“

Lazaro dum certa tempo ne deflankigis sian rigardon de la bivakfajro. Poste li levis la ŝultrojn. Li rigardis siajn vojkamaradojn. Kiam li vidis, ke ili ĉiuj rigardas al la fajro, ke kelkaj pikadas en ĝi, ke aliaj postŝovas lignon kaj ĉiuj ŝajne okupiĝas pri io por eviti, ke Andreo parolu al iu persone kaj povu demandi lin,

Lazaro fariĝis nur des pli necerta. Li kondutis kvazaŭ li ĉiumomente volus ekdiri ion, li tenis sian cigaron proksime al ardanta lignokarbeto, kvankam la cigaro ne bezonis denovan ekbruligadon kaj – diris nenion.

Poste Emilio parolis krude kaj bruske:„Kiun sencon havus, tiel katpiedi ĉirkaŭ la respondon? Nia kulpo tio ne estas, ke ni trafis vin ĉi tie. Ni ne serĉis vin. Vi mem renkonte venis en nian vojon. Ni ne havas la komision sciigi vin pri io.“

„Kompreneble ne“, diris Andreo. „Kompreneble vi ne havas komision. Sed estas ja mia patro, pri kiu temas. Kaj mi tiom da jaroj nenion aŭdis pri li.“

Kvazaŭ indiferente diris nun Emilio: „Estas tiel, *don* Arnulfo, la bienulo de via patro vendis vian patron en monterion. Al agento. Mi pensas, ke li nomiĝas *don* Gabriel.“
Certe dum kelkaj minutoj Andreo restadis sidanta kvazaŭ li estus paralizita.
Kiam liaj pensoj denove komencis labori normale, estis la unua, kion li pensis, ke li kuros plej rapide hejmen kaj murdos *don* Arnulfon.

Sed tiu penso perdiĝis rapide, ĉar klariĝis al li, ankoraŭ dum la ekesto de la penso, ke murdo ne estus puno por *don* Arnulfo, kaj ke li per tia ago ne povus helpi al la patro, sed, ke ties situo per tio fariĝus eĉ pli malesperiga.

Li ne ekkris, kiam konsciiĝis al li pecon post peco la grava mizero de sia patro.

Apenaŭ aŭdeble por la viroj, kiuj sidis ĉe li, li diris denove kaj denove: „En la monterion vendita, mian patron. Mian patron

vendita en la monterion, ĉar mi ne estis hejme por helpi al li pagi ties ŝuldojn.“

Dum nun liaj pensoj pasie svarmadis konfuze, li memoris la tagon, kiam li vidis sian patron je lasta fojo. Estis tiu tago, kiam lia patro aĉetis petaton por li, do bastmaton, kaj lanokovrilon, por ke li ne frostotremu ĉe la mastro, al kiu li servas, kiu ne pagas salajron al li, kiu donas al li nur la magran manĝon, kaj kiu normale havus la devon aĉeti la petaton kaj lanokvorilon por li, ĉar Andreo havis ĉe li ja nur loĝejon kaj nutradon kaj ĉar lia patrono estis lia servomastro. Sed estis lia povra patro, kiu aĉetis tiujn aĵojn por li, ĉar li ne povis vidi kiel suferas lia filo. Al la servomastro estis egale, ĉu la knabo aŭ frostotremas aŭ malsaniĝas aŭ mortas. Estis ja centoj de tiaj indiĝenaj knaboj, kiuj kostas nenion kaj al kiuj oni ne pagas salajron kaj al kiuj oni transŝovas iom da manĝo por ties laboro kiel al la hundoj de la domo. Lia patro kiel peono devis preni la petaton kaj la lankovrilon sur sian ŝuldokonton ĉe tiu bienulo, ĉe kiu li servis, per kio lia aktuala ŝuldo plialtiĝis konsiderinde.
Kiam Andreo tiam adiaŭis sian patron por reiri al sia servo, lia patro diris nenion, neniu ploro montris sin sur liaj okuloj. Sed li rigardis sian forirontan filon, kiel li ankoraŭ neniam rigardis lin. La tuta profunda amo, kiun la patro havis por sia filo, kaj kiun li hontis esprimi, tiel, kiel ĉiu indiĝeno, estis videbla en la okuloj de la patro, kiam li rigardis la filon dum la adiaŭado. Estis timida alta estimo por sia filo, kiun sentas indiĝeno, kaj kiu estas ligita kun la mistero, ke por la patro la knabo estas ĉenero en la ĉeno de la generacioj, kiu etendiĝas de eterneco ĝis eterneco, kiel portantoj kaj generuloj de la familia karaktero, kaj ke li, la maljuniĝanta viro plijuniĝas, kaj scias, ke li vivos post sia morto plu en sia filo. Nur indiĝeno, lante kaj heziteme rilate siajn vortojn kaj malvolema pri la esprimado de siaj sentoj, kapablas meti tutan religion kaj vivfilozofion en sian rigardon, kaj nur

indiĝeno ĉiam kapablas legi ĝuste tiun rigardon kaj ĉiam komprenas ĝin, kaj antaŭ la rigardo kaj post ĝi.

Tiun rigardon de sia patro, kiun Andreo neniam forgesis kaj portis en si kiel eterne sonantan hejmlandan kanton, li havis nun antaŭ siaj okuloj.

Ŝajnis al li, kvazaŭ tiu rigardo de lia patro troviĝas en la ardetanta fajro, kie ĝi ardas en ĉiu karboligno. Ŝajnis al li, kvazaŭ la rigardo troviĝas en la vizaĝoj de la viroj, kie ĝi heliĝas kaj malheliĝas, tiel, kiel la fajro ekflamiĝas kaj malflamiĝas. Kaj ŝajnis al li, kvazaŭ la rigardo de lia patro eĉ lumas el la tenebro, kiu ŝarĝas la vastan placon kiel revata stelo.

Pasis tempo, kiu ŝajnis al li nenombrebla kaj eterna. Poste li fine elspiris kaj turnis sin al *Estrellita*.

Sed li ne vidis ŝin, kvankam ŝi tie kaŭris kaj atendis lin. Li vidis anstataŭ ŝin nur la rigardon de sia patro, kiu estingis ĉion, kio estis krome por li sur la mondo, kaj kiu okupis lian internon kiel funebranta suno.

## 11/6

Li ekstaris, kun plumpa gesto.

Li diris: „Mi devas rigardi miajn ĉarojn. Ni finos la kampadon tuj post noktomezo. Mi ne havas tagon aldoneblan. Havu feliĉon sur via vojo, *amigos*.“

Li etendis al ĉiu la salutmanojn. Kiel ajn ili faris tion, ili tuŝis nur la pintojn de la fingroj ĉe la etendado de la salutmanoj. Kaj en tiun tuŝadon de la fingroj metis la viroj, tiel kiel ĉiu alia viro el ilia

raso, pli da sincero el iliaj aŭtentikaj sentoj ol faras tion aliaj homoj, kiuj ĉe la mansaluto kvazaŭ skuas la brakojn el siaj artikoj, ĉar ili ĉiam devas timi, ke la alia aliokaze dubus pri la bonkoreco kaj sincero de la saluto.

*Estrellita* ekstaris, kiam ŝi vidis, ke Andreo adiaŭis la virojn.

Andreo iris renkonte al ŝi, karesis ŝian hararon kaj diris: „Ni ekiru, Steleto, ni devas tre frue ekmarŝi.“

**Rimarko**
*amigos* = amikoj

## 11/7

En la fruaj matenaj horoj la ĉaristoj devis strečе labori.

Vojdistanco de pli ol tri kilometroj, kie la ĝangalo etendiĝis ĝis proksime de la vojo, estis kovrata de profunda ŝlimo. Unu flanko de la vojo estis alta rokovando, el kiu fontis ĉiun dudekan paŝon akvo, kiu tenadis moligita la vojon, kiu estis kovrata per putriĝantaj folioj, per putriĝemaj branĉoj kaj branĉetoj kaj per la kalkopolvo de la rokovandoj, kiu falis kiel sablo pecon post peco sur la vojon. Je lokoj, kie la vojo estis profunda, la ĝangala rojo inundadis post kelkaj tagoj la vojon tiom forte, ke la akvo ne forfluis flanken, sed laŭ la vojo, tiel eĉ ankoraŭ pli marĉigante kaj pli profundigante la ŝliman vojon. La gigantaj ĝangalaj arboj kovris per siaj kronoj la vojon tiel dense, ke la suno ne povis trapenetri ilin por tute elsekigi la vojon eĉ nur unufoje.

Tial tiu vojdistanco tiom strečis la ĉaristojn, ke ili ne povis pensi eĉ nur dum minuto pri io alia ol pri tio, kiel ili tie elvenos sen radorompiĝoj, sen deglitado de ĉaroj kaj de bovoj.

Ĉirkaŭ la naŭa matene ili tiam tamen atingis la pli bonan parton de la vojo, kiu nun ĝis Jovel estis libera kaj bona ŝoseo. Kio sur tiu vojo validis kiel bonkvalita, en aliaj landoj, kie oficistoj uzis la monon ceditan kaj transdonitan efektive por la ŝosekonstruado kaj ne metis ĝin en la proprajn poŝojn, tamen estus rigardata kiel sufiĉe aĉa vojo, tiel, ke oni supozus, ke ĝi estas la lasta vojparto antaŭ la eniro en la inferon. Sed tie tiaj aĉaj vojpartoj validis tiom, ke oni elmontris ilin kiel ekzemplon por alludi la enloĝantojn de la federacia ŝtato, kiel aspektas bone flegata aŭtoŝoseo proksime de Detrojto. Kompreneble tiu tielnomata bonkvalita vojdistanco estis ankoraŭ tiom fora de bonkvalita aŭtoŝoseo kiel eksprestrajna lokomotivo diferencas de laste produktita serio de bovoĉaroj. Sed sen tiuj ekzemploj oni ne kapablus klarigi al la homoj en la lando, ke ekzistas ie aliloke surtere – kie nur duono de la ŝosekonstruada mono restadas en la poŝoj de oficistoj kaj inĝenieroj – reto el stratoj, kiuj kune havas la longon de dekmiloj da kilometroj, sur kiuj oni povas veturi tiel facile, ke oni povus transporti neenpakitajn tetasojn sur ili sen disrompi eĉ nur unu tason. Tiujn modelajn ekzemplojn de bonkvalitaj vojpartoj sur tiu ĉi ŝtata ŝoseo ne konstruis la guberniestroj, sed la naturo. Sed la guberniestroj rigardis tion sia propra merito. Ili ebenigis tiujn vojojn pere de indiĝenoj, kiuj devigite kaj senpage faris la laboron kaj ili kalkuladis tiun parton de la vojo poste al la popolo tiom multekoste, kvazaŭ la ŝoseo estus rompita el roko.

Kiam la karavano jam delonge trairis la moligitan vojon kaj la suno komencis tiel flame radii malsupren, ke la bovoj, sekve de la varmego kaj la ekssvarmado de la mordantaj muŝegoj, ne plu kapablis labori, Andreo ordonis ripozan paŭzon.

La viroj eljungis la bovojn, ekbruligis bivakfajrojn kaj kuiris sian manĝon. Ili haste faris tion, ĉar ili estis lacaj kaj dormemaj.

Fariĝis neelteneble varmege; ĉar estis ĉirkaŭ tagmezo kaj la suno tiam staris krute super ili.

Kaj ĉiuj bezonis trankvilon kaj dormon.

## 11/8

La kampadejo troviĝis sur ne tre granda, sed bone kreskanta areo.

Tiu terpeco havis proksimume la formon de triangulo.

La vojo ekde Jovel tuŝis la kampadejon je unu angulo. La vojo de tie kondukis laŭ la maldekstra flanko de la triangulo kaj forlasis la duan angulon por preteriri monton. Tiun vojon sekvis la ĉaroj, ĉar la monto estis tro kruta kaj la pado trans la monton tro malvasta kaj tro rokeca.

La sekva flanko de la triangulo estis la suba linio de kruta altaĵo prikreskata de tuberaj arboj kaj arbustoj.

La angulo, kiu troviĝis transe de la unua angulo, kie la vojo ekde Jovel tuŝis la triangulon, estis la komenco de malvasta pado, kiu krute serpentumis ĝis la surfaco de la monto. Rajdisto- kaj mulokaravanoj ne marŝis sur la granda duoncirklo ĉirkaŭ la monton, sed grimpis sur tiu pado trans tre ŝton- kaj rulŝtonetan branĉan etendaĵon de tiu monto, ĝis kiam ili denove atingis proksimume post horo kvincent metrojn antaŭ malgranda sukerplantaĵo la grandan vojon.

La tria flanko de tiu triangula paŝtejo kliniĝis al speco de deklivo.

Tiu deklivo estis paŝtejo prikreskata per *Sacaton*-herbo, per

arbustoj, arbustaĵoj kaj malbone kreskintaj usonaj piceoj.

Preskaŭ malsupre de tiu deklivo serpentumis rojo tra densa vepro. Estis parte la sama rojo, kiu supre sur la paŝtejo krucis la vojon kondukantan ekde Jovel. Kaj pro la klara trinkebla akvo de la rojo, taŭgis tiu supra paŝtejo kiel bonega kampadejo.

Sur la alia flanko de la rojo perdiĝis la deklivo en granda vepro.

**Rimarko**
*sacaton* = tufa speco de kruda herbo

## 11/9

Tiu malgranda kampadejo estis por *Estrellit*a unu el la plej belaj memoroj el ŝia ĝistiama vivo.

Estis la unua vojaĝo, kiun Andreo kaj ŝi, *Estrellita*, faris kune. Post kiam li kondukis ŝin antaŭ kelkaj semajnoj kun jarfoiraj komercistoj kaj ties varoj supren, okazis dum la reveno de karavaneto rekondukata de Andreo de sanktula festo en *Balún-Canán*, ke li trovis *Estrellita*-n. Kaj ekde tiu vespero ŝi estis ĉe li.

Ĝis supren al Jovel vivis la knabino en ĉiama timo, ke ŝia pli frua mastro aŭ ties filo trovos kaj rekondukos ŝin. Sed kiam ŝi jam estis transe de Jovel kaj venis al tute fremda regiono, perdiĝis ŝia timo tute. Ŝi tiam tute fordonis sin al sia sento, kiun ŝi portis en sia koro pri Andreo ekde la unuaj vortoj, kiujn li diris al ŝi.

Tiu loko tie estis la unua kampadejo en ilia vojaĝo, kie ŝi sentis sin sekura kontraŭ ĉiu ajn persekuto, kie ŝi unuafoje libere elspiris kiel juna besto en la arbaro, kiu fuĝis el sia kaĝo kaj kiu priflaras la konfidajn herbojn kaj arbustojn en kvieta beateco, ĉar

ĝi retrovis malnovajn, bonajn kaj intimajn amikojn.

Tie en la kampadejo Andreo instruis al ŝi skribi la unuan vorton, *Estrellita*, jen la nomo, kiun ŝi ricevis de li.

Sed ŝi ja tie ne atingis pli rilate al sia skribado ol pene povi pentri la malgrandan vokalon ‚e'.

Tiam ili ambaŭ kune sidis ĉe la deklivo, ĉe la rojo, je loko, kiu estis lasata libera de la densa arbustaĵo, nur ĝuste tiom vasta, ke ambaŭ povis sidi unu apud la alia.

Li tiris surpresitan papereton el ĉemizopoŝo.

Estis simpla poemo de nur kelkaj linioj, kiun li ie trovis, li ne plu sciis precize kie. Ĝi plaĉis al li tiom, ĉar ĝi estis tiel simpla, ĉar ĝi tiel kare sonis pro ties vortoj, kaj ĉar li tuj tute komprenis ĝin rilate ties tutan enhavon kaj povis postsenti ĝin.
Atenteme li elŝiris ĝin el la ŝiraĵo de surpresita papero, kiun li levis ie sur la vojo. La papereto estis jam sufiĉe flaviĝinta kaj saturita de ŝvito pro la longatempa portado en lia ĉemiza poŝo.

Li disfaldis ĝin zorgeme kaj antaŭlegis ĝin al Steleto:
„Bluaj floroj ĉe la vojoj;
ruĝaj floroj ĉe l' figkakt';
estas lig' al vi, Priëta;
de kiam mi rigardis vin
je l' unua vidkontakt'"

Li legis tion hispane.

Kiam ŝi demandante rigardis lin, ĉar ŝi tiam ne komprenis la hispanan, li tradukis tion en la celtalan por ŝi.

Ŝi diris pri tio: „Tio estas tiel, kvazaŭ kantas birdo en la arbustaĵo, kiam li serĉas inon kaj volas konstrui neston por ĝi.“

„Tion ankaŭ certe tiel opiniis tiu, kiu verkis la kanton“, li diris, strange tuŝita de la natura klarigo, kiun ŝi esprimis pri la linioj.

„Ĉu verkis?“ ŝi demandis. „Kio estas tio?“

Tiumomente li komencis klarigi al ŝi, kio estas la verkado. Por kio ĝi servas, kaj ke per ĝi oni povas sciigi al neĉeestanto ion, kion oni volas diri al tiu.

„Jen mi ja ne devas lerni la skribadon“, ŝi diris simplanime, „ĉar vi ĉiam estos ĉe mi kaj mi ĉiam ĉe vi kaj mi volas paroli kun neniu alia sur la mondo ol nur kun vi, mi povas diri al vi ĉion per mia buŝo kaj ne devas skribi al vi.“

„Tio ja eble estas ĝusta, Steleto“, li diris, kaj li pensis serioze, ke ŝi pravas.

Sed li sentis sin tiel senfine riĉa, pro sia tiom malfacile akirita trezoro de la mizera scio, kiun li posedis, ke li sentis tion dolore ne povi dividi tiujn trezorojn kun Steleto. Li ne volis havi ion, kion ŝi ankoraŭ ne havas, ne esti pli riĉa ol ŝi. Li volis sciigi kaj doni al ŝi ĉion, kion li posedas, ĉion havi kun ŝi komune.

Kaj li havis tiun deziron sen scii, ke akiritaj aŭ eksciitaj konoj, kiujn oni sciigas al aliaj homoj nur pro helpopreteco, faras la donanton pli riĉa ol la doninto estis antaŭ la disdivido de siaj trezoroj. La riĉo de la trezoroj de la scio de unuopa homo kreskas laŭ tiu amplekso, laŭ kiu kreskas la edukiteco kaj la scio de ĉiuj homoj, kiuj estas ĉirkaŭ li. La kulturo de la homa socio baziĝas ne sur la giganta scio de unuopaj homoj ĉirkaŭataj de centmiloj da

nesciantaj kaj needukitaj homoj, sed vere alta kulturo formiĝas nur per la ĉiama interŝanĝo de ideoj kaj pensoj de centmiloj de homoj, kiuj havas simile altan bazan edukitecon kaj pro tio povas pli facile reciproke komprenigi sin rilate al siaj ideoj kaj pensoj. Ĉar ĉiu unuopa homo, egale de kiu ajn raso aŭ deveno, foje survojigite, kapablas evoluigi pensojn kaj ideojn, kiuj laŭ ties speco vere estas originaj kaj novaj. Tie, kie la formado de la spirito kaj la disciplinado de la inteligenteco estas la privilegio kaj negoco de kasto el profesiaj spiritaj boksistoj, kiuj ladujope aŭ kestope fordonas de siaj trezoroj la varon nur al aliaj privilegiitoj, sekiĝas la fontoj de ĉiam denova fekundigo de la homa spirito, ĉar la privilegiitaj spiritaj akrobatoj rifuzas ideojn, kiuj devenas de neprivilegiitoj, kaj devas rifuzi tiujn ideojn, ĉar ili endanĝerigas ties privilegiojn kaj ties socian rangon.

Pro sia forta deziro sciigi al ŝi ĉion, kion li sciis, kaj partoprenigi ŝin tute pri ĉio, kion li posedas, serĉis Andreo alian kaŭzon, por komprenigi al sia amatino, kiom grava estas por ŝi skribado, legado kaj kalkulado.

Li diris: „Pripensu, *Estrellit*a, tiun, kiu povas skribi kaj legi, neniu tiel facile povas trompi per kontraktoj, per ŝuldokontoj, per dekretoj de la registaro. Se la peonoj en la bienoj povus legi kaj kalkuli, la bienulo ne povus teni ilin en sklaveco kaj en ŝuldodevigoj kaj vendi ilin laŭplaĉe.“

Ŝi ne komprenis, kial la sciado de tiuj etaj sciencoj povas liberigi peonon, ĉar ŝi ne superrigardis la kunligon. Por povi kompreni tiun interligon, ja ĝuste necesis la sciencoj pri legado, skribado kaj kalkulado, por ekkoni en kiu formo la kalkulado kaj skribado de tiu, kiu komprenas tion, povas esti uzata je la malavantaĝo de tiu, kiu nek povas legi nek kalkuli.

Sed ĉar li diris, ke tio tiel estas, tial ŝi kredis tion sen pripenso kaj sen kompreno.

Ŝi demandis: „Ĉu vi povas skribi?“

„Jes, mi povas skribi. Ĉu vi foje volas vidi kiel oni faras tion?“

Kaj li skribis sur papereton da papero per krajono: „Mi trovis *Estrellita*-n, kiam ŝi estis povra, tute forlasita kaj ne havis eĉ unu amikon en la vasta mondo.“

Ŝi observis lin kun devoto, kiam li lante pentris la literojn paperen, kaj ŝi admiris lin, ke li faris tion tiel lerte. Tio plenigis ŝin per granda ĝojo, ke li, la enhavo de ŝia vivo, estis tiom prudenta, ke li kapablas fari kaj scii ĉion, kio surtere estas konenda kaj scienda. Kiam li antaŭlegis poste la skribitan, ŝi diris: „Tio estas vera, ho, tio estas ja tiel vera kiel la steloj en la ĉielo.“

Kaj ŝi kaptis la manon, per kiu li skribis kaj premis ĝin al sia vizaĝo.

Tiam ŝi diris: „Mi volas skribi al vi pri ĉio en la mondo, same tian belan kaj karan, kian vi skribis tion nun al mi.“

„Prenu tiun notfolion kaj konservu ĝin“, li diris.

Ŝi kunfaldis la papereton ĝis kiam ĝi fariĝis tute eta, ŝovis ĝin supre en la malfermitan ĉemizon kaj diris: „Mi volas porti ĝin sur mia koro, kiel mi portas en mia koro ĉiujn viajn vortojn.“

„Nu, bone“, li diris ridete, „ankaŭ vi volas skribi ion tian belan al mi, vi diras. En ordo, ‚jen mi volas instrui la skribadon al vi kaj la

hispanan samtempe. Jen, atentu, en la celtala idiomo oni ne povas skribi, ĉar ni ne havas literojn. Literojn havas nur la lingvo de la ladinoj. Ili faris tiujn literojn, por ke ili povu skribi kontraktojn kaj leterojn.“

Tiel komenciĝis la lingvoinstruado kaj la instruo de la skribado. Kaj ĝi komenciĝis malsupre sur la eta loko ĉe la rojo. Cent paŝojn malproksime de la ĉaroj kaj viroj, dum la lastaj radioj de la suno kviete estingiĝis.

Ekde tiu tago, kiam tio okazis, *Estrellita* kun Andreo jam kvarfoje denove estis tie, sur tiu eta paŝtejo, kiam li kondukis karavanojn tien kaj tie kampadis.

Kaj ĉiufoje ili ambaŭ grimpis malsupren al la malvasta libera loko ĉe la rojo, kie ŝi lernis la unuan literon de sia nomo. Kaj ĉiufoje ŝi surgenuiĝis tiuloke kaj premis siajn lipojn al la herbe kovrita tero kiel saluton kaj memoron pri tiu unua vespero, kiun ŝi tie pasigis kun Andreo.

Ĉiam, kiam ŝi aŭskultis pli poste la vorton hejmlando, plektiĝis en ŝia animo kun la imago hejmlando tiu eta peceto da tero.

**Rimarkoj**
*nopalo* = figokakto

## 11/10

La ĉaristoj jam sternis sin por dormi, parte en la ombro de la arbustoj, parte sub ĉarojn.

Andreo rigardis ĉirkaŭ si, kaj kiam li trovis, ke ĉio estas en bona ordo, li alvokis Steleton.

Ŝi grimpis kelkajn paŝojn supren sur la monto kaj sidiĝis en la ombron de arbo, kie ŝi okupiĝis pri tio brodi per ruĝa, verda kaj blua lano amason da simplaj figuroj en sian novan blankan lanojaketon por plibeligi la jaketon. Ŝi neniam lernis brodi. Ŝi vidis tion nur unufoje ĉe indiĝenino, kiu sidis antaŭ la pordo de sia kabano, kie la karavano preterveturis kaj devis halti dum kvarono de horo, ĉar la jugorimenoj de bovo estis disŝiritaj. Ŝi provis la brodadon nun mem. Okazis sufiĉe mallerte. La figurojn, kiujn ŝi enbrodis, estis simplaj steletoj, raŭtoj, kvadratoj, cirkloj kun krucetoj, svastikoj kaj koretoj. Sed ŝi kopiis tiujn figuretojn tiel lerte, interŝanĝis ilin tiel multaspekte kaj uzadis la kolorojn tiel simple laŭnature, ke la jaketo jam dum la ekesto faris la impreson, ke ĝi fariĝos tre bela kaj vere unika je sia speco.

Kiam Andreo vokis ŝin al si, ŝi eksaltis, kunpakis haste siajn aĵojn, portis ilin al la ĉaro kaj iris renkonte al li.
Andreo diris: „ Ni iru malsupren al la rojo, kie ni ĉiam sidis. Ni tie same tiel bone povos ripozi kiel ĉi tie supre ĉe la ĉaroj.“

„Jes ja“, ŝi konsentis ĝoje. „Tie multe pli belas, tie estas neniu polvo de la ŝoseo, kaj ni povas interparoli tute solaj, nur vi kaj mi.“

Ŝi plezure babilis al li, dum ŝi parte saltante, parte grimpante avancis lin.
Laŭ jaroj kaj siaj gestoj ŝi ankoraŭ estis infano. Tamen ŝi laŭ la juĝo de sia raso estis nun jam juna ino.

## 11/11

Nun ili sidis malsupre sur la loko tiom intima al ili.

*Estrellita* lasis ludi la akvon ĉirkaŭ siaj nudaj, malhele brunaj kaj

fortaj piedoj.

Andreo rulumis dikan cigaron. Li faris tion tre pripenseme.

Kiam la cigaro fine ardetis, li diris sen iu ajn enkonduko: „La bienulo vendis mian patron en monterion.“

La knabino perdis ĉiun sangoguton el la vizaĝo. Ŝia buŝo malfermiĝis vaste, tute per si mem. Ŝia buŝo certe dum kelkaj minutoj estis tute malfermita. Poste ŝia buŝa interno fariĝis peza kaj seka. Ŝi profunde enspiris. La enspiro sonis tiel, kvazaŭ susuranta ventbloveto premiĝis en la buŝon. Ŝi haste movis la kapon al ĉiuj direktoj, kvazaŭ ŝi volus ĵeti sian kapon el la kolaj artikoj. Ŝiaj okuloj vaste elkaviĝis kaj fariĝis ruĝemaj, tiel, ke ŝajnis, kvazaŭ la haŭtetoj firmtenantaj ŝiajn okulojn, volus forbruli. Ŝiaj malgrandaj manoj formiĝis en pugnojn kaj ŝi batadis kvazaŭ tamburante sur siajn femurojn. Ŝi elpuŝis retiritan krion, kiu finiĝis kvazaŭ forhakite. Gargaris en ŝia gorĝo. Ŝi balancis la supran korpoparton tien kaj reen, kvazaŭ ĝi estus taŭzata de ŝtormo. Poste ŝi tiris la piedojn el la akvo kaj ŝovis ilin dense al si mem.

Kaj tiumomente la larmoj komencis flui el ŝiaj okuloj tiel, kiel fluetantaj rojetoj.

Sed Andreo aŭdis nek ŝian ploradon nek ŝian plorsingultadon.

## 11/12

Se diras indiĝeno al alia indiĝeno, ke lia patro estas en mizera situacio, tiukaze inter ili ne necesas eĉ nur unu plia vorto. Ĉar tio, kion la filo faros poste, estas tiel neŝanĝebla, estas tiel ekstera de lia volo kiel la morto, kiu povas trafi homon. Tiuj, kiuj devas

esprimi siajn sentojn per kontanta mono por scii, ke ili havas sentojn, komandas aŭ komandigas sian dion: „Por ke mi fartu bone, por ke mi vivu longe surtere, por ke mi ĉiam faru bonajn negocojn kaj por ke mi ĉiam diligente kaj abunde enspezu sufiĉe da belaspektaj dolaroj, tial honoru la gepatrojn.“

Ili nur tial ne diras la subpropozicion je la unua loko de la komando, por ke la dolaroj ne tro evidente montriĝu. Ja ankaŭ en nia hebreigita religio neniam estas preĝate pri la eterna ĉiela rekompenco en tiu maniero, ke temas ĉe tiu rekompenco pri kvieta kontenteco post farita vivlaboro, pri bonfartiga beateco, kiun oni sentas pri tio, ke oni faris konscie kaj intence neniam ion malbonan al estaĵo. Sed oni substrekas emfaze ĉe predikado kaj ĉe dresado de religiaj veroj, ke temas rilate la eternan ĉielan rekompencon pri bona sidloko en bonega simfonia koncerto, dum kiu oni havas la rajton porti flugilojn kaj ĉeokaze kunmuziki per saksofono, perkutinstrumentoj kaj liroj. Ĉiam devas esti klara, kion havigas bonaj agoj je kontanta mono aŭ je privilegioj post la morto, kaj ne estu nemenciita, ke la fiĝojo kontraŭ tiuj, kiuj eterne devos rosti kaj rosteti, ankaŭ havas valoron, pro kio utilas infaneca kredo.

La indiĝenoj ne konas dian leĝon, kaj neniam konis iun en la longa historio de sia raso. Sed ili konas surterajn faktojn. Kaj unu el tiuj faktoj estas: Li estas via patro kaj ŝi estas via patrino. Ĉu li honoras ambaŭ homojn aŭ ne, pri tio lia dio ne okupiĝas. Lia sango diras al li, kion li devas fari rilate al tiuj du homoj. Nek necesas promesi dolarojn al li, nek oni devas timigi lin per ardantaj tenajloj.

## 11/13

„Kiam vi ekiros?“ demandis *Estrellita*.

„Mi kondukos la ĉarojn supren al Jovel. Hodiaŭ nokte aŭ je la frua mateno ni povos esti tie. Mi havas ŝarĝon da kafo kaj tabako kaj kelkajn milojn da malplenaj boteloj el la bierfarejoj, kiujn ni retransportas. Morgaŭ vespere ni estos sur la hejmvojo. Post tri tagoj mi povos esti kun la ĉaroj ĉe *don* Laŭreano. Tiam mi foriros tuj, ankoraŭ en la sama nokto por ne veni tro malfrue al mia patro."

„Mi iros kun vi, karulo mia", diris Steleto. „Mi ankaŭ iros kun vi en la monterion, mi iros kun vi tien, kien ajn vi iros. Ĝis trans la finon de l' mondo. Neniu vojo estus tro longa, neniu vojo tro streĉa, neniu laboro tro dura, se mi povas esti kun vi."

„Se vi povus fari tion, *Estrellita* mia" objetis Andreo kun voĉo sufokiĝanta, „tiukaze mi eĉ ne parolus pri tio kun vi. Ni forirus, kaj estus bone, egale kien kaj egale kun kia celo kaj fino. Tion mi ĉion bone pripensis, dum la tuta nokto kaj hodiaŭ dum la tuta vojo. Vi ne povas iri kun mi. Vi ne povas pro vi, kaj ne pro mi, mi certe neniam pensis, ke mi, iam ajn, tiom devos suferigi vian koron, kaj tute sen mia kulpo. Kaj multe malpli estas la kulpo de mia povra patro, ke mi vin, kara Steleto mia, devos lasi sola."

„Vi promesis al mi en la unuaj tagoj, kiam ni nokte sidis sur la herbeja ebenaĵo kaj estis tiom plenaj de ĝojo, ke vi neniam forlasos min. Ĉu vi ne promesis tion al mi?" demandis Estrellita.

„Tion mi promesis", konfirmis Andreo. „Vi estas la plej proksima al mi, tuj post mia patro, kaj se ne estus pro mia patro, neniu generalo kaj neniu guberniestro povus disigi vin de mi. Mia patrino neniam povas veni en tian grandan mizeron, kiel estas la mizero, en kiu estas nun mia patro. Mia patro estas nun jam maljuna kaj laca. Li multe laboris. Li apenaŭ transvivus la marŝon al monterio, kaj li certe postrestus ĉe la vojo, kie vulturoj

kaj sovaĝaj hundoj vorus lin. Kaj tial vi estas krom mia patro la plej proksima al mi, ĉar via mizero povas fariĝi tiom pli granda ol tiu de mia patro. Sed ĉar mi ne povas permesi, ke via mizero fariĝos pli profunda ol tiu de mia patro, tial mi ne povos preni vin kun mi.“

La junulino ne komprenis, kion li celis.

Ŝi demandis: „Sed, se mi ĉiam estos ĉe vi, kiel mia mizero povus fariĝi pli granda ol ĝi estus,.se vi forlasus min?“

„Mian patron urĝe ŝarĝas mizero. El tiu mizero mi liberigos lin. Estas la plej amara, kiu trafis lin en la vivo. Sed el la mizeroj, kiuj trafus vin, se vi akompanus min, mi ne ne povus liberigi vin. Mi povus nur murdi iun. Sed tiukaze ili murdus min kaj vi estus tamen sola kaj pli sola ol antaŭe.“

„Sed mi mortus tiukaze kun vi“, ŝi diris trankvile.

„Se oni permesos morti al vi, Steleto“, ĝustigis ŝin Andreo. „Kaj“ – li aldonis, „se de vi ankoraŭ tiom postrestos, ke la mortado havos sencon por vi, kaj ke restos al vi sufiĉe da propra volo morti libervole. Via animo kaj via korpo estus disrompitaj.“

Ŝi ne sciis kion diri responde. Formiĝis en ŝi korpa imago pri nekonata timo, kiu ŝajnis al ŝi simila al monstra bestaĉo kun nenombreblaj ungegoj kaj longaj hararkovrataj brakoj, kiuj langumas kiel serpentoj en ĉiuj direktoj por kapti viktimojn.

Ŝi ne povis imagi, kiujn specojn de mizeroj Andreo eble celis. Sed ŝi koncedis al li, ĉar li sciis tiom da aferoj. Kaj ĉion, kion li diris, estis ĉiam vera kaj ĝusta.

Pensante pri tio, ŝi fariĝis nur des pli dolorige konscia pri la estonteca perdo.

La trankvila certo per kiu li diris, ke li devos iri sola, sen ŝi, prenis de ŝi ĉiun esperon, ke povus ekzisti alia elirvojo.

Li pripensis tion longe kaj daŭre kaj konsideris ĉiujn eblojn. Nun ŝi memoris pri tio, ke li diris eĉ ne vorton dum la tuta vojo, dum alitempe li havis por ŝi eĉ sur la plej strecaj vojoj kaj ĉe la plej duraj laboroj, kiam la blasfemiaj sakroj flugis kiel mordomuŝoj tra la aero, ĉeokaze kelkajn afablajn aŭ ŝercantajn vortojn, tuj, se ŝi proksimiĝis al li. Kiam li ekvidis ŝin, ekmortis ankaŭ la plej ŝrikaj insultadoj sur liaj lipoj kaj anstataŭ dirota sakro pro neatendita radorompiĝo je la plej aĉa distanco de la vojo, formis sin sur lia ŝvitanta kaj polvoplena vizaĝo ĝoja ridado, kiun li ĵetis al sia Steleto.

Ĉar lia sperto estis multoble pli ampleksa ol ŝia kaj ĉar ŝi profunde en sia koro sentis, ke li estas kun sia tuta persono unueca kun ŝi, ŝi sciis ankaŭ, ke li jam tute pripensis ĉion de ĉiuj flankoj por trovi eblon reteni ŝin ĉe si.

## 11/14

La sorto ne estas diskutebla. Por indiĝeno multe pli ol por homo de la eŭropa loĝantaro, kiu troviĝas sub la influo de multnombraj filozofoj, el kiuj li elserĉas tiujn, kiuj ŝajnas al li plej taŭgaj por liaj negocoj aŭ la harmonio de lia vivo. En tia oportuna situacio indiĝeno ne troviĝas. Por li la sorto estas lia vivdestino, kiun li ne povas eviti kaj kontraŭ kiu li tial ankaŭ ne batalas.

Tamen *Estrellita* kaptis la lastan alludon de espero, kiun ŝi supozis vidi briltremi en sia ekkirliĝinta pensomaro.

„Mi aŭdis“, ŝi diris, „ke de tempo al tempo viroj kunprenas siajn edzinojn en la monteriojn.“

„Jes“, koncedis Andreo, „tion faras kelkaj viroj. Sed plej ofte aŭ ĉiam, se la edzinoj estas junaj kaj agrable aspektas, la viro ne plu revenos, pro sia edzino.“

Andreo sciis, ke *Estrellita* ne komprenas lin. Li ankaŭ ne povus fari ĝin komprenebla por ŝi, se li havus la intencon. Ĉar por tia kompreno mankis al ŝi grava antaŭkondiĉo. Steleto komprenis la vortojn alie.

Ŝi diris: „Tiukaze mi kompreneble ne volas iri kun vi. Mi tute certe ne volas havi la kulpon, ke vi ne revenos. Mi deziregas, ke vi revenu, tuj kiam vi estos liberiginta vian patron per laboro. Mi certe atendos vin, mi atendos kaj atendos. Ĝis la lasta spirtiro de mia vivo.“

„Jes, Steleto“, li diris pene, „tion mi certe volas, ke vi atendu min. Ankaŭ tion mi pripensis. Sed kie en la mondo vi povus atendi min? En la tuta vasta mondo, kiun mi konas, ne estas por vi, Steleto mia, eta loketo trovebla, kie vi trankvile kaj konfide povus atendi min.“

„Mi atendos en la domo de via patrino“, ŝi diris ĝoja.

Ankaŭ pri tio li kompreneble pensis.

„Tion vi povus, Steleto“, li klarigis al ŝi, „tion vi povus, se mia patrino loĝus tre malproksime kaj aliloke, kaj ne en la bieno. Post malpli ol semajno scius la bienulo, de kie vi fuĝis, ke vi vivas sur la bieno de *don* Arnulfo. Kaj li tuj rekondukigus vin helpe de la polico. Kaj kion vi pensas, kion lia filo, Jose, pri kiu vi rakontis al

mi, farus kun vi? Tion mi ne devas diri al vi.“

Ŝi fermis la okulojn kaj skuiĝis pro naŭzo kaj teruriĝo.

„Tio“, Andreo parolis plu, „estas plia kaŭzo, kial vi ne povas akompani min. La vojo al la monterioj kondukas tra la regionoj, kie la bienuloj estas la plej potencaj viroj kaj kie la oficistoj, la sekretarioj kaj lokaj estroj pafmortigas iun post konciza verdikto por dek pesoj kaj kelkajn glasplenojn da komiteko, se la bienulo volas havi tion tiel. Tion vi scias ja tiel bone kiel mi. Via bienulo ekscios tuj, ke vi estas en la regiono kaj li kaptigos vin el la marŝkolono kaj rekondukos vin. Sendepende de ĉiuj aliaj aferoj, kiuj certe okazos al vi, vi devus labori du jarojn por nenio por pagi la ŝuldojn pro via kaptiĝo. La bienuloj ne ekhavas konsciencriproĉojn pro indiĝeno aŭ eĉ malpli pro malgranda kara indiĝena knabino, kia estas mia Steleto. Ĉu ŝi mortas ĉu ne?! Estas ja tiom da indiĝenoj, tiom multaj, kaj ili estas pli malmultekostaj por bienulo ol junaj bovidoj.“

„Pri tio vi pravas“, diris per kapjeso *Estrellita*, „vi scias ĉion en la mondo. Kaj estas tiel, kiel vi diras.“

„Kaj nun, Steleto mia“, li parolis mallaŭte, „nun vi obeu al mi lastan fojon kaj faru, kion mi ordonos al vi.“

„Ne la lastan fojon“, rediris la knabino sen lasi finparoli lin, „ne la lastan fojon. Mi ĉiam kaj eterne obeos al vi. Tiom longe, kiom mi vivas, ĉar vi estas mia Sinjoro kaj ĉio.“

Dum certa tempo li estis plu pripensema por detale pripensi ĉiun paŝon, kiun iri li intencis rekomendi al Steleto.

Poste li diris, ĉiun vorton emfazante, por forte memorigi ĝin al la

knabino: „Ni iros nun supren al Jovel. Morgaŭ ni estos sur la revojo al Ĉiapaso. En Ĉiapaso mi faros la finkalkulon kun *don* Laŭreano. Mi havas ankoraŭ tre grandan ŝuldon je li. Estas ĉirkaŭ naŭdek pesoj. Li transskribos ilin al *don* Arnulfo. Kaj *don* Arnulfo transkribos ilin al mia konto en la monterio. Mi provos, ke *don* Laŭreano pruntedonu al mi dek pesojn aldone. Tion li certe faros. Mi bone servis al li dum multaj jaroj kaj neniam faris damaĝon al li. Tiujn dek pesojn mi donos al vi en Ĉiapaso. Vi bone envolvos ilin en vian jupon. Tiam iru kun la karavano, kiun kondukas Aŭrelio malsupren ĝis la trajnostacio. Aŭrelion mi konas bone. Li estas mia amiko. Mi parolos kun li. Li estas bona ulo, kiu vin sekure kaj en bona stato alvenigos malsupren en la stacion. Tiam vi veturu per la trajno al *Tonalá*. Tio kostas nur duonon de peso. Tie vi serĉu al vi bonan servon. Vi povas paroli nun sufiĉe de la hispana, vi sufiĉe bone povas legi kaj skribi. Vi povos enspezi ses aŭ ok pesojn ĉiumonate. Se ne plaĉos al vi post kelke da tempo aŭ oni traktos vin aĉe, jen veturu plu, eble al *Huixtla* aŭ prefere ĝis *Tapachula*. Tio estas grandega urbo, kie la servo estas bone pagata. Tie loĝas multaj usonanoj, kiuj traktos knabinon tian kia vin bone kaj bone pagas ŝin. Sed iru neniam en alian urbon ol nur en urbon ĉe la fervojlinio. Tie mi, se mi iutage revenos, povos serĉi vin kaj povos vin trovi. Se vi irus aliloken en la lando, mi certe neniam povus retrovi vin.“

„*No la olvidaré ni una palabra*“, ŝi diris hispane. „Eĉ ne unu el viaj vortoj mi iam forgesos, kaj mi ĉiam tiel agos, kiel vi diris tion al mi.“

Ŝi parolis tion kiel ĵuron.

## 11/15

Estis du tagojn poste, kiam la karavano reveninta de Jovel,

ekkampadis sur la sama malgranda paŝtejo.

La karavano alvenis la celon, kiam la nokto jam komenciĝis.

La bovoj estis prizorgataj kaj la ĉaroj troviĝis en taŭga veturordo.

La vespermanĝo estas finita kaj la ĉaristoj sidis ĉe la bivakfajro, fumante kaj babilante.

*Bonifacio* ludis sur akordioneto, kiun li aĉetis en Jovel. *Pascual* akompanis lin per gitaro. Du el la viroj kune dancis.

Tiam la luno leviĝis. Ĝi venis de la altebenaĵo ĉe Jovel. Iom post iom ĝi leviĝis alten en la klaran ĉielon, profunde ruĝa kaj plena kaj tiom granda kaj potence aspektanta, kvazaŭ li volus vori la teron per gluto.

Andreo leviĝis de la fajro.

Li iris transen al sia ĉaro.

Tie sidis Steleto sur la kondukista breto, revante aŭ en pensoj, turniĝante siajn plenajn kaj grandajn okulojn al la luno.

Andreo staris dum certa tempo apud ŝi.

Tiam li karesis ŝian hararon, kiun antaŭ la manĝo ŝi trakombis tiel zorgeme, kaj kiu nun longe kaj dense pendis malsupren de ŝi.

„Venu, *Yita*“, li diris.

Li levis ŝin malsupren de la ĉaro.

Ili iris malantaŭ la ĉaroj por eviti, ke la viroj ĉe la fajro povu vidi, en kiu direkto ili malproksimiĝas.

Kiam ili jam forlasis la paŝtejon, Andreo levis Steleton per siaj brakoj kaj portis ŝin malsupren al la rojo kaj sidigis ŝin en tiun malvastan liberan lokon, kiu estis por ili la unua hejmlando, kiun ili havis komune.

Kiel longaj trembrilaj harfasketoj el oro plenigis la lumo de la luno la rojon.

Antaŭ iliaj okuloj staris la vepro, nigra kaj ne trapenetrebla. Oraj platoj kun disŝiritaj randoj kuŝis sur la vepro, tie, kie kaptis densa kaj kunigita foliaro la lumon de la luno.

Malantaŭ ili kaj apud ili staris al ĉiuj flankoj arbustoj, arbustaĵoj kaj tuberhavaj miskreskintaj arbetoj. Kelkaj el ili plene banataj en la lumo de la luno, aliaj nur tuŝitaj de arĝentaj flagoj, kaj sur aliaj estis fiksitaj oraj ŝildetoj. La ombroj troviĝis distrite en la ore inundata libera loko de la deklivo, kvazaŭ ili estus la postlasitaj spiroj de tiuj arbustoj de la tago.

En ambaŭ hominfanoj, kiuj tie sidis silente, tenante sin permane, vekiĝis la ideo, ke tiu arbustaĵo estas vivanta kaj formas tutan mondon nur por si mem, kun siaj propraj formoj, kun sia speciala karaktero, simile al malbonintence ensorĉitaj hometoj, kiuj ekzistis kaj forpasis, kiuj estis malĝuste naskitaj kaj ne povis aranĝiĝi en pli favora tempo kun la efektiva mondo.

La vepro kantis. La arbustaĵo violonis. La herboj flutis kaj la rojo ludis profunde hoboje.

De la viroj, kiuj sidis supre ĉe la bivakfajro, forbloviĝis

malsupren forrompitaj akordoj de luditaj melodioj, kiuj ŝajne venis el tiom malproksima distanco, kvazaŭ ili estus la elspiro de postrestintaj kantoj, kiuj estis kantitaj de aliaj ĉaristoj similmaniere sur la sama paŝtejo kelkajn noktojn antaŭe.

Andreo kaj *Estrellita* tiom profundiĝis en pensojn, ke ili rigardus ĝin kiel profundan doloron de sia animo, se ili devus paroli. Ambaŭ havis senton, kvazaŭ ĉiu el ili pensas tion kion ankaŭ la alia pensas en tiu momento.

Superfortis ilin dolorige dolĉa urĝo sin reciproke perdi en la alia por gajni sin dum la daŭro de la ekzisto de l' universo por konservadi sin por eterne esti kunaj en la travivaĵo de sama sento kaj okazaĵo.

Kaj okazis sen ilia volo kaj sen ilia deziro, ke ili ambaŭ proksimiĝis plian paŝon pli al la ekkono de la esenco de multaj aferoj en la vivo de la homoj.

De la kampadejo kantis la ĉaristoj al ili: *„Amapola del camino“*. Ili kantis ĝin kun longaj sonoj kaj plena de melankolio.

Kaj la kanto ĉirkaŭblovis ilin ambaŭ kaj penetris en iliajn ardantajn spirojn, tiel, ke ĝi fariĝis ilia nuptokanto.

„Ne timu, Steleto“, diris Andreo, „estu kuraĝa. Kvankam eĉ centoj de la viroj kaj junaj viroj ne revenas kaj estas forblovataj kaj enterigitaj en la monterioj, mi revenos. Mi revenos al vi, *Estrellita* mia, kaj se la mondo pro tio devus disrompiĝi en pecojn.“

„Mi atendos vin, ĉiam kaj ĉiam“, diris ŝi.

**Rimarko**
*Amapola del camino* = La papavo de l‘ vojo.

F I N O

## GLOSARO

*aguardiente* = speco de brando
*ahora, muchachos, escuela* = Ek, knaboj, al la lernejo!
alkaldo = vilaĝestro, vilaĝa juĝisto
*amapola del camino* = la papavo de l‘ vojo
*amigo* = amiko
*Andrés* = Andreo
*amor para la patria* = amo al la patrujo
*arriero* = mulisto, mulpelisto, veturigisto
*ayuntamiento* = komunuma (urba) konsilantaro

*Bachajón Celtal* = regiono en Meksiko, kie oni parolas la celtalan, indiĝenan lingvon
*barrio* = urboparto, kvartalo ktp.
*Buenas noches* = Bonan vesperon! Bonan nokton!
*bueno* = bone, bona
*Buenos días señor profesor!* = Bonan matenon, sinjoro instruisto!

*caballeros* = sinjoroj,ĝentlemanoj
*cabildo* = urbodomo, municipa sidejo
*cacique* = kaciko, indiĝena vilaĝestro, tribestro
*Candelaria* = Kandelofesto, Puriĝo de Sankta Virgulino
*caray* = fulmotondro
*Caribe*-indiĝenoj = ĉe Traven: „*Carribe*-Indianer“ = certe estas la karibaj indiĝenoj
*carretera* = ĉarostrato

*celtalo* = germane: Tseltale, tribano de la indiĝenaj celtaloj
*cochino* = porko
*comisario* = komisiito
*comiteco* = speco de brando, produkita en C*omitán*, Ĉiapaso
*comiteco añejo* = pli longe aĝigita en lignaj bareloj ol simpla komiteko
*cómo?* = kiel?
*consideración* = respekto
*copita* = glaseto por brando, ekz. por komiteko aŭ por ĉerizbrando
*coronel* = kolonel
*cuartel* = kazerno
*cura* = pastro

*delegado* = prezentanto, parolisto
*don* = sinjoro
*feria* = foiro, jarfoiro
*fonda* = gastejo kun manĝejo
*fondas* = gastejoj kaj manĝejoj
*frijoles* = fazeoloj

*Gabucho* = Gabĉjo
*gracias* = mi dankas
hamako = ŝnura reto aŭ tolaĵo, horizontale pendigita per siaj du ekstremaĵoj kaj formanta porteblan liton en kiu oni kuŝas, aŭ sin balancas
*honradeza* = Ehrenhaftigkeit
ĥorongo = jorongo = lankovrilo ĉiam kun enmeza entranĉaĵo por la kapo, uzata kiel mantelo, similas al la sudamerika „ponĉo“
*inspector (angle)*= inspektoro

*jefe de la operaciones militares* = la militista ĉefo
*jefe politico* = politika ĉefo
*jorongo* = ĥorongo, lankovrilo ĉiam kun entranĉaĵo por la kapo en la mezo, uzata kiel mantelo, similas al sudamerika „ponĉo“

Jovel = praa indiĝena nomo de *San Cristobál*, plej ofte uzata de la celtaloj kaj cociloj

komiteko (*comiteco)* = speco de brando, produktita en *Comitán, Chiapas* (Ĉiapaso)
*la verdad es asi* = por diri la veron
ladino= mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en *Chiapas* (Ĉiapaso) uzata specife ankaŭ por diferencigi neindiĝenojn kaj neindiĝenojn, do ankaŭ blankulojn de indiĝenoj
leŭgo (legua) = mezurunuo distancrilata, surtere ĉirkaŭ 4,5 km-ojn
*licenciado* = advokato

mestizo = miksitulo kun indiĝena kaj blanka gepatroj, en Ĉiapaso uzata specife ankaŭ por tio diferencigi neindiĝenojn de indiĝeno, do ankaŭ blankulojn de indiĝenoj
*milpa* = maizejo
*montería* = monterio: laborkoncentrejo en la ĝangalo, kie indiĝenoj ofte sub la gvidado de eksterlandanoj dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn por povi fortransporti ilin de tie
mozo = servisto, servoknabo, servutulo, stalservutulo, portisto ks.
*muchacho* = knabo, junulo, eŭfemisme: servisto
*muchachos* = knaboj, junuloj
*muchachas* = knabinoj, ankaŭ eŭfemismo por putinoj
*multa* = punmono, punpago
*municipalidad* = municipo = municipio = komunuma administrejo, urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron
*nuevo* = nova

*Ora pro nobis* = Petu por ni! (Alparolado de sanktulo en la latina lingvo.)

*patria* = patrujo, patrolando
patrono = sanktulo aŭ ĉefo

*periodico* = gazeto
peso = monunuo en Meksiko
*petato* = mato
*pórtico* = portiko = kolonhalo
*profesoro* = instruisto, helpinstruisto ktp.
pueblo = setlejo de indiĝenoj, puebloindiĝeno
*Purísima* = la purega madono, Dipatrino

*realo* = dudek kvin centavoj
*rebozo* = tuko

*salvajes* = la sovaĝuloj
*sash* (arabe: شاش, *shash*) estas vesta zono por teni kune robon, kaj kutime ligita ĉirkaŭ la koksojn
*señor* = sinjoro
*señora* = sinjorino
*spick and span* (angle) = ege pura

t*ate* = patro
tekilo = speco de brando, destilita el la fermentita pulpo de agavo
tamaloj = *tamales* (hispanlingve)
*tienda* = vendejo, butiko
tsotsilo = ano de indiĝena tribo en Meksiko, ekz. en Ĉiapaso

*viejo* = la maljuna ĉefo
*Viva Mexico, viva arriba!* = Vivu Meksiko, vivu ĝi

***